


ĈARO

B.Traven



Mahagonciklo romano I

Aŭtoro	B.Traven
Titolo	Ĉaro
Tradukis	Dorothea & Hans-Georg Kaiser (Donjo & Cezar) laŭ la unua eldono 1931 „Der Karren“ de Librogildo Gutenberg, Berlino.
Lingve kontrolis	Juan Jacobo Schmitter Vladimir Türk
Aranĝis	Frank Vohla Hans-Georg Kaiser
Finredakto	je la 14-a de oktobro en la jaro 2016

Ĉapitro 01

01

Andreo Ugalde havis pure indiĝenan sangon kaj apartenis al la granda popolo de celtaloj.

Li devenis de la bieno Lumbojvil en la distrikto de Simojovel. La kompleta nomo de tiu bieno estis *Santa María Dolorosa Lumbojvil*.

Lumbojvil estis la pramalnova indiĝena nomo de ekonomia komunumo de indiĝenoj kaj ĝi signifas „kultivita tero“. Post la hispana konkerado oni forprenis tiun komunumon de la indiĝenoj, kaj la ĉefa guberniestro, kiu tie komandis, vendis aŭ donacis la grundon al hispana soldulo, al landskneĥto, kiu transformis la komunumon al *finca*, al sia bieno. La indiĝenoj, la originaj posedantoj, restis en la vilaĝo, kiu troviĝis meze de la iama komuna grundo, ĉar ili povis iri al neniu alia loko. Parte ili restadis plu tie pro sentimentala fideleco al la tero, sur kiu ili naskiĝis, kaj parte pro la rapide disvastiĝanta ekkono, ke atendus ilin tute sama sorto, kien ajn ili irus. Ili ne plu estis sendependaj kamparanoj sur la propra grundo. La

bienposedanto, la nova mastro sur la grundo, asignis laŭ sia plaĉo kaj bontrovo al ili agrojn, sur kiuj ili kultivis la fruktojn bezonatajn por vivteni sin kaj siajn familianojn. Tio estis la pago por la laboro, kiun ili devis plenumi por la nova mastro, kies servutuloj ili fariĝis.

La hispanoj, se ili akiris tian komunuman grundon, adoptis la malnovan indiĝenan nomon, ĉar tio estis la ununura vojo por ebligi, ke la indiĝena loĝantaro uzinta la nomon dum jarcentoj, povu scii kie ili estas kaj kien ili apartenas. Sed la hispanoj, por esti certaj pri la protekto de siaj propraj dioj en la ĵus akirita tereno, metis antaŭ la indiĝena nomo bonan pian. En tiu ĉi kazo: *Santa María Dolorosa*.

Pro heredaĵoj kaj vendoj la bieno iom post iom trapasis la manojn de multaj posedantoj. Sed tio, kio neniam ŝanĝiĝis ĉe tiuj aĉetoj kaj vendoj, estis la grundo mem kaj ties originaj loĝantoj. Sur la bieno loĝis ankoraŭ la samaj familioj, kiuj tie jam loĝis antaŭ ol venis la hispanoj. Fidelaj al la grundo kaj al la tero ili atendis trankvile kaj pacience la tagon, kiam ili denove fariĝos la posedantoj.

La tiama posedanto estis don Arnulfo Partida, meksikano

de hispana deveno. Pri sia hispana deveno li tre fieris, kvankam li verŝajne havis en siaj vejnoj pli da meksika kaj indiĝena sango ol hispana.

Rimarkoj

landskneĥto= tiu internacia vorto ne estas en la nova PIV. Mi trovis ĝin en vortaro de profesoro Erich-Dieter Krause.

Okazis malofte, ke familiano de la peonoj povis forlasi la bienon. Se la patro estis peono, ankaŭ la filo estis peono, kaj la filino estis la edzino de peono. Tio estis preskaŭ leĝo. Kaj se peono forkuris por vivi sian propran vivon, la bienposedanto pagis kvin pesojn al la prezidanto de la distrikta *municipalidad*, kaj la prezidanto ordonis al la polico kapti kaj rekonduki la eskapintan peonon en la bienon. Post la trasufero de speciala puno pro la forkuro, la peono ankoraŭ devis pagi la kvin pesojn per laboro. Sed indiĝeno havas tiajn intimajn rilatojn al sia familio kaj al siaj sangokunuloj kaj amikoj, ke peono nur tre malofte ekpensas forkuri de la bieno, al kiu li apartenas.

Andreo Ugalde forlasis la bienon sen la devo fuĝi. Ĉu la forlaso de la devena bieno, kvankam ĝi signifas certan servutecon por la peono, ĉiam estas bonŝanco, ne klare respondeblas. Estas tre ofte je lia persona malutilo, kaj tre ofte estas je lia avantaĝo. Por scii tion antaŭe aŭ eĉ lerte kaj sukcese adaptiĝi al la nova ĉirkaŭaĵo, mankas al la peono la inteligenteco, kiun la bienposedanto timeme evitas evoluigi. Kaj se tiu evoluigo de la inteligenteco de la

peono eĉ okazas fare de la ŝtato, la bienulo fariĝas malagraba, tiam li iĝas tre maloportuna por la ŝtato. Li iĝas monarkiisto aŭ bolŝeviko aŭ gvidanto de ribeluloj, kio ajn, se li nur povas malhelpi per tio la danĝeran zorgadon de la ŝtato pri siaj peonoj.

Rimarko

municipalidad = municipo aŭ municipio (urbo aŭ teritorio havanta relative sendependan registaron)

Filino de *don* Arnulfo edziniĝis kaj vivis ekde tiam en Tenejapa. Tenejapa estas bela kaj pura urbeto, priloĝata je duono de meksikanoj, tiel nomataj *ladinos*, kaj je duono de pursangaj indiĝenoj. La indiĝenoj kaj la meksikanoj loĝas en urbokvartalo por si mem. Sed sur la foirplaco kaj en ĉiuj vendejoj la indiĝenoj miksiĝas kun la meksikanoj, tiel kiel ĉie en la mondo miksiĝas la loĝantaro de urbo. La meksikanoj havas sian propran urbestron kaj la indiĝenoj havas sian propran *jefe*, do tribestron aŭ kacikon, aŭ kiel ajn ili nomas lin.

Doña Emilia ne povis trovi en sia nova loĝejo la ĝustajn servoknabinojn. Aŭ ŝi ne povis kutimiĝi al la indiĝenaj knabinoj en *Tenejapa*, aŭ ŝi volis havi familiarajn vizaĝojn ĉirkaŭ si, aŭ kial ajn. Ĉiukaze ŝi sendis indiĝenan servoknabon kun letero al sia patro. Ŝi petis la patron sendi du knabinojn de la hejma ranĉo. Kaj ŝi tuj menciis la nomojn de la dezirataj knabinoj, Ofelia kaj Paŭlina. Ambaŭ knabinoj jam servis hejme en la domo de la patro, kaj *doña* Emilia havis ilin dum longa tempo ĉirkaŭ si en la kuirejo kaj en la loĝoĉambroj. Por peti la deziratajn

personojn senprokraste, ŝi skribis ankaŭ al la patro, ke li sendu lertan knabon, kiun la juna edzo nepre bezonas en sia vendejo.

Don Arnulfo ne povis rifuzi ion al sia filino, des malpli, ĉar ŝi aludis, ke li fariĝos avo en la preskribita tempo, kion ŝi subite rimarkis en la pasinta semajno. La patro pro tio rapidis sendi la du deziritajn knabinojn, kaj li ankaŭ tuj elektis la knabon, kiu kuniros.

Tiu knabo estis *Andreo*. Unu el la knabinoj, *Ofelia*, estis lia onklino. Ĉar li foriris kun sia onklino, estis pli facile por li foriri de la patra *jacalito*, de la argila kabaneto, en kiu li naskiĝis.

Okazis la unuan fojon en lia juna vivo, ke li foriris de hejme. La patrino ploris, kiam ŝi knedis la maizokaĉon por li. Sed lia patro estis stoika kaj ne montris, kion li vere sentis. Tamen la knabo perceptis per sia vira instinkto, kiel profunde la patro lin amas kaj kiom lin dolorigas la traskuiga apartiĝo. Kvankam tiu ne montris eĉ ne per la plej eta movo en sia vizaĝo, kion signifas por li la apartiĝo de sia filo. En la nigre brunaj okuloj de la patro estis nur febla flagrado, stranga brilado, kian la

knabo antaŭe vidis ĉe la patro neniam. Sed ĝi malkaŝis al la filo tiom profundan amon, kiun li ĝis tiu momento neniam supozis ĉe sia patro. Ĉar Criserio estis simpla viro, kiu sciis pri la mondo kaj la vivo ne pli ol instruis lin kaj povis instrui lia *milpa*, la maizkampoj, lia fazeola kampo, liaj ŝafoj, la kampoj kaj brutaroj de lia patrono. Li povis nek per vortoj nek per gestoj esprimi siajn sentojn, li ankaŭ tute ne ekpensis esprimi ilin.

Tiu palpebrumo en la okuloj de lia patro ĉe la adiaŭo de la filo de hejme destinis la tutan pluan vivon de la knabo. Ĝi estis la granda turnopunkto en la formado de lia karaktero kaj la komenco pri la konstruo de lia sorto.

Andreo tiam havis dek unu jarojn.

La du knabinoj oni sidigis sur ĉevalojn, kaj iliajn malmultajn vestetojn kaj dormkovraĵojn oni pakis en fragmitajn matojn kaj poste sur mulon.

Andreo kaj la junulo, kiu estis kunsendita, por ke li akompanu ilin kaj rekonduku la bestojn, iris piede.

La vojaĝo daŭris tri tagojn.

Ambaŭ knabinoj kaj la knabo, kiuj havis hejmsopiron, sentis plifaciliĝon, kiam ili revidis la bone konatan vizaĝon de *doña* Emilia en *Tenejapa*. Eĉ kvankam tio okazis en la domo de la patrono, *Doña* Emilia naskiĝis ja sur la sama tero kiel ili. Ŝi estis nur jaron pli aĝa ol Ofelia kaj nur tri jarojn pli aĝa ol Paŭlina.

Ili kune plenkreskis, ĉar la du indiĝenaj knabinoj tre frue komencis sian servon en la domo. Kaj en tiu domo ili kune mastrumadis en la kuirejo kaj en la loĝoĉambroj, kune ridis, ploris, dancis, surgenuis antaŭ la sanktaj bildoj en la kapelo de la bieno kaj havis siajn komunajn malgrandajn sekretojn. *Doña* Emilia parolis la indiĝenan lingvon tiel flue kiel la knabinoj, kaj la knabinoj scipovis

sufiĉe de la hispana lingvo por komprenigi sin inter meksikanoj.

Doña Emilia estis ĉiam tre ŝatata ĉe la peonaj familioj de lia patro, kvankam kompreneble kun la ofta limigo, ke oni ŝatis ŝin tiel, kiel en reĝlando iafoje oni pli ŝatas la kronprincon ol la reĝon. Sed ŝi ĉiam helpis al malsanuloj kaj provis esti justa, kiam ajn tio estis ebla, se laŭ ŝia opinio al iu el la peonoj, la patro aŭ la *mayordomo*, la intendanto faris maljustaĵon. Kaj tiel, restante en la proksimo de la familiara juna ino, la du knabinoj kaj la knabo jam post kelkaj tagoj preskaŭ forgesis, ke ili troviĝas en nova ĉirkaŭaĵo.

Don Leonardo, la edzo de *doña* Emilia, estis afabla viro, kiu ŝajne ne povis fari malbonaĵon al iu. Li ankaŭ ne interesiĝis pri la servistaro de sia edzino. Al la knabinoj ŝajnis, ke li estas pli bona kaj pli bonkora patrono ol *don* Arnulfo, kiu ofte tre koleriĝis.

Don Leonardo estis *comerciante*, komercisto. Li havis en Tenejapa certan *tienda de abarrotes*, nutraĵvendejon kaj magazemon por ĉiuj specoj de varoj: sukero, kafo, maizo; fazeoloj, sapo, faruno, brando, konservuoj, ŝuoj, lanternoj, hakiloj, konfekciaj vestaĵoj, ĉemizoj, kotonostofoj, silkaj rubandoj, fonografoj, medicino, tabako, sanktaj bildoj, inko, biero en boteloj, parfumoj, seloj, kartoĉoj. Estis kvazaŭ *Wanamaker Department Store* en liliputa formato, kiun oni, en tiu duone indiĝena kaj duone meksika urbo Tenejapa kun ĉirkaŭ mil loĝantoj, devis nomi granda kaj metropola.

Don Leonardo tute bone kapablis zorgi sola pri la ampleksa vendejo. En ekstrema kazo, se alkuris tro multe da homoj, ekzemple, se ino deziris kandelon por tri centavoj kaj indiĝena ino samtempe por du centavoj volis havi ricinan oleon, *doña* Emilia kelkfoje alsaltis por helpi. Sed, ke du homoj samtempe venis en la vendejon por aĉeti ion, tio okazis nur malofte, kaj se tio efektive iam okazis, tiam en foira tago. La kutima vendeja tago pasis tiel, ke frumatene je la kvina kaj duono kaŭris antaŭ la

pordo indiĝeno , kiu en la sama momento, kiam oni malfermis, eniris kaj postulis por *quinto*, do por kvin centavoj, tabakfoliojn. Du horojn poste venis infano kaj postulis por *medio*, do por ses centavoj, muelitan kafon. Je la deka kudristino sendis infanon pro maŝinaj kudriloj de la grandeco sep. La vendeja posedanto ordonis informi, ke li ne havas la grandon sep. La infano kuris hejmen, revenis kaj diris, ke ankaŭ la grando ok akcepteblas. *Don* Leonardo ordonis informi, ke li bedaŭrinde ankaŭ la grandon ok ne havas, sed nur la grandon naŭ. La infano revenis kaj aĉetis por tri centavoj kudrilon de la grando naŭ. En la paso de la tago oni interŝanĝis tiam la kudrilon kvarfoje, ĝis la partioj finfine interkonsentiĝis vespere pri la grando kvin kaj la vendo estis finita per tio; sub la kondiĉo, ke la kudristino havas la rajton interŝanĝi la kudrilon en la paso de la semajno, se la grandeco tamen ne taŭgus.

De tempo al tempo kompreneble ankaŭ paro da botoj trovis aĉetanton, aŭ ses metroj da krepŝtofo aŭ dudek kvin piloloj el kinino aŭ eĉ tuta blua robo por dudek tri pesoj. Tio estas, dudek tri pesojn *don* Leonardo postulis por ĝi, ĉar li importis la robon el Nova Jorko. Post kvar

horoj la robo estis vendita por dekkvar pesoj, kion *don* Leonardo kaj ankaŭ la aĉetintino priploris, aŭ almenaŭ ŝajnis priplori. Li, ĉar li devis fordoni la robon sub la aĉetprezo kaj nur pro tio povus fari tion kaj faras, ĉar ŝi estas najbarino kaj iros al geedziĝa festo, kaj ĉar li esperas, ke ŝi ekde nun estos lia fidela klientino ĝis la fino de sia vivo. Dum ŝi ŝajnis plori, ĉar ŝi intencis aĉeti robon nur por ok pesoj kaj nun devas fordoni sian tutan ŝparitan monon, por ke ŝi povu pagi ĉi tiun skandale multekostan robon. Kiam la vendo estis finita, *don* Leonardo rakontis al sia juna edzino, ke li gajnis ses pesojn je la robo, kaj la aĉetintino rakontis en la tuta urbo, ke ŝi lerte trompis *don* Leonardon, ke ŝi kaptis la robon, kiu valoras minimume tridek pesojn, por la ridinde malgranda prezo de dek kvar pesoj, kaj ke ŝi aĉetis neniam en sia tuta vivo tian bonan kaj modernan robon por tiom malmulte da mono.

Tiu *tienda* sinjoron Leonardon ne riĉigis, kaj apenaŭ bonstatigus. La konkurenco estis tro granda. Ĉiu tria domo en la urbeto estis vendejo. Kompreneble la ceteraj vendejoj ne estis tiel grandaj kaj la varoj ne estis tiom multaj kiom tiuj de *don* Leonardo. La plej multaj vendejoj

ne estis pli grandaj ol la vendokesto de kolportisto, kaj en duono de ĉiuj vendejoj oni povus aĉeti ĉiujn ekzistantajn varojn por la elvenda prezo de dek pesoj, kaj ĉe tio oni eĉ riskus perdi monon.

Don Leonardo faris aliajn negocojn, kiuj enspezigis pli. De indiĝenaj kampanoj, loĝantaj en sendependaj komunumoj, li aĉetis grandkvante maizon kaj vendis ĝin poste kun bona profito en la pli grandaj urboj Jovel, Tuxtla, Yalanchen, Balún-Canán. Li aĉetis en la distrikto Simojovel kafon kaj en la distrikto Pichucalco kakaon kaj vendis tiujn varojn al la pli grandaj usonaj aĉetistoj de kafo kaj kakao ĉe la fervojstacio. Li aĉetis en Hucutsin milojn da tabakfaskoj kaj vendis ilin al la komercistoj en la urboj. Li faris tiujn negocojn ne grandskale.

Kompreneble ne. Por tio mankis al li sufiĉe da kapitalo, kaj ĉeestis ankaŭ tro multe da aliaj grandkvantaj aĉetistoj, kiuj malfaciligis reciproke la vivon kaj la ekzistadon.

Krome la produktado ne estis sufiĉe granda kaj stabila por riĉigi lin. Sed tamen tiuj kromnegocoj estis granda helpo por atingi komfortan bonan staton. Li havis bonajn kialojn konsideri sin pli bonstata ol lia bopatro, *don* Arnulfo.

Rimarkoj

Jovel = malnova indiĝena nomo de San Cristobal.

Balún-Canán = antikva majaa nomo, loko, kie troviĝas nun la urbo Comitán en Ĉiapaso.

Ĝis nun lia onklino helpis al li en la vendejo. Sed ekde lia geedziĝo la onklino kaj li estis malamikoj. Patrinoj kaj onkloj estas tiaj, ke ili fariĝas malicaj kaj eĉ mordemaj, se iliaj protektatoj geedziĝas kaj ili ne estas kunakceptataj en la geedzeco ĝoje kaj per vaste etenditaj brakoj. Kaj onkloj, speciale, se ili estas onkloj postrestintaj, foje pli sangosoifas ol bopatrinoj. La bopatrino, eĉ la bona, la escepto, estas postrestaĵo el la tempo de la kavernaj homoj. Tion oni tiel ofte forgesas, kaj tial la ŝercoj pri la bopatrino estas plej ofte tiel enuaj.

Don Leonardo ne emis havi sian junan edzinon ĉiam en la vendejo, kvankam tio estis normala en la malgrandaj urboj de Meksiko kaj precipe en la vendejoj de la suba meza klaso. La meksikana ino ĉe negocoj tre superas la viron. Ŝi estas pli laborema ol li, pli lerta kaj pli rapida en la komprenado de situacioj. Kiam la ino en la lando Meksiko iutage eniros la politikon – okazaĵo, kiu ĉe la elektoj de la jaro 1929 tre proksimis – tiam la meksika respubliko certe havos internan pacon kaj enorme progresos, ĉar la ino disponas pri io, kio mankas al la

meksikana viro: la kapablo antaŭkalkuli kaj la trankvilo por pacience atendi la antaŭkalkulitan.

Ĉar *don* Leonardo ne deziris vidi sian edzinon ĉe la laboro en la vendejo, almenaŭ ne necese, li pensis pri knabo, kiun li tiel povus instrui en la vendejo, ke li kapablos anstataŭi lin, kiam li, pro siaj aĉetoj, ne povas esti hejme.

Doña Emilia priskribis kaj rekomendis la knabon Andreo al li. Andreo venis naŭjara en la patronan domon de *don* Arnulfo por servi ĉe la manĝotablo. En la ranĉoj kaj *haciendas* en Meksiko preskaŭ ĉiam knaboj servas ĉe la manĝotablo, tre malofte knabinoj. Estas preskaŭ ĉiam knaboj de unu aŭ de kelkaj peonoj de la *hacienda*, do ĉiam indiĝenaj knaboj. Kompreneble ofte estas ankaŭ infanoj, kiuj naskiĝis kiel rezulto de amrilatoj de la bona patrono aŭ de liaj plenkreskaj filoj kun unu aŭ pluraj indiĝenaj knabinoj de la *bieno*.

La laboro de knabo en la domo de la patrono estas konsiderata kiel deviga laboro, kiun oni kreditas al lia patro. Al la patro de la filo oni asignas eble iom pli grandan agron, aŭ oni minusas unu aŭ du tagojn de lia dusemajna ĉiumonata deviga laboro ĉe la patrono, aŭ li

ricevas la rajton teni kelkajn kaprojn aŭ eĉ bovinon sur la paŝtejoj de la patrono, aŭ la knabo nuligas per sia laboro la ŝuldon ĉe la patrono faritan de la patro, eble pro tio, ke tiu bezonis ŝtofون por ĉemizo aŭ ĉar li akiris porkidon aŭ hundeton de la mastro.

Andreo servis ne nur ĉe la tablo, sed li helpis ankaŭ ĉe la lavado de la manĝilaro, li helpis ĉe la purigado de la ĉambroj, akvumis la florojn en la ĝardeno, purigis la rajdistan ekipaĵon de la patrono, helpis ĉe la banado de la rajdoĉevaloj, helpis alporti la akvon el la rivero, kaj kiam videble nenio alia farendis, vokis lin la *mayordomo*, la intendanto, kaj tiam li devis helpi ĉe la tordado de ŝnuroj. Kaj tamen, kion ajn li faris, ĝis la eksceso li laboris neniam. Tiel, kiel neniu peono devis laboraĉi ĝismorte, eĉ ne unu el ili, kvankam ili ĉiuj troviĝis en certa formo de servuteco. Sur tiu bieno ĉiukaze ne, ĉar oni faris nenion tro haste, nek ĉi tie nek sur iu alia bieno en la posedo de meksikano aŭ de hispano kun indiĝena sango. Se iu el la domo iam alvokis la knabon Andreo, kaj tiu ne venis, ĉar li interbatiĝis kun aliaj knaboj de la vilaĝo, oni superŝutis lin per insultoj, kaj ĉeokaze ankaŭ vangofrapo trafis lin, sed poste oni jam forgesis la incidenton.

Kaj tamen la servo en la domo por Andreo estis granda avantaĝo. Li aŭskultis tie la hispanan lingvon kaj en la tempo post la alveno en *Tenejapa*, li lernis la lingvon tiel rapide, ke li baldaŭ povis paroli ĝin tiel bone, kiel la tieaj meksikanaj knaboj. Kaj ĉar li samtempe parolis ankaŭ sian gepatran lingvon, la celtalan, kiun la indiĝenoj en Tenejapa kaj en ties vasta ĉirkaŭaĵo parolis, malgraŭ tio, ke ĝi iom deflankiĝis de la dialekto de Andreo, la knabo havis grandan valoron por *don* Leonardo. Ĉar *don* Leonardo havis, precipe en foiraj tagoj pli da klientoj indiĝenaj ol meksikanaj.

Don Leonardo baldaŭ havis bonan opinion pri la knabo. *Andreo* volonte lernis kaj li estis inteligenta kaj lerta. Li lernis rapide diferencigi la diversajn varojn kaj ĝuste nomi ilin, li lernis, por kio ili uzeblas kaj kiun kvaliton ili havas, li memortenis iliajn prezojn kaj baldaŭ li lernis ankaŭ, kiun maksimuman prezon li devas proponi por certa varo kaj kiom multe eblas malpliigi ĝin, por ke lia mastro ankoraŭ havu gajnon.

Don Leonardo sendis la knabon en vesperan lernejon, por ke li lernu legi, skribi kaj kalkuli. Ne pro troigita amo al la knabo kaj eĉ malpli pro la zorgo pri la futuro de la knabo, sed kun certeco pro pure egoistaj motivoj, ĉar tio estis utila por li mem. La knabo nur tre malmulte scipovis kalkuli. Kiam iu kliento donis al li peson kaj la venditaj varoj kostis okdek ses centavojn, li devis unue demandi *don* Leonardon aŭ *doña* Emilia au devis eĉ antaŭe serĉi ilin, por ke ili diru la sumon, kiom li devos redoni. Tio estis tro komplika, kaj ofte ĝena, kiam *don* Leonardo ekzemple sidis ĝuste ĉe la tablo aŭ volis legi gazeton. Kaj krome estis moleste, ke la knabo ne povis legi la

surskribojn sur la kestoj kaj pakaĵoj kaj pro tio ofte malfermis la malĝustajn kestojn aŭ intermiksitis la ciferojn de la prezoj kaj tiel riskis vendi la varojn tro malkare.

Don Leonardo konsideris kaj konkludis kalkulinte, ke la knabo havus pli grandan valoron, se li povus legi, skribi kaj kalkuli. Ĉi tie je malgranda skalo okazis nur tio, kio ĉie en la mondo okazas grandskale. La fabrikistoj, la grandkapitalistoj, la grandbienuloj en la fundo de sia naturo malinklinis la klerecon de la proletoj. Ili ĝuste sentis, ke la edukitaj proletoj povas endanĝerigi ilian privilegiitan pozicion en la mondo. Sed la ekonomia vivo fariĝis tiom komplika kaj komplikita, ke fabrikiston, kiu havas needukitajn proletojn, bankrotigas tiuj fabrikistoj, kiuj arigas edukitajn kaj tre inteligentajn laboristojn ĉirkaŭ si. Tornisto de fero, kiu ne povas kalkuli, kiujn transmisiajn radojn li devas alĝustigi, se li devas torni kanelon el dek helicerroj je longo kun unu colo, estas en la nuna tempo sen valoro por fabrikisto. La maŝinoj, kiujn la laboristoj devas manipuli en la nuna tempo, plej ofte estas tiel komplikaj, ke la laboristo, kiu ne povas fulmrapide legi ĉiujn surskribojn sur la sennombraj levumiloj, radoj kaj brakoj sur sia maŝino, povas kaŭzi al

la fabrikanto dum du sekundoj damaĝon dekmildolaran. Laboristo, kiu la prezentitajn teknikajn desegnaĵojn ne kapablas legi, kompreni kaj labori laŭ ili, estas ne uzebla por nuntempa fabrikisto. La nuntempa kapitalisto, por esti kaj resti kapitalisto, devas subteni, ja eĉ instigi la ŝtaton, ke ĝi donu al la infanoj de la proletaro tian bonan edukitecon, kian antaŭ cent jaroj nur malofte havis la infanoj de fabrikistoj, ĉar li ja iutage bezonos ilin kiel laboristojn. La kapitalisto devas subteni la edukadon de la proletaro kun siaj pagitaj impostoj. Li faras tion kun amara kolero en la koro, sed li ne havas alian eblon. En la nuna tempo, kaj eĉ pli en la futuro, ne tiu lando staros en la unua loko en la mondo, kiu havas la plej kleran regantan klason, sed tiu lando decidus pri la valoro de la dolaro, kiu edukas interne de siaj landlimoj la plej kleran proletaron.

Tial estis puraj konsideroj pri utileco kaj la propra avantaĝo, kiuj instigis *don* Leonardon, doni al la knabo limigitan lernejan edukadon. Kaj oni certe jam nun povas diri, ke, se la knabo iam farus individuan uzon de sia klereco laŭ maniero, kiu ne plaĉas kaj ne utilas al *don* Leonardo, tiu nomus lin sendankema mizerulo, knabo, el

kiu li faris homon, kaj kiu nun rekompencas la grandan bonecon de lia mastro per senhonta sendankeco. Kaj li aldonus, ke, se li, *don* Leonardo, estus sciinta tion pli frue, li estus lasinta la knabon en ties kota indiana vilaĝo kaj sin certe detenus de tio elspezi monon, por ke la knabo lernu ion.

La bona mono, elspezita de *don* Leonardo por la lerneja edukado de la knabo, ne estis multa, sesdek centavojn ĉiumonate. Sed *don* Leonardo faris multan bruon pri tiuj elspezoj.

Efektive li havis kaŭzon multe paroli pri tio. Li certe estis la ununura homo en la urbo, kiu sendis indiĝenan servoknabon en la lernejon kaj eĉ pagis por tio. Al aliaj meksikanoj, loĝantaj en Tenejapa kaj havantaj indiĝenajn servinfanojn, eĉ ne venis en la kapon ebligi al siaj servantoj la akiron de iom da edukiteco. La servinfanoj, ĉu knaboj ĉu knabinoj, laboris de la kvina frumatene ĝis la deka vespere. Ne estis en ĉiu kazo streĉiga laboro, sed ili ĉiam devis esti sur la piedoj, kaj ili devis ĉeesti, kiam ajn oni vokas ilin. La servinfano ne malhaveblis eĉ horon. Almenaŭ imagis tion lia mastro kaj lia mastrino. Kaj sendi lin en lernejon estis ne nur frenezaĵo, sed ankaŭ peko. Frenezaĵo ĝi estis tial, ĉar povus okazi, ke la indiĝena knabo post iom da tempo pli kapablus kaj pli scius ol la propra filo de la mastro. Ĉar oni kutime tre neglekte zorgis pri la edukado de la gemastraj infanoj.

Plej ofte oni rigardis kiel sukceson jam tion, se ili iom povis legi kaj skribi. Peko estis pro tio, ĉar la eklezio ne estis tre bonvolema, se temis pri la edukado de la indiĝenoj. La eklezio volis lasi la indiĝenojn en ilia senkulpeco kaj senscienco, ĉar tiel la ĉiela regno estas certa al la senkulpaj infanetoj, dum ĉe edukita indiĝeno oni neniam scias, kien lin kondukos lia eduko. La ekzemplo de la indiĝeno Benito Juarez estis tiam ankoraŭ tre freŝa kaj restas freŝa eĉ nun. Tiu indiĝeno el Oaxaca, vivinta ĝis la dekkvina jaro en paradiza senscienco, ricevis la eblon akiri iom da edukado. Kaj kiam li post multaj penoj finfine fariĝis klerigita homo, li konfiskis la eklezian proprieton por la meksika popolo kaj tiel radikale stucis la eternajn rajtojn de Dio persone transdonitajn al la eklezio, kiel kuraĝis tion antaŭe ankoraŭ neniu kontraŭ la katolika eklezio. Ne mirakle, ke la eklezio oblikve rigardis la edukadon de la indiĝenoj.

La sesdek centavoj, elspezitaj de *don* Leonardo por la lerneja edukado de Andreo, fakte estis multe malpli granda elspezo ol ŝajnis. La kialo: Andreo ne ricevis salajron.

Kiu estus tiel freneza pagi salajron al indiana knabo?! La indiana knabo devas ĝoji pri la honoro, ke oni permesas al li labori. Tio estas sufiĉe da salajro. Kaj la patronon oni danku por tio, ke li okupas lin.

Andreo ricevis la manĝon. Ĝi estis abunda. Tion oni devas koncedi. Sed lia manĝo estis malofte io alia ol rostitaj flanoj el maiza kaĉo, nigraj faboj kaj akraj kapsikoj, aŭ por diri tion pli precize, *tortillas*, *frijoles* kaj akra verda pepro. Se la knabo ne tuj ĉemanis, kiam oni vokis lin, aŭ se li misfaris ion dum sia laboro, oni diris ĉiufoje al li, ke li eĉ ne meritas la manĝon, kiun lia mastro ĉiutage perdas pro li.

Krom la nutraĵoj li ricevis ankaŭ la vestaĵojn de sia patrono. La vestoj konsistis el blanka kotonpantalono, blanka ĉemizforma kotonjako kaj bastĉapelo. Ŝuojn kaj botojn la knabo ne ricevis. Eĉ ne sandalojn. Li iris ĉiam nudapiede kaj neniam dum sia vivo havis ion je la piedoj. La knabo kutimiĝis al tio kaj ne sciis ĝin pli bone.

Kiam estis *fiesta*, la festo de la sankta patrono de Tenejapa, la knabo ricevis eble kvin centavojn, aŭ se lia mastro estis en donacema humoro, du realojn, do dudek

kvin centavojn, por ke li povu aĉeti *dulces*, bombonojn. Tio estis unufoje en la jaro, ĉar la *fiesta* okazis nur unufoje en jaro. Sed tio ne estis ĉio. Se la knabo havis sian *día del santo*, la tagon de sia propra sankta patrono, li ricevis denove dek centavojn kaj eble novan *cinturón rojo de lana*, ruĝan lanozonon, rubandon, kiu servis por la firmtenado de lia kotonpantalono ĉirkaŭ la koksoj.

Liton li ne havis. Li ankaŭ ne kutimiĝis al iu. Li dormis sur *petate*, sur mato el basto, kiun li sternis en angulo de la kuirejo aŭ en angulo de la portiko. La petaton li kunprenis de hejme.

Ĉar la knabo ricevis ankaŭ dum sia servado en la patrona domo de la bienulo neniam salajron, kaj tie eĉ ne unu centavon sur la manon, li tute ne sciis, kio estas salajro. Kaj ĉar li nun ricevis dufoje en la jaro kelkajn centavojn de sia mastro, li opiniis, ke li faris en sia vivo grandan paŝon antaŭen. Jen sistemo, kiu kapitaliston povus paligi pro envio, kaj kies laŭleĝa tutmonda enkondukado estas la volupta revo de ĉiu labordonanto.

La instruisto facile povis eduki la knabon por sesdek centavoj ĉiumonate.

Li havis salajron da dudek kvin pesoj dum monato.

La *Jefe Politico*, la distrikta ĉefo, havis sescent pesojn ĉiumonate, se oni ne konsideras la enspezojn, kiujn li enkasigis el ĉantaĝoj kaj kiel ŝmirmonojn. Tio estis pli ol la salajro.

El ĉiuj dungitoj de la ŝtato la instruisto havis la plej malgrandan salajron.

Prokurorojn kaj policajn direktorojn oni pagas dudekoble pli bone. Oni pagas ilin dudekoble pli bone kaj estimas ilin centoble pli alte, ĉar estas ilia tasko ronĝi la difektojn de la homaro. Tasko, kiu estas necesa por konservi la ŝtaton kaj komprenigi al la homoj, ke la agnosko de la privata propraĵo estas signo de la civilizacio.

La instruisto ne povis ĉantaĝi iun, ĉar li havis je tio nek rajton nek la potencon. Kaj neniuj pagi ŝmirmonon al li, ĉar estis tute egale por la gelernantoj aŭ iliaj gepatroj, ĉu iu en la lernejo sukcese trapasis ekzamenon,

ĉu ne.

Li povis plibonigi siajn enspezojn nur per tio, ke li aranĝis vesperan lernejon por plenkreskintoj kaj infanoj, kiuj dum la tago ne povis veni en la lernejon. La plimulto de la urbetaj infanoj, kaj de la indiĝenoj ĉiuj, devis labori dum la tago. Kelkaj sur la kampoj, kaj la aliaj en iu hejmindustrio, kie ili gisis kandelojn, tordis cigaredojn, formis el argilo kuirejajn vazojn, teksis lanajn kovrilojn, prilaboris ledon, bolis bombonojn kaj plektis ĉapelojn.

La instruisto kalkulis por ĉiu lernanto, ĉu plenkreska ĉu ne, peson ĉiumonate. Multaj familioj ne povis pagi tion, kaj tial la infanoj restis sen lerneja edukado.

Don Leonardo estis bona komercisto, li sciis, kiel formarĉandi de la peso, pagenda al la instruisto por *Andreo*, ankoraŭ kvardek centavojn.

Oni decidis, ke *Andreo* iru ĉiun vesperon en la lernejon, kiu okazis de la sepa ĝis la naŭa aŭ ĝis duono antaŭ la deka. *Andreo* volonte tien irus, ĉar li ekhavis ĝojon pri la lernado. Sed, se lia patrono bezonis lin en la vendejo, li ne permesis al li iri en la lernejon. La vendejo estis pli grava,

kaj la lernado estis nenio alia ol disipo de tempo.

Don Leonardo ne aĉetis librojn por la knabo. Kiam li efektive iam donis al li malpuran skribokajeron el la vendejo aŭ duone rompitan krajonon aŭ malfreŝan inkon en boteleto, li faris tion kun multaj vortoj kaj tordita mieno. Sufiĉis ja, se la knabo ricevis malnovan pakpaperon, kiu ne plu uzeblis por involvi ion. Kaj sendite ien, *Andreo* devis atenti surstrate, ĉu ne eblas levi krajonstumpeton, kiun iu perdis aŭ forĵetis.

Kvankam tiu maniero de edukado tute ne estis kompleta, *Andreo* lernis multon.

La plej grava afero, kiun li lernis, estis tio, ke la edukado gravas. Eĉ la gravecon scipovi legi kaj skribi oni ekkomprenas nur tiukaze, se oni jam scipovas legi kaj skribi.

Ĉapitro 02

01

Andreo havis nun jam dek kvin jarojn. Li ankoraŭ nun iris nudapiede. Kaj li dormis ankoraŭ nun sur petato, kiun li sternis en angulon de la kuirejo aŭ en sekan angulon de la portiko, kaj kiun li matene, ekstarinte, denove kunruladis kaj ie ŝovis sub ĉevronon. La *petate*, la mato el basto, ne plu estis tiu, kiun li kunprenis de hejme. Ankaŭ la lana kovrilo, per kiu li kovris sin, ne estis plu la sama. La petato finfine estis kuŝtruigita. Sed *don* Leonardo ne donis novan al li, ĉar petato kostas peson kaj dudek centavojn.

Doña Emilia en tiu tempo vizitis dufoje sian patron en la bieno por hejme ĉe la gepatroj montri kaj elmeti al admiro siajn du infanojn, kiujn ŝi naskis intertempe.

Ĉe tiuj vojaĝoj Andreo akompanis ŝin. Li ja nun jam estis granda knabo, al kiu *don* Leonardo trankvile povis konfidi sian edzinon kaj siajn infanojn.

Tiel Andreo revidis siajn gepatrojn kaj gefratojn kaj la tutan parencaron.

La patro donis al li novan petaton kaj novan lankovrilon, vidinte, kiel aĉe aspektis tiuj aĵoj de la knabo.

La lankovrilon la patro devis aĉeti el la *bodega*, el la staplejo de la patrono. Ĝi kostis naŭ pesojn, ĉar ĝi estis bonkvalita, farita de la indiĝenoj en Chamula. La patro ankaŭ la petaton devis aĉeti de sia patrono. Tiu petato kostis peson kaj sepdek kvin centavojn, ĉar en la *bodega* de la bienposedanto ĉiuj aĵoj kostis kvindek aŭ cent procentojn pli ol en vendejo en la urbo.

Patro Criserio kompreneble ne povis pagi la lankovrilon kaj la maton, ĉar li ja ne ricevis salajron. Sekve li devis pruntepreni la aĵojn de la patrono kaj aĉeti ilin kredite. *Don Arnulfo* diris: „La kovrilo kostas naŭ pesojn.“

„Tio estas tre multekosta, *patrono*“, respondis Criserio, „en Simojovel mi povus aĉeti kovrilon por kvin pesoj.“

„Tion vi povas, Criserio, se vi havas la monon.“

„Sed mi ne havas monon, *patroncito*, ĉefĉjo“, diris Criserio pri tio.

„Vi ne aĉetu la kovrilon, Criserio, se ĝi por vi estas tro multekosta“, diris *don Arnulfo*. Li ŝovis la kovrilon reen

en la bretaron.

„Sed mi ja devas havi la kovrilon por mia *hijito*, por mia filĉjo, alie li ja frostomortus“, diris Criserio kun senmova vizaĝo.

„La kovrilo kostas naŭ pesojn, Criserio. Pli malkare mi ne povas lasi ĝin al vi. Se ĝi estas tro multekosta por vi kaj vi povas aliloke aĉeti la kovrilon pli malkare, vi estas libera fari tion. Vi ne estas devigita aĉeti la kovrilon ĉe mi. Ĉu vi eble pensas, ke mi volas, ke vi faru ŝuldojn? Tion mi certe ne volas. Mi preferus, se miaj *muchachos*, miaj laboristoj sur la bieno, ne havus ŝuldojn. Tiukaze mi ne havus malagrabraĵojn, kaj miaj *muchachos* estus liberaj kaj povus foriri, kiam ili volas. Ĉi tie ne estas sklaveco.“

„Tion mi bone scias, sinjoro“, diris Criserio. „Ni ne estas *esclavos*, ni estas liberaj kaj povas foriri, kiam ni volas kaj kien ni volas.“

„Se vi ne havas ŝuldojn ĉe mi, ĉu ne, tion vi ja scias?“

„Tion mi scias bone, *patrono*. Se ni ne havas ŝuldojn ĉe la *patrono*.“ Criserio diris tion kvazaŭ li lernis tion parkere. La sencon li ne pripensis. La senco estis tro fora por li.

Sed *don Arnulfo* akcelis nun la aferon. Li ne havis la tempon marĉandi kun unu el siaj peonoj kaj komenci interparoladon pri la rilatoj de ŝuldodependeco kaj la libera elekto de la loĝejo. Tiaj temoj estis nek por li nek por iu alia bienulo problemoj. Estis frida, seka objektiveco. La ŝtato, la registaro, la soldatoj kaj la polico gardas liajn rajtojn kiel kreditoron.

„Ĉu vi do volas havi la kovrilon aŭ ne? Diru, kion vi volas, kaj se vi volas nenion, foriru. La kovrilo kostas naŭ pesojn. Vi ne devas preni ĝin, se vi ne volas fari ŝuldojn.“

„Mi prenos la kovrilon kaj la petaton“, diris Criserio.

„Bone“, respondis *don Arnulfo*, „mi do skribos ĝin en la libron al via konto.“

„Jes, *patroncito*, skribu ĝin en mian konton, mi bezonas la kovrilon kaj la petaton por mia fileto, kiu ja nun tiom malproksimas.“

Don Arnulfo malfermis la libron, foliumis ĝis la konto de Criserio Ugalde aperis, kaj dum li skribis en la libron, li diris: „Atendu ĝis ni havos tion tute en ordo.“

„Jes, *patroncito*, mi atendas.“ Criserio prenis la aĵojn kaj

ŝovis ilin sub la brakon.

Don Arnulfo gratadis la plumon, por ke ĝi skribu, kaj ekkalkulis laŭte: „La kovrilo kostas naŭ pesojn. Ĉu tio estas ĝusta, *Criserio*?“

„Jes, tio estas ĝusta, *patrono*, naŭ pesojn.“

Don Arnulfo skribis kaj poste diris: „La mato kostas peson kaj sepdek kvin centavojn.“

„*Patrono*“, interrompis lin *Criserio*, „la petato estas vere tre multekosta. En *Yajalón* bona petato kostas nur sep realojn.“

„*Por el diablo*, ĉe la diablo, ĉu vi volas havi la petaton aŭ ne? Klarigu en via kapo, kion vi volas, kaj kion vi ne volas. Mi ne plu havas tempon.“ *Don Arnulfo* fariĝis nun tre malbonvolema. Por ne igi lin eĉ pli ĉagrenita, diris *Criserio*: „Jes, *patrono*, kompreneble mi volas havi la petaton, por mia filo, por *Andreo*.“

„*Bueno*, en ordo, ĝi kostas peson kaj sepdek kvin. Ĝuste, *Criserio*?“

„Tio estas ĝusta, *patrono*.“

„*Muy bien*, tre bone“, diris skribante *don Arnulfo*. „Tio do faras kune rondigite dekunu pesojn. Ĉu tio estas ĝusta, Criserio?“

„Tio estas ĝusta, patrono.“

„Tio faros do dek unu pesojn. Kaj ĉar vi restas ŝulda al mi dek unu pesojn kaj ne pagas, tio faras dek unu pesojn kaj tio sekve faras dudek du pesojn. Dek unu pesojn por la kovrilo kaj la petato kaj dek unu pesojn, ĉar vi ne pagas kaj restas ŝulda la sumon al mi. Ĉu tio estas ĝusta, Criserio?“

Criserio ne povis kalkuli. Neniukaze li povis tion tiel rapide sumigi. La ciferoj konfuzis lin, ĉar li ne tiel rapide povis sekvi ilin, kaj li ankaŭ ne volis fari la patronon malbonvolema, kaj krome la patrono diris la ciferojn ĉiujn hispanlingve, kiujn Criserio efektive rekonis kiel hispanlingvajn, sed en sia cerbo ne povis percepti.

Tiel estis tute normale, ke Criserio diris: „Tio estas ĝusta, patrono.“

Ĉar la patrono diris tion, ĝi devis esti ĝusta. Tia patrono, tia fera kaj riĉa mastro, trompe ne riĉigas sin je povra

indiĝeno.

„Ĉu konsentite, Criserio?“ demandis *don Arnulfo*.

„Konsentite, patrono“, respondis Criserio.

Don Arnulfo al Criserio ne permesis, ke tiu ŝmiru sur la konton konfirman kruceton. Criserio la belan puran kontolibron inaŭguritan per „En la nomo de Dio!“ tamen nur grase makulaĉus per inko. Konfirmaj krucetoj ne necesis. Se ekestus disputo, kio neniam okazis, demandus neniun oficiston pro la kruceto. La krucetoj estus senvaloraj jam pro tio, ĉar nek Criserio nek iu alia peono de la bieno povis legi, kion li konfirmu per sia kruco. Tial estis tute egale, ĉu tie estis krucetoj aŭ ne. *Don Arnulfo* demandis: 'Ĉu vi konsentas?' kaj Criserio estis respondis 'Jes, patrono, mi konsentas.' Ĉiu juĝisto en la respubliko Meksiko en proceso inter bienulo kaj peono agnoskus tiun buŝan konfirmon. La peono konfirmis buŝe la konton, kaj per tio li estis respondeca por la farita kaj konfirmita ŝuldo.

Don Arnulfo estis honesta kaj honora mastro. Li traktis siajn peonojn pli bone ol multaj aliaj bienuloj, kiujn li

konis. Aliaj terposedantoj ne estis tiel mildkoraj al siaj peonoj.

„La ĉemizo kostas kvin pesojn. Ĝuste, jes? Bone. Kaj ĉar vi ne pagas la ĉemizon, tial estas kvin pesoj. Kaj ĉar vi restas ŝulda al mi la kvin pesojn, tial estas kvin pesoj. Kaj ĉar mi de vi neniam povos ricevi la monon kontante, tial estas kvin pesoj. Tio estas do kvin kaj kvin kaj kvin kaj kvin, tio faras dudek pesojn. Konsentite?“

„Jes, patrono, konsentite.“ La peono nenie aliloke povas aĉeti ĉemizon, se li bezonas ĝin, ĉar li ja nenie en la mondo havas krediton, nur ĉe sia mastro, por kiu li laboras kaj kiun li ne rajtas forlasi, se li ankoraŭ havas eĉ nur unu centavon da ŝuldoj ĉe li.

Ili ne estas sklavoj, la peonoj. La sklavecon oni forigis en Meksiko, kiam oni deklaris la sendependecon kontraŭ Hispanio. La neekzistado de la sklaveco en Meksiko estas konfirmita pere de la konstitucio.

En unu sekcio de la dia monda ordo oni profitas el tio, se la proletoj povas legi, skribi kaj fulmrapide kalkuli; en alia sekcio de tiu prudenta monda ordo oni eĉ pli profitas

el tio, se la proletoj ne povas kalkuli kaj ne lernas la hispanan lingvon. Kiu volas enspezi monon, tiu devas nur decidi, kiun sekcion li deziras ekspluati. Ambaŭ sekcioj entenas orminejojn.

Criserio ne konsideris tion, ĉu ĉio ĉi estis justa aŭ ne. Tiel komplekse li ne pensis por percepti kaj kompreni tiajn negocojn. Se iu eĉ dum horoj provus klarigi al li, ke oni hontinde mensogis al li en tiu afero, li ne akceptus tion. Li aŭskultus kaj aŭskultus, kaj finfine li dirus: „La patrono pravas; ĉar la patrono estas nobla viro, kaj li ne trompas povran indiĝenon. Li kalkulis tute ĝuste, mi ja ekde nun restas ŝulda al li la dekunu pesojn, kaj tial do estas dudek du pesoj. Tio estas tute prava.“

Don Arnulfo kompreneble povus iri alian vojon por ricevi la dudek du pesojn. Li simple povus diri: 'La kovrilo kaj la petato kostas kune dudek du pesojn, aĉetu aŭ ne aĉetu ilin.' Sed tiel la indiĝeno ekkomprenus, ke estas prezo uzura. Tiukaze li ne aĉetus la varojn kaj havigus al si anstataŭaĵojn, kiujn li mem povus akiri, ekzemple felojn de ĉasitaj bestoj. La prezojn por aĵoj li ja komprenas. Li ankaŭ komprenas, ke en la bieno ĉiuj varoj devas esti pli multekostaj ol ĉe la foiro en la urbo, ĉar la bienulo havas transportkostojn. Kaj krome li ne scias, je kiu prezo la bienulo aĉetas la varojn. La simplajn prezojn komprenas

la peono; kion li ne komprenas kaj kion li ne povas kapti tiel rapide en la kapo, estas la hasta ĵonglado per ciferoj kaj transkalkuloj fare de la bienulo. Se temis pri kalkulado per ciferoj pli grandaj ol kvin, ĉesis por la peono ĉia kompreno. Ĉu do estis dek kvin aŭ dudek du aŭ sesdek sep pesoj, tio signifis por li ĉiam la samon. Tiaj ciferoj ĉiufoje konfuzis tiom peonon, ke li baldaŭ falis en specon de hipnoto. Kaj tiu hipnoto ankoraŭ profundigis, se efektive okazus, ke juĝistoj aŭ oficistoj inspektas la kontojn de la bienposedanto por eltrovi, ĉu oni faras aŭ ne faras maljustaĵon al la indiĝenaj kamplaboristoj. En la tuta mondo ili konis nur unu homon, al kiu ili povis turni sin por plendi pri io, kaj tiu homo estis ilia patrono.

Sed ĉu povra indiĝeno ĉu ne povra indiĝeno. En alte civilizitaj landoj ekzistas la sama dieca sistemo: La soldato tradraŝita de la kapitano rajtas plendi nur ĉe sia kapitano, kaj tiu kapitano decidas, ĉu la plendo estas rajtigita kaj transdonebla aŭ ne. Tial la soldato en civilizita lando ne pravos, se li rikane rigardas el fiera alto malsupren al la povra senscia peono, kiu pacience devas toleri ĉion.

Estas multspecaj sistemoj de la sklaveco kaj prirabado de homoj surtere, kiujn prudenta kaj normala homo ne povus eltrovi, se ili ne ekzistus efektive.

Criserio estis feliĉa, ke li povis doni la kovrilon kaj la petaton al sia filo. Li diris al li, ke la aĵoj kostis dek unu pesojn. Sed li ne diris, ke li pro tio ŝargis sin per ŝuldo de dudek du pesoj.

En lia kapo la afero alie speguliĝis. La varoj kostas dek unu pesojn. Tio estas ĝusta. Ke li fakte ŝuldis dudek du pesojn, tute ne koncernis tiujn aĵojn, sed estis nur pro tio, ke li ne povis pagi la dek unu pesojn kontante. Tial li ne konsideris necesa interparoli pri la dek unu pesoj kun sia filo.

Andreo eĉ ne povus fari ion, se li sciis tion. Sed li bone sciis, kia nekredeble alta sumo dek unu pesoj estas por lia patro. Li ja sciis la ekonomiajn rilatojn de la peonoj en bieno. Li eble ne sciis kaj ne komprenis ilin, kiam li foriris de la hejmo. Sed nun li pli maturiĝis, kaj ĉe la du vizitoj en la bieno li aŭskultis en la kabano de la gepatroj kaj en la aliaj kabanoj de peonoj pri ĉiuj tiuj aferoj.

Se la peonoj en la kabanoj interparolis pri tiaj rilatoj, tio ne okazis kritike. Ili akceptis la aferojn tiel, kiel ili estas.

Oni rigardis ilin kiel eternan destinon de la sorto, kiu ne ŝanĝeblas fare de homo. Tiel, kiel homo ne povas ŝanĝi tion, ke la akvo de rivero fluas malsupren kaj ne supren. La patrono estas la patrono, kaj la peono estas la peono. Tiel estas kaj tiel restos. La filo de peono iĝas peono. Kaj kiam la patrono transdonas la bienon al sia filo aŭ vendas ĝin, ŝanĝiĝas la nomo de la patrono, sed je la sociaj rilatoj ŝanĝiĝas nenio. Se oni efektive kritikis ion, estis nur pro tio, ke la grundo, asignita de la patrono al tiu aŭ al tiu peono, estas tro malfekunda, ke ĝi havas tro multajn ŝtonojn kaj montojn, aŭ, ke oni volonte havus iom pli da grundo, aŭ, ke la prezoj de la porkoj, pagitaj de la komercistoj devus esti pli altaj je dudek kvin aŭ kvindek centavoj, ĉar du pesoj kaj okdek centavoj por bona elkreskinta porko efektive estas tro malmulte.

Sed la peonoj ne kritikis, ke la patrono havas la aĉetan prioritaton por ĉiuj porkoj, kaproj kaj ŝafoj, kiujn vendas ties peonoj. Kaj, ke li mem fiksas la prezojn por tiuj porkoj, kiujn li intencis aĉeti de siaj peonoj por poste mem vendi ilin, kaj ke la peonoj unue devis peti lian permeson, kiam ili intencis vendi siajn malgrandajn brutojn al pretervagantaj komercistoj, kaj ke ili devis pagi

al la patrono por ĉiu vendita besto kvindek ĝis sepdek kvin centavojn aŭ eĉ peson. Tio estas, kaj ĉiam estis, la bona rajto de la patrono. La porkoj, ŝafoj kaj kaproj plenkreskis ja sur lia bieno. Sed la peonoj devis aĉeti la porkidojn kaj kapridojn; kaj la maizon, la nutraĵon de la bestoj, kiun la indiĝenoj kultivis mem.

La peonoj ankaŭ ne havis la rajton vendi superfluan maizon aŭ superflujajn fazeolojn de siaj kampoj al la vagantaj komercistoj aŭ sur la foirplaco de la plej proksima loko. Ankaŭ pri tio la patrono havis la aĉetprioritaton, kaj ankaŭ en tiu kazo ili devis peti la aĉetpermeson. Kaj parton de la ricevita mono ili devis doni al la patrono. Se ili havis ŝuldojn, kaj ili ĉiuj havis ŝuldojn ĉe li, ili tute ne rajtis vendi ion, sed ĉion devis doni al li. Kaj la patrono dekalkulis la ŝuldon nur tiom multe, kiom li fiksis la prezon.

Ĉio tio estis justa. Ĝi estis laŭleĝa kaj destinita de la ĉielo, kaj la eklezio konfirmis ĉion tion. La dioj estis ja la samsangaj parencoj de la patrono, kaj ili neniel estis la parencoj aŭ boparencoj de la indiĝenoj.

Estis tiel, kaj oni ne povis ŝanĝi tion. Ĉiam estis tiel kaj

ĉiam tiel restos. La peonoj tion ne sciis pli bone. Ili sciis nur, ke tiel estas ĉie sur la mondo. Ĉar kien ajn ili iris aŭ kien ajn ili venis, en ĉiuj bienoj de la najbaroj estis tute same. Sekve devis esti tiel sur la tuta tero. Ilia tero, aŭ pli bone dirate, kion ili sciis kiel teron aŭ mondon, estis la tereno, kie loĝis la indiĝenoj, kiuj parolis la saman lingvon kiel ili mem. Kie oni ne parolis ilian lingvon, tie estis mondo, kiu estis fremda al ili. Kaj kiaj sociaj rilatoj regis tie, ili ne sciis kaj ankaŭ ne povis ekscii.

En ilia distrikto troviĝis multaj vilaĝoj, kiuj estis sendependaj. Ili estis plej ofte vilaĝoj, kie vivis indiĝenoj, kiuj neniam estis peonoj en bieno. Aŭ la grundo estis tiel magra, ke neniu hispano iam havis la sopiron posedi ĝin, aŭ la indiĝenoj estis ĉiam tiel ribelemaj, tiel kontraŭstaremaj kaj tiel murdemaj, ke neniu hispano povis elteni tie. Tiel estis en Bachajón kaj en multaj aliaj vilaĝoj. Sed, se la peonoj rigardis tien, ili trovis, ke tiuj sendependaj indiĝenoj vivas ankoraŭ multe pli mizere kaj pli povre ol ili mem. Tiuj sendependaj indiĝenoj vivis foje tiel mizere, ke ili libervole forlasis siajn sendependajn vilaĝojn kaj libervole transloĝiĝis al bienoj por fariĝi peonoj. La kaŭzoj estis multnombraj. La plejmulto el tiuj

kaŭzoj havis la radikon en la karakteraj ecoj, en la kutimoj kaj moroj de tiuj indiĝenoj. Sed la ĉefa kaŭzo estis la malesperiga manko de scioj de la indiĝenoj kaj la granda lerteco de la grandaj bienposedantoj kaj de la eklezio interligita kun ili, teni la indiĝenojn en tiu sensciado.

La patro de Andreo tute ne estis devigita aĉeti novan kovrilon kaj novan petaton por sia filo. Li faris tion pro amo al sia filo, kaj ĉar li ne povis elteni, ke tiu suferas.

La viro, kiu devus doni al Andreo novajn aĵojn, estis lia mastro, *don* Leonardo. Sed al tiu estis tute egale, ĉu Andreo nokte frostotremas, ĉu li devas dormi nur sur la nuda tero aŭ ĉu li malvarmumis kaj malsaniĝis, aŭ ĉu la knabo restas sana kaj vivoforta. Kial zorgi pri la bonfarto de indiana knabo?! Se la knabo ekhavis pneŭmonion aŭ febron kaj mortus, ĉu estus problemo por li? Estas miloj da indiĝenaj knaboj. Li petus sian edzinon skribi al la patro, ke li sendu alian knabon. Kien tio kondukus, se li zorgus pri nude pieda indiĝena knabo? Dek unu pesojn la knabo ne valoris. Krome tute ne damaĝas al indiĝena knabo, se li dormas sur nuda tero. Ili kutimiĝis pri tio, ili estas tiel rezistfortaj kiel iliaj hundoj. La dek unu pesojn li bezonas por aliaj aferoj.

Salajron Andreo ankoraŭ nun ne ricevis, kaj *don* Leonardo neniam konsideris iam doni iun al la knabo. Li ankaŭ tiukaze ne pagus salajron al li, se Andreo havus

jam dudek aŭ tridek jarojn kaj plenumus la taskojn por la vendejo tiel bone kiel juna viro el San Cristóbal, kiu farus la laboron ne por malpli ol dudek pesoj ĉiumonate kaj la manĝo.

La solan diferencon, kiun li faris ĉe la knabo en la du lastaj jaroj, estis tiu, ke Andreo ĉe festo en Tenejapa ricevis ne kvin aŭ dek centavojn sed *tostón*, do kvindek centavojn.

„Ne aĉetu sensencaĵojn por tio, kaj precipe neniun *aguardiente*, neniun brandon“, admonis lin *don* Leonardo, kiam li transdonis la kvindek centavojn kun mieno, kvazaŭ li donus ormoneron dudekpesan al li.

Don Leonardo nun konfidis al *Andreo* de tempo al tempo jam tre respondecoplenajn taskojn.

Li sendis lin kun konsiderindaj monsumoj al *San Cristóbal*, al la plej proksima pli granda urbo, kie *Andreo* devis aĉeti varojn kaj intertrakti kun la *arrieros*, kun la mulpelistoj, kiuj devis transporti la aĉetitajn varojn al *Tenejapa*. Li akompanis la varojn, li devis atenti pri tio, ke ili estas kompletaj kaj alvenas sen difekto en *Tenejapa*.

Tiuj laboroj konsiderinde plivastigis la spertojn de la knabo. Li koniĝis kun vera granda urbo, rigardis la abundon kaj la diversecon de varoj el la tuta mondo kaj aŭdis pri urboj, kiuj estas miloble pli grandaj ol *San Cristóbal*, kiu ŝajnis al li, alveninta tie la unuan fojon, pli granda kaj pli bela urbo ol ĉiu alia surtere. Ĝi havis stratojn, kiuj estis longaj kilometrojn, domon apud domo, ĉiuj el ŝtonoj kaj multaj kun fenestroj. Antaŭe li ne sciis, ke ekzistas domoj kun fenestroj, ĉar li neniam antaŭe vidis tian domon. En *Tenejapa* estis kelkaj, sed la fenestroj estis nur lukoj kun kradoj. Kaj nun li vidis ĉi tie fenestrojn kun vitrotabuloj, kaj li vidis eĉ vendejajn

fenestrojn kun grandegaj vitrotabuloj, post kiuj la varoj estis staplitaj kaj aspektis tiel, kvazaŭ oni tuj povus forpreni ilin.

Li vidis tie bovoĉarojn, la *carretas*, la unuan fojon.

Ĝis nun li ne sciis, ke ekzistas iuj ĉaroj aŭ veturiloj, kaj ke tiujn ĉarojn povas tiri bestoj, ĉar ankaŭ tirbestojn li ne vidis antaŭe. La kampojn de la bieno, kiel ankaŭ la kampojn en Tenejapa, oni ne plugis. Oni puŝis simple bastonon en la teron, en kiun oni ĵetis la maizograjnojn aŭ fabojn. Se efektive necesis iom plugi, ekzemple pro tomatoj aŭ pro kapsikoj, tio okazis per plugo, kiu verdire ne estis pli ol bastonego, tirata de peono. El kie Andreo do povus preni la scion pri tirbestoj? Tiaj vojoj, sur kiaj grandaj veturiloj aŭ nur ĉaroj povas veturi, ekzistis eĉ ne unu en la tuta vasta kaj granda distrikto. Ĉiuj vojoj estis nur mallarĝaj padoj, ofte tiel mallarĝaj, tiel ŝtonplenaj, tiel truigitaj kaj tiel lozaj, ke eĉ por pakmuloj estis malfacile iri sur ili sen danĝero. Andreo aŭdis de ĉaristo, ke la ĉaroj faras veturojn dekkvinoble pli longajn ol la vojdistanco de Tenejapa ĝis San Cristóbal. Kaj de Tenejapa ĝis San Cristóbal ŝarĝmulo bezonas tutan

tagmarŝon.

La knabo skeptike rigardis la ĉariston, kiu rakontis tion al li. Sed aliaj ĉaristoj diris la samon. Kaj indiĝena salokomercisto, vendante siajn varojn surstrate, demandate de li, diris, ke tio estas tute ĝusta, kaj ke li scias tion, ĉar li iam akompanis saloŝarĝon sur ĉaro ĝis Arriaga.

Tiel Andreo ricevis la unuan fojon impreson pri la grandeco de la terglobo, sur kiu li vivas.

Ĝis tiam li tute ne havis imagon pri la grandeco de la tero, sur kiu li vivas. Por diri la veron, li neniam pensis pri tio. Kiam oni parolis en la domo aŭ en la vendejo de *don* Leonardo pri Tuxtla, Tonalá, Tapachula, San Gerónimo, Verakruco kaj pri Meksikurbo, li imagis al si la urbojn tiel, kiel estas Tenejapa, la sola urbo, kiun li konis. Kaj se oni interparolis pri tio, ke tiuj urboj estas tre malproksimaj, li kalkuladis por si, ke ili certe malproksimas duoble aŭ trioble aŭ maksimume kvaroble ol la hejma bieno Lumbojvil de Tenejapa. Ĉiukaze li certis, ke tiuj urboj ankoraŭ troviĝas interne de la horizonto. Ĉar tie la mondo, kiel scias kiu ajn, tute

finiĝas.

Alia ĉaristo, kiun li renkontis en la portiko de la *cabildo*, do de la municipa sidejo, kun kiu li vespermanĝis maizoflanojn kaj nigrajn fabojn de indiĝenino varmigita sur lada kuirilo, diris al li, ke la veturo de la ĉaroj finiĝas en Arriaga, kaj ke Arriaga estas fervojstacio. Kaj kiam Andreo demandis, kio tio estas, la ĉaristo klarigis al li, ke tie grandegaj veturiloj alportas el malproksimaj landoj la varojn, kiujn oni poste ŝarĝas sur ĉarojn kaj transportas en la internon de la lando. Li diris eĉ pli. Li diris, ke tiaj veturiloj estas multe pli grandaj ol ĉaro, ke tia veturilo estas tiel granda kiel ŝtona domo, kaj ke sola ĉarego entenas tiom da varoj, ke oni per ili povas tute plenigi kvindek ĉarojn. Tiuj veturiloj veturas sur vojoj faritaj el fero, kaj kvardek tiaj veturiloj kaj ankoraŭ multe pli da ili estas tirataj de alia granda veturilo, kiu faras multe da fumo kaj ege ĝemas kaj ŝvitas kiel granda besto. Kaj tiu nomiĝas *ferrocarril*, la fervojo.

La vorton *ferrocarril* Andreo konis, ĉar li lernis skribi tiun ĉe la instruisto. Sed la instruisto ne povis klarigi la aferon al li, ĉar la instruisto neniam vidis fervojon, ankaŭ

ne bildon pri ĝi, kaj tial li ne povis imagi al si la aĵon. Li devis esti kontenta per tio, ke la lernantoj lernis senerare skribi la vorton. La vorto estis en la legolibro. Sed ĉar Andreo povis legi kaj skribi la vorton, li sentis strangan parencecon al la aĵo. Kiam la ĉaristo klarigis la fervojon, kiel ĝi aspektas, ĝemas, ŝvitas, tusas, bojas kaj anhelas, preskaŭ ŝajnis al la knabo, kvazaŭ li jam vidus ie fervojon. Ĝi ne estis fremda, nova kaj neatendita afero por li, ĉar li sciis kiel nomi ĝin, ja eĉ kiel skribi. Spite al sia ĝemado kaj muĝado la monstro ne timigis lin. Tute male, li deziris vidi la monstron proksime antaŭ siaj okuloj. Kaj li eltrovis, sen konsciiĝi pri la okazaĵo, ke la sciado de nekutima aĵo kaj la sciado de ĝia nomo, forrabas de la aĵo la potencon disvastigi teruron. Kaj, ĉar li ne nur sciis tion, sed eĉ povis skribi la nomon, tio donis al li fortan senton de sekureco kaj vekis en li memkonscion tian, kian li sentis neniam antaŭe.

Pro tiu por si mem apenaŭ rimarkinda interna travivaĵo, kiun li havis en tiuj malmultaj minutoj, do, ke tiu terura monstro, prezentita de la fanfaronema ĉaristo multe pli terura kaj timiga ol ĝi estis fakte, nur tial ŝrumpis, ĉar oni scias ĝian nomon kaj ĝin per literoj kapablas komprenigi

kaj videbligi al si, la knabo subite tute komprenis la valoron de edukiteco. Li povis klarigi tion al neniuj. Li nur sentis tion.

Kaj ju pli li meditis pri tio, des pli klara iĝis por li, des pli klara iĝis ĉirkaŭ li, kaj des pli klara iĝis per unu fojo la tuta mondo. La sciata vorto klarigis kaj dismembrigis tiel komplete la tutan aĵon, ke neniuj misteroj plu restis je ĝi. *Ferrocarril*. Tre klare. *Ferro* signifas fero, *carro* signifas veturilo, *riel* relo; do veturilo el fero, kiu veturas sur reloj. Tio ĉi en la vorto estis nur iom obskurigita, ĉiujn vortojn oni faris pli koncizaj, por ke la tuta vorto ne fariĝu tro longa.

Tial li havis la ideon, ke tiel estas probable kun ĉiuj vortoj, ke ĉiuj vortoj precize klarigas aĵojn aŭ procedojn kaj tre sobre solvas la sekretojn de la aĵoj aŭ procedoj. Li serĉis per sia cerbo kelkajn aliajn vortojn. Kaj efektive, laŭ lia rapide ekfulmanta opinio estis tiel ĉe ĉiu vorto.

Ekde nun li havis tute alian opinion pri la edukiteco. Li nun ne plu pensis, ke edukado estas utila nur por labori pli sukcese kaj pli rapide en vendejoj. Li sentis, ke la lernado kaj la edukiteco havas ankoraŭ alian, eble eĉ pli

grandan valoron ol la nuran utilecon en negocoj. Li faris pensajn saltojn.

Li travivis la samon kiel iu, kiu deduktas malgrandan filozofian teorion el akre limigitaj rilatoj en la ekonomia aŭ socia vivo de la homoj. Li ne scias, ke tiun saman teorion antaŭ li deklaris jam multaj homoj, kaj ke inter ili estas ĉirkaŭ kvindek homoj, kiuj jam sciis la bazan ideon de tiu malgranda teorio, kiam Aristotelo ankoraŭ vendis sandalrimenojn en la stratoj de Ateno, por ke li almenaŭ povu vivi. Jam en tiu tempo filozofo nur de siaj mondorenversigaj doktrinoj ne povis vivi; li bezonis laboron, kiu sekurigas al li la panon kaj la salon, komercon por artikloj de la ĉiutaga senfilozofia vivo. Kaj kiel al ĉiuj okazas, se ili opinias, ke ili kaptis novan ideon, tiel ankaŭ al Andreo. Li supozis, ke la eduko povus detrui la minacantan kaj timigan potencon de idoloj, de pastroj kaj de ĉiuspecaj fantomoj de la superstiĉo, kiuj per siaj grimacoj influas la homojn. Kaj li pensis, se la eduko povas sendanĝerigi nekonatajn monstrojn kiel la fervojon, se ĝi povas puŝi idolojn kaj minacantajn fantomojn de ĝiaj fundamentoj, la eduko certe ankaŭ devas esti kapabla liberigi la patron kaj ĉiujn peonojn de

la hejma bieno de eterne ŝarĝanta sklaveco.

Li havis la edukitecon, kaj li liberis.

Sed liajn konfuzajn pensojn abrupte interrompis Lucio, la mulisto, kiu sekvatage matene kun li estis transportonta la varojn al Tenejapa.

„Kie vi dormos, Andreo?“ demandis Lucio.

„Mi ĉie povas dormi en la portiko de la municipa domo“, diris Andreo. Li jam sternis sian maton, nur tri paŝojn for de tiu indiĝenino, kiu tenis ĉi tie varma la tutan nokton la simplajn manĝojn por mulistoj kaj ĉaristoj.

„Tion ne faru“, diris Lucio. „Iru kun mi. Ni dormos en la pordega enirejo de *don* Ambrosio, kie estas la varoj. La muloj, starantaj en la malantaŭa korto, rapide atingeblos. Ni ŝarĝos ilin je la dua matene. Tiel ni ĉirkaŭ la kvara jam estos sur la vojo.“

Tio memorigis lin, ke li ne estas libera, ke li ne povas fari, kion li volas, ke li eĉ ne povas dormi ĉi tie en la portiko, kie, pro la alvenantaj kaj forveturantaj viroj sur ĉevaloj, pro ĉaristoj, mulistoj, vagantaj indiĝenaj potokomercistoj kaj korboplektistoj, regas vigla vivo dum la tuta nokto, kie

multe da aferoj rigardeblas kaj aŭdeblas. Li devis dormi tie, kie la mulisto Lucio plej rapide povas disponi pri li sen antaŭe devi serĉi lin. La remarŝon kun la varoj komandis Lucio, kiun lia mastro persone respondecigis pri la transporto. Kaj ankaŭ Andreo havis sian mastron, kiu ordonis al li, ke li akompanu la varojn, ĉu plaĉis, ĉu ne plaĉis al li. Ĉar la mastro donis la manĝon al li kaj la permeson, ke li sternu la maton en angulo de ties domo.

Andreo en siaj sovaĝe kirliĝantaj pensoj eltrovis por si la ideon, ke la eduko, kiun li supozis havi, povas detrui ĉian timon pri monstroj kaj idoloj. Sed kiam Lucio, kiu sobre kaj praktike parolis pri la ĉiutagaj taskoj, memorigis lin pri lia mastro, Andreo ektimis denove. Pro sperto li bone sciis, kiel furioze kaj kolere *don* Leonardo povas reagi, se oni eraris pri laboro aŭ se io ne funkcias tiel, kiel ĝi funkciu laŭ lia deziro. Li sciis, ke *don* Leonardo, kiam li koleriĝis, sen hezito ekkaptas breton aŭ dikan bastonegon aŭ feran kestorubandon, aŭ kion ajn kion li povas preni en la manon, kaj draŝos ĝin sur la knabokapon.

Kiel helpu edukiteco en tiu kazo, pensis Andreo, kiam li kun Lucio trotis tra la tenebraj stratoj al la domo de *don*

Ambrosio. Ke li, Andreo, povas legi, skribi kaj kalkuli, utilas nur al lia mastro, al *don* Leonardo, ne al li mem. Li restas tiu, kiu li estas, peono, kiu ne ricevas salajron, kiu devas obei, kion ajn oni ordonas al li, kiu dum la dudek kvar horoj de tago devas ĉeesti, se oni vokas kaj bezonas lin.

Sed li estis tamen libera. Ĉar li sciis, kio estas libero. Libera estas la peono, kiu ne estas enfermita en ŝmira truon, kiu havas la nomon karcero aŭ prizono. En tiun truon la patrono povas sendi peonon, kiam ajn li volas. Kaj libero estis, se ili dimanĉe ne kunligis al oni la manojn kaj la piedojn sur la dorson pro maldiligenteco dum la semajno, aŭ pro malobeemo, aŭ ĉar forkuris bovido.

Andreo ne povis diri, ke li estas mallibera. Li nek kuŝis en karcero nek ligita en la selokamero de la bieno. Li estis libera. Kiam li iris je la sekvinta mateno kun la ŝarĝitaj muloj kaj la vojo estis sur la maldekstra flanko tro loza aŭ tro ŝlima, li havis la liberon elekti la vojon sur la dekstra flanko por konduki la mulojn nelezitaj al la celo. Kaj li havis la liberon pli ŝarĝi la flavan mulon per kelkaj kilogramoj ol la grizan mulon. Kaj li havis la liberon fumi

kelkajn cigaredojn, sub la kondiĉo, ke li havas ilin. Kiun pluan liberon peono atendu de la vivo! Eble ankoraŭ la liberon edziĝi, kiam li havas la necesan aĝon kaj alia peono donas sian filinon al li, por ke li edzinigu ŝin. Kaj tiam li havis la lastan grandan liberecon, fari sufiĉe multajn infanojn kaj plenkreskigi ilin de la fruktoj de la malgranda kampo, kiun la patrono asignis al li, por tiel provizi la patronon per freŝaj peonoj.

Li havis ĉiujn liberojn, kiujn li konis. Kaj se iu demandus lin pri tio, li per laŭta voĉo blekus la dogmon, kion oni enkapigis en la lernejo per soldateca dresado al la infanoj: „Mi estas libera civitano de sendependa nacio. *Viva la patria! Viva!*“ Kaj li kredus tion, kion li blekas.

Ĉapitro 03

01

En Chilón *Don* Leonardo aĉetis tre malmultekoste tridek mulojn de bienulo, kiu nepre bezonis monon. Li lasis peli la mulojn de la akompananto Andreo al Tenejapa, kie li zorgis pri ilia intensa flegado, por ke ili havu plaĉan aspekton.

Li faris enketon, kiom kostas flegataj muloj, kaj li aŭdis, ke oni momente pagas la plej bonajn prezojn en *La Concordia*, kie kelkaj posedantoj de kafplantejoj intencis aĉeti plurajn centojn de muloj.

Eksciinte post pliaj enketoj, ke tiu informo estas vera, li tuj decidis konduki la mulojn al *La Concordia*.

Li prenis sian plej bonan ĉevalon kaj ekrajdis jam pli frue, por intertrakti la negocon. La mulojn Andreo devis postkonduki, ricevinte ankoraŭ kelkajn helpantojn, ĉar ĉe tia longa vojaĝo tridek muloj ne povas marŝi la saman troton kiel sola bona ĉevalo, sur kiu sidas lerta rajdanto.

Don Leonardo vendis la mulojn du tagojn pli frue ol ili

alvenis. La aĉetinto kaj la vendinto estis kontentaj pri la negoco. *Don* Leonardo abunde enspezis, kaj la planteja posedanto akiris la mulojn multe pli malkare ol li supozis. Se li estus devinta aĉeti la mulojn en Tabasko, la prezo pliĝus ankoraŭfoje je duono.

En *La Concordia* ĉeestis tre multaj homoj en tiu semajno, ĉar baldaŭ okazos festo, kune kun *feria*, kun kermeso.

Tie estis ĉevalkomercistoj, brutkomercistoj, azenkomercistoj de Comitán; agentoj, kiuj varbis indiĝenajn laboristojn el la sendependaj vilaĝoj por la kafo- kaj kakaoplantejoj; aĉetistoj de kafo, maizo aŭ ligno; agentoj de maŝinoj, agentoj de feraĵoj kaj laboriloj por la agrokulturo, aĉetistoj de terposedaĵo, komercistoj de ŝtofoj kaj de artikloj por la ĉiutaga bezono. Ĉiuj ĉi homoj havis multe da mono ĉe si, por validigi la kontraktojn. Tiuj homoj enspezis multe da mono, kaj ĉiuj esperis enspezi eĉ multe pli da mono ol kutime.

La vesperoj estis tre longaj. Oni sufiĉe trinkis. Kaj ĉar la homoj ne sciis, kiel pasigi la tempon dum la vesperoj aŭ kion fari, se ili ne interparolis pri negocoj, ili pasie ludis.

Vendinte siajn mulojn, *don* Leonardo ne tuj reveturis. Per la enspezita mono li uzis la okazon por novaj negocoj kaj por enspezi multe da mono aldone. Sed li finis siajn negocojn same tiom malofte per rapida kontrakto, kiom

ĉiuj ceteraj homoj. La viroj ne rapidis, ĉar ili havis sufiĉe da tempo, kaj ĉiu esperis eĉ pli bonajn okazojn kaj eĉ pli bonajn ofertojn.

Kaj ankaŭ *don* Leonardo ne sciis, kion fari dum la vesperoj. Tial estis do tute normala, ke li sidiĝis kun grupo da viroj kaj ludis, tiel, kiel faris tion ankaŭ ĉiuj aliaj.

El la *caballeros*, kun kiuj li ludis, li konis ĉiun. Ili ĉiuj, ankaŭ li mem, estis honestaj kaj fidindaj ludantoj, dume ili ĉiuj, inkluzive de li mem, en negocoj sufiĉe ofte provis trompi la kontraŭulojn per ĉiuj eblaj artifikoj. Sed ĉe ludo oni devas esti honesta, tio postulas la honoro de *caballero*. En negocoj neniu estas tiom akurata, kaj tamen ĉiu restas honorulo. La grupo ludis *Siete y Medio*. Tio estas tre rapida ludo. Ĝis frumatene je la dua *don* Leonardo forludis la tutan monon ricevintan por la muloj. Sed li daŭrigis la ludadon. Li jam ne havis eĉ unusolan peson por povi ludi plu per ĝi, kun la espero regajni sian monon. Kaj ĉe la ludado neniu *caballero* pruntedonas monon. Tio estis malnova, bone elprovita leĝo.

En *La Concordia* la viroj ludis en granda ĉambro de la domo de civitano, kiun ili konis. Ĉiuj mastroj havis siajn servoknabojn, siajn servistojn, ĉe si.

Tiuj *muchachos* estis ĉiam ĉe siaj mastroj. Ĉi tie la knaboj proksime kuŝis dormante sur siaj matoj. Kelkaj dormis en la portiko, aliaj dormis en angulo de la ĉambro, en kiu ludis la mastroj. Tio tute ne ĝenis la sinjorojn.

De tempo al tempo mastro per piedo puŝis tiun aŭ tiun el la servoknaboj: „Hola, Lazaro, eksaltu, kuru transen kaj frapu la pordon de la kantino, jen dek du realoj por nova litro da *comiteco añejo*. Nu, ek do, saltu jam, ne hezitu. Niaj gorĝoj estas sekaj.“

Rimarko

caballero = sinjoro, ĝentlemano, kavaliro

Ĉifoje estis ne Lazaro, sed Andreo, kiun puŝis unu el la sinjoroj per piedo. Ĉe tiaj kunvenoj la servoknaboj estis la socia komuna proprieto de ĉiuj ĉeestantaj sinjoroj. Tial neniu atentis, kiu alvokis kies servoknabon kaj forsendis lin kun komisio.

Andreo revenis kun la komitekobotelo kaj starigis ĝin sur la tablon.

„Jen, trinku plengorĝon, *muchacho*“, diris *don* Laŭreano, kiu estis sendinta la knabon. Li plenigis glason kaj ŝovis ĝin al Andreo. Tiu eltrinkis ĝin per unu fojo. Tiam li prenis per dentpikilo al si peceton de la distranĉita fromaĝo sur la telero.

La rilato de mastro al sia servoknabo en Meksiko ne estas tiel, kiel tiu inter mastro kaj sklavo. Precipe dum vojaĝo la mastro ne estas tro fiera trinki el la sama botelo kiel lia servoknabo, tute egale, ĉu ĝi entenas akvon, kafon, brandon, aŭ sodotrinkaĵon. Kaj pri la manĝo validas la samo. Kiam la vetero estas tre frida, la mastro, kunruliĝante envolvas sin en kovrilon tuj apud sia

servoknabo, por ke ili reciproke tenu sin varmaj. La mastro dividas sian meleagron sufiĉe honeste kun sia servoknabo; kaj tiu detiras per la fingroj de la maizkaĉa bulo aŭ de la viandopeco tiom, kiom li pensas bezoni por satiĝi. Sed li neniam tuŝas la manĝon de la mastro, eĉ ne kiam li malsatmortus, se la mastro ne manĝas samtempe aŭ jam manĝis. Sed, kvankam la *muchacho* trinkis el la sama botelo kiel la mastro, tiu ne havas ian skrupulon, tuj poste piedbati la servoknabon, se tiu ne sufiĉe rapide suprensaltas por kapti fortrotantan ĉevalon, antaŭ ol ĝi estas tro malproksima. Andreo intencis ree kaŭri en sia angulo, kiam *don* Leonardo rimarkis lin.

„Atentu, *don* Laŭreano“, tuj diris *don* Leonardo, „mi vetas kun vi pri mia *muchacho*, kiom vi donus por li?“

Don Laŭreano havis la ludobankon.

Li rigardis supren, kontrolis la knabon Andreo per rapida rigardo de supre ĝis piede, tiel, kiel oni kontrolas ĉevalon, kies aĉeton oni devas decidi en la sama momento.

„Ĉu li parolas la kastilian aŭ nur idiomon?“ demandis *don* Laŭreano, dum li miksis la ludokartojn.

„Li parolas ambaŭ lingvojn, kaj li scipovas iom legi kaj skribi“, respondis *don* Leonardo.

„Dudek kvin pesojn“, *don* Laŭreano diris per konciza voĉo, kiu klare aludis, ke tio estas la maksimuma sumo, kiun li pretus doni por li.

„*Aceptado*, akceptite“, respondis *don* Leonardo.

La kartoj falis, kaj *don* Leonardo malgajnis la ludon.

Li tiris la revolveron el la zono kaj pesis ĝin en la mano.

Ie aliloke la ludantoj suprensaltus, por deteni *don* Leonardo de hasta suicido. Sed kvankam ĉiu el la sinjoroj vidis la movon, neniu faris mienon kvazaŭ li estas kaptonta la brakon de sinjoro Leonardo.

Ĉiu estis sufiĉe filozofiema, por diri al si: 'Se li volas mortpafi sin, tiukaze estas lia afero, tio tute ne koncernas nin. Ni zorgos pri lia deca enterigo, ĉar tio estas nia devo kiel *caballeros* kaj amikoj.'

Sed la sinjoroj estis tro bonaj meksikanoj, por ne scii, ke neniu tiel rapide pafmortigas sin. Se li ankoraŭ ne forludis sian ranĉon, sian domon kaj la domon de sia

bopatro kaj krome ankoraŭ sian plej bonan ĉevalon, ne ekzistas danĝero de suicido. Meksiko estas tro bela por tio, kaj ĉu oni havos en dua vivo la bonŝancon denove surteriĝi en Meksiko, neniukaze estas certa. Tial estas pli bone, se oni konservas tion, kion oni havas, krome oni ne tentu la diojn.

Don Leonardo karesis sian revolveron, kaj tiam li metis lin antaŭ *don* Laŭreanon.

Don Laŭreano interrompis la miksadon de la kartoĵoj, demetis ilin kaj rigardis la revolveron, kiel oni rigardas artverkon. Li pesis ĝin, svingadis ĝin, rigardis en la tubon, kontrolis la mekanismon kaj diris: „Kalibro 38. *Bueno, muy bueno. All right*, kvindek pesojn.“

Unu el la kunludantoj vokis: „Mi donas sesdek por ĝi.“

„Tion ankaŭ mi donas“, *don* Leonardo diris senemocie.

„Ĉu iu proponas pli?“ li demandis ĉirkaurigardante.

Neniu proponis pli.

„Bone, sesdek pesojn“, *don* Laŭreano kapjesis al *don* Leonardo.

„*Aceptado*“, respondis *don* Leonardo.

„Ĉu vi riskas la sesdek pesojn, aŭ ĉu vi malpliigas la sumon, *don* Leonardo?“ demandis *don* Laŭreano.

„Mi volas vidi la unuan karton, poste mi decidus.“

„*Bueno*, kiel vi volas, *amigo*.“

Don Leonardo levis la donitan karton. Estis sepo. Li diris: „Mi ludos pri la sesdek pesoj.“

„Bone“, respondis *don* Laŭreano. „*Otra*, plian karton, aŭ sufiĉas al vi?“

Don Leonardo dum momento pripensis la aferon. La sepo estis tiel favora, ke estus sen senco postuli plian karton. Se li malgajnus la revolveron, restus al li nur la selo, kaj poste nur la ĉevalo. Tiukaze li devus rajdi returne sur prunteprenita ĉevalo, kaj tio estas por *caballero* preskaŭ tion hontiga kiel devi migri piede, kiel indiĝeno. Meksikana *caballero* iras piede nur tiukaze, se lia ĉevalo sub li renversiĝis. Piede iri, kie eblas rajdi, eĉ se estus tre klopodige kaj daŭre danĝere por la besto kaj la rajdanto, tion faras nur usonaj esplorvojaĝantoj. Kaj tial ili ne estas tre estimataj de meksikaj sinjoroj, ankaŭ se tiuj

esplorvojaĝantoj sian nomon konigis per siaj libroj en la tuta civilizita mondo.

Don Leonardo meditis ankoraŭ momenton, dume li tiel trapenetre kaj intense rigardis la karton, detiritan jam duone de la kartostako de *don* Laŭreano, kvazaŭ li esperus vidi ĝian valoron sur la kovroflanko.

Li decidis diri: 'Sufiĉas, *gracias*.' Sed tute kontraŭvole, li elpuŝis la vortojn: „*Otra*, unu plian.“

Oni donis al li la karton. Li tenis ĝin dum momento tiel, kiel li ricevis ĝin, kun la bildo sur la suba flanko, kvazaŭ li timus vidi la karton. Ĉiuj ludantoj rigardis lin, por povi ĝui tute lian streĉitecon. Ludoj estas ja nur pro tio tiel interesaj, ĉar oni ĉiam travivas du streĉiĝojn, la propran kaj tiun de la kunludantoj.

Don Leonardo memgarde turnis la karton. Ĉiuj kunludantoj ja nun jam sciis, ke lia unua karto devas esti seso aŭ sepo. Se li havus malpli, li ne hezitus postuli novan karton.

Li vidis, ke li ricevis reĝon.

Malkovrante li metis ambaŭ kartojn sur la tablon kaj diris

laŭte elspire: „*Siete y Medio, caballeros*, sep kaj duonon, sinjoroj.“

Trankvile, kvazaŭ alia ludofino tute ne eblus, li prenis sian revolveron kaj remetis ĝin en sian pistolan zonon. Li rastis kelkajn centojn da pesoj, kaj krome li gajnis la bankon. Kiu tenas la bankon, tiu ricevas la avantaĝon pri duono de ludpunkto, kiun li havas pli ol la aliaj kunludantoj.

La ludado estis daŭrigata.

La sekvan tagon posttagmeze je la kvina la sinjoroj deklaris, ke nun la tri lastaj ludoj estas disdonataj, kaj ke poste neniu plu rajtos postuli aŭ akcepti revanĉon. Pri tio la sinjoroj interkonsentiĝis, ĉar ili nun ĉiuj tiom lakis, ke ili apenaŭ kapablis plu teni la kartojn kaj jam komencis nombri malĝuste.

Don Leonardo jam regajnis la tutan monon kaj ĉirkaŭ dumil pesojn kaj kelkajn centojn aldone.

Ĉe proksimuma interkalkulado de la gajnitaj kaj malgajnitaj sumoj evidentiĝis, ke neniu el la sinjoroj suferis tro grandajn perdojn. El la du aŭ tri mil pesoj, kiujn tiu aŭ tiu malgajnis, oni ne faris tragedion. La sinjoroj, kiuj malgajnis, jam en duondormo kalkulis, kiom ili devus pliigi la prezojn de la vendendaj varoj por ekvilibrigi la ludoperdon. Se oni faras la finkalkulon, kutime montriĝas, ke estas malofte la ludantoj, kiuj pagas la perdon. Iu, kiu tute ne partoprenis la ludadon, pagas per sia sango.

La viroj, duone ŝanceliĝante, ekstaris kaj paŝis en la portikon. La servoknaboj, kiuj ĉi tie senokupe sidadis kaj atendis, alsaltis kaj elportis la ĉambroseĝojn de tie, kie la sinjoroj ludis, eksteren en la halon. La viroj sinkis lacaj sur la seĝojn. Kelkaj iom dormis, aliaj interparolis pri dormemigaj banalaĵoj, pli por resti maldormaj, ol por interparoli serioze. Tridek minutojn post tio la dommastro alvokis la virojn, ke ili bonvolu veni al la *comedor*, en la manĝoĉambron.

Post la vespermanĝo la viroj ekstaris, etendiĝis, kaj ekpaŝis al la stratoj, por vidi, kio okazis intertempe en la mondo: ĉu la negocoj estas pli proksimaj al kontrakto, kaj kiun oni povus renkonti, kun kiu interparoli.

Don Laŭreano foriris kun *don* Leonardo. Ambaŭ loĝis en la sama gastejo.

Kiam ili eliris tra pordego, tie staris *Andreo*, kiu apogis sin al angulfoŝto, interbabilante kun alia servoknabo, kiu same atendis sian sinjoron.

Don Laŭreano tuŝetis ŝultron de *Andreo* kaj diris: „Kiel vi

nomiĝas, *hijito*, fileto mia?“

„Andreo Ugalde, *su servidor*, je via servo, *señor*“, respondis la knabo.

„Do, Andreo“, diris *don* Laŭreano. „Ĉu vi jam iam laboris kun bovoj?“

„No, *señor*“, rediris la knabo.

„Tio ne estas tiom malfacila“, daŭrigis *don* Laŭreano.

„Tion vi lernos baldaŭ. Vi estas forta junulo kaj havas tre prudentan vizaĝon. Mi pensas, ke vi havos sukceson ĉe mi. Tion ni baldaŭ vidos. Vi scias kompreneble, ke vi nun estas mia *muchacho*.“

Andreo rigardis *don* Leonardon kaj diris: „Kun via tre afabla permeso, patrono, sed mi apartenas al *don* Leonardo.“

Don Laŭreano turnis la kapon, rigardis al *don* Leonardo kaj diris: „*Don* Leonardo, ĉu vi ne diris al li, ke li nun estas ĉe mi?“

Pro tiu demando *don* Leonardo memoris kiel en sonĝo, ke li vetis la knabon kaj malgajnis lin. Kiam li riskis la

revolveron kaj poste regajnis ĝin, li tre rapide reprenis la revolveron kaj ŝovis ĝin en la pistolozonon. Tion li faris pli rapide ol la kunrastadon de la mono gajnita en la sama ludo. En tiu ludo li gajnis ankaŭ la bankon, kiel li nun eĉ pli bone memoris. Kaj de tiam li pensis ĉiam nur pri la mono, kiun li malgajnis kaj intencis regajni. Sed, ke li perdis la knabon, tion li absolute forgesis. Alie li estus postulinta de *don* Laŭreano, kiam tiu ĉirkaŭ tagmezo preskaŭ sen centavo en la poŝo, jam komencis ludi anstataŭ per mono per personaj kunportitaj aĵoj, ke tiu unue vetu kun li pri la knabo, por tiel ebligi regajni lin.

Sed la ludado nun estis farita. *Don* Laŭreano ne devis redoni la knabon, ankaŭ ne post repago de la dudek kvin pesoj, vetitaj por li.

En Meksiko ne ekzistas komerco pri homoj; neniuj homoj aĉetebblas, neniuj homoj vendeblas. La konstitucio malpermesas tion, la konstitucio solene deklaras ĉiun enloĝanton de la respubliko kiel liberan, sendependan, netuŝeblan homon, je kiu nur la propra patro, la polico, la prokuroro kaj la ŝtato sub certaj kondiĉoj havas korpajn rajtojn. Tial *don* Leonardo post la preterlaso povis ŝanĝi

tion jam neniel. Li ne povis oferti al *don* Laŭreano dudek kvin aŭ eĉ kvindek pesojn. Tio estus aĉeto de homo. Kaj lin kaj *don* Laŭreanon, ambaŭ, oni povus kondamni je severaj prizonaj punoj. Krome ili ambaŭ estis bonaj kaj ortodoksaj kristanoj, por kiuj estus peko vendi kristanon, ankaŭ se estas nur indiano. Ambaŭ, ankaŭ kiel *caballeros* kaj meksikanoj, hontus oferti aŭ eĉ akcepti monon por kunloĝanto de la respubliko kaj tiel trakti la proprajn samlandanojn kiel varon. En ĉiu kazo estus rompo de la bona moro kaj de ĉia kutimo.

Sed la moralo estas tiel komplika, kaj ne nur en Meksiko, ke oni konsideras tion ne maldeca, ne malpermesita aŭ fia, se sinjoroj ĉe ludo riskas la propraĵon de siaj edzinoj, infanoj aŭ gepatroj, kaj ke oni akceptas, se sinjoroj vetas kun iu pri la korpa honoro de sia edzino aŭ de la filino aŭ de la amatino, kiam mankas eĉ centavo kiel havaĵo por povi ludi plu.

Tamen, en tiu kazo la moralo estis tre sobra. Andreo estis peono, kiu apartenas al la bieno kiel movebla havaĵo. Kvankam li ne vendeblis pro la konstitucio, li tamen laŭrajte estis interŝanĝebla inter la mastroj. La peonon

oni ĉe tio ne demandis, ĉu li deziras havi la novan mastron, ĉu ne. Li estis tiel bonege edukita de la eklezio kaj de la bienegaj posedantoj, ke li eĉ ne konsiderus per nura penso diri eĉ riproĉan vorton kontraŭ la interŝanĝado. Tio estus malobeado. Kaj neniuj peonoj havas la rajton esti malobeemaj.

Al la peonoj la bienulo estis malpli fidela ol al siaj preferataj ĉevaloj. Kaj al Andreo *don* Leonardo estis malpli fidela ol al du realoj. Alveninte hejme, li tuj havigos al si alian knabon de la bopatra bieno.

Li diris dormeme: „Jes, tio estas prava, Andreo . Vi estas nun la *muchacho* de *don* Laŭreano.“

Per tio la incidento estis finita por li. Li daŭrigis la interparoladon, tie, kie ĝi estis interrompita. Pri ludoperdoj oni ne funebras kaj oni ne priploras ilin. *Caballero* estas ĉiam grandanima.

Semajnon poste *don* Leonardo revenis hejmen al Tenejapa. Lia akompananto estis ekde La Concordia servoknabo, kiun li luprenis por la vojaĝo. Li pagis salajron al li kaj resendis lin.

Doña Emilia ne tuj demandis pro *Andreo*. Ŝi supozis, ke *Andreo* havas iun komision kaj venos pli poste. Se viro kaj ino post tri aŭ kvar semajnoj revidas unu la alian, kaj ili ankoraŭ ne tro enuas en la edzeco, ili kutime interparolas pri aliaj aferoj, kiuj ŝajnas al ili pli gravaj kaj pli agrablaj ol la aktuala restada loko de indiĝena *muchacho*.

Sed kiam jam du tagoj pasis kaj *Andreo* ankoraŭ ne alvenis, demandis *doña* Emilia la edzon: „Cetere, kie estas *Andreo*? Mi tute ne vidis lin ĝis nun.“

Dum momento *don* Leonardo intencis diri: 'La knabo havis akcidenton survoje. Piedbatis lin mulo, kaj ni devis enterigi lin.'

Jen tio, kion *don* Leonardo elpensis survoje. Sed dironte tion, li trovis ĝin tro stulta. Tial li rimarkis indifere:

„La knabo? Do tiu? Li perdis tri mulojn survoje, kostis tagojn kaj monon al ni kapti la mulojn. Ili estis tute elĉerpitaj. Mi ne scias, kiu diablo lin subite rajdis. Li ne plu uzeblas. Ankaŭ ribelema kaj impertinenta li fariĝis. En La Concordia li forkuris. Al kelkaj aliaj servoknaboj li diris, ke li iros al Tapachula, kie li povus perlabori multe da mono. Mi ne postkuris lin. Se li emas foriri, li ja tamen forkuros. Tio estas la danko, ke mi ne ŝparis penojn je li. Ni skribu al via patro, ke li sendu alian taŭgan knabon de la bieno.“

Ĉar la edzino ĝuste en tiu momento trovis la ĉirkaŭbrakojn de sia edzo precipe dolĉaj, kiel ofte okazas kiel sekvo de pli longa interrompa disiĝo de agrablaj kutimoj, ŝi ne emis kvereli. Tio nur ĝenas dolĉajn revidajn solenaĵojn. Tial ŝi ne plu diris ion pri tio. Oni forgesis la knabon Andreo. La nova knabo, sendita de *don Arnulfo*, bone alkutimiĝis. Ĉar li, ĵus veninta de la bieno, tre obeis kaj tre humilis, kaj ĉiumatene humile kisis la manojn de sia mastro kaj de sia mastrino, kiel li kutimiĝis en la bieno, *doña Emilia* kaj *don Leonardo* interkonsentiĝis, ke la nova knabo estas pli bona, pli laborema, pli komplezema, pli obeema, pli fidela, pli honesta kaj pli

fidinda ol Andreo.

Ĉapitro 04

01

Don Laŭreano Figueroa estis komisionero, io tia, kia komerca agento. Li loĝis en Chiapa de Corso.

Li estis la reprezentanto de ducent aŭ eĉ tricent komercaj entreprenoj en Meksiko, Puebla, Monterrey, Usono, Hispanio, Francio kaj en kelkaj pluaj landoj, pri kiuj li sciis nenion krom la nomo.

En lia distrikto li estis la ĝenerala agento por kudromaŝinoj, por sengrajnigaj maŝinoj por maizo, por porcelanvaroj, por gudritaj kartontegmentoj, por ondolado, petrolo, skribmaŝinoj, hispanaj pulvopafiloj ŝarĝendaj tra la tubobuŝo, florsemaĵoj, dornodrato, gazetoj, ĵurnaloj, botelbieroj, vinoj kaj cigaredoj. Li transprenis frajtojn kaj ekspedojn al ĉiuj punktoj de la terglobo, kiel legeblis sur la kapo de liaj leterfolioj. Li aĉetis kaj vendis terposedaĵojn, domojn kaj hipotekojn. Li estis pli bone konata en ĉiu urbeto de la federacia ŝtato ol la guberniestro aŭ la politikaj ĉefoj. Ekzistis en la ŝtato neniu loko kun meksikaj enloĝantoj, kie ne estis videbla

en ĉiuj vendejoj, en ĉiuj *fondas*, en ĉiuj hoteloj kaj en ĉiuj oficejoj surmura kalendaro kun bildo de multkolora kaj mirinde bela pejzaĝo de speco, kiel oni trovas tian en Meksiko nenie. Super tiu bela pejzaĝo, graslitere presita, troviĝis lia nomo, kaj la pejzaĝo havis kadron el la presitaj nomoj de ĉiuj ĉi aĝoj, kiujn li reprezentis kiel ĝenerala agento.

Ke *don* Laŭreano kiel ĝenerala agento reprezentis tiom da firmaoj, oni ne rigardu kiel ridindan aferon. Se li reprezentus kiel agento nur unu grandan firmaon, li mortus pro malsato. Li estis la ĝenerala agento de mondfama pianfabriko en Nov-Jorko. Dum tri jaroj li sukcesis vendi ununuran pianon. Sed li havis, kiel li skribis al la firmao, la motivitan esperon vendi pluan pianon interne de du jaroj, ĉar novbakita geedza paro jam de monatoj intencas aĉeti iun. Kudromaŝinoj vendiĝis iom pli rapide; sed ankaŭ tiu komerco estis trista afero. Li havis grandan fidon pri bonaj negocoj kun skribmaŝinoj. Skribmaŝinoj ĝuste komencis koniĝi ĉe la negocistoj de la federacia ŝtato, kiuj ekuzis ilin. Li amike rilatis kun la politikaj ĉefoj, kaj li esperis provizi ĉiujn oficejojn de la ŝtato per skribmaŝinoj.

Lia plej grava negoco estis kompreneble la ekspedado, la transporta entrepreno estis kvazaŭ la sekurigita ĉiutaga pano por li, la bazo de lia tuta ekonomia ekzisto.

Li havis kvardek ĉarojn, kiuj moviĝadis inter Arriaga kaj Balún-Canán. Ĉar li kaj la familio, al kiu li apartenis, estis bone konataj en la ŝtato, kaj ĉar li mem havis la reputacion esti nepre fidinda kaj honora, neniam mankis al li frajtaj komisioj. Al liaj karavanoj oni konfidis ne nur multvalorajn frajtojn kaj transportojn de mono, sed ankaŭ sole veturantajn inojn kaj unuopajn infanojn, senditajn al iuj parencoj aŭ en lernejon. Ĉie oni sciis, ke liaj ĉaristoj, kiam ili devas defendi la konfeditajn frajtajn aĵojn, riskas la propran vivon kontraŭ banditoj aŭ kontraŭ katastrofoj de la naturo.

Andreo ne rompĉis al si la kapon pri tio, kial oni transigis lin tiel senceremonie kaj sen demando pri lia opinio de unu mastro al la alia. Tio estus sen utilo kaj ne ŝanĝus ion je la faktoj. La mastroj inter si interŝanĝis ja ankaŭ azenojn, ĉevalojn kaj mulojn. Demandis neniu, ĉu ĉevalo volas iri al la nova mastro aŭ ne, kaj neniu deziras scii, kiel tio plaĉas al ĝi.

Andreo eĉ ne ekpensis diri ion pri tio. Ankoraŭ multe malpli envenis en lian kapon, ke li eble povus havi eĉ la rajton diri jes aŭ ne pri afero, pri kiu interkonsentiĝis jam la mastroj. Ke ekzistas homaj rajtoj aŭ io tia, li ne sciis. Li sciis nur tion, kaj tion li sciis ekde la infaneco: peono devas obei. Kie en la tuta mondo oni permesas al soldato diri ion kontraŭ tio, se la superulo sendas lin en militaj aŭ pacaj tempoj en marĉon, kie povos okazi, ke li sinkos kaj mortaĉos?

Obeo estas la unua devo de soldato; kaj des pli la obeo estas la unua kaj plej grava devo de peono. La soldaton oni sendas al Flandrio ĉu plaĉas al li ĉu ne; kaj liaj mastroj lin interŝanĝas. Hodiaŭ li batalas kaj sangas por

la bonfarto de la angloj, morgaŭ por la rajto de la francoj provizi la mondon per komplezemaj inoj, kaj postmorgaŭ li batalas por la demokratio de ĉiuj landoj kaj por la rajto pri memdecido de la malgrandaj nacioj, kiuj havas koruptitan propran lingvon kaj nekoruptitan ambicion fare de siaj profitavidaj kapitalistoj. Se la obeo de la proletoj ekŝanceliĝas, ekstremas la fundamentoj de la ŝtato kaj la ribelo kaŭriĝas por eksalto. Ĉiuj leĝoj de la naturo ekribelus kaj konfuziĝus, se bienulo, kiam ajn, subite havus la ideon demandi peonon: '*Hijito mío, cómo te gusta, kiel tio plaĉas al vi, filĉjo mia?*'

Andreo ankaŭ neniam atendis de lia patrono, ke tiu demandos lian opinion. Li faris, kion oni ordonis al li. Ne pli kaj ne malpli. Li povus rifuzi, se lia mastro ordonus al li pendumi sin je la plej proksima arbo; ĉar tio estus kontraŭ la leĝoj de la eklezio. Male al tio ne estis kontraŭ la leĝoj de la eklezio, se oni ordonis al li, ke li toleru sian skurĝadon aŭ lasu enfermi siajn manojn kaj piedojn kun kurbigita korpo en la aperturoj de forta duparta tabulo, el kiu li ne povas liberiĝi plu. La eklezio instruis lin, ke tie, kie ne estas obeo al la mastro, de Dio destinita al li, ankaŭ ne atendeblas la obeo al Dio kaj al Sankta Patro. Nur se la

obeo sur ĉiuj vojoj estas sekurigita kaj tre bone sekurigita, la obeo estas sekurigita ankaŭ al Dio kaj al la eklezio. Tion oni tuj de la komenco devas meti en la sangon.

Kio eble vere tuŝis la knabon Andreo ĉe la tuta komerco, estis nur tio, ke oni transigis lin el vivo, al kiu li kutimiĝis, en vivon novan. Se oni ĵetas iun kontraŭ ties volo el malnova kutimo en novan, tio estas plej ofte doloriga.

Jam dum la vojaĝo al la loĝejo de *don* Leonardo Andreo rimarkis, ke estas multe pli agrable servi por la nova mastro ol por la antaŭa.

Don Laŭreano sciis nenion pri la intima vivo de bieno. Li sciis, ke bieno havas peonojn; sed li ne sciis, kia severa disciplino, ja tiraneco, regas en la bienoj. Kiam li foje pro negocoj estis gasto sur bieno, li ne ricevis la okazon ĵeti pli proksiman rigardon al la efektivaj rilatoj de la proletaro en bieno. Li ankaŭ ne interesigis pri tio. Ne estis lia afero tie fari studojn. Li volis fari negocojn kaj volis havi la bienulon kiel daŭran amikon.

Don Laŭreano estis negocisto. Kaj li traktis ĉiujn siajn ĉaristojn kaj *muchachos* laŭ la ora principo de ĉiuj bonaj negocistoj: Se vi povas, profitu, sed aliajn ne incitu! Pro riĉa sperto li sciis, ke tia principo, se ĉiuj negocistoj konsideras ĝin, estas tre favora al ĉiu negoco, komerco kaj trafiko. Estas vere, ke ĉiuj liaj laboristoj vivis simplan kaj severan vivon. Sed, se ili komparis sian vivon kun tiu de la peonoj kaj kun tiu de multaj aliaj proletoj, ĝi ŝajnis al ili eltenebla. Laborilforĝisto en fabriko en Dayton, kiu

perlaboras tridek dolarojn ĉiumonate, kaj ĉeokaze aŭdas ion pri laboristo de tekstila fabriko en Gastono, ekzemple, ke tiu perlaboras nur dek unu dolarojn ĉiumonate, koncedas: „Damne, mi ja ankoraŭ iel sukcese baraktas min tra la vivo, sufiĉe aĉe traktate kaj ĉasate, kun miaj kvar infanoj; sed rigardu tiun bedaŭrindan *son of a gun* en Gaston kun siaj dek unu arĝentotaleroj dum ĉiu semajno kaj kun ok infanoj sur la nuko. Ĉe la ĉielaj trombonistoj, mi tamen ne volus esti en lia felo, kiom mi kontentas, ke mi havas tridek pesojn en ĉiu semajno. Ĝi ne sufiĉas por vivi kaj ne por morti, tio estas ĝusta, sed kiel la povra hundeto en Gaston kun siaj nuraj dek unu arĝenteroj tion eltenas, tio estas por mi la plej granda mondomiraklo sur la tuta terglobo.“

La homoj, kiuj laboris ĉe sinjoro Laŭreano, estis liberaj viroj. Kiam ili kun la ĉaro alvenis en la korto de sia mastro, ili povis diri: „Aŭskultu, patrono, mi volas foriri, mi volas serĉi ion alian.“ Tiukaze, se li estis bona kaj fidinda ĉaristo, *don* Laŭreano diris: „Kial vi volas foriri, Juliano? Vi estas nun jam kvar jarojn ĉe mi. Ni ĉiam bone akordiĝis. *Bueno*, mi donas al vi duonon de realo pli ĉiutage.“

La ĉaristo eble restis kaj ricevis duonon de realo pli ĉiutage kaj estis kontenta. Aŭ li ne restis kaj iris sian vojon. *Don* Laŭreano ne devigis lin resti, kiam li nepre volis foriri. La viro estis libera.

Kompreneble li tre rapide lernis, multe pli rapide ol li antaŭe supozis, ke la libero, rigardata pli severe kaj ĉe taglumo, havas tre malmulte da libero je si, ĉar li trovis entrepreniston, kiu malpli pagas al li, kiu pli rigore laborigas lin, kaj kiu lin traktas hontinde. Sed ĉar ne satigus lin la plenigo de la stomako per pluveroj gutantaj al li en la vaste malfermitan buŝon, li devis servi al la mastro, kiu promesis monon al li por lia laboro, por ke li povu povi aĉeti tortiljojn kaj fazeolojn. Per tiu ĉirkaŭvojo la libera ĉaristo lernis la saĝon, ke libero kaj la libera elekto de la loĝloko estas belaj vortoj, kreitaj por agrable vuali la nudan fasadon de krudaj ekonomiaj faktoj.

Tiel montriĝis, ke tiukaze, se oni sekvis la aferojn kaj rilatojn ĝis la sobra finrezulto, la liberaj ĉaristoj ĉe sia mastro same tiel fidele kaj fidinde eltenis, kiel devis fari tion la peonoj ĉe sia bienulo. La ĉaristoj sciis, ke ili estas liberaj viroj, kiuj povas foriri kiam kaj kien ili volas. La

peonoj sciis, ke ili ne estas liberaj viroj kaj ne havas la rajton foriri, kiam kaj kien ili volas. Sed, se oni metis la finpunkton al la konstato pri iliaj ekonomiaj kondiĉoj, sub kiuj ili devas vivi, montriĝis, ke ambaŭ kaptiĝis en la sama marĉo. Nur, ke la marĉo de unu el ambaŭ grupoj ne havas la nomon de la marĉo de la alia grupo.

La bienposedantoj faris pli grandan profiton, se ili daŭrigis la peonan sistemon, kaj la ceteraj mastroj faris pli da mono, se ili laborigis liberajn virojn por si.

La mallibera peono faris nur tion, kion oni ordonis al li. Li transcedis la pensadon al sia patrono, kaj per tio li transigis al sia patrono ĉian respondecon por la rezulto de la ordonoj.

La libera ĉaristo devis mem pensi kaj devis mem transpreni la respondecon por tio, kion li faras. Se li farus strikte nur tion, kion oni ordonis al li, se li de unu kilometro de la vojo ĝis la alia ne mem pripensus, kiel li plej bone kaj plej rapide antaŭenvenu kun sia ĉaro, atingus ĉaro kun frajtaĵoj la cellokon neniam.

Bieno en la stato, en kiu ĝi troviĝas jam dum kvarcent

jaroj, povas ekzisti nur helpe de la peonoj. Ekspedada entrepreno povas prosperi nur kun laboristoj, kiujn oni persvadas, ke ili estas liberaj. Sistemo kun liberaj laboristoj, kie oni povas ŝarĝi la liberajn laboristojn per respondeco, kaj kie la mastro prenas al si la rajton respondecigi la laboriston je la salajro per dekalkuloj kaj punoj, se la laboristo eraras kiel respondeculo, estas pli favora por la profito ol la peona sistemo. Jen la sola kaŭzo, kial oni forigis la sklavecon surtere. Reformuloj kaj filantropoj ĉiam malfruas jarcenton. Ili atingas ĉiam nur tion, kio estas favora al progresinta kapitalisma ekonomio. Ne pli. Tiel, kiel respublika regadosistemo sekuras kontraŭ la atakoj de la monarkistoj nur tiukaze, se ĝi ebligas atingi ankoraŭ pliajn celojn en la ĝenerala ekonomia vivo kaj se ĝi promesas pli grandajn profitojn ol la monarkia sistemo. Teorioj kaj idealoj, kiuj celas la socian vivon de la homoj, havas la eblecon de realiĝo nur en tiu kazo, se ili garantias pli grandan sekurecon por la ĉiutaga pano. Ĉiuj ceteraj ideoj, ankaŭ se ili aspektas kiom ajn belaj, devas resti en libroj, broŝuroj kaj flugfolioj. En kunvenoj ili kapablas vekti flamiĝantan entuziasmon, sed la sobra grizo de la morgaŭa mateno

sufokas ankaŭ la plej grandan entuziasmon de tiuj, kiuj volas satmanĝi kaj kiuj devas satmanĝi, por ke ili plu povu vivi.

Andreo rajdis apud *don* Laŭreano sur la vojo. *La Providencia*, kie ili tranoktis, troviĝis jam malantaŭ ili.

„Do, vi ankoraŭ ne laboris kun bovoj, Andreo?“ demandis *don* Laŭreano, ekbruligante cigaredon kaj prezentante al la knabo la cigaredopaketon, por ke li eltiru unu el la cigaredoj.

„Ne, patrono. *Don* Leonardo ne havas bovojn kaj ankaŭ ne ĉarojn. Ĉaroj ne povas veturi sur la vojoj de Tenejapa ĝis Jovel kaj sur la vojoj ĝis *Simojovel* kaj supren ĝis Bilja. La vojoj estas tro malvastaj, tro ŝlimaj, tro montecaj kaj ofte tro plenaj de ŝtonoj. Tie ni uzis nur transportmulojn, kaj eĉ muloj ne uzeblis sur multaj vojoj, ĉar ili forrompiĝas kaj glitas en abismojn. Tie ni nur portistojn uzis sukcese.“

„Mi konas kelkajn vojojn tie supre“, diris *don* Laŭrerano, „ofte mi estis tie pro negocoj. Tutajn mejlojn oni devas gvidi surpiede la ĉevalon, se oni ne volas perdi ĝin kaj rompi la nukon al si. Ĉu ankaŭ sur la bieno ne estis bovoj?“

„Nur en gregoj, sinjoro, por vendo. Kaj oni pelis ilin kiel liberajn gregojn supren al Juan Bautista kaj Frontera, kiam la patrono sendis ilin sur la foirojn en Tabasko.“

„Nu, ne gravas, *muchacho*“, diris *don* Laŭreano. „Tion vi baldaŭ lernos. Tio ne estas komplika. Ŝajnas al mi, ke vi estas prudenta kaj lernema. Vi baldaŭ lernos, kiel oni aljugigas kaj jungas la bovojn. Kaj se vi dum certa tempo veturos en la ĉarokaravano kun miaj spertaj ĉaristoj, vi baldaŭ lernos scii la vojon kaj ĉiujn artifikojn.“

„Certe, patrono.“

„La laboro ne estas tiom fortostreĉiga, kiel ŝajnas, knabo“, instruis lin la mastro. „Se la frajto estas ŝarĝita, vi preskaŭ ne havas laboron. La bestoj konas la vojon pli bone ol la *muchachos*. Ili iras eĉ en la plej nigra nokto sen gvidado. Kompreneble, tie, kie la vojoj estas aĉaj, iam kaj tiam estas multe da laboro. Jen via interveno necesas. Jen vi devas ĵeti vian pezon sur la spokojn de la ĉarradoj. Kaj kelkfoje oni devas levi ĉaron el truo, ŝtonojn kaj palisojn oni devas ŝtopi en la kavojn por ebenigi la vojon. Se vi bone atentis, kaj ne dormas sidante, vi nur tre malofte havos rompitan radakson. Ankaŭ tio rezultigus laboron.“

Sed tio tiam estus via propra kulpo. Estus puno por vi, ĉar vi dormis kaj ne atentis.“

„Mi certe bone atentis.“

„Mi estas certa, ke la laboro tre plaĉos al vi. Vi koniĝos al multaj vojoj, vidos multajn lokojn kaj urbojn. Vi ofte malsupreniros ĝis la fervojo kaj ĉiam havos *compañeros*, kamaradojn kaj akompanantojn. De tempo al tempo vi havos familiojn en la ĉaro. Tiam vi jam foje rikoltos duonon de peso kiel trinkmonon, se vi estos afabla al la homoj kaj montriĝos servema. Mi havas nenion kontraŭ tio, se miaj *muchachos* ĉeokaze kunprenas kroman frajtpaketon de unu loko al alia aŭ permesas al vojaĝanto sursidi dum vojtago. La dudek aŭ tridek centavoj, pagataj por tio, estas por vi. Tion mi ne kalkulas tiom severe.“

„*Muchas, gracias, señor*, mi tre dankas al vi, sinjoro.“

„Jes, sed nun pri la salajro, Andreo . Tion ni prefere tuj klarigu inter ni, por ke ni sciu, kie ni staras. Kiom pagis *don Leonardo* al vi por ĉiu tago?“

„*Don Leonardo* al mi ne pagis salajron“, diris la knabo laŭvere.

„Tio ne eblas ĉe mi“, klarigis *don* Laŭreano. „Ĉiu, kiu faras sian laboron, valoras sian salajron. Tio estas mia devizo. Por mi neniuj laboras senpage. Ĉiun laboron mi pagas. Ĉe mi ne estas peonoj kaj sklavo. Ankaŭ laboristo deziras vivi kaj celas prosperon. Mi havis karavanestron, *encargado*, kiu laboris dek ok jarojn por mi. Nun li havas belan vendejon en Suchiapa. Kaj aliulo, laborinta ĉe mi dek kvin jarojn, posedas nun tre belan *ranchito*, ranĉeton en Alcala. Tiuj homoj ne drinkis, bone laboris kaj ĉiam ŝparis sian monon. Mi volas, ke miaj *muchachos* prosperu kaj ne laboru dum la tuta vivo por fremdaj homoj. Anastasio, kiu havas la vendejon en Suchiapa, ricevas la tutan stokon de la varoj, kiujn li vendas en sia vendejo, de mi je kredito. Kaj li pagas ĉiam ĝustatempe. *Muchachos*, laborintaj kaj servintaj honeste kaj fidele al mi, trovas ĉe mi dum sia tuta vivo helpon kaj subtenon. Mi forgesas neniun el miaj viroj.“

Ĉio estis tute prava, kion *don* Laŭreano diris. Neniu vorto estis troigita. Kiam la viroj tro maljuniĝis, por esti bonaj ĉaristoj – ĉar la vivo de ĉaristo estas fortoraba, kiel Andreo baldaŭ estis ekscionta, – *don* Laŭreano helpis al ili fondi iun malgrandan vendejon. Ili tiam estis liaj plej

bonaj klientoj kaj servis al li samtempe kiel subagentoj en la distriktoj, kie ili establis sin. Kaj ili bonege servis al li kiel informantoj pri aliaj komercistoj en la proksimo kaj donis bonajn konsilojn pri novaj terposedantoj kaj pri ties bezono je maŝinoj kaj varoj. Li bone sciis, kiel organizi kaj plivastigi siajn negocojn.

„Kiel mi jam diris, por mi neniun senpage devas labori. Mi jam pensis pri via salajro. Mi donas al vi ĉiutage unu realon kaj du realtrionojn, do dudek centavojn. Tio faras ses pesojn dum monato. Tio estas bona salajro.“

„*Muchas gracias*, patrono.“ Por Andreo la salajro certe estis tre bona; ĉar li ricevis ĝis tiam neniun salajron.

Ses pesoj, mezuritaj je liaj bezonoj, estis tre granda sumo.

„Kompreneble vi havas ŝuldon, Andreo, kiun vi antaŭe devos partopagi al mi.“

„Kiun ŝuldon, patrono?“ demandis Andreo. „Mi aĉetis nenion.“

„Tio estas prava, *muchacho*, vi aĉetis nenion. Sed mi devas diri al vi, ke *don* Leonardo ĉe la kartoludo malgajnis al mi dudek kvin pesojn. Kaj tiujn dudek kvin

pesojn nature vi devas pagi.“

„Jes, sinjoro.“

„Tio faras – atendu momenton.“ *Don* Laŭreano kalkuladis mallaŭte murmurante. „Jes, tio estas dudek centavoj por peso, tio estas kvin... kaj en dudek kvin pesojn... tio estas cent dudek kvin. Tio estas do cent dudek kvin tagoj. Tio estas do cent dudek kvin tagoj, kiujn vi devos labori antaŭ ol mi povos pagi al vi la salajron *in efectivo*, do kontante. Kompreneble, mi ne estas tirano. Se vi bezonas ion, diru tion al mi, kaj mi donas al vi antaŭpagon, tri aŭ kvin pesojn, kiujn ni poste dekalkulos de via konta bonhavo.“

„Jes, sinjoro.“

„Tion vi ja komprenas, Andreo, ĉu?“

„Jes, sinjoro.“

„Sekve ni interkonsentiĝis?“

„Jes, sinjoro.“

„Kompreneble vi ricevas la manĝon. Vi ĉiuj ricevas por la vojo viajn porciojn el faboj, salo, sukero, kafo, rizo,

sekigitaj fiŝoj, sekigita viando, de tempo al tempo krome ladujeton kun sardinoj, kaj vi ricevas la monon por la manĝoj kaj trinkaĵoj, por ke vi povu aĉeti tortiljojn sur la vojo. De miaj ĉaristoj ankoraŭ neniam iu malsatmortis. Kaj se ili ne disipis la monon por tekiloj kaj komitekoj, ili ĉiam ŝparis sian monon kaj tiel plibonigis sian staton en la mondo.“

„Jes, sinjoro.“

„Tio estu kompreneble klara al vi, ke vi ne rajtas forkuri ĝis via kulpo da dudek kvin pesoj estos plene pagita, kaj se vi ricevis de mi antaŭpagon, tio kompreneble ankaŭ estas ŝuldo, kiun vi devos repagi, antaŭ ol vi povus pensi pri tio serĉi alian patronon aŭ eĉ forkuri al Gvatemalio. Tie en Gvatemalio la *muchachos* vivas ja multe pli aĉe ol nur mizere. Ja ne pensu tion vera, se ekzemple vagabondantaj *muchachos* en Arriaga volos rakonti al vi, ke oni multe perlaboras sur la plantejoj en Gvatemalio. Tio estas malicaj mensogoj de la vagabondoj, kiuj ĉirkaŭvagas en Arriaga, Tonalá kaj en Tapachula. Restu en via patrolando, Andreo, servu al via mastro fidele kaj lojale, tiel nenio mankos al vi. *La patria, tu pais propio,*

en la propra lando estas ĉiam plej bona kaj sekura en la vivo, tie vi estas inter viaj homoj kaj neniam malsatmortos. Mi estas plene konvinkita, nun rigardante vin, ke vi estos bona kaj fidela ĉaristo.“

„Mi tre klopodos, patrono.“

„Tion mi vere esperas, Andreo. Kiel ĉaristo vi havos tre respondecan laboron. Se eble eĉ okazos, ke varoj el via ĉaro perdiĝos, ke oni ŝtelos ilin de vi, aŭ ke ili forbrulos, aŭ, ke ili falos en abismojn, vi kompreneble devos anstataŭi ĉion. Tion mi tiam devus dekalkuli de via salajro, kaj vi havus ŝuldon ĉe mi. Sed, se vi bone atentos, io tia ne povos okazi.“

„Mi bone atentos, patrono, ke neniu varo perdiĝu.“

„Tion mi scias, vi estas fidinda knabo, Andreo.“

Ili ankoraŭ dum iom da tempo trotante rajdis. Tiam *don* Laŭreano forĵetis la cigaredostumpon kaj diris: „Nun ni iom galopos, por ke ni progresu antaŭen.“

Ĉapitro 05

01

Ŝanceliĝante kaj brue pum-pum-ante la ĉarokaravano sin trenis sur la dek kvin mejlojn longa vojo de Chiapa de Corso ĝis supren al la altmontara pasejo *El Calvario*. Tiu pasejo *El Calvario* kondukas transen de la plej alta punkto *Cerro de Chiapa*, kiu estas parto de la kruta rokmontara ĉeno nomata Sierra, kiu etendiĝas longe inter *Chiapa de Corso* kaj Ixtapa kaj disigas la tropikan malaltan ebenaĵon Tuxtla Gutierrez de la frideta alta regiono *La Mesa de Las Casas*.

La altmontara pasejo *El Calvario* havis spite al sia tiom pia kaj tiel katolika nomo diable malbonan reputacion. Ĝi estis vojo plena de suferoj en ĉia ajn rilato, kiu penseblas. Vojo de suferoj por vojaĝantoj de ĉia maniero kaj de ĉiu speco; por vojaĝantoj, kiuj iris piede, rajdis sur ĉevaloj aŭ sur la dorso de muloj. Ne malpli ĝi estis vojo de suferoj por la indiĝenaj portistoj, kiuj devis pene porti pezajn ŝarĝojn kun varoj, aŭ portokorbojn, en kiuj sidis vojaĝantaj inoj aŭ oldaj, ne rajdokapablaj viroj. Korpulentaj inoj, sufiĉe ofte portendaj, pezis cent tridek

ĝis cent kvindek kilogramojn. Kaj eĉ pli la pasejo estis vojo de suferoj por la gvidantoj de la ĉaroj aŭ por la pelistoj de pakbestaj karavanoj.

Tiuj gvidantoj komencis sakri, forlasinte antaŭ horo la afablan urbeton *Chiapa de Corso*, nestigita en la eterna verde de la palmoj kaj de la bananaj arboj, ĉar ili ne estis tiel stoikaj kiel la indiĝenaj portistoj, kiuj troitis silente kaj persiste alten per facilaj kaj balanciĝantaj paŝoj. Ju pli kruta kaj komplika iĝis la vojo, des pli detalaj kaj des pli sovaĝaj fariĝis la sakroj. Tiuj ĉarogvidantoj kaj mulopelistoj forĵuris kaj malbenis sur tiu ĉi vojo la proprajn animojn kaj la animojn de siaj patrinoj, ili malbenis siajn naskigintojn kaj ili malbenis la tagon, kiam oni naskis ilin, kaj tiom pli ili malbenis la tagon, kiu faris el ili ĉarogvidanton. Ili malbenis per kriantaj voĉoj Dion en la ĉielo kaj Sanktan Virgulinon, kaj kiel kromdonon ili deziris, ke ĉiuj sanktuloj de la eklezio venu en la inferon. Ĉe ĉiu vojkurbiĝo de la vojo ili promesis sian animon kaj la animon de ĉiu el siaj infanoj al la diablo, se tiu bonŝance pasigus ilin sen rompita rado aŭ rompita akso, sen falo de tirbovoj en la profundajn abismojn, sen malsuprenglitado de pakbestoj de la vojo

en la fendoriĉajn ravinojn.

Supre sur la kalvaria monto staris granda ligna kruco, evidente de la vetero atakita, en alta ŝtonamaso, sur kiu kuŝis montoj de velkintaj floroj. Kaj se la ĉaristoj kaj mulpelistoj atingis la krucon, tiam ili ĉiuj demetis la grandan de fulmotondroj distaŭzitan bastĉapelon, faris tri genufleksojn kaj sin krucosignis. Per tio ili denove estis akceptitaj en la aron de la kredantoj kaj piuloj, kaj Satano ne plu havis potencon pri ili kaj pri iliaj animoj; ĉar Dio kaj Benata Virgulino grandanime pardonpetas al la pekinto, kiu reiras plena de pento al la laŭdokantoj kaj konsekritaj krucoj, kaj ĉar Tiu, kiu kreis montojn, ravinojn, riverojn, marĉojn kaj lagojn, transprenis la respondecon por ĉio, kio okazas al tiuj kreitaĵoj kaj kion oni faras pro ili. Suprenveni sur la altmontaran pasejon ili ja nepre devis, kaj ĉu ilin helpas ĉe tio Dio aŭ Sankta Virgulino aŭ Satano, tio estis fakte egala al ili, se ili nur venos supren kun siaj ĉaroj, siaj bestoj, siaj ŝarĝoj kaj siaj varoj.

Post la atingado de la kruco la kalvaria vojo kompreneble ne finiĝis, kiel oni povus supozi, ĉar tie ja staras la kruco,

kiu promesas saviĝon al ĉiuj homoj. Tiel facile oni ĝin ne faras al la homoj surtere, alie ili tro rapide ekdiboĉus kaj malĉastiĝus. Kaj sin nur signi per kruco, tio ne sufiĉas. Tiom malkara la vivo ne estas en la plendinda surtera mizera mondo.

Por multaj vojaĝantoj, precipe por tiuj sur ĉevaloj, kiuj vojaĝis sole aŭ nur duope kaj akompanataj ĝuste nur de unu aŭ de du servoknaboj, komenciĝis nur tiam la vera kalvaria vojo.

El Calvario havis duoblan signifon. Kiam oni komprenis la unuan el la signifoj, sakrante, ĵurante, ĝemante kaj ŝvitante, oni havis ankoraŭ la solvon de la dua signifo antaŭ si. La solvado de la dua signifo sufiĉe ofte finiĝis per rapida kaj rutina kaj pro tio senkompata morto de la vojaĝantoj. Tial sakris tiuj, kiuj ne estis tiom certaj, ke ili sane kaj sendamaĝite preteriros la krucon, malpli ofte sur la vojo ol la *carreteros* kaj *arrieros*, kiuj havis pli fortikan naturon kaj malpli ofte pensis pri la alia mondo, ĉar ili pli devis pensi pri la pli proksima ĉi-tiea mondo. La vojaĝantoj plej ofte mortis tiel subite, ke ne restis sufiĉe da tempo por krucosigni sin, kaj sekurigi al si per tio

ankoraŭ ĝustatempe oportunan vivon en la alia mondo.

Rimarkoj

carretero = ĉaristo

arriero = mulpelisto

La altmontara transpasejo estis fifama kaj timata pro la banditoj embuskantaj tie vojaĝantojn kaj karavanojn.

La banditoj estas lertaj kaj prudentaj negocistoj, kiuj regas sian metion kaj faras sian laboron kun memgardemo kaj saĝeco. Tie, kie guberniestroj, generaloj, policaj ĉefoj, deputitoj, urbestroj kaj impostkolektistoj priŝtelas la landon kaj la popolon, kie ajn estas nur okazo, al centoj de neoficistoj ne restas io alia, krom same priŝteli iun. Se oficisto ŝtelas ion, oni nomas tion korupteco, se neoficista persono ŝtelas ion, estas bandito. Sed nur tie, kie oficistoj ŝteladas, ŝtelas ankaŭ banditoj. Kaj tuj, se oni supre ĉesigas la ŝteladon, la banditoj malsupre ĉiuj formortas dum la paso de semajno.

La banditoj de la Calvariomonto ne embuskis ĉiutage. Tion iliaj inoj tute ne estus indulgintaj; ĉar ankaŭ la edzino de sia edzo volas havi ion alian aldonan ol nur la ĉiutagan panon kaj ĉeokaze novan robaĉon. Krome la embuskantoj ne povis vivi nur de la banditaj enspezoj, ili devis konservi sian bonan reputacion. Tial ili ĉiuj havis

malgrandan, kelkfoje eĉ grandan farmon. Kaj al tiuj farmoj ili dediĉis la plej grandan parton de sia tempo. Unue por resti estimataj civitanoj, due por ne vekii nenecesan suspekton kaj trie por havi sekuran enspezon por la infanoj, por ke tiuj povu plenkreski al honorindaj civitanoj.

Pro ĉiuj ĉi kialoj ili ne ĉasis ĉiutage. Krome tio fortimigus la vojaĝantojn efektive vojaĝi tie, aŭ ili veturus nur en grandaj grupoj, tiel, ke la banditoj ne plu povus fari negocojn. Kaj la registaro tie starigus daŭran komandan postenon, kiu estus ĝeno por la banditoj. Tial okazis, ke pasis multaj semajnoj, ja ofte eĉ monatoj sen iu rabatako. Kaj tiam oni subite dum tri tagoj prirabis ĉiujn vojaĝantojn kaj karavanojn, kiuj alvenis sur la vojo. Alitempe eble okazis, ke oni nur al unu aŭ du vojaĝantoj baris la vojon kaj prirabis nur malgrandan mulan karavanon, dum ĉiuj ceteraj, kiuj devis iri en la sama tago aŭ en la sama semajno la vojon, vojaĝis sen molesto.

Ĝuste la necerteco, kiam la banditoj aperos, faris el la vojo terurvojon. Neniam iu antaŭe kun certeco sciis, ĉu li traglitos sane kaj ne prirabite, aŭ ĉu ne. Neniam iu kun

serena certeco povis porti monon de loko al loko bezonatan por aĉetoj aŭ gajnitan el vendoj, aŭ iujn aliajn valoraĵojn. Eĉ, se iu vojaĝante havis nek multan monon, nek iujn valoraĵojn ĉe si, tamen ne estis certe, ĉu oni ne senvestigos kaj murdos lin. Nur ĉevalojn kaj mulojn kaj selojn oni ne rabis. Ĉar ĉiuj bestoj havas siajn brulmarkojn, kaj seloj havas tiom da specialaj malgrandaj rekoniloj, ke per ili oni povus trovi la banditojn.

La vojaĝantoj kompreneble povus veturi en grandaj grupoj. Kompreneble ili povus fari tion. Sed oni ne povus aranĝi tion tiel facile kiel ĉe kompanio de soldatoj, al kiuj oni ordonas, ke ili ekmarŝu je certa horo, kaj tiam ili simple ekmarŝas.

Je la tago, kiam ekzemple kvinopo povus ekvojaĝi, la alia kvinopo, intencanta vojaĝi kun la unua grupo, ne povas ekveturi, ĉar iu el ili intertempe havas malsanan infanon, la alia naskigontan edzinon, la tria aĉetis domon, kiun li devas inspekti je tiu tago, la kvara tro ŝarĝis sian stomakon, kaj kvina en la nokto eble decidis, ke la vojaĝo tute ne urĝas, kaj ke li ĝin prefere prokrastas. Poste ankaŭ la unua kvinopo ne restas kune. Iun viron oni alvokis

neatendite al tribunalo, al alia en la frua mateno forbrulis la domo, kaj tial restas nur tri aŭ eĉ nur du homoj, kiuj nepre devas entrepreni la veturon, ĉar ilia tuta negoco dependas de tio esti je certa tago en Tuxtla aŭ en Arriaga. Tiel la restintoj veturas duope. Je bonŝanco. Ili ekrajdas kun konsekritaj amuletoj, kun sennombraj krucoj de la familianoj kaj kun bonkvalita ĉirkaŭpendigita revolvero. Du tagojn aŭ du semajnojn poste oni trovas ilin mortpafitaj aŭ mortbatitaj en unu el la abismoj. Kelkaj el la banditoj, ne sciante ion, diligentaj kaj sobraj kamparanoj, al kiuj oni ne povus riproĉi iun honordifekton, helpas ĉe la serĉado, ili kulpigas per tondraj vortoj la registaron kaj plendas, ke mankas al la banditoj la eklezia kredo, kaj ke ili estas punoskurĝo por la lando, ĉar mankas al ili ĉiu kredo pri venĝo en la alia mondo.

Kiu ajn kreis la altmontaran pasejon, ĉu tertremo ĉu la kara Dio en la ĉiela alto aŭ tre lanta ŝanĝiĝo de la terkrusto, ĉiukaze tiu aŭ tio, kio kreis la pasejon, estis donacema. Li aŭ ĝi konstruis miraklon de la naturo.

La vojo kondukas kun pli ol kvindek kurbiĝoj sur la rokmontaran supraĵon. Eble estas eĉ okdek vojkurbiĝoj aŭ cent dudek. Kiu sciu? *Quién sabe!* Neniu kalkulus la kurbiĝojn. Kaj tiu, kiu planis kalkuli ilin, tre baldaŭ forgesas, kiom da ili li jam pasis, ĉar li devas koncentriĝi pri aliaj aferoj, kiuj momente estas pli gravaj ol geografiaj aŭ topografiaj konstatoj.

La suprengrimado komenciĝas jam antaŭ ol oni forlasos la lokon Chiapa de Corso. La lasta preĝejo de la urbo staras jam tiom alte super la urbo, ke piuloj, kiuj rapide senspiriĝas, ne povas viziti ĝin.

En la urbo la stratoj estas bone pavimitaj, kun krudaj rondaj ŝtonoj de tiu speco, kiu estis tre moderna antaŭ kvincent jaroj. Sed tuj, kiam oni forlasas la lastan pavimitan straton, komenciĝas la turmentoj, el kiuj oni

liberiĝos nur tiam, kiam oni atingos post preskaŭ cent kilometroj la sekvantan urbon kun pavimitaj stratoj.

Sur la tropika malalta ebenaĵo, kie la stratoj kaj placoj estas limigataj de altaj palmoj, tie, kie la agroj, la ĝardenoj kaj la kultivitaj terposedaĵoj estas plenaj de riĉaĵoj el plantoj, floroj, arbustoj kaj arboj de la varmega zono, grimpas la vojo supren sur la fridetan altaĵon de la *Sierra*, kie staras abioj tiel belaj, fortaj kaj sveltaj kiel en la nordo de Ohio.

Pli kaj pli profundaj fariĝas la krutaj ravinoj kaj abismoj ĉe la maldekstra flanko de la vojo; kaj dekstre staras preskaŭ je la tuta longo de la vojo la alta kruta rokara fronto de la *Sierra*, kiu ŝanĝiĝas nur rilate al la karakterizaj trajtoj de la plantoj kaj de la dorna vepro, kiuj kreskas tie.

Tiam, supre sur la pasejo, oni vidas la tutan tropikan ebenaĵon, kiu sin sternas ĉe la piedoj. Tre malproksime ĉe la horizonto, en verde blua vibrado, leviĝas la longa montoĉeno de alia brako de la *Sierra*, kiu per siaj montosuproj profunde etendiĝas super la nubojn. Kiel arĝenta fadeno, kiu sen formo kaj sen dezajno estas

enteksita en gigantan tapiŝon, kuŝas la Grijalva-rivero, ŝajne senmova kaj ŝajne fremdeca en la briletanta ebenaĵo.

Estas groteska tragiko, ke ĝuste en tiuj lokoj de la vojo, kie oni tute povas forgesi sin mem, dum oni rigardas la eksterordinarajn donacojn de disipema naturo, plej proksimaj estas la banditoj kun revolveroj, fusiloj kaj tranĉiloj. Ĉar estas ĝuste tiuj lokoj, kie la vojaĝantoj kaj la karavanoj povas nek eviti, nek reiri nek fuĝi. Sur la maldekstra flanko de la vojo, ducent ĝis tricent metrojn profunde troviĝas la kruta roka abismo, kaj sur la dekstra flanko staras dura kaj kvazaŭ elkreskinta el la vojo la rokara fronto, tiel kruta, tiel malglata, tiel dense kovrata de dorna vepro kaj fingrolongaj pikiloj de multaj diversaj kreskaĵoj, ke eĉ kaprino perdus ĉian esperon povi fuĝi sur tiu vojo.

Oni povas kompreni, kial multaj vojaĝantoj nomas la pasejon „*Ayúdame Purísima!*“ „Sankta Virgulino, patrino de Dio, helpu al mi!“ Sed ĉar ankaŭ la banditoj estas bonaj katolikoj, kaj same alvokas Sanktan Virgulinon, ke ŝi havigu grasan predon al ili, la ŝancoj por ambaŭ partioj

estas kvindekprocentaj.

Ĉar la ĉaristoj bone konis la multnombrajn danĝerojn de la vojo, tio instigis ilin atendi en bivako ekstere de la urbo *Chiapa de Corso*, ĝis sufiĉe da ĉaroj estos kune, por ke ili povu formi tre grandan longan karavanon.

Grandan karavanon la banditoj povas reteni certan tempon, sed ili ne povas sukcese ataki kaj prirabi ĝin. Se la rabistoj atakas la unuan ĉaron kaj eĉ knalas nur unu pafao aŭ eksonas nur unu krio de la atakita ĉaristo, haltas tuj la tuta karavano kaj la gvidantoj de la mezaj kaj malantaŭaj ĉaroj, bone ŝirmataj per la ĉaroj, avancas kun siaj pafiloj, maĉetoj, bastonegoj, tranĉiloj, radospokoĵoj, ŝtonoj aŭ kion ajn ili krome havas ĉemane. Kaj tiam la situacio por la banditoj iĝos tikla, se ili ne fuĝas ĝustatempe. Se ili atakas la lastan ĉaron, okazas nur ŝanĝiĝo de la fronto, sed la rezulto estas la sama. Se la banditoj eksciis, ke la ĉaroj ŝarĝis metalmonon, okazis kelkajn fojojn, ke oni samtempe atakis la unuan kaj la lastan ĉaron. En la sovaĝa tumulto de la batalo, kiu estis la sekvo, la banditoj, rapide eljunginte per tranĉado la bovojn, sukcesis ĵeti kelkajn ĉarojn en la abismon, kaj ili

ankaŭ sukcese elrabis kelkajn pluajn ĉarojn kaj ĵetis la enhavojn en tiujn abismojn, kie staris kelkaj viroj postene por tuj forporti la rabitajn aĵojn al sekura loko. Sed tiam por la supre batalantaj banditoj estis jam la plej lasta momento por foriĝi kiel eble plej rapide kaj kaŝi sin mem en sekura loko, ĉar jam pli ol duono el ili estis vunditaj kaj kelkaj el ili ne plu estis tute kompletaj rilate siajn korpajn partojn. Ili devis kapitulacii, sen gajni aŭ nur vidi la monon transportatan de la ĉaristoj.

Se la ĉaristoj transportis ankaŭ varojn havantajn nur malgrandan komercan valoron, ekzemple salon, kahelojn, librojn, botelojn aŭ frajtaĵojn ne bone vendeblajn de la banditoj, kiel ekzemple maŝinpartojn, ladoplatojn aŭ ferstangojn, la ĉaristoj tiukaze iris en grupoj kun kvar ĝis ok ĉaroj. La ĉaristoj mem havis nur malmulte da mono ĉe si, ĉiu el ili eble nur sesdek aŭ sepdek centavojn, kaj tiujn malmultajn centavojn ili scipovis tiel bone kaŝi, ke neniu bandito povus trovi ilin.

Se la ĉaroj male al tio transportis valoran frajton, kiel ekzemple silkaĵojn, horloĝojn, vestajn ŝtofojn, juvelojn, vinojn, likvorojn, revolverojn, ĉasarmilojn, municion, ili

iris nur en grandaj karavanoj kun kvardek ĝis sesdek aŭ eĉ pli da ĉaroj.

Sed la grandaj karavanoj, kiel ajn utilaj ili estis kiel protekto kontraŭ banditoj, havis multajn malavantaĝojn. Ili marŝis multe pli lante ol pli malgrandaj grupoj, kio altigis la frajtkostojn, ĉar ĉiu tago kaŭzas kostojn por la nutraĵoj de la bovoj kaj la salajron de la gvidantoj, kaj por la komercisto malfruiĝo je tago povas signifi, ke li ne ĝustatempe povas vendi la frajton. Por grandaj karavanoj estis multe pli komplike havigi la necesan bestonutraĵon ol por malgrandaj. En granda karavano la nombro de la aksorompoj estas pli granda ol en malgranda. Kaj se la karavano ne volas disiĝi, la tuta karavano devas halti, ĝis la rompitaĵoj estas riparitaj. Jen la kaŭzo, kial oni nur en tiu kazo iris en grandaj ĉarokaravanoj, se oni bezonis protekton.

La *carretas* estas plumpaj, peze konstruitaj duradaj ĉaroj. La radoj estas tre altaj, pro la riveroj kaj marĉoj, kiujn oni devas transiri en marŝoj. La ĉaro mem havas malvastan konstruon, ĝi estas duoble pli longa ol larĝa. Ĝi havas duonrondan tegmenton, kiu kuŝas sur framo el grandaj ringoj. En karavano kun dudek ĉaroj estis apenaŭ du ĉaroj kun tegmento de la sama speco. Unu ĉaro havis tegmenton el kruda tolteksaĵo, alia tegmenton el fragmitaj matoj, plua havis kovrilon el interplektitaj palmfolioj, kaj aliajn oni kovris per feloj de cervinoj, antilopoj, pumoj aŭ jaguaroj, alia havis ĉifontegmenton, do kolekton el malnovaj ĉemizoj, kotonpantalonoj kaj disŝiritaj lankovriloj. Kaj troviĝis eble ankaŭ ĉaro, kiu havis tegmenton el speco de korboplektaĵo, kaj alia havis tegmenton el brunaj, bone tanitaj feloj de bovinoj, kaproj aŭ ŝafoj.

Ĉiun ĉaron tiris bovoparo. La bovoj estis eksterordinare grandaj bestoj kun longaj kornoj. Multaj el ili aspektis tiel pezaj kaj grandegaj, kvazaŭ ili estus ensorĉitaj elefantoj.

La bovoj ne tiris per jugo troviĝanta sur ilia kolo, sed ili

tiris per siaj fortikaj fruntoj.

Du bovojn, la tirparon, oni apudstarigis, tiam oni metis super iliajn kapojn tute proksime al la malantaŭo de la kornoj, pezan tirtrabon. Tiu trabo estis jam per si mem tiom peza, ke forta viro devas klopodi, se li sola surmetas ĝin. Kiam la trabo estas metita sur la deziratan lokon, kaj la bovoj havas la necesan distancon inter si, oni ligas la trabon per firmaj kaj krude tanitaj ledorimenoj kun la kornoj. De tempo al tempo oni boras truojn en la kornojn, por ke oni povu firmteni pli sekure la rimenojn en ties situo.

Kiam la tirtrabo estas firmligita per la rimenoj, oni ligas ĝin per aliaj rimenoj al la peza timono de la ĉaro. La timono estas rigide fiksita al ĝi.

La bovoj tiras la ĉaron per klinitaj kapoj. Neniu el ambaŭ bestoj sendepende povas fari movon per la kapo. Ĉiu kapmovo de unu el la bestoj kaŭzas la saman kapmovon de la apuda besto. Dum la marŝo ili ne povas defendi siajn antaŭajn korpopartojn kontraŭ la mordoj de grasaj muŝoj kaj aliaj insektoj, kiuj milope ĉirkaŭsvarmas la ĉarojn. Ili sin ne povas leki, ja eĉ ne skui sin. Ili devas elteni, kion

Dio, kiu kreis tiujn insektojn, ŝarĝas sur ilin. Tiel okazas, ke en tiuj tagoj, kiam pluvo minacas, aŭ se la insektoj pro aliaj kaŭzoj pli ol kutime malsatas kaj sangavidas, la bovoj de la kapo ĝis la piedoj estas kovritaj per sango, kiu senĉese fluetas en sennombraj mincaj strioj super iliajn antaŭajn korpopartojn.

Rigide gapante per siaj grandaj kaj vitrecaj okuloj, movante apenaŭ iam okulglobon, la bovoj peze marŝas, la ĉarojn tirante post si, paŝon post paŝo antaŭen. La paŝoj estas ekstreme lantaj, sed regulaj, kvazaŭ gvidus ilin maŝino.

La bovojn oni pelas ne per vipo, sed per longaj bastonoj. La bastonoj, eltranĉitaj el dura ligno, estas akre pintigitaj je unu finaĵo. Ĉe kelkaj oni anstaŭis la lignan pinton per najlo. Per tiuj bastonoj la ĉaristo pikas la bovojn en la postaĵojn, se li volas rapidigi ilin. Kion la insektoj ne povas atingi ĉe la malantaŭaj korpopartoj de la bovoj, ĉar tie la bestoj per siaj vosto forpelas la insektojn, tion la ĉaristoj atingas per siaj akre pintaj bastonoj. Se la irado sur la vojo estas eĉ pli malfacila ol kutime kaj la bovoj estas malsataj kaj lacaj kaj ne tiel rapide antaŭeniĝas kiel

la ĉaristoj deziras tion, la sango baldaŭ komenciĝas flueti en sennombraj strioj ankaŭ el la postaj korpopartoj de la bovoj. Sed la ĉaristojn siavice la labordonantoj atakas, pikas, insultas kaj minacas per elĵeto el la laboro, se ili tro malfruiĝas survoje. Tiel la bovoj havas almenaŭ la kontentiĝon, ke la mondo estas perfekta, kaj ke Dio estas justa kaj venĝas ilin.

En la seka sezono la vojo estas kovrita de polvotavolo, kiu estas dudek ĝis kvindek centrimetrojn alta kaj el tre blanka kaj fajna kalkeca substanco, kiu brulas kaj mordas kiel veneno en la okuloj, en la nazo kaj en la buŝo. En la pluva sezono la vojo estas kovrita de tenaca tertavolo, kiu altas duonon de metro kaj firmkroĉiĝas al la ĉarradoj kaj la bovopiedoj kvazaŭ per ŝnuregoj.

Sed egale ĉu estas seka sezono kun la ĉiama vualo de dikaj tavoloj el polvonuboj, aŭ ĉu estas pluva sezono kun la diktavola, tenaca ŝlimo, la vojo estas ĉiam kaj eterne martiriga kun siaj miloj da truoj, vojsulkoj kaj kavaĵoj, kun siaj milionoj da ŝtonoj kaj rokoblokoj, kun siaj dikaj ellavitaj radikoj de gigantaj tropikaj kaj duontropikaj arboj, kun sia deglitado de tutaj vojpartoj, kun sia bruado

ĉe la falado de forrompitaj ŝtonamasoj kaj forputritaj aŭ purlavitaj trunkoj. Jen kompato ekzistas nek por la ĉaristoj, nek por la bovoj, neniuj saviĝo el miloj da suferoj de homoj kaj bestoj, ĉar en Suchipa, Tuxtla, *Chiapa de Corso*, Ixtapa, *San Cristóbal*, *Comitán* kaj Sopaluta vivis miloj da homoj, kiuj bezonis salon, vestojn, librojn, mandolinojn, serurojn, likvorojn, horloĝojn, ŝuojn, skribmaŝinojn, fonografojn, porcelantasiojn, silkajn ĉemizojn, orelringojn, fotografajn aparatojn, parfumojn, feltoĉapelojn, alumetojn, cinamon, aspirinon, oleopentraĵojn, kroĉtrikilojn, botelan bieron, kraĵojn, tranĉilrazilojn kun garantiaĵo de sendanĝereco, okulvitrojn, cicumojn, ŝraŭbojn, ŝirfoliajn kalendarojn, butonojn. Sen transporto ne estas civilizacio.

Rampante la karavano grimpis sur la pasejon El Calvario. Tio estis grandioza brua komponaĵo tia, kia ĝin povus krei neniu artisto. Kiom ajn diferencaj kaj kiom ajn disonancaj estis la sonoj, ili formis tamen, ĉiuj kune, mirinde belan harmonion.

Aŭdiĝas anheloj, kelkfoje grumbla grunto de unu el la bovoj, la ĝemsimilaj sonoj de la ledaj rimenoj, la grincado de la radoj, la knarado de aksoj, la raslado de la surkonstruitaj ĉaroframoj, la bruoplena kaj vitreca tintado de malbone pakitaj objektoj en la kestoj, la grincado kaj stumblado ĉe la veturado trans ŝtonojn, la ŝrikanta forglitado de rado de montsupro, la falado aŭ renversiĝo de unu ĉaroflanko en kaveton de la vojo, la trasinkado en akve subminitan kavaĵon, la tam-tamo sur roka parto plena de tuberoj, la pum-puma bruado trans grandajn radikojn, krioj de la ĉaristoj, sakroj, insultoj, ĵuroj, pelantaj vokoj. Iu fajfas melodion, alia kantas ion, alia zumadas ion por si. Tiam sidas ĉaro tiom profunde en truo, ke ĝi firmopinĉiĝas. La viroj de la najbaraj ĉaroj venas por helpi, kaj kun multe da kriado kaj ĝemado oni ellevas

la ĉaron. Poste la tuta karavano denove moviĝas pro sia peza ŝarĝo treniĝe antaŭen. Ĉe la vojflankoj en la vepro kaj en la herbejoj ĉirpas kaj flutas griloj kaj cikadoj, ie kantas kelkaj birdoj, abeloj flugas zumante tra la vibranta aero, papilioj flirtas tien kaj tien kaj sekvas la karavanon, atendante la malsekajn ekskrementojn de la bovoj.

La karavanon vualas vasta mantelo el polvo. Kiam vento blovas sur kelkaj lokoj de la vojo, tiam kolektiĝas grandaj pezaj nuboj el polvo, kiuj estas tiel densaj, ke la ĉaristo apenaŭ povas vidi la ĉaron, kun kiu oni marŝas antaŭ li.

La ĉaristoj havas pezajn palpebrojn de la amasa polvo. La viroj aspektas kvazaŭ oni rulis ilin en faruno. Iliaj vizaĝoj estas nigraj de la miksaĵo el ŝvito kaj polvo.

Kiam oni staras supre sur la altaĵo proksime sub la altmontara pasejo, kie oni superrigardas samtempe multajn vojkurbiĝojn, oni gajnas la impreson de la marŝanta karavano, kvazaŭ kolosa, strange fremda vermo rampus alten. Ĉiu unuopa ĉaro aspektas kiel ringo en la longa korpo de la vermo. Kaj ĉar la ĉaroj tien kaj tien balanciĝas kaj kvazaŭ stumblas, la impresoj, ke tie granda vermo suprenrampas, fariĝas des pli reala. Ke ili estas

ĉaroj, oni ne povas vidi de la altaĵo. La distanco kaj la varmega vibranta aero, kiu sin sternas kiel tremanta blanka nubovualo sur la teron, efektivas kaj realigas aĵojn, kiuj ĉe sobra rezonado ne povas esti realaj. Sed eĉ homo, kiu kutime klare pensas, perdas ĉian kapablon sobre rigardi kaj objekte juĝi ion sub la ŝarĝanta tropika suno, homo, kiu vualite en ondoformaj polvonuboj grimpas plu kaj plu en la ĉiama konscio de la malfacilecoj kaj danĝeroj de la vojo.

La karavano nun atingis la pasejon. Elveninte el vojo tra rokoj de la lasta ravino kaj tra irinte krutan rokan pordegon, la karavano venis sur la vastan altan ebenaĵon de El Calvario.

Sur tiu alta ebenaĵo troviĝis tri ranĉoj. La plej granda el ili, la ranĉo El Calvario, aspektis kun la multaj peonaj kabanoj kiel vilaĝo. Alia malgranda ranĉo, ĉe la alia finaĵo de la ebenaĵo, faris per sia blanke kalkita domo kaj la kolonoj de la portiko puran kaj idilian impreson. Tiu ranĉo servis kutime kiel nokta restadejo kaj gastejo por vojaĝantoj sur ĉevaloj, ĉar ĝi troviĝis preskaŭ en la mezo de la vojo de inter Tuxtla kaj *San Cristóbal*. La vojaĝantoj, kiuj venis de San Cristóbal, ĉiam provis atingi tiun malgrandan ranĉon, ĉar la vojdistanco de ĉi tie al Tuxtla ŝajnis al ili pli mallonga ol tiu ekde la urbeto Ixtapa, kiam ili nokte restadis tie.

La alta ebenaĵo estas ĉiam, dum la tuta jaro, kovrata de herboj. Je la fino de la seka sezono la herboj kompreneble estas tre malabundaj. Sed dure laborantaj bovoj, muloj kaj ĉevaloj sur tiuj vojoj rapide forgesas esti elektemaj ĉe

la manĝado. Ili evidente ĝojas, ke ili finfine atingis la bivakon. La aspekto de la bonvenigata herbejo, instigas la bestojn heni kaj bleki. Precipe la bovojn, kutimiĝintajn restadi ĉi tie la tutan laboran vivon, ankaŭ la plej lerta ĉaristo ne pelus plu eĉ nur kilometron. La marŝo de *Chiapa de Corso* ĝis tiu alta ebenaĵo estas la plej longa dum la tuta veturo inter Arriaga kaj Balún-Canán, ĉar la ĉaroj sur tiu vojo nenie povas halti. La vojo estas tro malvasta, kaj ne troveblas nutraĵoj survoje, kaj nur malmulte da akvo. Akvon bezonas ne nur la bestoj, sed eĉ pli la ĉaristoj. La alta ebenaĵo je unu flanko estas limigita de krutaj rokoj kaj montĉenoj, kaj sur la alia flanko estas densa, dornoplena, tropika vepro.

Veninte sur la altan ebenaĵon la ĉaristoj plej volonte ĵetiĝus teren kaj dormus tuj tie, kie ili sin sternas. Ili estas lacaj kaj elĉerpitaj de la laboro ĝis la lasta hareto de sia korpo.

Sed ili havas pluan laboron antaŭ si.

Ili kunveturigas ĉiujn ĉarojn, ĝis ili laŭvice apudas unu la alian, tiel, ke ĉiu ĉaro staras flanke de alia. La ĉaristoj, kiel ĉiuj indiĝenoj, havas denaskan senson por beleco. La kanonoj de artileria regimento ne povus stari pli bele kaj pli soldatece sur sia kampadejo ol la ĉaroj de karavano. Kun krioj kaj komandoj, kun impeto kaj ŝovado oni rektliniigas la ĉarojn. Oni eljungas kaj dejugigas la bovojn.

La ĉarojn oni ĉiam rektliniigas. Sed okazas sufiĉe ofte, ke la ĉaristoj estas tiel elĉerpitaj de la laboro, ke ili ne dejugigas la bovojn. Oni lasas stari la bovojn kun ilia tiom peza jugo, kun la kompakta tirtrabo malantaŭ la kornoj. Tiukaze la bestoj devas resti kune kiel paroj. Tie, kie unu el la bestoj sin paŝtas, ankaŭ la alia sin devas paŝti. Ili

apenaŭ povas flankenturni la kapon. Kaj se unu besto movas la kapon dekstren, ankaŭ la alia besto devas movi la kapon dekstren. Estas ankoraŭ alia kaŭzo, kial dum certaj bivakoj oni ne liberigas la bovojn de la jugo, kvankam tio evidente estas neeltenebla torturo por la bestoj.

Se la bestoj sin paŝtas unuope, ili vaste disiras por trovi la plej bonan paŝtejon. Ne malofte ili foriras kvin kilometrojn de la ripozejo. Tiam la ĉaristoj devas serĉi la bestojn. Iam kaj tiam ili devas rekonduki la bestojn el la ĝangalo, ĉar la bovoj preferas certajn arbofoliojn al la tro sveltaj herboj. Pro tiu serĉado la ĉaristoj perdas ofte duonon de tago kaj tutajn tagojn. Okazas, ke ĉiuj ĉaristoj de la tuta karavano devas serĉi du aŭ eĉ nur unu bovon. Estas komplike jam en la taglumo, sed eĉ pli en la nokto, kiam la viroj devas rampi kun lanternoj kaj kenotorĉoj tra vepro kaj ĝangalo por kapti la disirintajn bestojn. La ĉaristoj estas tre ekzercitaj serĉantoj de fuĝintaj bovoj. Ili komprenas ĝuste legi ĉiun forrompitan branĉeton, ĉiun malsupren tretitan arbuston, ĉiun huffrapitan herbotufon, multe pli bone ol abocolibron. Ili scias precize, ĉu hufosignoj estas malnovaj tagon aŭ du

semajnojn, aŭ ĉu estas la spuro de libere paŝtiganta grego de bovoj de proksima ranĉo aŭ de unu el la propraj bovoj. Tamen okazas, ke oni trovas la bovojn ne post tuta semajno, aŭ ĉar ili estas tre rapidaj kaj migras al sia hejma ranĉo, aŭ ĉar ili miksiĝas kun alia grego kaj kun tiu marŝas al la ranĉo de tiuj bestoj.

La tempon, kiun la ĉaristoj perdas pro la serĉado de fuĝintaj bestoj, ili devas provi regajni iel. Se ili tro ofte malfruiĝas kun siaj frajtoj, iliaj mastroj ilin krude insultas, eble severe punas aŭ maldungas. Tiukaze ili havas la reputacion de sentaŭguloj kaj de nefidindaj ĉaristoj, kaj retrovas nur kun klopodo alian laboron.

Tial oni ne tro haste akuzu la ĉaristojn pri krueleco al bestoj, kiam ili de tempo al tempo ne liberigas la bovojn de la jugo. Ne dejugigitaj bovoj ne povas fuĝi longan distancon, ĉar ili pro la peza jugotrabo, kiu kuŝas transverse super ili, ĉie puŝiĝas je arboj kaj tiel estas retenataj. Sed ĉiufoje lasi stari la bestojn kun jugo, tion la ĉaristoj tamen ne povas riski. Ĉar tiuj bestoj, kiuj restas en la jugo, ne povas manĝi tiel bone kaj abunde kiel la bestoj, kiuj sin paŝtas libere. Tia besto restas malsata, iĝas

magra, ne kapablas sufiĉe forte tiri, kaj eble oni devas eĉ lasi kuŝi ĝin iam ĉe la vojrandoj.

Kunpreni nutraĵojn sur la ĉaroj kaj firmligi la bestojn sur la ripozejoj ne eblas. Ili estas fortaj bestoj, kaj tial ili bezonas multe da manĝo, se ili laboru bone. Sed, se oni ŝarĝas nutraĵojn sur la ĉarojn, oni ne povus ŝarĝi ilin per frajto. La maizo, kiu kunportendas por la bestoj, ĉar oni povas aĉeti ĝin ne je ĉiuj lokoj de la vojo, forprenas jam sufiĉe da spaco, kaj jam sufiĉe ŝarĝas la ĉarojn.

Kion ajn bona ĉaristo elpensas al si, por ke li povu esti simile justa kaj al sia mastro kaj al siaj bestoj kaj al la komercisto, kiu bezonas la varojn ĝis certa dato, ĉie li puŝiĝas je rilatoj kaj kondiĉoj, kiuj estas pli potencaj kaj pli fortaj ol liaj plej bonaj intencoj.

Centmiloj de bestoj kaj milionoj de homoj devas elteni kaj trasuferi ŝajne neelteneblajn suferojn, por ke civilizacio povas esti, kaj por ke oni povas porti civilizacion en la plej forajn angulojn kaj anguletojn de la terĝlobo, tien, kie loĝas homoj.

Ĉapitro 06

01

La ĉarojn oni jam kunveturigis laŭ bela kaj ekzakta rekta linio. La bovojn oni jam eljungis kaj liberigis de la jugo. Tiuj serĉis kuŝejon kaj ĵetiĝis teren. Ili estis tro lacaj por paŝti sin. La ĉaristoj revenis por pretigi simplan manĝon al si. Ĉiu serĉis sian grupon. Dum la marŝo la ĉaroj veturis tie, kie oni envicigis ilin. Sed, kiam oni haltis por ripozi, la ĉaristoj de ĉiu mastro formis grupon, la ĉaristoj de *don* Laŭreano, tiuj de alia komisiisto, de *don* Nicasio. Kaj la ĉaristoj de plia mastro same formis propran kuirgrupon. Ĉar ili pretigis la manĝojn al si el la nutraĵoj, kiujn iliaj mastroj donis al ili por la marŝo.

De ĉiu grupo viro kuris kun gazolinladujo al la rivereto por alporti akvon. Kelkaj aliaj kuris en la tropikan arbaron por havigi lignopecojn. Aliaj formis per tranĉiloj la bastonojn, sur kiuj oni pendigis la kuirkaldronojn.

Estis jam tre malfrue vespere, ĉar la marŝtago estis nekutime longa.

Baldaŭ ekflamis en ĉiuj grupoj la bivakfajroj.

Apud la fajro staris kaj sur la fajroj pendis ĉiuspecaj ujoj de rapide kaj tamen lerte faritaj stabloj, je kiu oni kuiris.

La homoj kuiris nigrajn fabojn en sufiĉe grandaj kvantoj, por ke la faboj, bezonantaj longan kuirtempon, sufiĉu eĉ por la posta matenmanĝo. Ili kuiris rizon. Ili varmigis maizoflanojn. Kaj ĉie oni kuiris kafon, la neeviteblan trinkaĵon dum ĉiuj manĝoj de vojaĝantoj en Meksiko. Se kafo estis rara, oni uzis de tempo al tempo ankaŭ pinolon. Pinolo estas polvo el disfrotitaj kaj rostitaj maizograjnoj. Se mankis eĉ pinolo, oni kuiris teon el citronfolioj, plukitaj ie survoje.

La fabojn oni kuiris ĝis ili estis molaj. Poste oni bongustigis ilin per porkograso, kiu, kunprenita en boteloj, pro la varmega klimato, ĉiam estis likva kiel oleo.

La rizon oni ne kuiris kiel en Eŭropo, sed kiel en Meksiko. En pato oni varmegigis porkograson. Se la graso estis sufiĉe varmega, oni ŝutis la sekajn rizograjnojn en paton kaj turnomovis ilin tiom longe tien kaj tien ĝis ili estis brunaj. Tiam oni lante enverŝis, preskaŭ guton post guto, akvon. Se oni faris tion mallerte, la flamo saltis sur la paton kaj ekflamiĝis tie tiom alta fajro, ke ofte nigriĝis la

tuta rizo.

Ankaŭ la kafon oni kuiris meksike. Oni verŝis akvon en kegloforman ladokruĉeton. Poste oni ŝutis manplendon da muelita kafo en ĝin kaj bonan pecon de bruna nerafinita sukero. La miksaĵon oni forte boligis kiel supon. La kafon oni ne filtris, la rekremento restis en la kafo kaj oni kunglutis ĝin.

Kelkaj ĉaristoj survoje kaptis kuniklojn, aliaj ĉaspafis sovaĝan meleagron kaj dazipojn, kaj pluaj aliaj kun siaj hundoj elpelis el vaka arbotrunko iun *tepezcuintle*.

Apud ĉiu fajro kuŝadis la hundoj, kiuj atendis ostojn kaj la ceterajn restaĵojn de la manĝo. Ĉiu ĉaristo havis hundon ĉe si. Kiel ĉe eŭropano apartenas al la pantalono jako, tiel apartenas al indiĝeno hundo.

La ĉaristoj dum siaj marŝoj havis sufiĉe da okazoj kapti ĉirkaŭirantajn kokinojn kaj porketojn por pliampleksigi siajn manĝojn, sed ĉaristoj ne priŝtelas ranĉistojn, kaj eĉ malpli ili priŝtelas povrajn indiĝenajn kamparanojn.

Rimarko

tepezcuintle = speco de sovaĝa kuniklo en Meksiko, Kostariko ktp...

Ĉifoje multaj inoj veturis kun la karavano. Inoj, kiuj vojaĝis solaj, inoj kun infanoj, inoj kun siaj servoknabinoj. Kelkaj el ili vojaĝis al San Cristobal, aliaj al Comitán aŭ pli en la internon de la ŝtato aŭ eĉ supren al Tabasko. Ili ĉiuj estis inoj de la plej subaj popoltavoloj, kies viroj ne havas sufiĉe da mono por povi rajdigi ilin sur ĉevaloj. Eĉ, se la viro eble havus ĉevalon aŭ eĉ kelkajn, li devus aŭ mem kunrajdi kaj tiel perdis tempon kaj krome li devus lasi la negocon sub la kontrolo de alia, aŭ li devus lui fidindajn virojn, kiuj akompanus lian edzinon. Tio estus tre multekosta. Sed, se la inoj vojaĝis per karavano, ili pagis por sia sidloko en la ĉaro peson aŭ eble eĉ nur duonon de peso. Kaj, ĉar ĉiam pluraj inoj vojaĝis en karavano, ino sentis sin ne tiel sola kiel inter nuraj fremdaj viroj.

Okazis de tempo al tempo, ke en tre granda marŝkolono kunvojaĝis nur unu ino, aŭ tute sola aŭ nur kun servoknabino. Sed okazis neniam, ke ĉaristo molestis inon, nek en la tago nek en la nokto, se ŝi ne instigis tion mem kaj deziris ion, kion ŝi ne povis havi sekve de la

foresto de sia edzo kaj kion ŝi estis kutimiĝinta kiel la ĉiutagan manĝadon kaj trinkadon. Io tia iafoje okazis, ĉar la inoj estis plej ofte indiĝenaj aŭ almenaŭ havis pli da indiĝena sango ol eŭropa. Krome ili devenis de la sama popolklaso kiel la ĉaristoj. Ĉar veturo ofte daŭris ĝis tri aŭ kvar semajnoj, oni apenaŭ povis akuzi la inojn, kiuj ne estis skulptitaj el ligno, sed havis vivantan varman sangon en siaj vejnoj anstataŭ fridan ĉerizfolian teon. La kulpon oni ŝovas ja en ĉiu kazo al la edzo. Kial li lasis ŝin sola? La viro, kiel ajn li turnas kaj movas la aferon, havas ja neniun sekurecon. Ĝis la hodiaŭa tago oni ne klare konstatis por kiu servo Belzebuto, en la formo de serpento, pagis la pomon al Eva. Tiam ekzistis nek oraj braceletoj nek diamantringoj por la oreloj, nek ĉekoj. Eva estus preferinta perlan kolĉenon, kiu kostas du mil dolarojn. Sed ŝi prenis, kion ŝi povis ricevi, por ne resti senpagita. Ankaŭ aliaj kontentiĝas ja per tri pesoj, se ili ne povas ricevi kvindek da.

Multaj ĉaristoj havas dum veturo sian edzinon ĉe si. Indiĝeno aŭ viro, kiu estas je kvindek procentoj indiĝeno, eltenas ne longe sen sia edzino. La ĉaristoj, kiuj havas siajn edzinojn kun si, ĉe siaj mastroj ofte validas kiel pli

fidindaj ol la needziĝintaj. Tiuj ĉaristoj, kiuj lasas hejme siajn edzinojn, de tempo al tempo ekhavas sovaĝan sopiron al la edzinoj. Ili forkuras kaj lasas stari la ĉaron ie survoje aŭ transdonas ĝin al iu el la restantaj ĉaristoj, por ke tiu kunveturigu ĝin.

La edzinoj de la ĉaristoj kompreneble kunmanĝas de la porcioj, kiujn ties viroj ricevas por la marŝo. Sed la porcioj estas abundaj. Estas ja nur nigraj faboj kaj rizo, nutraĵoj, kiuj tie apenaŭ havas valoron. Terpomon la ĉaristo ricevas en sia tuta vivo eble ne pli ol dufoje por manĝo. Ili estas tro multekostaj. Terpomojn eĉ la mastro en sia propra mastrumado uzas nur tre ŝpareme. Estas rikaniga ironio. En la mezo de Eŭropo kaj en la nordo de Eŭropo la terpomoj estas la pano de la popolo; sur la amerika kontinento, kie la terpomo havas sian originon, ĝi apartenas al la plej multekostaj nutraĵoj.

Ĉu de la porcioj de la ĉaristoj unu homo pli aŭ malpli kunmanĝas, patrono ne perceptas. Li eĉ ne rigardas pro tio. Li ne interesiĝas pri tio, ĉu liaj ĉaristoj veturas kun siaj edzinoj, ĉu ne. Kaj eĉ multe malpli li aŭ iu alia homo interesiĝas pri tio, ĉu la ĉaristo kaj lia edzino estas laŭleĝe

geedziĝintaj ĉu ne. En kiu formo de la geedziĝo vivas ĉaristo kaj ties edzino, estas nur la afero de la ĉaristo kaj de ties edzino. Estas privata afero, kiu koncernas nur tiujn ambaŭ, krome neniun en la lando.

La patrono havas ankoraŭ aliajn kaŭzojn, kial li ne kritikis kiel pedanto la malmultajn nigrajn fabojn, kiujn manĝas edzino de ĉaristo. Per la ino de la ĉaristo la frajntreprenisto ricevas aldonan laboristaron, kiun li ne devas pagi, al kiu li devas doni nur la manĝon. Kvankam la inoj de la ĉaristoj ne necesas por bona kaj sekura marŝo de ĉarokaravano, ili estas tre utilaj kaj helpas ĉe multaj aferoj.

Ili helpas ĉe la serĉado kaj rekaptado de la eskapintaj bovoj. Kaj se ili ne kunhelpas serĉi ilin, ĉiuj ĉaristoj foriras por serĉado kaj la inoj restadas en la bivako kaj gardas la frajtojn. Aŭ ili kuiras por siaj edzoj la manĝon, kaj la viroj intertempe povas ripari rompitaĵon de ĉaro. Aŭ, se la inoj kuiras kaj por siaj edzoj lavas la ĉemizojn kaj pantalonojn kaj surkudras flikpecojn, la viroj povas pli bone dormi, kaj ili tiam pli bone laboras kaj ne ekdormas. Kaj se vojdistanco ne havas precipajn

obstaklojn, la viro en la ĉaro dormas profunde kaj la edzino kondukas la bovojn. Kion la patrono povus pli postuli por la manpleno da nigraj faboj, kiujn ino de ĉaristo kunmangâs de la porcioj!

Ne ĉiuj ĉaristoj havas edzinojn. Apenaŭ kvinono aŭ eĉ malpli de la bovopelistoj, dungitaj sur tiaj marŝoj, kunveturigas edzinon.

Kelkaj de la ĉaristoj vivas kun siaj gepatroj aŭ kun geedziĝintaj gefratoj en iu loko ĉe la vojo. Aliaj vivas, kiam ili ne marŝas, en la domo de la mastro, en angulo, kiun oni lasas al ili. Aliaj havas aron da malgrandaj infanoj en sia hejma kabano kaj la edzino devas resti ĉe la infanoj. Aliaj havis edzinon, sed ŝi forkuris de ili; aŭ edzinon tede lastfine la eterna marŝado sur la mizeraj vojoj, tage kaj nokte en tropika varmego kaj en tropikaj torentaj pluvoj; aŭ edzino estas graveda; aŭ la gepatroj de la edzino, aŭ la gepatroj de la viro volas havi la inon hejme en la kabano.

Alia speco de ĉaristoj estas nefidindaj edzoj. Ili baldaŭ estas sataj pri la edzino kaj forŝovas ŝin aŭ kviete aŭ per insultoj kaj ripopuŝoj. Kaj alia speco estas neplibonigeblaj unuopuloj, kiuj nur ĉeokaze iras al ino, sed en la alia tempo kaj speciale dum marŝoj ne volas vidi jupon ĉirkaŭ si. Ili delektiĝas je la disputoj kaj kvereloj de siaj

edzinhavaj kamaradoj.

Tial oni vidas de tempo al tempo marŝkolonojn, en kiuj eĉ ne unu ino estas inter la ĉaristoj. En tiaj karavanoj ĝi estas plej gaja, plej ĝoja kaj plej sovaĝa. Ĉi tie la viroj senzorge povas cedi al siaj sentoj kaj al la plezuro rakonti kaj aŭskulti la plej ekscesajn rakontojn kaj anekdotojn. Estas ja la granda malvirto de inoj, ke ili ĉiam devas entrudiĝi kaj enmiksiĝi en la vivon de viro. Plej plaĉa estas la edzino, kiun oni povas meti en tirkeston, kaj kiun oni elprenas nur tiam, kiam oni bezonas ŝin; kiun poste oni povas denove zorgeme involvi kaj formeti ĝis la venonta fojo. Sed tia ino estas nur la dolĉa sonĝo de virofantazio. Ŝi estas artprodukto. Ŝi estas pli rara ol la ovo de la birdo fenikso. Kaj vere benata estas la viro, kiu havas tian edzinon. Tia viro povas atingi ion tre grandan en la vivo.

La ĉaristoj kompreneble ne havas la tempon por serĉi ensorĉitan trezoron en ideala mondo. Kiel ĉiuj aliaj viroj, ĝemantaj sub la jugo de la karno, ili devas kontentiĝi per tio, kio haveblas; kaj tiam ili devas provi eviti la dornojn sur la rozoplana vojo. La ununura, kion ili lernas sur tiu ĉi

vojo, estas la sperto, ke sur rozarbedo estas centoble pli
da dornoj ol rozoj. Kaj kiaj dornoj!

Krom la inoj, kiuj devis vojaĝi por viziti kuraciston aŭ parencojn aŭ nupton, aŭ kiuj vojaĝas mi ne scias kien kaj kial, kaj krom la inoj de la ĉaristoj, troviĝas en la karavanoj ofte ankaŭ komercistinoj, kiuj aĉetis varojn en Arriaga aŭ en Tonalá kaj kiuj nun vagas en la internon de la ŝtato por fari tie dum foiroj kaj dum festoj siajn negocojn.

Tiuj komercistinoj kaj la vojaĝantaj inoj ne restadis en la karavano aŭ ĉe ties bivakfajroj. Ili ja ĉiuj havis iom da vojaĝmono ĉe si. Kaj ĉar ranĉoj estis proksimaj, ili foriris, tuj kiam la karavanoj haltis, en la ranĉistajn domojn.

Tie ili trovis aliajn inojn, la edzinojn de la ranĉistoj aŭ ties filinojn, aŭ ties patrinojn aŭ onklorinojn aŭ kiujn ajn, kiu apartenas aŭ kroĉiĝas en Meksiko al familio.

Plej ofte ili konis sin reciproke, eble estis eĉ tre malproksimaj parencoj; kaj se ili ne konis sin persone, ili havis ie en la ŝtato komunajn konatojn. Tiel ili senfine babiladis dum duono de nokto. La inoj sur la solecaj ranĉoj ja ĉiufoje tiom ĝojis, se ili aŭskultis novaĵojn,

skandalajn kaj klaĉon el aliaj lokoj.

La inoj kunmanĝis ĉe la tablo de la ranĉisto. Kutime ili pagis nenion por tio, kaj se ili tamen devis pagi ion, ne estis pli ol dudek aŭ tridek centavoj, pli pro la etiketo ol pro la enspezo.

Kiam ili ĉiuj sufiĉe interparolis kaj ĉiu klaĉo jam atingis sian celon, aŭ pli bone dirate, la inajn orelojn, kaj ekfermiĝis ĉiuj okuloj pro laciĝo, oni proponis liton al ili, aŭ oni sternis sur la plankon matojn, kiuj estis dike kovrataj de abioplingoj. Tie la inoj pretigis la litaĵon alportitan de servopretaj ĉaristoj.

Kiam ne estis ranĉoj aŭ bienegoj en la proksimo, la inoj devis kontentiĝi pri la provizoraj dormlokoj en la frajtĉaroj. Tio estis tre maloportuna. Sed kion alian ili povis fari?

La inoj de la ĉaristoj, ne tiel forte ligitaj je la kutimoj de laŭregula hejma vivo, dormis tie, kie ili trovis lokon. Ili estis kutimigintaj al dura kaj rigida vivo, plej ofte ekde la infaneco.

Ili kapablis dormi tie, kie ili kuŝis. Tute egale, kie tio estis. Se estis libera spaco en la ĉaro kaj oni povis aranĝi la frajtaĵojn al kuŝejo, ili dormis en la ĉaro.

Se ne estis loko en la ĉaro, aŭ la sakoj, valizoj kaj kestoj estis tro malegalaj laŭforme por povi aranĝi kuŝejon, ili dormis kiel la viroj sub la ĉaro sur la tero. Aŭ ili nur kaŭris, apogante sian dorson kontraŭ rado. Aŭ ili kuŝiĝis apud la ĉaro sur herbejo. Iu loko ĉiam troviĝis por sterni la moskitoreton super si, en tiuj partoj de la vojo, kie la aero estis plena de insektoj.

La ĉaristoj mem tute ne sciis, kio estas la senco de la vorto malkomforto. Se ili havis siajn inojn ĉe si, ili kompreneble provis pretigi kuŝejon kiel eble plej bonan kaj komfortan. Sed por si mem ili pensis pri nenio alia ol pri tio ripozi kaj dormi.

Ili ĉiam laciĝis de la laboro tiel, ke ili, se ili jam sternis sin apud la ĉaro, eĉ ne vekigis, se torenta pluvo malsekigis ilin ĝis la ostoj. Aŭ, se ili tamen vekigis, ili estis tiel kaputaj de la laboro, ke ili eĉ ne provis rampi sub la ĉaron. Ili tiris nur la kovrilon pli proksimen super la kapon.

Granda helpo tio ne estus, rampi dum la pluvo sub la ĉaron. Se estas bona plenvalora tropika pluvo, la tuta bivakejo troviĝas baldaŭ kvazaŭ en lago. Kaj ĉirkaŭe kuŝantaj bretoj kaj ŝnuroj tuj komencas fornaĝi.

Ĉe tia vetero la ĉaristo ne pensas pri si mem. Li zorgas nur pri la frajto, kiun li havas. Li saltas supren kaj firme kunligas la matojn, kiuj protektas ambaŭ finaĵojn de la ĉaro kontraŭ polvo kaj vetero, por ke la pluvo ne povu vipi kaj tiel damaĝi la frajton. Li firmplektas la tegmentan kovrilon tie, kie ĝi deigis en la marŝo, kaj li plenigas fendojn per ĉifonoj aŭ herboj.

La hundoj vigliĝas kaj serĉas sekan lokon al si en la fendoj de sakoj kaj kestoj.

La ĉaristo ne estas hundo, kiu povus premi sin inter

fendojn. Li estas homo kun animo, kiu post laborplena kaj peniga surtera vivo iam flugos supren en la paradizon. Li estas homo, kiu povas ami, plori kaj ridi. Li estas homo naskita de patrino, kiu amas lin, kaj kiu kun veoj affliktiĝas pri la bonfarto de sia infano.

Li estas homo kiel lia patrono. Homa estaĵo kiel la prezidanto de sia patrio, tiu granda, tiom abunde per ordenoj garnita ŝtatviro, *Don Porfirio*.

Sed lia patrono ne povis elspezi monon por aĉeti al siaj ĉaristoj malgrandan akvorezistan tendon kaj malgrandan malpezan faldoliton, kiuj sekurigas al la ĉaristo ankaŭ en marĉa bivako sekan dormlokon. Tiom da mono la frajttransportoj ne enspezigis, la patrono havis aliajn elspezojn, kiuj estas pli gravaj ol tia sensencaĵo. *Don Porfirio*, kies bildo pendis brile en larĝa orumita krado je muro en la granda loĝoĉambro de la patrono, dekretis tiom da mirinde bonegaj leĝoj. Sed inter tiuj miloj kaj miloj da mirinde bonegaj leĝoj estis eĉ ne ununura leĝo, kiu levus la ĉariston en pli altan rangon ol la tirbovojn, kiujn li jungas al la ĉaro de la patrono. Se bovoj povas ripozi en torenta pluvo sub la libera ĉielo kaj staranta en

lago, kial do pro ĉio en la mondo kaj pro ĉiuj sanktuloj oni pensu ĉe la fabrikado de leĝoj pri la protektado de ĉaristo?! La bovoj kostas multe da mono. La ĉaristo ne kostas monon. Se ne plaĉas al li, li povas foriri, tuj kiam li transdonis la frajton sen damaĝo kaj sekurigite en la celloko. Ekzistas sufiĉe da ĉaristoj, kiuj atendas dungigon. Ĉe la diablo, kial tiom da babilaĉo pri indiana ĉarulo!

Por la laboro estas pli bone, se li kuŝas ekstere en la densa pluvo. Tiukaze li vekiĝas ĝustatempe. Fariĝas ja tro maloportune por li. Li ekstaras pro la pluvego meze de la nokto, li jungas la bovojn kaj veturas plu. Ĉe tio li eble gajnas eĉ dek du horojn de la vojaĝo. La patrono ricevas la reputacion kiel bona frajtentreprenisto, kiu ne malfruiĝas. Tio servas al la komerco kaj prosperigas la bonfartron de la patrio.

Ekde tiu bivakejo ĝis la pli interna parto de la ŝtato oni jam ne devis timi banditojn. Iom pli danĝere fariĝis nur en la proksimo de Balún-Canán, kie okazis de tempo al tempo atakoj sur la vojoj. Sed ĉi tie minacis la vojaĝantojn nur tri aŭ kvar banditoj, kiuj verŝajne estis fratoj. Ĉarojn ili kuraĝis ataki nur en tiu kazo, se ne estis pli ol du aŭ maksimume tri. Pli grandajn karavanojn ili ne kuraĝis ataki. Tiuj banditoj estis pli danĝeraj por unuopaj vojaĝantoj sur ĉevaloj. En la ŝtato ili havis la aĉan reputacion de rabistoj, kiuj ĉiufoje murdas la atakitan vojaĝanton, por ke oni ne malkovru ilin.

Ĉar de tie la sekvaj cent dudek kilometroj estis sekure ireblaj kaj multaj ĉaroj de la karavano, pli ol tri kvaronoj el ili, transportis frajtojn nur ĝis Jovel, kaj nur kelkaj eĉ ĝis Shimojol, la granda karavano de tie dispartiĝis en pli grandajn grupojn kun ok ĝis dek ĉaroj.

Ĉiu marŝkolono havis sian *encargado*, sian laborgvidanton, kiu respondecis pri la kolono, kaj kiu decidis pri la ĉiutaga marŝo.

Ĉe unu el la marŝkolonoj la matena fajro ekflamiĝis jam denove je la unua en la nokto. La kolonestro observis, ke la bovoj de tiu kolono estis en bona konstitucio; kaj ĉar ĝiaj ĉaristoj ŝarĝis la ĉarojn ne tro pezaj, li volis atingi la lokon Ixtapa ankoraŭ en la frua antaŭtagmezo. De tiu alta ebenaĵo ĝis Ixtapa estis nur ses kilometroj. Li devis tie transdoni kelkajn frajtaĵojn al posedantoj de vendejoj.

Liaj ĉaristoj nutris la bovojn per maizo. Poste la homoj manĝis nigrajn fabojn kaj trinkis kafon. Kaj kiam ili jam finis tion, ili aljugigis kaj jungis la bovojn. Tiam viro kuris transen al unu el la ranĉoj kaj frapis pordon, malantaŭ kiu dormis, kiel oni montris al li jam en la antaŭa vespero, la inoj, kiuj vojaĝos plu kun tiu marŝkolono.

„*Orito, muchacho* momenton, knabo, mi tuj venos“, vokis ino, tuj vekiĝinte.

La inoj ekstaris, sen longe etendiĝi kaj oscedi. Ili ŝovis la kapon tra la surĵetita jupo kaj malfermis la pordon. La viro saltis en la ĉambron, kaj per kelkaj lertaj manmovoĵoj li kunrulis en faskon la litaĵojn de la inoj kaj kunŝnuris ilin.

La inoj trempis la mezajn fingrojn de la maldekstra kaj dekstra mano en malgrandan pelvon faritan el kavigita kukurbo kun akvo kaj viŝis siajn okulojn per la malsekaj mezaj fingroj. Per tiu ĉi movo la lavado de la vizaĝo estas finita ĉe la meksikanoj, ĉu viraj, ĉu inaj, kiam ili vojaĝas sur ĉaro.

Poste ili tenis ambaŭ manojn kiel pelvon al la viro, kaj tiu verŝis la akvon el la kukurba pelveto sur la manojn de ĉiu ino. La akvo sufiĉis por la kvar inoj lavantaj sin. Estis trionlitro da akvo, pri kies centprocenta pureco oni kutime ne longe diskutas.

La inoj kunfrotis siajn malsekigitajn manojn kaj tuŝis per ili sian hararon. Per malgranda poŝkombilo kaj kvar movoj ili kombis sian hararon, ĝis ĝi estis glata. Kaj jam ili estis pretaj por la daŭrigo de la vojaĝo.

Tio iris tiel rapide, ke, de tiam, kiam la *muchacho* frapis la pordon, pasis nur du minutoj, ĝis la inoj ektrinkis kelkajn varmegajn glutojn da kafo el tasoj jam enportitaj de knabino de la ranĉo. La frapado vekis ankaŭ tiun knabinon, kaj ŝi tenis varma la kafon sur fornelo en la ardanta cindro.

Neniu meksikano faris pli da ceremonioj sur tiuj vojoj. Kaj ni ĉiuj, aŭ niaj avoj, faris la samon, kiam ankoraŭ ne ekzistis litvagonoj en trajno, kaj kiam oni konsideris la tamburece bruantan diliĝencon kiel la plej rapidan kaj plej komfortan transportilon. Ĉar ĉaro tirata de bovoj ne estas tiel eleganta kiel elasta diliĝenco el la dua duono de la deksepa jarcento, oni ne povas atendi, ke la vojaĝantoj tiel zorgeme vestas sin kaj gladas la vestojn, kvazaŭ ili partoprenus ĉe festa vespermanĝo kun la emiro de Afganio en la senditosalonego en hotelo Ritz. Tualeto, kiun oni ne adaptas al sia ĉirkaŭo, detruas la harmonion de la vivo. Kaj por la harmonio de la aĝoj en sia ĉirkaŭo la meksikano havas tre delikatan kaj kultivitan senton.

La ĉaristoj dum veturo, kiu daŭras tri aŭ kvar semajnojn, tute ne lavas sin. Ili sin ankaŭ ne razas kaj ne tondas la hararon. Tiuj, kiuj havas indiĝenan sangon, ne havas barbon aŭ nur barbolanugon. Sed kelkaj triboj eĉ havas fortan barbokreskon. Kaj de la ĉaristoj apartenantaj al tiuj triboj, aŭ ties pragepatroj, kiuj miksiĝis kun la apartenantoj de tiaj triboj, ĉiu unuope aspektis kiel kvin kanibaloj kune, kiuj pro sia terura aspekto estis elĵetitaj el la infero de la onklino de l' diablo.

Kompreneble ĉeokaze misharmonio ĝenas tiun romantikan rabistan eksteraĵon. Kiam ili sufiĉe longe haltas en la proksimo de rivero kaj ne tro lacas, ili banas sin, kaj se ili havas eĉ pli da tempo, ili banas sin seninterrompe dum du horoj. Sed la harmonio poste baldaŭ denove ekestos. La unuan, kion la ĉaristo, kiel ĉiu meksikano, matene kaj vespere faras, antaŭ ol li enverŝas eĉ nur gluton da kafo, estas, ke li lavas al si zorgeme kaj persiste la buŝon. Kaj tiukaze, se la ĉaroj estas veturigataj, la ĉaristo unue lavas sin, antaŭ ol li ŝovas mordaĵon de la simpla manĝo en sian buŝon. Kaj se li ne trovas akvon survoje, aŭ se lia kukurba botelo, en kiu li kunportis akvon, estas eltrinkita, li simple ne manĝas, ĉar li ne povas lavi unue la manojn al si. Kvankam la lavado de la manoj estas ofte nur simbola lavado, ĉar li disponas nur pri dek gutoj da akvo por la lavado, la manoj tamen nepre devas esti lavitaj, antaŭ ol li povas manĝi.

Tri minutojn post kiam oni vekis la inojn, ili sidis jam je kvarono laviĝintaj kaj je okono manĝintaj en siaj ĉaroj, kaj la kolono troviĝis sur la marŝo.

Intertempe dua kolono pretigis la ekmarŝon. Ĝi bezonis pli da tempo. Oni devis serĉi kaj eltrovi bovojn el aliaj kolonoj. Kaj tio estis sufiĉe komplika, ĉar la nokto estis ankoraŭ nigra kiel peĉo.

Ĉe plua kolono oni riparis radon. Ĉe alia oni devis kuraci karnovundojn de bovoj. Tria kolono post zorgema inspektado fare de ties *kolonestro* verŝajne ekveturos nur ĉirkaŭ tagmezo. La bovoj estis tro elĉerpitaj, tro lacigitaj, ili ne lasis peli sin al ekstaro. Sekve de sia troa laciĝo ili nokte apenaŭ paŝtis sin. La ĉaristoj alportis la maizon ĝis proksime antaŭ iliajn nazojn, por instigi ilin manĝi. Tiuj bovoj faris kvar longajn veturojn, sen tio, ke oni permesis ripozon al ili, kaj ĉiu veturo daŭris tri semajnojn. Tio estis la kolono de *don* Laŭreano, en kiu *Andreo* gvidis ĉaron. En la frajtentrepreno de *don* Laŭreano la ĉaristoj kaj la bovoj devis labori eĉ pli streĉe kaj pli persiste, ĉar li ĉiam havis multe da frajtoj. Antaŭ ol granda frajto estis liverita, atendis jam nova sian eskpedadon. Sed la seninterrompa laborado de la bovoj estis daŭrigebla nur ĝis certa limo. Se la bovoj estis tro elĉerpitaj kaj tro lacigitaj, ĉar ili ne

havis feriojn sur paŝtejo, okazis, ke ili haltis sur la vojo kaj nek per la plej bona nutraĵo nek per afablaj persvadoj lasis sin instigi denove ekiri. Batoj des pli ne havis efikon. Tre ofte la bovoj faris la samon, kion faras ankaŭ muloj. Ili sternis sin sur la vojo, rifuzis nutraĵojn kaj mortis.

Bovoj kaj muloj trifoje aŭ kvarfoje po jaro bezonis tri aŭ kvar semajnojn da ferioj sur bona paŝtejo. Kaj ili ricevis tiujn feriojn. Bovoj kaj muloj estis multekostaj. Kaj tial la suicido de bovoj estis tre multekosta afero por la mastroj. La ĉaristoj ricevis neniam feriojn. Ili laboris tagon post tago, je dimanĉoj kaj festtagoj, tage kaj nokte, en pluvo kaj tropika ardo, dum sabloŝtormoj kaj dum fulmotondroj, kiuj tiel sovaĝis, de tempo al tempo lasis fali sin sur la vojon. Sed ili ne memmortigis sin pro troa laciĝo. Tio estis la privilegio de bovoj kaj muloj. Pro tio ili estis ja stultaj bovoj kaj eĉ pli stultaj muloj. Kaj se ĉaristo sur la vojo efektive mortis aŭ ĉe la suprenlevado de ĉaro glitinta en truon glitis mem malsupren en ravinon kaj ĉe tio frakasiĝis, aŭ falis sub la radojn de ĉaro, tiukaze ne estis konsiderinda perdo por la entreprenisto. Ĉaristoj kostis multe malpli ol bovoj aŭ muloj. Ili kostis eĉ ne centavon da investo, kun la escepto, ke la entreprenisto

por ĉaristo transprenis la ŝuldon, kiun tiu havis ĉe antaŭa mastro. Kaj tia ŝuldo estis ĉiam tre malalta kompare al la mono, kiun kostas bovo.

Diversaj skipoj en la veturtempoj de la ĉaroj ne estis regulitaj. La kolonestro aranĝis la veturtempojn laŭ sia plej bona juĝo.

En la varmega malalta regiono la ĉaroj veturas nur en la nokto, kaj dum la tago ripozas la bovoj. En granda varmeĝo ili ne marŝas tiel bone aŭ ili tute laciĝas jam post du horoj. Ili estas bestoj de la mezvarmaj zonoj kaj ili restas bestoj de tiuj zonoj, ankaŭ se ili naskiĝas sur paŝtejo en la tropika regiono. Estas ne nur la varmeĝo, kiu malpliigas la laborkapablon de la bovoj. Estas ankaŭ miloj da grandaj ĉevalmuŝoj, kiuj ĉirkaŭsvarmas la bovojn kaj elsuĉas ilian sangon. Tiuj muŝoj mordas nur dum la hela sunlumo. Tuj kiam nuboj kovras la sunon, la muŝoj malaperas kiel forsorĉitaj.

En la friska alta ebenaĵo la ĉaroj estas veturigataj ankaŭ dum la tago. Ĉiu marŝo daŭras kvar ĝis ses horojn, laŭ la malfacileco de la vojo kaj laŭ la distanco de unu bona bivakejo ĝis alia. Poste oni ripozas kvar ĝis kvin horojn. Kaj tiam oni denove ekmarŝas.

Por centkilometra vojdistanco kolono de ĉaroj bezonas kvin ĝis sep tagojn.

La frajton oni prikalkulas laŭ pezo kaj distanco. De tempo al tempo ankaŭ per la spaco, kiun ĝi okupas.

La pezunuoj estas *arroba* kaj *quintal*. *Arroba* havas dek unu kilogramojn kaj duonon; *quintal* havas kvardek kvin kilogramojn. La frajto por *arroba* kaj distanco de cent kilometroj kostas kutime peson, kelkfoje tri kvaronojn de peso aŭ ofte eĉ nur duonon de peso. La pezon oni plej ofte ne pesas per pesilo, sed la kolonestro taksas ĝin. Ankaŭ la vojdistancon oni taksas. Oni ne prikalkulas ĝin per kilometroj, sed per *legua*, do per leŭgo. Unu leŭgo havas ĉirkaŭ kvar kilometrojn. Sed tiun ĉi leŭgon la kolonestro mezuras laŭ la tempo, kiun li bezonas por trapasi kvar kilometrojn. Kelkaj distancoj, kiujn li taksas kiel dek leŭgojn efektive havas, se oni mezuras ilin precize, nur ok kaj duonon aŭ nur sep leŭgojn, dum alia vojo, kiun li taksas kiel dek du leŭgojn efektive havas dek kvin leŭgojn. La vojdistancoj, foje iam taksitaj de ĉaristo aŭ mulisto, ne plu ŝanĝiĝis. Ili eĉ tiam ne ŝanĝiĝis dum longa tempo, se la inĝenieroj precize mezuris la vojdistancojn.

La ĉaristoj, kiuj taksis tiujn vojdistancojn, mortis antaŭ tricent jaroj. Neniu scias iliajn nomojn. Sed oni prikalkulas ankoraŭ nun ĉiujn frajtojn laŭ tiuj taksoj.

Sed kiom ajn malefika kaj primitiva tio ŝajne estas por civilizita eŭropano, lastfine ĉio ekvilibriĝas en perfekta harmonio. Ĉu estas kvin leŭgoj pli aŭ malpli, ĉu la pezo pesas duonon da kilogramo pli aŭ malpli, tion oni ne traktas tiel skrupule. La frajtentreprenisto interkonsentiĝas kun la klientoj, aŭ kiam li transprenas la frajton aŭ kiam li liveros ĝin.

„Aŭskultu, *don* Laŭreano, vi prikalkulis dek *arrobas* por la kesto, sed estas apenaŭ ok. Kiel vi tiukaze de mi povas postuli dek kvin pesojn por la frajto?“ diras la komercisto.

Al tio *don* Laŭreano replikas: „*Don* Miguel, sed tion vi devas koncedi al mi, ke la kesto estas granda kaj peza. Mi ja ne scias, kion ajn vi havas en ĝi. Dek kvin pesoj estas vere sufiĉe malkaraj. Mi ne scias, kiel mi faru tiel gajnon. La maizo pli kaj pli kostas, kaj la *muchachos* volas havi pli kaj pli da salajro. Vi scias bone, *don* Miguel, ke tio estas preskaŭ kvardek leŭgoj, sed mi prikalkulis nur tridek kvin da ili. Tamen, tiom rigora ankaŭ mi ne estas,

kaj ni ja denove kune faros negocojn. Bone, pagu al mi dek tri pesojn kaj kvindek centavojn. Tion vi vere povas pagi al mi, *don Miguel*.”

Tiam ili interkonsentiĝis pri dek du pesoj kaj okdek centavoj, ambaŭ estis tre kontentaj, kaj ne postrestis ĉagreno pro tiu negoco.

Kiam *don Miguel* pagis ĉe la fervojo ekspresfraĵton, li pagis precize ĝiscentave tion, kio estas skribita sur la fraĵtletero. La fervoja entrepreno ja ne zorgas pri tio, ĉu *don Miguel* restas amiko aŭ ne. Kaj la oficistoj, kiuj ne respondecis pri la fraĵttarifoj de la fervoja entrepreno, ne lasis tiri sin en longajn debatojn kun *don Miguel*. Ili havis siajn fiksitajn laborhorojn; kaj kiam tiuj jam pasis, ili iris hejmen, egale, ĉu *don Miguel* ricevis sian keston ĉu ne.

Ĉapitro 07

01

Andreo havis nun preskaŭ dek naŭ jarojn. Jam pli ol tri jarojn li laboris por *don* Laŭreano kiel ĉaristo. Lia ŝuldo de dudek kvin pesoĵ, por kiuj li transiris en la posedon de *don* Laŭreano, estis delonge pagita kaj li ricevis nun jam delonge sian salajron kontante.

La salajron li ne ricevis ĉiun monaton ĝustatempe, tiel, kiel tio devus esti. *Don* Laŭreano pagis tiel, kiel plaĉis al li, kaj kiam li supozis, ke tiuj kelkaj salajropesoĵ estas malhaveblaj sen tio, ke la negocoĵ pro tio suferus damaĝon.

Intertempe Andreo fariĝis tre bona kaj diligenta ĉaristo. Li konis la vojon de Arriaga ĝis Balún-Canán tiel bone, ke li kapablis sekure preterveturi en la plej tenebra nokto ĉiun truon kaj ĉiun terdegliton de la vojo, ĉar li konis ĉiun ŝtonon sur la vojo, ĉiun unuopan vojkurbiĝon, ĉiun marĉan grundon, ĉiun trairejon, kie oni travadas riveron. Li konis la profundecon de ĉiu rivera vadejo, ĝiscole precize, li sciis, kie estas la plej bona loko por vadi tra la

rivero meze de junio aŭ en la mezo de septembro. Tiuj ejoj, kie eblis travadi la riveron ŝanĝiĝis laŭ la falinta pluvokvanto. En la pluvotempo oni devis atendi de tempo al tempo kelkajn horojn aŭ eĉ tagduonojn ĝis la akvo sufiĉe defluis, por ke la varoj en la ĉaro ne malsekiĝu. Li konis ĉiun haltejon ĉe la vojo laŭ la nomo donita de tiuj ĉaristoj, kiuj tie restadis antaŭ du jarcentoj kiel la unuaj. Li konis ĉiun paŝtejon ĉe la vojo, ties nutraĵajn valorojn por la bovoj kaj kiom da ĉaroj ĝi akceptas laŭ grandeco. Li konis ĉiun ranĉon kaj ĉiun solan indiĝenan kabanon ĉe la vojrandoj kaj konis ĉiujn homojn loĝantajn ĉe la vojo. Li lernis, kiel plej avantaĝe ŝarĝi ĉaron, li lernis, kiel ĝuste trakti la bovojn, por ke ili laboru tiom, kiom eblas maksimume. Kaj li sciis ĉiujn eblojn kiel lerte ripari rompitan radon aŭ akson de ĉaro. Kio ajn okazis sur la vojo, li ĉiam sciis, kiel helpi al si, ankaŭ se li estis sola. Multajn fojojn li jam kiel kolonestro tute sen helpo kondukis malgrandajn marŝkolonojn. *Don Laŭreano* povis diri eĉ ne unu malfavoran vorton kontraŭ li kaj lia laboro. En ĉiu rilato li multe pli bone lernis majstri la laboron ol la patrono iam atendis tion.

Tial li plialtigis la salajron de Andreo. Li ricevis nun

kvardek centavojn ĉiutage, dek du pesojn ĉiumonate. Jen tre bela kaj fieriga sumo, se li komparis ĝin kun la kvar aŭ kvin pesoj ĉiumonate, kiujn perlaboris tiuj peonoj, kiuj ĉiutage devis labori dek ses horojn en la sukermueliloj, en brandofabrikoj, prilaborejoj de sisalo, tegolaj fabrikoj kaj lignokortoj, kiuj ĉiuj troviĝis proksime de la vojo. Tiuj laboristoj, kiuj vivis kun siaj familioj pli aĉe kaj pli mizere ol bestoj.

Kompare al ili li vivis streĉan vivon kiel ili, sed lia vivo estis libera. Li kaj liaj kamaradoj ne estis ligitaj al horoj. Li laboris sufiĉe streĉe, sed li ne laboris ĝis ftiziĝo kiel la eterne malsataj peonoj en la haciendaj fabrikoj, en kiuj oni prilaboris agrokulturajn produktojn. Se li bone ŝarĝis la frajton kaj lia ĉaro estis en bona marŝkondiĉo, se la bovoj ne estis tro lacigitaj kaj ankoraŭ ne tro longe laboris, kaj se la vojo estis bona, li povis sidi dum horoj sur la ĉaro kaj revii kaj rigardi la belaĵojn de la ĉirkaŭa naturo.

La bovoj, kiuj deĵoris jam kelkajn jarojn, kaj kiuj jam multajn fojojn marŝis la vojon, ofte sciis la vojon pli bone ol la ĉaristoj mem. Tio estis normala, ĉar la bovoj kun siaj

nazoj kaj okuloj estis pli proksimaj al la vojo ol la pelistoj. Kaj la spertaj bovoj neniukaze estis tiel stultaj, kiel oni supozas bovon, se oni volas insulti aŭ ĉagreni per tiu nomo kunhomon. Ili trotadis tre lante, ĉar tio estis tiel indiferenta kiel siropo al ili, ĉu la ĉaro ankoraŭ hodiaŭ aŭ nur la sekvan semajnon atingos la vojaĝan celon. Ili havis tempon, kaj ili prenis al si tiun tempon por la manĝo kaj por la laboro. Eble ili sciis, ke ili ĉiam estos bovoj, kaj ke ili tiom longe, kiom ili estos sur la piedoj, devos tiri ĉaron. Ili estis filozofoj kaj sciis sufiĉe bone, ke tio ne ŝanĝos ilian sorton, ĉu ili rapidos sur la marŝo aŭ ne. Estas ĉiam nur proletoj, kiuj havas malpli da prudento ol bovoj kaj tial supozas, ke ili efektive iutage fariĝos fabrikestro aŭ membro de kontrolkonsilio, se ili fervore kaj streĉe laboras kaj ĉe ĉiuj siaj laboroj rapidas por plaĉi al siaj pelistoj. Tial estas ofendo por la bovo, sed ne por la proleto, se oni diras al proleto: „Kara mia, vi estas ja stulta kiel bovo!“ La bovo havus la rajton plendi ĉe jura instanco pro tiu ofendo, sed ne la laboristo. Rondigite prikalkulite la kvanto de mil proletoj estas proporcia al unu fabrikestro. Tion scias bovo sen la studado de statistikoj; sed proleto vendiĝas ĉiutage denove kun la

fama kaj efika marŝalbastono en la tornistro.

La bovoj vere ne estis stultaj. Ili sciis sian vojon kaj ili laboris eĉ ne unu paŝon pli ol ili supozis konvena por siaj vivfortoj.

Kompreneble ili ne blinde trotis antaŭen. Antaŭe ili detale rigardis la vojon, kaj tiam ili preteriris ĉiun rokan ŝtonon, ĉiun truon, ĉiun terdegliton, ĉiun arban radikon plenan de tuberoj tiom distance, kiom la alligita ĉaro permesis tion al ili. Ili faris tion certe ne por plaĉi al siaj pelistoj, sed por la propra avantaĝo. Tio plifaciligis ilian laboron kaj alvenigis ilin pli rapide al la sekva ripozejo. Tiom multe lernis ĉiuj bovoj, kaj pli ili ne devis lerni, ĉar oni feliĉe ne povis persvadi ilin, ke ili, se ili pli fervore kaj pli diligente laborus, povus preni la marŝalbastonon el sia tornistro kaj transformiĝus en la bone flegatan rajdoĉevalon de generalo. Sed, ĉar ili plifaciligis sian propran laboron, plifaciligis ankaŭ la laboro de iliaj kondukantoj. La ĉaristoj, kiuj havis spertajn bovojn antaŭ siaj ĉaroj, povis tiom revii kaj dormeti, kiom ili volis.

Bone scii la laborvaloron de la bovoj de sia kolono kaj la plej bonajn elserĉi je la komenco de veturo, tion strebis

ĉiu sperta ĉaristo. La kolonestro de ĉiu marŝkolono, kiu devas atenti ankaŭ ĉiujn ceterajn ĉarojn, elektas al si unue siajn bovojn. Tiam sekvas la ĉaristo, kiu servas jam la plej longan tempon ĉe la patrono. La ceteraj devas preni tiujn, kiuj postrestas.

Andreo lernis de la spertaj ĉaristoj, kiel oni devas fari tion, se oni ĉe marŝo volas interŝanĝi la proprajn bovojn kontraŭ la pli bonaj de alia ĉaristo. Ĉar okazas, ke la bovoj pro tiu aŭ tiu kaŭzo ŝanĝas sian laborkvanton en marŝo. Ili ja malofte estas ĉiuj samaj rilate sian karakteron, siajn kapablojn, kapricojn kaj sian rezistvolon kontraŭ eksteraj cirkonstancoj, kiel ankaŭ la homoj ne ĉiuj estas samaj.

Kelkaj bovoj tiras bonege la unuajn kvindek kilometrojn. Poste ili malfortiĝas. Aliaj pliboniĝas dum la laboro, ili pli kaj pli adaptiĝas al ĝi kaj ŝajne tiras aldonajn fortojn el ĉiu nova marŝotago. Kelkaj faras diablajn malfacilaĵojn ĉe la trapaso de ŝlimaj vojdistancoj, sed sur rokecaj kaj malebenaj vojoj ili iras tiel trankvile kaj obeeme, kvazaŭ tio estus la vojo al la bovoparadizo.

Andreo havis la denaskan ruzecon de la subprematoj kaj elvringatoj de sia raso. Kaj ĉar la peonoj ekde la juneco

dependas de tio, ke ili uzas sian ruzon por konservi sian vivon kaj por konservi sin kiel individuon kaj kiel rason kontraŭ siaj mastroj, tiu ruzeco ne estas limigata de memĝenema moralo. Batu aŭ vi estos batata. Kaj se vi ne povas bati la alian, ĉar li estas via mastro, kiu rajtas mortpafi vin kiel hundon, se vi levis manon kontraŭ li, jen serpentumu kaj turnu vin tiel lerte, ke la bato vin ne trafu, kaj se ĝi tamen trafos vin, ke ĝi ne damaĝu tro al vi. La evitema pigrulo ĉe la soldatoj kaj ĉe la sklavoĵ estas la prudentulo, la aliaj estas la stultuloj.

La plialtigon de sia salajro Andreo atingis per malgrandaj artifikoj. Nenie oni pagas la proleton por tio, kion li faras efektive, sed nur por tio, kion li faras ŝajne laŭ la opinio de tiu, kiu pagas la salajron al li. Lia kulpo ne estis, ke lia moralo fariĝis tiu de fripono, estas la kulpo de tiuj, kiuj lasas al li nur tiom, kiom li nepre bezonas por povi labori.

Don Laŭreano iam akompanis iun el siaj multnombraj kolonoj dum tuta tago, ĉar li ĝuste havis la saman vojon. La bovoj de ĉaro rifuzis tiri. Ili obstine rezistis kaj provis deĵeti la jugotrabon. La kolonestro kaj la gvidanto de tiu ĉaro tre klopodis peli la bovojn antaŭen. Sen sukceso.

Don Laŭreano venis al ili. Sed ankaŭ li ne sciis konsilon. Tiu ĉaro prokrastis la tutan marŝon. *Don* Laŭreano diris, ke li emas vendi la bovojn al amika frajtentreprenisto por superruzi lin, ĉar ili ne uzeblas. Kiam nun la tuta kolono haltis kaj ne povis veturi plu pro la obstine kontraŭstarema bovoparo, kaj kiam ĉiuj ceteraj ĉaristoj paroladis kaj ĉiu sciis ion alian, kio tamen ne helpis, alvenis kvazaŭ hazarde ankaŭ Andreo.

Li provis peli la bovojn. Ili iris du, tri paŝojn, tiam ili

denove rifuzis paŝi.

„Mi supozas, ke mi scias, kial pigras la *bueyes*, la bovoj“, li diris.

„Jes ja“, interrompis lin la kolonestro, „vi, knabo, venas kiel vokita, kvankam vi ankoraŭ estas malseka sub la postaĵo, vi volas diri al mi – al maljuna fakulo veturanta jam tridek jarojn sur tiu ĉi vojo – kio estas pri la bovoj. Kuru hejmen al via patrino, por ke ŝi ŝovu sekan vindon en vian pantalonon.“

Don Laŭreano staris tie, kaj diris nenion pri la babilado de ambaŭ. Sed *Andreo* ne lasis timigi sin. Li diris seke: „La rimenoj estas tro firme ligitaj al la jugotraboj, jen la problemo, aŭ tordiĝis dura rimeno.“

Sen atendi, kion la kolonestro diros, li iris al la bovoj kaj senrimenigis ilin.

Don Laŭreano jam sidiĝis sur ŝtonon, ekbruligis pluan cigaredon al si. Tiam li rigardis sufiĉe indifere, kion faras *Andreo*.

Kiam *Andreo* estis foriginta la rimenojn, li glatigis ilin, faris ilin laŭŝajne pli molaj kaj pli elastaj per sufiĉe

granda kvanto da salivo kaj poste denove aljugigis la bovojn per la rimenoj.

„Ambaŭ bovoj ne eltenas tion, se oni tro firme ligas ilin per la rimenoj“, li diris. „Sed Lucio estas ankoraŭ tro nova ĉe ni, li ne konas sufiĉe la bestojn. Lia kulpo ne estas.“

Per tiuj vortoj li liberigis sian *compañero* Lucio de ĉiu kulpo kaj de ĉiu eblo esti atakata de *don* Laŭreano aŭ de la laborestro per laŭtaj riproĉoj pro la malbona fiksado de la rimenoj.

Ĉe la deligado de la rimenoj Andreo starigis sin tiel lerte kaj faris tiajn man- kaj brakmovojn, ke tiel li ruze kovris per ombro certajn manipulojn tiel, ke nek *don* Laŭreano nek la kolonestro nek iu el la ceteraj ĉaristoj, ĉirkaŭstarantaj enuigite, povis observi la trompartifikon de Andreo.

Li skulptis en la pasinta vespero el dura ligno malgrandajn pintajn konusojn. Kaj frue matene, kiam oni jungis la bovojn, li ruze ŝovis tiujn konusojn sub la rimenojn. En la unuaj tridek minutoj la bovoj ne sentis tiun maloportunaĵon, ili iris kiel kutime. Sed kiam la suno

leviĝis kaj fariĝis varmega, la rimenoj iom post iom elsekiĝis kaj la konusetoj boris sin en la kapohaŭton de la bovoj. Post ĉiu plia kilometro, kiun la bovoj tiris, la konusetoj enboris sin pli profunden, frotis la haŭton, kaj kiam la haŭto estis vundfrotita, la konusetoj estigis eksterordinarajn dolorojn, kio instigis la bovojn fine konduti kvazaŭ frezeziĝinte.

Andreo sciis tre bone, ke oni faris tian trukon de tempo al tempo per dornoj aŭ aliaj pikiloj, se oni volis ŝercmistifiki ĉariston. Sed la dornoj rapide pikis en la haŭton tiel, ke la bestoj ekde la komenco ne plu tiris. Tiukaze la ĉaristo kompreneble tuj sciis, pri kio temas. Li devis denove deligi la rimenojn kaj tiam plian fojon fiksi ilin. Jen la ŝerco, per kiu oni mistifikis flavbekulojn, por ke ili devu fari la laboron je dua fojo, kaj por ke oni povu nomi ilin stultuloj.

Sed la artifiko kun la konuseto el dura ligno estis la eltrovaĵo de Andreo. La artifiko funkciis nur kun granda hezito kaj preskaŭ nerimarkeble. Eĉ la plej maljuna kaj plej sperta ĉaristo ne povis eltrovi, kio estas la kaŭzo, ke la bovoj unue bone marŝis kaj tiam pli kaj pli malobeis

paŝi, antaŭ ol ili fine tute rifuzis marŝi plu.

Post kiam Andreo denove aljugigis kaj jungis la bovojn, li pelis ilin antaŭen. Kaj nun ili kuris tiel obeeme kaj gaje kiel bone prizorgataj ĉevaloj de bierejo.

La maljuna kolonestro gapis perplekse kaj decidis de nun rigardi Andreon kiel plenvaloran viron kaj maturan ĉariston, kies amikecon oni certigu al si.

Des pli mirigite gapis la okuloj de *don* Laŭreano.

Kvankam li ne komprenis multon pri la efektiva laboro de la ĉaristoj. Se li estus devigita konduki ĉaran kolonon de Arriaga al Chiapa de Corso, tiukaze estus dubinda, ĉu la karavano atingus la celon ankoraŭ en tiu ĉi jarcento.

Kiam ili jam denove marŝis, li tiris Andreon ĉe okazo flanken kaj diris al li: „Aŭskultu, knabo, mi donas al vi nun tri realojn ĉiutage. Vi ellernis vian laboron kaj valoras nun la salajron de tridek ses centavoj ĉiutage.“

Plian altigon de lia salajro, kiun Andreo ricevis post kelke da tempo, li dankis denove al artifiko.

En la jaroj de sia laboro kiel ĉaristo li akiris sufiĉe da saĝo por ekkoni, ke li nur pro tio, ke li fervore, streĉe kaj efike

laboras, ne rajtas atendi agnoskon aŭ premion. Lian laboron oni ne multe atentis. Li devis rimarkigi sin al sia mastro, kaj li devis instigi la timon en sia mastro, ke tiu eĉ povus perdi la tre diligentan ĉariston, kiu scias pli bone trakti la bovojn ol maljuna laborestro, se li ne altigos iom lian salajron.

Pli ol kvar monatojn Andreo devis labori antaŭ ol estis nuligita la ŝuldo de dudek kvin pesoj, kiun lia antaŭa mastro forludis al sia nuna.

En tiuj ĉi kvar monatoj Andreo devis aĉeti al si kvin ĉemizojn, tri kalsonetojn, kvar pantalonojn, bastĉapelon, novan lanan kovrilon kaj kotonjakon. La laboro de ĉaristo voras ties vestojn kiel sulfata acido. Ĉe kesto elstaras najlo, ĉe alia kesto longa lignosplitaĵo, kaj ĉe la ŝarĝado la najlo kaptas la ĉemizon aŭ la pantalonon, kaj la vestoj dum mallonga tempo fendiĝas strioforme. Ĉe la marŝo la vestoj dum horo per pluvo tute malsekiĝas, kaj la sekvan horon la tropika suno sekigas la vestojn sur la korpo tiom rapide, ke la ĉemizoj kaj pantalonoj post kelkaj tagoj estas kiel tindro kaj tuj disfalus, se oni, pasante rokfronton, nur tuŝus ĝin. Ĉe la vojo mem estas dornaj arbustoj kaj pikilhavaj kreskaĵoj, kiuj sur la vestoj deŝiras ie vestopecetojn, kaj ie tranĉas fendetojn en ilin. Eĉ, se oni kiel ajn bone atentis. Ĉe ĉiu manipulo, kiu necesas ĉe la ŝarĝado aŭ ĉe la marŝo, perdiĝas peceto de la vestaĵo.

La ĉaristo ĉe la vojrandado aĉetas al si de tempo al tempo

komitekon, kiam estas vere tro fride kaj pluve kaj liaj vestoj ne fariĝas sekaj. Kelkfoje li aĉetas al si citronojn por fari limonadon, cigaredoskatolon, kelkajn manĝojn aŭ fromaĝopecon, por iom pliriĉigi sian vivon. Alitempe li venas al loko, kie estas festo aŭ foiro, kaj li ne volas stari ĉeflanke kiel forpelito. Ankaŭ li volas foje iom plezuriĝi. Li aĉetas buŝharmonikon aŭ malmultekostan gitaron por serenigi la vesperojn ĉirkaŭ la fajro, kiuj sufiĉe ofte estas tristaj. Krome li devas ĉeokaze aĉeti sapopeceton, lia hararo bezonas tondadon, foje li perdas sian lignan kombilon kaj bezonas novan. Iam disrompiĝas ĉe la marŝo la botelo kun *creolina**, kiun li bezonas por kuraci bovojn, kaj li do devas aĉeti ĝin kaj novan botelon. Aĉeti ŝuojn por protekti siajn piedojn sur la ŝtonplenaj vojoj, kie kuŝas ĉiaspecaj dornoj kaj pikiloj, pri tio li eĉ ne povas pensi. Li ne havas ŝuojn kaj li ne povas aĉeti ŝuojn. Li estas jam kontenta, se li povas havigi al si krudan ledon, por fliki la indiĝenajn sandalojn, kiujn li uzas.

Kiel ajn li kalkuladas kaj ŝparas kaj vivas eĉ pli mizere, ĉiam li ŝuldas antaŭpagon al sia mastro, ĉar sur la tuta Tero nur tiu donas krediton al li. Ĉiujn aĵojn, kiujn li bezonas, kiel ekzemple ĉemizojn kaj pantalonojn kaj

kovrilojn, li devas aĉeti de sia mastro, ĉar neniu komercisto ion pruntedonas al li. Kaj lia mastro fiksas la prezojn por la varoj, kiujn li vendas al siaj ĉaristoj.

La antaŭpago estas ŝuldo. Kaj tiom longe, kiom li havas ŝuldojn, li ne rajtas forkuri. La polico kaptus lin, kaj la kostojn de lia kapto oni enskribus sur la debetan flankon de lia konto.

Sed la ĉaristo ne estas peono, kiu estas fiksa kapitalo de bieno aŭ de bienego. Li estas libera laboristo. Li devas pagi nur sian ŝuldon, kiun li havas ĉe sia patrono, kaj poste li povas iri tien, kien li volas. La tuta mondo estas lia, kaj ĉio, kion tiu mondo produktas. Neniu devigas lin fari ŝuldojn, nek la leĝoj, nek la ŝtato. Li estas tute libera fari aŭ ne fari ŝuldojn. Se li ne uzas tiun liberon por si mem, oni povas respondecigi nek lian mastron, nek la ŝtaton nek la diktatoron Porfirio Diaz. Kaj, se li ne amasigas proprajon por fariĝi iutage mem frajntreprenisto aŭ fabrikposedanto aŭ posedanto de bieno, tiukaze estas nur tial, ĉar li ne ŝparas. La mondo estas malferma por ĉiu, kiu volas fondi bankon. Kaj, ĉar la proleto ne ŝparas, sed ĉion fordiboĉas kaj fordrinkas, tial

li estas proleto kaj ne bankiero. La kapitalisma ekonomia sistemo estas nur mito, kiun la agitistoj kaj aliaj anarkistoj kolportas por ekflamigi la mondrevolucion kaj tiel transpreni la bankojn kaj la parfumitajn filinojn de la membroj de la kontrolkonsilio. Ŝparu, proleto, kaj tiukaze vi povas akiri bankon, tuj ĉe la sekvanta stratangulo, sen devi klopodi pri la mondorevolucio.

Rimarko

Creolina = kontraŭinsekta likvaĵo, uzita ankaŭ kontraŭ puloj sur hundoj

Kiam Andreo jam forlaboris la ŝuldon de dudek kvin pesoj, li ŝuldis al *don* Laŭreano persone kvardek du pesojn por varoj, kiujn li ricevis de li, kaj dek ses kontantajn pesojn, kiujn li bezonis por aliaj aferoj.

Kiam li jam pli ol tri jarojn lojale kaj fidele kaj kun vera kristaneca humileco kaj modesto servis al sia mastro, li ŝuldis al *don* Laŭreano naŭdek kvar pesojn.

Matematikisto ja ne per la propablokalkulo, sed sendube per la certeckalkulo dum du minutoj povus diri al li, ke tiukaze, se li servus plu tiel fidele kaj obeeme kiel antaŭe al sia mastro dum kvardek jaroj, li ŝuldus al *don* Laŭreano aŭ al ties filo naŭcent dudek kvar pesojn kaj tridek centavojn, precize kunkalkulinte ĉiujn plialtigojn de la salajro, kiujn Andreo estus sekuriginta al si pro fideleco aŭ lojaleco aŭ per artifiko.

Andreo, kiel ĉiuj ĉaristoj, rigardis kun bedaŭro kaj kompatato malsupren sur la povrajn peonojn, kiuj ne estis liberaj, kaj kiuj restis ligitaj al la bieno, al kiu ili apartenis.

Kaj estis efektive granda diferenco inter la ekonomiaj kaj

sociaj liberecoj de la ĉaristoj kaj de la peonoj en bieno.

Se ĉaristo ĉe la marŝo falis en ravinon kaj rompis sian nukon aŭ ĉaro veturis sur lin kaj dispremis lin aŭ sovaĝiĝinta bovo lin surpikis aŭ sonserpento mordis en nudan piedon de li aŭ marĉa febro forkonsumis lin, lia ŝuldo post tio ĉe la patrono estis nuligita. La patrono certe ne priplendis la ĉariston, kiu mortaĉis ĉe sia laboro, sed la perdiĝintan ŝuldosumon. La ĉaristo nun almenaŭ estis libera kaj bone konservata en la paradizo.

Male, se peono mortis, la bienulo ne perdis eĉ centavon de la ŝuldo de sia peono. Kvazaŭ tio estus memkomprenebla afero, la ŝuldo transiris sen vorto al la plej maljuna filo de la peono, aŭ oni distribuis ĝin al ĉiuj filoj, aŭ ĝi transiris al la frato de la morta peono, se ne estis filoj, aŭ ili transiris al la edzoj de liaj filinoj, se li havis nur filinojn.

Se la peono estis entombigita, la patrono kunvokis la respondecajn filojn aŭ fratojn aŭ bofilojn, montris al ili la kontolibron kaj la debetan saldon de la mortinto kaj demandis: „Ĉu tio estas laŭorda?“

Kaj la demandito respondis: „Jes, patrono, tio estas laŭorda!“

Tiam la patrono foliumis ĝis la debeta saldo de la demandito, enskribis la ŝuldosumon de la mortinto, kunkalkulis la du debetojn, diris la novan finsumon kaj demandis pluan fojon: „Ĉu tio estas en ordo, *muchacho*?“

Kaj la demandito diris: „Jes, tio estas en ordo, patrono!“

Post kiam tio okazis, la patrono malfermis la malgrandan bienan kapelon, kaj la inoj de la peonoj rajtis eniri por starigi kelkajn kandelojn por la animo de la mortinto sur la altaron de la sankta protektanto de la bieno kaj por ekbruligi la kandelojn.

La patrono de la bieno estis ja bona katoliko, al kiu oni notus kiel pekon, se li eble eĉ ne permesus oferi kelkajn kandelojn por la eterna paco de mortinta katoliko, eĉ se li estas nur povra peono.

Tio estis justa. Tio validis kiel justa. Kaj ĉar estis juste, oni gardis tion kiel ĉion alian, kio estas justa per leĝoj kaj per la ŝtato. Kiun sencon havus ŝtato, se ĝi tion, kio estas justa, ne volus gardi per la polico kaj per siaj soldatoj kaj

juĝistoj kaj prizonoj?

Estis tiuj malgrandaj diferencoj, kiuj permesis al la ĉaristoj konsideri sin sur la socia eskalo rangoŝtupon pli alta ol la peonoj de bieno.

La mondo estas plena de justeco. Estas la eraro de la ĉaristoj kaj de la peonoj kaj de ĉiuj proletoj sur la mondo, ke ili ne uzas la justecon, kiu havigeblas senpage. Neniu devigas ĉariston, eble eĉ per ŝarĝita revolvero premita sur la bruston, fari ŝuldojn. Neniu surtere devigas iun. Eĉ ne kiom ajn monavida bienulo devigas peonon fari ŝuldojn. Aŭ fari aŭ ne fari ŝuldojn, tio estas la granda libereco de la proleto.

Se la ĉaristo kaj la peono uzas malĝuste kaj eĉ endanĝerigante sin mem tiun grandan liberon, kiu formas en la naciaj himnoj de ĉiuj popoloj la kernon de la kantado, oni ne kulpigu la bienposedanton aŭ la frajntrepreniston pri tio. Tio estas maljusta kaj ne tre nobla.

Ĉiuj homoj, sen escepto, havas ekde la naskiĝo liberan volon. Por ĉiu individuo ambaŭ vojoj estas malfermaj, la

vojo al la infero, kaj la vojo al la eternaj ĝojoj kaj jubilaj kantadoj de l' paradizo. La kreinto de la vortoj „salajrosklavo“ kaj „sklavo de la ekonomiaj rilatoj“ estas la antikristo. La sama antikristo, pri kiu jam la apostoloj diris: Gardu vin kontraŭ tiaj. Pendumi ilin, aŭ meti ilin sur la elektran seĝon, aŭ nomi ilin fantaziuloj kaj detruantoj de la ŝtato, estas la sankta devo de ĉiuj bonuloj, de ĉiuj justuloj kaj de ĉiuj noblaj homoj.

Ĉapitro 08

01

Estis la lasta semajno de januaro. Meze de februaro oni festis en Balún-Canán la feston de la sanktulo Caralampio.

Sankta Caralampio estas la sankta patrono de la urbo Balún-Canán. Li estis samtempe ankaŭ la sankta patrono por la urbeto Sapaluta, situanta sur la vasta ebenaĵo de Balún-Canán, ĉirkaŭ dudek kilometrojn malproksime de ĝi.

Kiel la sanktulo Caralampio venis al la honoro fariĝi la sankta protektanto de Balún-Canán, li certe apenaŭ mem ne povus respondi. Estis krome neniu, kiu sciis, kial *San Caralampio* estis elektita gardi la urbon Balún-Canán kontraŭ la diablo kaj ĉiuj ceteraj danĝeroj. Ankaŭ la *curas*, la klerikaro en Balún-Canán embarasiĝus, se ili koncize kaj klare devus diri la kaŭzojn, kial Caralampio por la urbo fariĝis tiom grava sanktulo. Kaj neniu, inkluzive de ĉiuj klerikoj, sciis kun certeco, kiu fakte estis *San Caralampio*, kiam li vivis, kion li faris, ke oni

sanktuligis lin. Ĉiu kontentiĝis per la fakto, ke lia figuro el ligno staras en la ĉefa preĝejo en Balún-Canán kaj en la preĝejo en Sopaluta, kie ĉiu povas rigardi lin kiel enkorpiĝintan personon antaŭ si, por konvinkiĝi, ke *San Caralampio* efektive ekzistas.

La festo honore al la sanktulo Caralampio estis nenio alia krom pura kaj nuda komerca afero.

La festo daŭris tutan semajnon. Kaj ĉar ĝi estis ligita al antaŭfestoj kaj postfestoj, ĝi daŭris fakte almenaŭ du semajnojn.

En tiuj du semajnoj faris la eklezio sian plej lukran negocon en la tuta jaro.

Bonegan negocon faris la centoj de ĉirkaŭvagantaj komercistoj kaj la posedantoj de ludotabloj, kiuj el ĉiuj lokoj kaj anguloj de la ŝtato migris al tiu festo por senpezigi la piajn festpartoprenantojn de mono, havaĵo kaj posedaĵo.

En aroj alvenis: petantoj de almozoj, kripluloj, poŝoŝtelistoj, friponoj, ludkarttranĉistoj, poluristoj de ĵetkuboj, aŭguristoj, fajrovoruloj, sabroglutistoj,

serpentohomoj.

En la kantinoj oni stimulis la negocon per tielnomataj kelnerinoj, kiuj en trupoj kun siaj „patrinoj“ kaj „nutristinoj“ alvenis. La patrinoj kaj nutristinoj estis la afergvidantoj de tiuj inoj.

Ĉion, kio iel eblas sub la suno, permesis la urba administraro ĉe tiu tiom pia sankta festo. Ĉar ankaŭ por la urbestro, por la imposta kolektisto, la impostmarka administranto kaj la polica prezidanto tiuj du semajnoj estis la plej grava kaj plej granda negoco en la jaro. Pro tiu granda negoco centoj da revolverpafoj, mortpafitaj kaj vunditaj rivalaj kandidatoj kaj balotantoj plivigligis la elektojn de la urbaj oficistoj kaj de la polica ĉefo. Ĉar ĉiuj komercistoj devis pagi altan standokotizon. La ludado per mono estis malpermesita laŭ leĝo en la tuta respubliko. Kaj ĉar nur la urbestro, la polica ĉefo kaj la politika ĉefo por tio povas doni la specialan permeson, la posedantoj de ludotabloj devis aĉeti tiun permeson per multe da mono. Sed eksterordinare multan monon devis pagi la *cantineros*, la kantinaj posedantoj por la permeso okupi dum du semajnoj kelnerinojn por la priservado. Kaj la

„patrinoj“ de la kelnerinoj devis bone pagi al la urbestro kaj al la ceteraj superaj aŭtoritatoj, por ke ili ricevu la permeson sendi ĉeokaze la kelnerinojn kun gasto por horo en ĉambron. Ankaŭ la piaj civitanoj, kiuj ludonis siajn bonajn loĝoĉambrojn kaj siajn geedzajn litojn hore al la kelnerinoj, devis aĉeti tiun ludonantan permeson per atentindaj sumoj de la superaj aŭtoritatoj. Por nenio oni ricevas ja nenion en tiu mondo. Ankaŭ la kuracisto, kiu ricevis de la aŭtoritatoj la privilegion ekzameni la kelnerinojn kaj skribi por ili sanecan ateston, devis interkonsentiĝi kun la urbestro rilate tiun privilegion, por ke ne ricevu ĝin eble alia kuracisto, kiu pagas pli. Ĉiu kelnerino devis renovigi la sanecan ateston trifoje dum semajno. Tio estis preskribo, kiun proklamis la urbestro kaj la polica ĉefo. Por ĉiu atesto la kelnerino devis pagi tri pesojn. Tiel ankaŭ la kuracisto konsideris la sanktigitan feston honore al *San Caralampio* kiel sian plej lukran negocon en la jaro. Lia bona burĝa klientaro lasis sin kuraci nur fature; kaj tiuj fakturoj restis kelkfoje nepagitaj dum tri aŭ kvar jaroj. La kelnerinoj male al tio estis honesta klientaro, kiuj tuj pagis kaj ne acide tordis la vizaĝon.

La urba administraro faris ion por la mono, tiel, ke neniu en la urbo povis diri, ke la mono foriĝas en la poŝoj de viroj, kiuj apartenas al la administraro. La aŭtoritatoj aĉetis por ducent pesoj aŭ simila sumo raketojn kaj aliajn petardojn kaj aranĝis piroteknikajn lumludojn por plezurigi la loĝantaron. Ili neniam studis romian historion, sed laŭ ennaskita prudento ili sin direktis laŭ la antikva romia ŝtatfilozofio: Pano kaj cirko. Ankaŭ la panon ili ne forgesis. Oni rostitis bovon kaj kelkajn porkojn sur placo, kaj ĉiuj povruloj ricevis pecon de la *barbacoa*. Ankaŭ pere de la lumludoj kaj la rostiloj la aŭtoritatoj enspezis, ĉar la viro, kiu volis vendi la piroteknikaĵojn al la urbo, kaj tiu, kiu liveris la rostkradojn, devis pagi honoran sumon al la disdonanto de tiuj komisionoj, por ke ne alia viro, kiu same aspiras la negocon, ricevu la komision. Neniu surtere atendas, ke iu plezurigas sen pago la popolon kaj sen kostoj nutras la povrulojn. Neniu homo povas fari tion, se li ne volas esti rigardata stultulo. Kaj ĉar tiuj viroj volis enspezi monon, ja eĉ devis enspezi ĝin, ili liveris apenaŭ la duonon de tio, kion la aŭtoritatoj pagis, aŭ ili liveris varojn tiom aĉajn, ke ili valoris eĉ multe malpli ol duonon.

Ĉar ĉiu el la superaj oficistoj ie kaj iel havis manon en la ludo, neniu kontrolis tion. Tio kaŭzus ja en ĉiu kazo nur problemojn kaj ĉagrenon, kaj oni farus nenecese malamikojn al si. Por kio tio? La vivo estas multe pli suneca, se oni kontrolas nenion. La urbestro, la impostoficisto kaj la polica ĉefo, ĉiuj havas sufiĉe da zorgoj surtere. Kial oni ankoraŭ eĉ pli tristigu al ili la vivon, kiu jam per si mem estas malgaja, per tio, ke oni precize kontrolas iliajn kasojn kaj fakturajn librojn kaj kvitancojn kaj liverajn slipojn. Se efektive iu iam ordonas revizion – la diablo sciu, kiu – tiukaze ja ankaŭ tiuj homoj scias sufiĉe bone ŝati la valoron de kvindek pesoĵ, kiujn oni tiel facile perlaboras kvazaŭ preterire. Ni ja ĉiuj estas fratoj, kaj ĉiu el ni jam pekis iam, ĝi restas ja inter fratoj, ĝi restas ja en la lando. *Viva La Patria!* Vivu la bela patrujo! Kaj tie, kie la amata patrujo ne estas favora al via negoco, jen fabriku kanonojn kaj municion por la tradicia malamiko, kiu embuskas nin.

Andreo gvidis malgrandan ĉarokaravanon de *Chiapa de Corso* al Sapaluta.

Don Laŭreano konfidis la gvidadon de tiu karavano al li, ĉar tiu vojo prezentis nur malmultajn komplikaĵojn, kaj ĉar estis dum la seka sezono. Krome *don* Laŭreano ĝuste en tiuj semajnoj ne povis rezigni pri la pli spertaj ĉaristoj, ĉar li havis eksterordinare multe da frajto sur la vojo de Arriaga al Tuxtla kaj la fraĵtaĵoj estis tiaj, ke necesis tre spertaj ĉaristoj, por ke la varoj ne ricevu damaĝon.

La gvidado de la karavano, estis ankaŭ tial simpla por Andreo, ĉar ĝin akompanis multaj komercistoj, viroj kaj inoj, kiuj transportis siajn varojn per ĉaroj al Sapaluta. Tiuj komercistoj havis personan intereson, ke la varoj bonorde atingu la celon. Se io okazus sur la vojo, rompo de rado aŭ necesa plibonigo de deglitinta vojdistancaĵo, ili diligente helpus per fortaj manoj por savi siajn varojn kaj por atingi ankoraŭ ĝustatempe la foirplacon.

Sapaluta, kiu verŝajne tial havis la saman protektan sanktulon Caralampio kiel Balún-Canán, ĉar la homoj ne

havis sufiĉe da fantazio aŭ sciojn pri sanktuloj por elekti propran sanktulon, festis la feston jam du semajojn pli frue ol Balún-Canán. Bonaj negocaj kaŭzoj instigis la piajn homojn de Sapaluta ne samtempe festi kun Balún-Canán. Alikaze ili estus devintaj dividi la enspezojn kun la multe pli granda urbo.

Nun ili havis la negocon tute por si mem, kaj ili povis ĉerpi la unuan plej dikan kremon.

Al la festo venis centoj da vizitantoj de Balún-Canán. Ili uzis la okazon de la festo por viziti amikojn kaj parencojn, kiujn ili tiom longe ne vidis kaj tamen tiel kore amis. Per tio ili gajnis la monon por nutrado kaj loĝado, kaj tiel ŝparis la kostojn por la hotelo. Ke oni pri ili poste parolis malice, ĉar ili estis granda ŝarĝo, tio ne ĝenis ilin, ĉar ili ja ne aŭdis tion. La bonaj homoj de Balún-Canán tamen valoris la penon, ĉar la bonaj homoj de Sapaluta du semajnojn poste ĉiuj iris al Balún-Canán kaj tie ĉe la parencoj kaj amikoj serĉis kaj trovis nutradon kaj loĝejon.

Sed ĉio ĉi helpis al la negoco. Ĉar la centoj de vizitantoj el ambaŭ urboj konsiderinde pligrandigis la nombron de la konsumantoj. Kaj kie estas multaj konsumantoj, tie oni

havas la bonŝancon pri floranta negoco.

La tuta regiono en ĉirkaŭo de cent kilometroj vivis pro tiuj du festoj kvar semajnojn en deliro de ekscitiĝo, el kiu la regionanoj vekigis nur tiam, kiam komenciĝis la preparaj laboroj por *Semana Santa*, la Sankta Semajno. La Sanktan Semajnon festis ĉiu loko, kiom ajn malgranda ĝi estis, por si mem, sen la partopreno de eksteraj vizitantoj. En tiu semajno la kernpunkto de la plezuro estis forbruligi la *judíos*, la tielnomatajn „judojn“ aŭ meti raketojn en la kartonkorpojn kaj eskplodigi ilin en la ventojn.

Ĉe tiuj du festoj de *San Caralampio* precipe la eklezio riĉe kontentigis siajn bezonojn. Neniu riproĉu la eklezion pri tio. La eklezio kreis krom la kvardek kvar mil aliaj sanktuloj ankaŭ la sanktulon Caralampio, kaj tial estis nur ĝuste kaj juste, ke ankaŭ la ekleziuloj ne staru kun malplenaj manoj ĉe la festo.

La centoj de vizitantoj, kiuj venis el Balún-Canán al Sapaluta, konsideris tion sia unua devo saluti la sanktulon Caralampio kaj doni monon al la eklezio. Kaj kiam la kontraŭvizitantoj de Sapaluta venis al la festo de

Balún-Canán, estis same necese por la savo de la animoj, ke ili montru sian respekton al *San Caralampio* ankaŭ en la katedralo de Balún-Canán, kaj ke ankaŭ ili donu monon al la eklezio. La plej piaj homoj de la regiono, eĉ, se ili nek en Sapaluta nek en Balún-Canán havis la rajton pri daŭra loĝadejo, pilgrimis al ambaŭ festoj, por ne neglekti eble ion ĉe la adorado de *San Caralampio*. Pli bone dufoje doni monon al la eklezio ol nur unufoje. Sekure estas sekure. Ĉe religiaj aferoj estas multe pli bone, fari bonon tro multe kaj tro supermezure ol tro malmulte. Neniu centavo oferita al la eklezio estos forgesita, kiel oni povas legi en la preĝejoj sufiĉe klare sur la oferkesto.

La preĝejoj de Sapaluta kaj de Balún-Canán prenis la monon ne nur de la piuloj. La eklezio ne atentis pri tio, de kie ĝi venas kaj kiel la mono estas akirita. Des pli ĝi interesiĝas pri tio nombri la ricevitajn monojn, pro la trezoroj, kiujn konsumas tineo kaj rusto.

Ĉiuj komercistoj kaj ĉiuj posedantoj de ludotabloj iris tuj, kiam ili jam pagis sian standon kaj pagis ĉe la aŭtoritatoj la standokotizon kaj la imposton, en la preĝejon por

petegi la sanktulon Caralampio, je kies honoro kaj invito ili venis ĉi tien, ke li benu iliajn negocojn per riĉa gajno, ĉar ili faris nur pro li tiun longan kaj penigan vojaĝon, kvankam ili prefere restus hejme ĉe la edzino kaj la infanoj. Ili oferis kandelojn kaj metis sufiĉe da bonaj moneroj en la precipan oferkeston de *San Caralampio*, ĉar ili sciis, ke oni sur tiu ĉi mondo faras nenion por nenio. Ankaŭ ne en la ĉielo. Oni devas doni monon, kiam oni ankoraŭ havas vestojn kun poŝoj. Kiam oni jam iras en la ĉielon, mankas kutime la poŝoj, kaj tiam estas tro malfrue.

Ankaŭ la kantineroj komencis sian negocon per humila preĝo al la sanktulo Caralampio kaj kun valorplenaj moneroj. Ili devis sekurigi al si bonan gajnon el la vendo de siaj komitekoj kaj de siaj aliaj alkoholaj trinkaĵoj. Eĉ pli arde preĝis la kelnerinoj, la *meseras*, dum kelkaj horoj antaŭ *San Caralampio* kaj oferis monon, kaj se ili ne havis ĝin, ĉar ili ankoraŭ neniom perlaboris, ili promesis al li solene laŭprocentan parton de la negoco. Kaj kun deca digno surgenuiĝis antaŭ la sanktulo la etikedaj damoj anstataŭantaj la patrinojn de la povraj, nenion sciantaj virgaj kelnerinoj. Ili tiris per nobela gesto sian

nigran kaptukon vaste sur la vizaĝon kaj preĝis dum unu surgenuo ses rozariojn. Ili devis fari eĉ multe pli da bono ol la aliaj, ankaŭ ĉe la oferado de mono. Kaj precipe dum la oferado. Ili preĝis ja ne nur por si mem kaj por la propra animo. Ili estis sufiĉe maljunaj, por nun senpene resti virgaj kaj netuŝitaj. Sed ili ne estis egoistaj. Ili preĝis por la animoj de la kompatindaj protektatinoj al ili konfidataj, kiujn ĉiam minacis la kaptiloj de Satano, kaj kiuj ne povis defendi sin, ĉar ili havis lindajn vizaĝojn kaj tamen ne volis malsatmorti. Per siaj preĝoj kaj malavaraj oferoj la „patrinoj“ de tiuj knabinoj liberigis sin jam antaŭe de ĉiu kulpo. Kiam ili jam faris tion, la vojo al floranta negoco estis malfermita; ĉar oni diris al ili: KREDU kaj oferu, tiam oni pardonos al vi; kiu kredas kaj konfidas, al tiu la ĉiela regno estas malfermita, amen.

Ankaŭ la kripluloj kaj la almozpetantoj donis sian modestan financon kontribuon kaj ne forgesis, ke estis *San Caralampio*, kiu ofertis la proksiman bonan negocon al ili. Tuj post la fino de siaj preĝoj ili elrampis el la preĝejo kaj ekde tiu tempo sidante restadis tuj apud la pordo kaj sur la ŝtupoj por komenci la negocon. Antaŭe ili kverelis kelkan tempon pri la plej proksimaj lokoj al la

pordo. Sed tiam ili prudentiĝis kaj organizis la aferon tiel, ke ĉiu el ili havu la rajton sidi dum du horoj plej proksime al la pordo, laŭ detale fiksitaj skipoj kaj alternadoj.

Kiam la festo de ĉiuj surteraj kaj enĉielaj aŭtoritatoj fine estis preparita, en maniero, kiu kontentigis ĉiujn, la negoco komenciĝis. Ĝi ekis per granda solena meso, kun plorantaj, ruĝiĝantaj okuloj kaj tuŝitaj koroj, kaj kun la voto ekde nun neniam plu fari ion malbonan surtere kaj ekskluzive prepari sin por la eterna vivo. *Te deum laudamus.*

Kiam la granda solena meso estis finita kaj la piaj ĉeestintoj komencis forlasi la preĝejon, sur la placo antaŭ la katedralo ludis jam la muzikgrupoj kaj la marimbistoj. La ludotablaj bankieroj kriis: „*Se fué!*“, kaj la ruletdiskoj sur iliaj tabloj gaje ekzumis. Ĉe la la standoj la komercistoj kriaĉis: „*Soy el más barato del mundo!*“ Mi estas la plej malkara de la mondo! El la kantinoj oni aŭdis la vokojn: „*Otra copita!*“ Plian malgrandan por la seka gorĝo! La kripluloj kaj almozpetantoj sur la ŝtupoj de la katedralo hurlis: „*Tengo hambre, caridad, por Dios, me muero!*“ „Mi malsatas, donu almozon, por la amo de Dio,

mi mortas!“

La kelnerinoj prenis sian lipkolorilon kaj farbis sian buŝeton brilege ruĝa.

La negoco honore al Sankta Caralampio jam komenciĝis.

Rimarko

„*Se fué!*“ = Li venkis! Li finigas la ludon! *¡Se fue!* estas malnova ortografio, jen ludesprimo. Se la bankiero kaj la kunludantoj ludis domemon, „*¡Se fue!*“ signifas ke unu el la ludantoj metis sur la tablon sian lastan ludmarkon; do, ke iu gajnis la ludon.

Plenumante sian taskon, Andreo gvidis la karavanon de Sapoluta al Balún-Canán, por veturigi la komercistojn kun siaj varoj al la festo, kiu nun komenciĝis en Balún-Canán. Tie li devis atendi ĝis la festo estos finita kaj poste li havos la taskon hejmenveturigi la homojn al Tuxtla aŭ al Suchiapa aŭ de kie ajn ili estis. La pezo de la varoj nur malmulte malpliĝis, ĉar la komercistoj survoje aŭ sur la placoj, aŭ kie ajn ili faris siajn negocojn, ĉiam uzis la okazon aĉeti novajn varojn faritajn aŭ kultivatajn en la regiono. Tio estis, laŭ la cirkonstancoj: tabako, kafo, lano, lanaj *tilmas*, feloj, petatoj, bastvaroj, korbvaroj, komiteko, ludiloj el bakita argilo. Tiujn tie malkare aĉetitajn varojn ili kunprenis aŭ vendis en la lokoj survoje aŭ transportigis ilin ĝis malsupren al la pli grandaj urboj ĉe la fervojo, kie ili enspezis altajn gajnojn el ili.

La karavanistoj de Andreo dum la festo en Sapoluga ne staris pigre. La ĉaristoj reveturis la ĉarojn ĝis Tsobtajal, kiu troviĝas meze de la vojo inter Balún-Canán kaj Jovel. Tie ili plenigis la ĉarojn per frajto de potistovaroj, kiujn faris indiĝenoj en Tsobtajal, kaj ili liveris la frajton al la

komisiitoj, kiujn *don* Laŭreano havis en tiuj urboj.

Male al tio *don* Laŭreano ĉe la ekveturo de la karavano de *Chiapa de Corso* ordonis, ke la bovoj dum la festo en Balún-Canán ripozu kaj bone sin paŝtu por povi reveturi dum mallonga tempo kaj sen tro granda laciĝo de la bestoj. Intertempe li jam akceptis denove sufiĉe da frajtkomisioj kaj tial bezonis la bestojn en bona konstitucio. Tiun ripozon dum preskaŭ du semajnoj la ĉaristoj uzis por foje ĝisdetale lavi sin, por reordigi siajn personajn aĵojn kaj tiom ofte, kiom eblas ebriiĝi.

Se la proleto sur la plej malsupra ŝtupo de la ekonomia kaj socia ranga ordo ne devas labori, ĉar estas festtago aŭ ripoztago, li ebriigas sin.

Li ne scias ion pli bonan. Neniu instruis lin uzi la tempon je sia propra avantaĝo. Neniu diris al li, ke li lernu pensi por si mem, anstataŭ lasi pensi aliajn por si dum la tuta vivo. Li lernis nur unu aferon, kaj tiun li lernis bone, tio estas: obei. Por tio li ricevadis batojn ekde juneco. Lia patro komencis bati lin, por ke li obeu. Kaj ĉar li lernis nur obei, kaj ĉiam nur obei, tial li ne lernis pensi por si mem. Kaj kiam li ebriiĝas, li havas senkulpigon por sia

festtago, kaj li sugestas al si, ke li nun ĝojas.

Tio servas al la granda Difavoro de sia mastro, se li ebriiĝas. Sub la kondiĉo, ke lia laboro ne suferas pro tio. Kaj ĉar li ne scias, kion fari pli bonan en ripozaj tagoj, li simple drinkas ĉiun ripoztagon. Tiel li almenaŭ ne fariĝas pli inteligenta, kaj, kio estas speciale utila por lia mastro, li havas plu ŝuldojn ĉe li.

Drinki li rajtas tiom, kiom li emas. Li estas ja libera viro, kiu povas fari aŭ ne fari, kion li volas. Kiel libera viro li havas la bonan rajton ebriiĝi kaj elspezi sian monon tiel, kiel plaĉas al li. Sed li devas ĉiufoje tiom frutempe ebriiĝi, ke li, kiam lia laboro denove komenciĝos, ne neglektas sian laboron.

Rimarko

tilma = tilmo estas kruda kotona mantelo uzata de indiĝenaj meksikaj kampuloj, nodita sur unu ŝultro.

La ripozaj tagoj kaj eĉ la festtagoj en la vivo de ĉaristoj estis tre raraj. Nur se la bovoj nepre bezonis ripozon, ricevis ankaŭ la ĉaristo per tio ripozotagon. Sed ne, se eventuale estis riparendaj rompitaĵoj. La bovoj ricevis plenajn ripozajn tagojn kaj eĉ feriojn, kaj de ties tagaj manĝoporcioj oni ne minusis certan kvanton dum la ferioj. Ili ricevis sian plenan salajron, ĉu ili havis feriojn, ĉu ne. Ĉar ili estis nur bovoj. Ili rajtis satdormi, ĉar ili ne sciis ripari rompitan radon. Tiukaze, se sufiĉe da frajtoj estis veturigendaj kaj se eblis kumpeli rezervajn bovojn en la karavanoj, tute ne estis ripozotago kaj neniam dimanĉo por ĉaristoj. Ofte ne dum tuta jaro. La ĉaristo povis ĝui siajn ripozotagojn, se li, skuata de febro, ruliĝis kaj kurbiĝis sur sia petato aŭ, se li ne povis movi siajn gambojn, ĉar li venis sub la radojn de ĉaro.

Ses tagojn ĉiusemajne laboru kaj aranĝu ĉiujn viajn aferojn, sed la sepan tagon ne laboru, sed gloru Dion la Eternulon. Tio tre bone estis farebla de Adamo kaj Evo en la paradizo, kiuj ĉiusemajne faris ses tagojn nenion alian krom rigardi la pomujon en la ĝardeno Edeno.

Sed la ĉaristoj ne vivis en la ĝardeno Edeno, sed en la dia ekonomia ordo, kie frajto ne rajtas atendi, ĉar alie suferus la civilizacio. Ili ne havis tempon glori la Eternulon pro tio, ke li donis la vivon al ili. Jen la vivo de ĉaristo. Preĝu por la savo de via eterna vivo kaj laboru por pliigi la trezorojn de la mondo. Kvankam via stomako tiel ne pleniĝas, vi almenaŭ ĉiam restas sklavo, kaj la ĉielaj ĝojoj kaj laŭdaj kantoj iam estos certaj al vi. Ne strebu al libero kaj bonfarto ĉi tie surtere, ĉaristo, alie vi falus en la maŝkaptilojn de Satano, vi metus en tumulton la bone ordigitajn rilatojn de la ŝtato kaj preterirus la dornan padon. Esti fidela kaj obeema sklavo pli valoras ol aspiri la trezorojn de la bone grasigitaj mastroj. Tio estas malnova bona kaj elprovita leĝo. Tial estas pli da servistoj ol mastroj.

La grandiozeco de la ĉaristoj estis, ke ili ne cerbumis pri tiaj aferoj. Ili ne havis tempon pensadi pri io alia ol pri la bonfarto de siaj bovoj kaj pri la bonstato de la ĉaroj. Krome ili estis ĉiam tro lacaj por pensi entute ion. Ili volis esti kontentaj. Nenion pli. Ĉio alia lacigis ilin eĉ pli.

Kaj ili estis kontentaj, se ne mankis al ili la centavoj por

aĉeti en ripozotagoj sufiĉe da brando, por ke ili povu forte ebriigi sin. En tiu stato neniu postulis de ili, ke ili pensu.

La karavano de Andreo troviĝis ekstere de la urbo, sur vasta ebenaĵo, tuj apud la vojo, kiu kondukas al El Puente.

Oni estis kunveturigintaj la ĉarojn kaj bonorde laŭ rekta linio starigis ilin. La ĉaristoj faris grandspacan kampadejon por si mem.

La bovoj paŝtis sin, vaste dise, sur la ebenaĵo.

Plurajn fojojn oni kunigis la bovojn kaj pelis ilin al la rivereto, kie ili banis sin dum horoj en la akvo por mortigi la milojn da iksodoj, kiuj boris sin en la haŭton de la bovoj.

Post la banado oni kondukis ilin al la kampadejo. La ĉaristoj zorgeme ratis la korpojn de la bestoj pro vundoj, por kuraci ilin, se necesis.

Poste la bestoj ricevis siajn porciojn da maizo, kaj se ili jam plenŝtopis siajn stomakojn, oni liberigis ilin, por ke ili paŝtiĝu.

Sur la ebenaĵo paŝtis sin nenombritaj centoj da bovoj,

muloj kaj azenoj. La ĉevaloj, muloj kaj azenoj neniam paŝtis sin en la proksimo de bovoj kaj la bovoj neniam en la proksimo de ĉevaloj. Ĉiuj bestoj, kiuj sin tie paŝtis, restadis kune en certaj grupoj. Plej ofte estis la gregoj, kiuj havis la saman posedanton; ĉar la libere paŝtiĝantaj bestoj prefere restas ĉe tiuj, al kiuj ili kutimiĝis per komuna plenkreskado en la korto de sia posedanto kaj per ĉeokazaj kunpeladoj kaj hejmkondukadoj al siaj ranĉoj, kie ili ricevas sian salon.

Sed multaj grupoj formiĝas pro simpatio. Kaj aliaj formiĝas pro neceso. Ĉar ties posedantoj neglektas ilin, ili tute forgesas, kien ili apartenas. Al tiuj pli malkompaktaj grupoj aliĝas tiuj bestoj, kiuj venas nur ĉeokaze sur tiun grandan ebenaĵon. Do, la bovoj de la haltantaj ĉaristoj kaj la ĉevaloj, muloj kaj azenoj de la migrantaj komercistoj.

Kvankam sur la ebenaĵo miloj da bestoj paŝtas sin, oni vidas nur malmultajn brutarojn, ĉar la ebenaĵo estas tiom vasta, ke la bestoj en ĝi tute perdiĝas por la okuloj. Oni vidas ilin malproksime apenaŭ kiel punktetojn. Ne estis tre komplike por la ĉaristoj serĉi kaj trovi siajn bovojn sur la ebenaĵo. Survoje kaj sur la haltejoj la ĉaristoj kutimigis

la bovojn al tio resti kune kaj ne vagi tro malproksime de la ĉaroj. La bestoj ja tro malproksime vagas nur tiukaze, se ili ne trovas sufiĉe da herboj, aŭ la herboj estas tro amaraj aŭ la paŝtejo estas tro kota pro la bestoj, kiuj antaŭe tie paŝtis sin.

Krome la bovoj de la ĉaristoj distingiĝas de la ceteraj bovoj en tia konsiderinda mezuro, ke ili estas facile ekkoneblaj eĉ el granda distanco por spertaj ĉaristoj, ĉu estas ĉarobovoj ĉu kutimaj brutoj. La ĉarobovoj estas ege grandaj fortaj bestoj kun pezaj, tre larĝe etendiĝantaj kornoj, kiuj erare apenaŭ preneblas por aliaj brutoj.

Sed tie antaŭ la urbo haltis ankoraŭ kvar aliaj karavanoj de frajtentreprenistoj. Kaj ĉar ankaŭ la bovoj de tiuj ceteraj karavanoj paŝtis sin sur la sama ebenaĵo, kompreneble povis okazi, ke la ĉaristoj, rekondukante la bestojn, marŝis kvin ĝis ok kilometrojn en la direkto de ekrigardita grupo de ĉarobovoj, nur por fine eltrovi ĉe la alveno, ke estas la bestoj de alia karavano, kaj ke ili iris la longan vojon por nenio. Sed ĉar ĉiu el la ĉaristoj konas la brulmarkojn de ĉiuj frajtentreprenistoj en la ŝtato, diris la diversaj ĉaristoj al la aliaj, kie ili renkontis la aliajn

bestojn ĉe la serĉado de la propraj.

En la lastaj tri tagoj de la festo komenciĝis la ĝenerala rastado de la ebenaĵo pro paŝtiĝantaj bestoj. En ĉiuj direktoj oni vidis virojn surpiedajn aŭ sur ĉevaloj, kiuj serĉis siajn rajdo- kaj pakbestojn sur la ebenaĵo. Okazis kelkfoje, ke vojaĝanto, kiu venis sur ĉevalo al la festo, devis serĉi dum tuta semajno sian formarsintan beston kaj ĝin ne trovis eĉ post tiu longa tempo kaj devis peti la posedanton de proksima ranĉo, ke li informu lin, tuj kiam la besto estos trovita ie, ĉar li ne povas atendi pluan tempon.

En la lastaj tagoj de la festo ankaŭ la posedantoj de la gregoj, kiuj paŝtis sin sur la ebenaĵo, elsendis siajn virojn, por bone gardi siajn brutarojn kaj ĉevalogregojn. Ĉar tiam venis la danĝera tempo, kiam la ŝtelistoj de ĉevaloj kaj muloj vagadis pro negardataj bonaj bestoj. En la pelmelo de la multaj forvojaĝantaj komercistoj kaj festvizitantoj neniuj tuj povis diri, ĉu la rajdataj kaj pakitaj bestoj apartenas al la forvojaĝantoj, aŭ ĉu ili estas ŝtelitaj. Tiuj, kiuj prenis fremdajn ĉevalojn kaj mulojn kun si, marŝis ja ne sur la larĝaj vojoj, kie estis veturigataj la ĉaroj. Kiu

rajdis sur ĉevalo, ekde la ebenaĵo, tiu povus formigri en ĉiu direkto, kiu plaĉus al li. Se li ne ĵus renkontis farmiston de la distrikto, kiu konas la brulmarkojn de ĉiuj siaj najbaroj, kaj lin preterire demandis, ĉu li aĉetis la bestojn kaj je kiom da mono, jen la ŝtelitaj bestoj estis post malmultaj tagoj en Tabasko aŭ eĉ en Gvatemalo.

Estis nur dum tiuj festoj, kiam multaj centoj de nekonataj homoj troviĝis en tiu loko, kiam eblis ŝteli bestojn de la ebenaĵo. En aliaj tempoj la vojaĝantoj estis tiom raraj, ke ĉiu enloĝanto tute precize sciis kia aspektas la vojaĝanto, kia li estas vestita, kun kiuj bestoj li alvenis, kaj kun kiuj li poste forvojaĝis. Se li havis ĉe si eĉ nur unu ĉevalon eksuspektatan, ke li povus esti ŝtelinta ĝin ie sur la vojo ĉi tien aŭ reen, ili kaptus lin antaŭ ol pasus tri tagvojaĝoj, se ne jam post du horoj.

Tial en kutimaj tempoj la gregoj sur la ebenaĵo estis tiel sekuraj, kvazaŭ ili starus en stalo. Sed ĉe la ekleziaj festoj de ambaŭ urboj, kiuj estis disigitaj pere de la granda ebenaĵo, la posedantoj de la gregoj dum la lasta semajno de la festo tage kaj nokte devis sidi sur seloj kaj kunteni siajn gregojn.

Tiel kiel la maristo, kies ŝipo troviĝas en haveno por ŝarĝi aŭ malŝarĝi kargon, neniel povas pigri, kiel tion eble supozas la naiva loĝanto sur firma tero, sed plej ofte devas labori pli streĉe ol tiam, kiam la ŝipo estas veturigata sur la alta maro, tiel tio okazis ankaŭ al la ĉaristoj.

Baninte, kuracinte kaj nutrinte la bovojn, ili tuj okupiĝis pri la ĉaroj. Se de tie estus okazinta rompo en la sekvantaj dekdu semajnoj, hajlus riproĉoj al ili. „Pigruloj, damnitaj de Dio, vi kampadis du plenajn semajnojn en Balún-Canán, sed vi faris nenion alian krom dormi kaj drinki, anstataŭ ripari viajn ĉarojn. Tiu rompita rado kostas al vi monatsalajron, por ke vi lernu teni vian ĉaron en ordo“, dirus *don* Laŭreano. „Kion vi pensas, kial mi pagas al vi tridek centavojn ĉiutage? Plej prefere mi draŝus per bastono vian melonkapon, filo de hundino damnita de Dio!“

Kiel la ĉaroj aspektis, se ili veturis duonon aŭ eĉ tutan jaron sen ripoztago kaj ĉiam estis sur la vojo, oni povas imagi.

Tia ĉaro estis farita antaŭ ducent jaroj. Kompreneble, de la partoj, kiuj donis al la ĉaro novan aspekton antaŭ ducent jaroj, restis eĉ ne unu peco. Unue la maldekstra rado estis tute rompita, poste la dekstra, poste la timono, poste la framo kun la tegmento. Ĝia plej nova peco eble aĝis kvin semajnojn, la plej malnova certe kvardek jarojn.

Kaj tial, ĉar ĉiuj unuopaj partoj de la ĉaroj rilate la aĝon kaj tial ankaŭ rilate la daŭron de la uzebleco estis tre diversaj, laŭ tio, ĉu oni renovigis ilin aŭ ne, necesis multe da ekzercado kaj precizaj scioj pri la esenco de ĉaro por povi eltrovi, kiuj partoj rompiĝus en la sekvonta marŝo. Renovigi tiujn partojn estis la tasko de la ĉaristoj, kiam ili haltis sur ripozejo.

Don Laŭreano sciis tre bone, ĉu io ne estis en ordo en certa marŝo, ankaŭ tiukaze, se li ne estis ĉe la karavano, eĉ, se neniu ĉaristo diris ion pri tio. Neniu el la ĉaristoj elbabilaciis ion pri siaj kamaradoj, nek por venĝi sin, nek por kaĵoli sian mastron. Tio estis kontraŭ ilia naturo. Eĉ ne venis en iliajn kapojn povi esti tiel fiaj.

Inter si, dum marŝo aŭ en kampadejo, ili de tempo al tempo malice batalis. Ili atakis sin per tranĉiloj, aŭ per

maĉetoj aŭ bastonegoj, fluis sufiĉe da sango, ekestis multnombraj ŝvelintaj tuberoj kaj bluiĝintaj vizaĝoj. Proletoj, ĉie surtere, trovas specialan plezuron pri tio reciproke dishaki la kapojn. Tial la kapoj de iliaj mastroj restas sanaj. Ĉar la kolero, akumuliginta sub la influo de ilia mizera kaj senperspektiva situacio, forvaporigas en la interfrata dishakado de la proletoj. Jen la kaŭzo, kial ili ne havas sufiĉe da puŝforto kaj laŭordan koleron, kiam prezentiĝas foje la okazo ĵeti la tutan ekonomian ordon en promesplenan malordon. Ne el bonega ordo, sed nur el furioza malordo kaj per luktado povas naskiĝi nova prudenta socio.

Sed post tiuj perfortaj bataloj neniam restis malamo, tiel, ke iu el ili iam pensus pri tio, ke li venĝos sin per tio, ke li eltrumpetos ion pri sia kamarado ĉe la mastro. Tio estis kontraŭ ilia honoro kaj ilia moralo.

Sed *don* Laŭreano tamen sufiĉe precize eksciis, kio okazis en la marŝo, kaj kial tio okazis.

Estis ĉiam kelkaj vojaĝantoj sur ĉevaloj, kiuj preterpasis haltantan karavanon kaj kompreneble vidis, kio okazis.

Ili venis al *Chiapa de Corso* kaj renkontis *don* Laŭreanon ie surstrate, aŭ ili havis eĉ negocon kun li.

„Mi vidis vian karavanon, kiu haltis proksime al Santa Catarina, *don* Laŭreano, ili streĉe laboris kaj ne povis ekveturi.“

„Kio okazis tie, *don* Cesar?“

„Rompita rado, kaj bovo eskapis, nur kojoto scias, kiom la *muchachos* devis kuri, antaŭ ol ili kaptis ĝin.“

Ankaŭ la komercistoj aŭ la familioj, kiuj vojaĝis en la ĉaroj, plendis ĉe *don* Laŭreano: „Aŭskultu, *don* Laŭreano, viaj ĉaroj estas skandalo. Trifoje ili havis rompiĝon survoje, ĉar viaj *muchachos* dormis, *tan flojos*, tiuj malagemaj dormemaj pigruloj. La venontan fojon mi prefere traktos la frajton kun *don* Mauricio.“

Aŭ komercisto en Shimojolo skribis al *don* Laŭreano drastan leteron, ĉar la frajto alvenis du tagojn tro malfrue.

„Kial vi du tagojn malfruiĝis dum la marŝo? Ekparolu!“ vokis *don* Laŭreano al la marŝkolonestro. Tiam ili do devis ekparoli, kiu ĉaro havis rompon, kaj kial, kaj kies

kulpo tio estis.

Kaj tiun, kies ĉaro disrompiĝis, kaj kiu retenis la marŝon, oni punis per dekalkulo de unu aŭ du monatsalajroj. Tio konsiderinde helpis, ke, kiom ajn li laboris kaj kiom ajn li provis vivi ŝpareme kaj kiom ajn malofte li permesis plezuron al si, lia ŝuldoŝarĝo ne malpliiĝis ĉe lia mastro, sed pli kaj pli altiĝis. Tiom longe, kiom li havas ŝuldojn, li devis labori kaj elteni la vivon ĉe sia mastro, al kiu li restas ŝulda ion. Li ne povis foriri kaj serĉi okupon, kie li perlaborus pli, aŭ kie li havus pli facilan laboron, kaj kie li pli povus esperi fine foje fariĝi pli libera kaj pli sendependa kaj por fari tion, kio plaĉas al li, kaj kio ebligus pli agrablan vivon al li.

Rompita rado aŭ la deglitado de ĉaro de la vojo ne nur kelkfoje retenis la marŝkolonon dum duonoj de tagoj kaj malfruigis la frajtalvenon, sed ankaŭ tre ofte okazis, ke pro la rompo aŭ pro la deglitado de ĉaro la transportataj varoj disrompiĝis kaj senvaloriĝis. Kesto kun porcelanvaroj aŭ kun medicino rapide senvaloriĝis pro misatento de ĉaristo. Kaj, se la malfeliĉo de rompo trafis lin, kiam la ĉaro troviĝas meze de rivero, kiu trapasendas,

tiukaze ofte la tuta frajto estis neniigita, se temis pri frajtaĵoj, kiuj ne eltenas malsekiĝon.

Ne la forsendinto de la varoj, kiu malbone pakis la varojn, devis kompensi la damaĝon. Li ne transprenis la kompensodevon por sendaĵoj sur ĉaroj. Tion li klarigis tuj en siaj vendokondiĉoj. La kompensdevigan asekuron por la sekura alveno de la varoj oni ŝarĝis al la frajtentreprenisto. Kompreneble li povis rifuzi la transprenon de la varoj, se ili estis malbone pakitaj. Sed tiukaze alia entreprenisto transprenus la riskon, kaj *don* Laŭreano perdus klientojn.

Nu, kial li havis spertajn ĉaristojn? Kaj kial li pagis akcepteblajn salajrojn al ili? Kial li transprenis la ŝuldojn de la antaŭaj mastroj, kiam ili venis al li por plibonigi sian situacion? Kial li traktis ilin ne kiel malliberajn peonojn, sed kiel liberajn laboristojn, kiujn li ne skurĝis kaj ne enfermigis ĉe manoj kaj piedoj en dupartan tabulon? Kial ĉiuj tiuj konsideroj de civilizita entreprenisto por siaj laboristoj, se tiuj siavice eĉ ne iom atentis pri tio, ke li ne suferu damaĝon?

Estis nur juste, ke li enskribis ĉiun rompon okazintan

dum transporto kiel debeton en la konton de siaj ĉaristoj. Se ili bone tenas en ordo siajn ĉarojn, rompo ne okazas. Kaj se ili bone konas sian vojon kaj ne dormas dum la marŝo, sed zorgeme atentas, ekestas neniuj perdoj. Estis nur pro neglektoj de la ĉaristoj, se ili malfruiĝis aŭ rompiĝis radoj aŭ varoj perdis sian valoron.

Neatentemon oni ne subtenu. Li ja estus akcelinta la fuŝemon kaj neatentemon de siaj ĉaristoj, se li ne lasus pagi la virojn por ĉiu damaĝo, kiu ekestas pro ilia kulpo. Li pagis la ĉaristojn ne por tio, ke ili dormu kaj drinku, sed por tio, ke ili laboru, kaj ke ili laboru por lia uzo. Kien la mondo kaj la civilizacio irus, se la laboristoj rajtus fari aŭ ne fari, kio plaĉas al ili. Al ĉiu laboristo oni donis ja kapon, kun kiu li pensu. De la bovoj li ne postulus pagon por damaĝo, ĉar tio estus stultaĵo, ĉar ĉiu prudenta homo scias, ke bovo ne kapablas pensi. Tial oni ja ankaŭ ne pagas salajron al la bovoj. Sed ĉar la ĉaristoj povas pensi, tial li pagis salajrojn al ili. Kaj ĉar li pagis salajrojn, tial li havis bonan rajton postuli de ili, ke ili pensu pri lia uzo.

En la stato, en kiu la ĉaroj ĉiuj troviĝis, nur unu rimedo povus helpi eviti rompojn. Kaj tiu estus anstataŭi tiujn ĉarojn, kiuj servis jam tro longe, per novaj. Sed ĉar kelkaj partoj de ĉiu ĉaro estis bonaj kiel novaj, ĉar oni enmetis ilin nur antaŭ kelkaj monatoj, tio estus sensenca disipo de uzvaloroj, kion la negoco ne povus elteni.

Kiam *don* Laŭreano devis pligrandigi la nombron de ĉaroj, ĉar la frajtoj pliiĝis, li ĉiufoje unue ie provis kunaĉeti malnovajn ĉarojn. Nur se li ne sukcesis kunaĉeti malnovajn ĉarojn, li mendis novajn.

Al la ĉaristoj ne restis alia elirvojo krom per riparo plibonigi kaj teni en bona ordo la ĉarojn, kiam ajn ili havis liberan horon por tio.

La plibonigado de la ĉaroj estus estinta facila afero, se *don* Laŭreano disponigintus por tio la materialon aŭ estis doninta monon al ili por povi aĉeti materialon, kiam ĝi necesas.

Kiam la ĉaristoj estis en la hejma starejo, en *Chiapa de Corso*, estis tie kompreneble du ĉarfaristoj, kiuj provizis

la ĉarojn per bona materialo. Krome ĉiu karavano ricevis kelkajn novajn rezervoradojn, jugojn kaj timonojn por la vojaĝo. Sed okazis ofte, ke kelkaj marŝkolonoj du aŭ eĉ tri monatojn ne tuŝis la hejmlokon, sed ĉiam restadis nur sur la vojo inter Arriaga kaj Tuxtla, aŭ inter Jovel kaj Balún-Canán, aŭ kie ajn ili ĝuste akceptis sufiĉe da frajto.

Monon por povi aĉeti materialon survoje la ĉaristoj ne ricevis.

„Se mi farus tion“, diris *don* Laŭreano, „mi estus sufiĉe stulta. La *muchachos* tuj en la unua vendejo ĉe la vojo fordrinkus ĝin aŭ forludus per ĵetkuboj aŭ ĉe la surĵetada ludo de pesoĵ. Mi ja konas ilin, mi scias, kiaj ili estas.“

Eble li kolektis spertojn de tiu speco. Sed restis la fakto, ke la ĉaristoj neniam ricevis monon por tio. Li donis al ili nur bonhavaĵajn biletojn, por ke ili povu aĉeti maizon por la bestoj. La kreditbiletojn, kiujn li persone subkribis kaj stampis, akceptis ĉiu en la ŝtato, ĉar ili estis tiel sekuraj kiel kontanta mono.

La bovojn oni devis nutradi bone. Li ne povis respondecigi ĉariston, se bovo ĉe la marŝo renversiĝis, ĉar

la bovo ja ankaŭ ie sur paŝtejo povis esti manĝinta venenajn foliojn, aŭ eble serpento mordis lin. La renversiĝintajn bovojn oni ne povis ripari per novaj enmetitaj eroj; kaj tial la ĉaristo ne kulpis tion. Kio ajn okazis al bovo, okazis kun la volo de Dio, kiu gardas la paserojn, por ke ne falu plumo el iliaj vostoĵoj sen lia ordono eksplicite esprimita.

Ĉar la ĉaristoj havis nek monon nek kreditbiletojn por aĉeti la necesan materialon por la plibonigado de la ĉaroj, restis ilia afero, kie kaj kiel havigi la materialon.

Teni en ordo la ĉarojn ili devis, por ne perdi kelkajn monatsalajrojn.

Tial ili devis preni la materialon tie, kie ili trovis ĝin.

Eĉ la enmartelita kredo pri terura venĝo en la alia mondo ne povis reteni ilin havigi al si la materialon tiel, kiel ĝi estis akordigebla nek kun surteraj, nek kun ĉielaj, kaj plej malmulte kun ŝtataj leĝoj. Antaŭ ĉio alia ili devis pensi pri la plej proksima afero, kaj tiu estis, ĉiukaze eviti rompojn de radoj; ĉar la unua devo de bona, fidela kaj obeema servisto estas, ke li servas al sia mastro, ke li akcelas ties

prosperon kaj gardas lin kontraŭ ĉiu damaĝo. Ĉiuj ceteraj
devoj povas atendi.

Tiom malofte, kiom la unuopaj eroj de ĉaro estis enmetitaĵoj el la sama jaro, estis ĉiuj eroj ĉiuj el la sama materialo.

Kelkaj eroj estis el mahagona ligno, aliaj el ebono, aliaj el cedro, aliaj el kverko, aliaj el abia ligno. Ĉiuj lignoj, preterpasataj de la karavanoj survoje, estis troveblaj en la ĉaroj.

Kelkajn kilometrojn for de Balún-Canán, sur la vojo al El Puente estis mirinde bela abia arbaro, kun la plej majestaj arboj, kiuj imageblas. Estas verŝajne la beleco de tiu arbaro, kiu instigis la indiĝenojn el praa pasinteco, prezenti tiun belegan arbaron al siaj dioj kiel hejmlandon. Ili starigis en ĝia mezo grupon el piramidoj kaj altaroj, por ke la dioj delectiĝu je ili. Ke la indiĝenaj dioj ankoraŭ nun loĝas en tiu arbaro apenaŭ estas supozebla; sed la piramidoj ankoraŭ ĉiuj ĉeestas.

Tiu ĉi arbaro apartenis nek al *don* Laŭreano nek al ties ĉaristoj, nek al la ceteraj ĉaristoj, kiuj ripozis sur la ebenaĵo kaj plibonigis per riparoj siajn ĉarojn.

Por rigardi tiujn piramidojn, la indiĝenoj ne havis la tempon. Ili ankaŭ ne interesiĝis pri tio rigardi ilin, ĉar ili koncentris sian intereson nur al la bona stato de la ĉaroj. Estas neniam bone por la proletoj interesiĝi pri io, kio ne havas rilaton al la laboro. Pri sia laboro ili pensu, kaj la piramidojn kaj la historion ili lasu al tiuj, kiuj estas elektitaj de la ŝtato alĝustigi la mondohistorion laŭ la bezonoj de tiu ŝtato. La bonstato de ĉiu ŝtato estas akcelata kaj lia interna paco kaj lia ordo konservata, se la ŝuisto restas ŝuisto, se la laboristo estas obeema servisto kaj la sciencisto ennebuligas la problemojn de la ekonomia vivo.

Krome la piramidoj estis multe tro malproksimaj por la ĉaristoj. Ili iris nur ĝis tien en la arbaron, kie ili trovis tiajn arbojn, kiajn ili bezonis, por fari el ili timonojn, jugojn kaj spokojn.

Poste ili kondukis la bovojn tien kaj trenis la uzpretajn anstataŭaĵojn al la kampadejo.

La posedanto de la arbaro dum tiu tempo troviĝis verŝajne en la ungegoj de kelnerino, honore al Sankta Caralampio. Tial li ne multe zorgis pri tio, kiu ŝtelis

lignon en lia arbaro.

Sed mankis al la ĉaristoj ankoraŭ aliaj gravaj aĵoj, por povi teni en ordo la ĉarojn de la mastroj. Tial ili nokte ŝteliris sur la ebenaĵon kaj buĉis kelkajn bovojn. Ili bezonis la haŭtojn por tranĉi el ili novajn rimenojn, ĉar la malnovaj elsekiĝis kaj estis rompiĝemaj.

La ĉaristoj neniam ŝtelis por si mem. Facile ili ie survoje povus ŝteli kokinon kaj aliloke porketon, por fortiga manĝo, kiun ili ĉiam tiom bezonis. Sed, se la bovoj tie jam foje estis buĉitaj, malmulte ŝanĝis tion je la eble leviĝantaj konscienciproĉoj, se ili nun ankaŭ kunprenis kelkajn bonajn pecojn da bovokarno al la kampadejo.

Ĉar ĉiu karavano, kiu haltis tie, devis vivi sub la samaj kondiĉoj, ĉiu karavano bezonis novan bovohaŭton. Tial pluraj bovoj devis lasi la vivon por la bonfarto de la frajtentreprenistoj.

La ŝtelado de arboj estis embarasiga afero por la ĉaristoj, se oni kaptis ilin ĉe tio. Furiozaj riproĉoj trafis la kulpinton, kaj eble svarmo da batoj per la rajdovipo sur la kapon. Sed la bovobuĉado estis eĉ pli malica afero, se eble

eĉ vakero vidis tion. Tiam ili malaperis fulmrapide en karcero. *Don* Laŭreano kompreneble ne lasis siajn ĉaristojn en la karcero, ĉar li bezonis ilin por la laboro, kaj ĉar ili havis ŝuldojn, kiujn ili devis forlabori. Se ili ne estus havintaj ŝuldojn, eble estintus egale al li. Sed li devis savi sian kapitalon. Do, se ŝtelo malkovriĝis, li pagis al la posedanto de la grego la valoron de la bovo, kaj li pagis al la urbestro kaj al la polica ĉefo de la loko, kie lia ĉaristo estis prizonulo en la *carcel municipal*, dudek pesojn da amikeca mono, kaj oni liberigis lian ĉariston. La elspezojn, kiujn *don* Laŭreano havis, kaj por la pagita bovo kaj por la amikeca mono, li skribis en la debeton de la ĉaristo. Kaj tute pravigite. *Don* Laŭreano ja neniam ordonis al siaj ĉaristoj ŝteli arbojn, buĉi bovojn, eltiri najlojn el domoj, rabi nokte feron en forĝejoj. Tiajn ordonojn *don* Laŭreano ankaŭ neniam en sia vivo donus, eĉ se unu el liaj karavanoj dum semajno devus halti sur la sama loko de la vojo. Ĉar li estis tre respektata kaj alte estimata membro de la komunumo. Li vivis en humileco antaŭ la Sankta Eklezio, kaj kvankam li konsideris la leĝojn de la lando en kelkaj kazoj kiel reformindaj favore al la posedantoj, li trovis ilin entute bonegaj; ĉar ili

protektis lian juste akiritan proprajon kaj retenis tiujn, kiuj ne havis proprajon, post decaj barieroj.

Sed sendepende de ĉio ĉi, la ĉaristoj, kampadantaj ĉi tie sur la ebenaĵo, riparis la ĉarojn ĝis ili estis en bona ordo.

Ĉar ĉiuj homoj, kiuj povus ĝeni ilin, troviĝis en festekscitiĝo honore al la sanktulo Caralampio, estis la havigado de la necesa materialo pli facila kaj pli rapide okazis, ol la ĉaristoj atendis tion.

Tiel restis al ili fine ankoraŭ sufiĉe da tempo por foje rigardi la feston elproksime, por ke ili ne devu restadi por ĉiam tie ekstere sur la eterne venta ebenaĵo, tiom malproksime de la urbo, por ke ili ĝuste povu aŭdi ankoraŭ de tempo al tempo la sonorilojn kaj la eksplode krakantan pafadon de la piroteknikaĵoj.

Kiel ĉiu, kiu iras al festo, ili havis la nepripensitan esperon, ke tie okazos io precipa kaj interesa, aŭ ke falos iu bonvenigata dono en iliajn manojn.

Sed ĉe festoj okazas iu surprizo nur tiam, kiam oni atendas neniun.

En ĉiu kazo la ĉaristoj deziregis foje dum kelkaj horoj

aŭskulti, vidi kaj flari ion alian ol nur ĉiam kaj eterne la
ĉarojn kaj la bovojn. Eĉ la plej inteligenta homo
transformiĝas tre rapide en bovon, se li vidas ĉiun tagon
ĉirkaŭ si nenion alian krom bovoj.

Ĉapitro 09

01

Estis malfrue posttagmeze. La festo de Sankta Caralampio atingis sian kulminon. Amasoj de homoj tumultis kaj ondadis sur la malvasta placo antaŭ la katedralo de la malalte situanta urboparto. Aŭdiĝis kvazaŭ gakado de aro de anseroj, krioj, bruoj, vokoj, blekado.

Ebriuloj kriaĉis kaj kantis kriĉvoĉe.

Tie kaj tie ludis muzikgrupoj, la muzikistoj iris nudapiede kaj en flikitaj pantalonoj kaj en ĉifonitaj flanelaj ĉemizoj. Antaŭ cirko, kiu estis stariginta sian tendon en la grandspaca interna korto de civitana domo situanta en unu el la plej proksimaj flankstratoj, ludis marimbistoj. Aliaj marimbistoj ludis sur la placo antaŭ la *cabildo*, la urbodomo. Policistoj trenis ĉiun dekan minuton ebriulon en la urbodomon por meti lin en la karceron.

La ebriuloj estis plej ofte peonoj aŭ indiĝenaj kamparanoj. Ili ne povis pagi punon. Il devis forlabori la punon, ĉar ili ebriiĝis. Matene, se ili estis sobraj post la

dormo, oni verŝis por ili varmegan nedolĉigitan nigran kafon en pelvon. Post kiam ili trinkis ĝin, ili devis purigi la placojn kaj stratojn, observataj de policisto kun ŝarĝita fusilo, por kio, reveninte, ili ricevis kafon, du kulerajn plenojn da nigraj kafograjnoj kaj kelkajn tortiljojn.

La stratpurigado estis kun mirinda precizeco enskribita kun tiom kaj tiom da tagsalajroj en la kontojn por la finkalkuladoj de la urba buĝeto. Sed, ĉar oni ĉiutage arestis sufiĉe da ebruloj, kaj se ili mankis, kulpigis vagantajn indiĝenojn pri tio, ĉu ili ebris, ĉu ne, la urbestro kaj la kasadministranto ne devis pagi la salajrojn, tiel precize skribitajn en la elspezkontojn.

Ankaŭ la kostojn por la prizorgado de la arestitoj oni kompreneble skribis kiel debeton en la kontojn. Se oni rigardis la finkalkulon por la kostoj de la arestitoj, oni devis supozi, ke ili fartis multe pli bone ol la honestaj civitanoj de la urbo. La arestitoj ricevis, kiel legeblis en la kostokalkulado, viandon, ovojn, fruktojn, cigaredojn. Estas vere mirige, ke la povraj indiĝenaj farmlaboristoj ĉe tia bonega traktado ne strebis ĉiutage, ke oni arestu ilin; ĉar vivi pli bone ol en la urba prizono ili povis nenie.

La placo antaŭ la katedralo troviĝis tre malalte. En la pluva sezono tiu placo estis ĉiufoje inundata kelkajn tagojn.

Sed nun la placo estis tute inundata de standoj, restoraciaj tendoj, pafbudoj kaj ludotabloj, inklude de ĵetkubaj tabloj. La irejoj inter tiuj budoj kaj standoj estis tiom malvastaj, ke la homoj, kiuj tie svarmadis, moviĝis nur lante antaŭen. Estis ĉiama ŝovado, interpuŝado kaj premado. Tiel ekestis la impreso, kvazaŭ kelkaj dekmiloj da homoj tie troviĝas sur la placo, kvankam, se oni nombrus ilin, ĉeestus apenaŭ pli ol tri mil da ili.

Kion tiuj urĝantaj kaj ŝovantaj interpuŝuloj kaj premuloj tie efektive serĉis, ili tute certe mem ne sciis. Tie nenio estis aĉetebla, kion ili ne povus aĉeti kiam ajn alitempe same bone aŭ eĉ pli bone, pli malkare kaj multe pli fidinda en iu magazeno de la urbo. Sed ĉiu havis sur sia vizaĝo esprimon, kvazaŭ li atendus aĉeti tie aŭtentikajn oromonerojn, kiuj popece kostas nur peson.

Ĉion, kion la homoj aĉetis tie, ili aĉetis ne tial, ĉar ili

bezonis ĝin, sed ili aĉetis ĝin, ĉar ili ĝin vidis, ĉar ili estis en la humoro elspezi monon, ĉar lertaj komercistoj persvadis ilin, ke ili povas aĉeti tion aŭ tion nur ĉe li kaj ĉe neniu alia en la mondo, kaj ke tio estas granda bonŝanco por ili, ke li venis en la urbon, kaj ke eĉ tiukaze, se ili momente ĝuste ne bezonus la aĉetindan varon, tiu mankus al ili morgaŭ kun certeco, ke tiam estos tro malfrue kaj ili preterpasus la grandan kaj plej favoran okazon en sia vivo.

Tiel la homojn kaptis certa ebrieco. Sub la influo de la kriado, de la bruo, de la muziko, de ofertantaj vendistoj, de la puŝado kaj ŝovado de la homoj ĉirkaŭ ili, kiuj aĉetis kaj aĉetis, kvazaŭ morgaŭ granda katastrofo povus detrui ĉion, la homoj perdis ĉiun kontrolon pri si kaj sia agado. Iliaj kapoj pleniĝis kaj peze ektorniĝis kaj perdis sian trankvilan pensmanieron. Tiel ili aĉetis kaj aĉetis, la plej sensencan kaj plej superfluan fatrason. Objektoj, kiuj estas malbelaj kaj ne havis uzvaloron. Kaj ili aĉetis kaj aĉetis, ĉar ili vidis, kiel ĉiuj aliaj homoj ĉirkaŭ ili aĉetas kaj aĉetas.

Simile estis ĉe la pafbudoj kaj ĉe la standoj, kie oni rajtis

ĵeti pilkojn al starigitaj nigraj katoj el kartono. Por dek centavoj oni rajtis pafi trifoje per pikilo al malgranda celdisko. Se sukcesis la pafinto trifoje trafi en la nigron, li ricevis kiel premion arabeske ornamitan kaj per oro pripentritan florovazon. En la pli grandaj urboj iu magazeno popece povus oferti tian vazon por dudek centavoj, kaj neniu, kiu posedas nur iom da estetika sento aĉetus ĝin. Eĉ tie en tiu pli malgranda urbo, kie tiam estis en modo tio, kio estis en pli grandaj urboj jam antaŭ tridek jaroj rabatvaro, komercisto apenaŭ povus esperi vendi tiajn vazojn kaj la ceteron, kion la pafbudoj kaj standoj disdonis krome kiel premiojn al klientoj. Sed, se oni gajnis tian objektaĉon en pafbudo, tio estis kiel donaco. Oni portas ĝin hejmen kaj starigas ĝin en la domo. Kvankam ĝi detruas ĉian harmonion en la domo, sed kiu havus la kuraĝon ĵeti tian bele orumitan vazon en la rubujon. Oni provas uzi ĝin kiel vazon. Sed, se oni vere metas florojn en ĝin, la vazo renversiĝas kun la akvo, ĉar la ĉeĥoslovakaj fabrikantoj de tiuj vazoj pensis malpli pri la ĝustaj proporcioj de la vazoj ol pri tio doni al ili luksan aspekton. Kaj ĉar la vazo do uzeblas por nenio en la mondo, oni nur starigas ĝin en la loĝejo de la pafinto. Tial

ĝi neniam disrompiĝas kaj herediĝas de generacio al generacio. Pro tio la estetika sento de la homoj restis ĉiam tiel, ke ĉiu nova generacio en pafbudo penas fari por dek centavoj dudekfoje tri pafojn, por gajni tian vazon.

Sed facile tute certe ne estis efektive gajni ion en la pafbudo. Oni gajnis nur pro pura hazardo ion, kaj la hazardo ekefikis nur tiam, se oni trifoje celis al tute alia loko ol al tiu, kiun oni intencis trafi. La aerfusiloj estis tiel alĝustigitaj, ke eĉ feliĉigaj hazardoj nur tre raris. La pafbuda viro povis vojaĝi kun siaj vazoj, tasoj por barbaj viroj, japanaj ventumiloj el Halle ĉe Saale kaj la vekhorloĝoj kaj bildoj de virgulino Maria du jarojn al kvardek diversaj jarfoiroj kaj sanktulaj festoj, kaj se oni iutage ree renkontis lin, li starigis plu la samajn vazojn kaj vekhorloĝojn. Kaj la homoj pafis ankoraŭ tiam tri pafojn por dek centavoj por gajni vekhorloĝon, kiu pro la longa servado estis rustiĝinta kaj deformiĝinta pro la multfoja enpakado kaj elpakado.

Sed la pafbuda mastro estis afabla viro. Se oni multe pafis kaj penis kaj faris kelkajn lertajn pafojn, kiuj tamen ne gajnis la vazon, sed la bonintencan kapkliniĝon de la

pafbudisto: „*Otra vez, caballero, más buena suerte*-la venontan fojon, *caballero*, vi pli bonŝancos!“ La bonega pafinto ricevis medalon fiksiton sur la bruston, kiu atentigis lin inter la ceteraj festpartoprenantoj kiel eminente gravan viron.

Oni povis pafi ankaŭ al surstarigitaj skatoloj kun cigaredoj. Skatoloj kun cent cigaredoj kostis tri pesojn, kaj tia skatolo aĉeteblis en ĉiu magazeno por dek centavoj. Sed tie en la festo la homoj ege penis dekfoje fari tri pafojn por dek centavoj por povi havi tian skatolon.

Se la homoj tro malprudente forpafis sian monon kaj nun volis regajni ĝin, ili iris al la ludobudoj kaj al la ruletaj tabloj. Tie estis ja tiel facile per dudek kvin centavoj per unu fojo gajni kvin pesojn. Tiun okazon oni ne rajtis preteriri, kaj ĉiu estis dankema al la viro kun la ruleto, ke li venis al la festo kaj tiel donis al la homoj la okazon fariĝi riĉaj en unu nokto eĉ sen devi labori.

La posedantoj de la pafbudoj kaj de la ĵetstandoj kaj ĉiuj similaj homoj estis grandaj friponoj, tion sciis ĉiuj festvizitantoj. La fusiloj ne pafis laŭcele, la pafforto estis

tro malgranda kaj ne faligis eĉ nur unu skatoleton da cigaredoj, se la pafbudisto ne deziris tion, kaj se li intence ne starigis la skatolon tiom proksime al la malantaŭa eĝo, ke ĝi jam falis, se oni nur iom tuŝis ĝin. De tempo al tempo li ja devis permesi la gajnnon de kelkaj skatoloj por allogi novajn klientojn.

Ankaŭ la viro kun katoj el kartono ŝovis de tempo al tempo fabokernon sub la ligneton servantan por la starigado de la kato tiel, ke la kato renversiĝis kaj la ĵetinto ricevis ses ĵetojn por nenio, por denove provi sian bonŝancon kaj gajni oran poŝhorloĝon.

Nur la viro kun la ruleto estis honesta. Tio estis konata. Kiu ajn vizitanto, kiu jam riskis sian monon, rajtis ektorni la ruleton, kaj se iu asertis, ke la ruleto staras oblikve, oni tuj ekvilibrigis ĝin. Tie friponaj agoj ne okazis. Tion ankaŭ la polico ne tolerus. Strange estis nur tio, ke la ununura viro, kiu daŭre gajnis kaj riĉiĝis, estis la posedanto de la ruleto mem. Kiel li pagu alie siajn altajn impostojn? Kaj ankaŭ vivi li volis. Kaj tamen ĉiuj homoj, kiuj riskis tie siajn pesojn, estis firme konvinkitaj, ke la viro kun la ruleto venis tien nur, ĉar li intencis riĉigi

ĉiujn. Kaj, se la ludantoj spite al multfoja vetado de sia mono ne riĉiĝis, sed tion, kion ili posedis, perdis, ĉiu kulpigis nur sin mem kaj diris, ke simple Fortuno ne helpis lin, ke estas lia ĉiama sorto ne havi bonŝancon.

Kompreneble la ruzuloj, kiuj tie ludis, ne esperis eĉ dum sekundo, ke ili povus forĝajni de la ruletposedanto almenaŭ peson. Se tiu danĝero minacus la ruletposedanton, li ja ne venus. Sed la ruzuloj ludis por gajni la monon de siaj kunludantoj, por tiel partopreni en la negoco de la ruletposedanto. La ruzuloj dum horoj eltenis ĉe la ludotablo. Ili vetis sian monon laŭ certa sistemo. Ili gajnis ofte kaj tiel helpis al la posedanto allogi novajn klientojn, ĉar la posedanto elpagis la gajnojn al la ruzuloj kun laŭta kriado: „Jen, *caballeros*, denove kvin pesojn por via *tostón*. Vi faras el mi povran viron. Morgaŭ mi devos fermi mian ruletotablon. Mi devas nutri familion. Sed mi estas viro de honoro. Nova ludo komenciĝas, *cabbaleros*. Vetu, *cabbaleros*, vetu. *Se fué*. Rrrr. *Quince negro*. Kiu havas la nigran dekkvin? Neniu? Vetu, *caballeros*, vetu, nova ludo komenciĝas.“

La ruzuloj gajnis efektive. Dudek pesojn, tridek pesojn.

Sed ili volis gajni cent pesojn kaj poste fini la ludon. Se nokte la rulettablo estis fermata, la posedanto faris la tutan negocon mem; kaj la ruzuloj estis same tiaj malplenaj kaj elsakigitaj kiel la stultuloj. La sola persono, kiu finis la tagon kun gajno, estis la ruletbankiero.

La ruleto kaj la ceteraj tabloj, kie oni ludis je kontanta mono, havis licencon nur ĝis la naŭa vespere. Nur sub tiu kondiĉo ili ricevis la licencon. Sed la vera negoco efektive komenciĝis ja nur post la naŭa vespere, ĉar la *caballeros* en tiu tempo sendis sian edzinon en la liton. Kaj tiam la *caballeros* estis liberaj kaj ne plu molestataj.

La polica ĉefo sendis policiston kun la informo, ke pasis la tempo por la ruleto. La ruletbankiero translasis la tablon por certa tempo al sia kunlaboranto, kaj li iris al unu el la *cantinas*, kie li renkontis la polican ĉefon.

„Ĉu *copita*, *jefe*? Ĉu glaseton da komiteko?“ li demandis. Sen atendi la respondon de la aŭtoritato, kun kiu li parolis, li mendis du grandajn glasetojn da komiteko *añejo*. Kaj kiam ili ankoraŭ estis duone plenaj en la manoj, li mendis du pluajn glasetojn da komiteko. Tiam li eltiris kvin pesojn el la poŝo, ŝovis ilin al la polica ĉefo en

la pendantan manon, grimace fermis okulon kaj diris: „Vi havas ja familion, *jefe*, estas por viaj infanoj.“

Ĝis la deka vespere montriĝis neniuj policistoj ĉe la ruleto. Oni gaje ludis. Laŭ la licenco ne estis permesite, ke persono vetu pli ol dek centavojn sur la sama nombrokampo. Kompreneble ĉiu rajtis veti kvin centavojn sur dek diversajn nombrojn aŭ pli da ili en ĉiu ludo. Sed vespere je la sepa la bankiero jam malinkline tordis la vizaĝon, se iu vetis malpli ol kvaronon de peso. Je la oka oni vidis jam nur ĵetonojn kun valoro de duono de peso sur la nombroj. Je la deka la bankiero po nombro akceptis kvin pesojn.

Tiam, je la deka vespere, aperis denove policistoj kun la informo, ke nun devu esti la lasta ludo, kaj ke li ne rajtas permesi pluan ludadon. La ruletviro donis al la policistoj peson. Tiam li denove iris al kantino. Ĉifoje ĝi estis aliloka. Sed ĝuste, li renkontis la polican ĉefon. Estis pruvo de la prudento de la bankiero, ke ĉiufoje li sukcesis tuj trovi la polican ĉefon en la ĝusta kantino sen disipi tempon ĉe la serĉado. Kostis denove du glasetojn da *comiteco añejo*, sed ĉifoje dek pesojn por la familio.

Sed tio ne estis ĉio ĉifoje. La polica ĉefo movis iom la kapon en la direkto al sinjoro, kiu sidis ĉe tablo kun botelo da biero antaŭ si.

„*El presidente* – la urbestro“, diris la polica ĉefo.

La ruletviro tuj komprenis.

Li iris al tiu tablo.

„*Cómo está, señor Presidente?* Kiel vi fartas?“

„Ah, *don Claudio, qué tal?* Kiel statas la negoco? Mi devas diri al vi, ke ni povas permesi nenial, ke via ruleto turniĝos ankoraŭ post la naŭa vespere. Vi ja konas la kondiĉojn de via licenco.“

„Mi tuj fermos ĝin, *señor Presidente*, nur kelkajn ludojn ankoraŭ. Kelkaj sinjoroj tie volas havi revanĉon. Tion mi apenaŭ povas rifuzi. La sinjoroj estas ekscititaj, kaj tio povus konduki al tumulto, eble eĉ al kelkaj pistolpafoj.“

„Vi pravas, *don Claudio*“, kapjesis la urbestro.

„Kompreneble, sub tiaj cirkonstancoj. Sed ne tro longe, ĉu vi komprenas? Ĉu vi ne volas sidiĝi al mi por botelo da biero?“

„Vi devas pardoni al mi, *señor Presidente*“, diris la ruletviro, lerte evitante la inviton, kiu tute ne estis serioze dirita. „Ĉe okazo“, li diris plu, kvazaŭ eksaltonte, por povi rekuri al sia negoco, „mi aŭdis, ke vi volas konstrui hospitalon ĉi tie. Ĉu vi permesus, *señor Presidente*, ke mi faru malgrandan kontribuon?“

„Mi tre dankas al vi en la nomo de la civitanaro“, respondis la urbestro.

La ruletviro tiris kvin ormonerojn el poŝo kaj metis ilin proksime antaŭ la urbestron kaj ŝovis ilin duone sub la urbestran brakon, ripozantan sur la tablo.

La oromoneroj malaperis, antaŭ ol la ruletbankiero denove enpoŝigis la manon.

„Kun via afabla permeso, *señor Presidente*, sed nun mi devas rapidi, por ke ne okazu ĉe mia tablo eĉ tumulto.“

„*Bueno, don Claudio*, sed memoru, ne tro longe.“

Eĉ je la unua post noktomezo la ruleto ankoraŭ turniĝis. Tiam la negoco atingis sian kulminon. Nun ludis la bienuloj. Ĉiuj ĉi homoj, kiuj povis veti nur duonon de peso aŭ peson, ne plu kuraĝis proksimiĝi. Oni ne vendis

ĵetonojn al ili. La plej malkaraj ĵetonoj kostis nun kvin pesojn. Ĉar oni ludis nur per ĵetonoj, la ruletviro, se la polica ĉefo aŭ la urbestro fine tamen agus en la nomo de la leĝo, povus ĉiam trankvile klarigi, ke ĉiu ĵetono valoras nur kvin centavojn. Neniu, ankaŭ ne spiritisto, povus vidi laŭ ĝia aspekto, je kiu prezo ili estis venditaj.

La polica ĉefo, kiu ankoraŭ trifoje estis vizitata en kantino de la bankiero, komisiis la policistojn serĉi ebrulojn kaj skandalulojn kaj ne molesti la bienposedantojn ĉe la ruleta tablo.

La *Presidente* same estis vizitata ankoraŭ trifoje. Pro la hospitalo. Poste li foriris por dormi kaj konfidis la urbon al la protekto de la ludantaj bienuloj. Sub ties ŝirmo la urbo estis sekura; ĉar la bienuloj estis la defendantoj de kvieto kaj ordo, kaj ĉar ili rigardis ĉion ekzistantan kiel bonaĵon kaj kiel tiel dezirata de Dio.

Ĉapitro 10

01

Andreo alvenis en la urbo malfrue, kiam jam vesperiĝis.

La sencela ondado de la homoj pli intensiĝis .La kriadado de la vendistoj estis nun pli laŭta, kvankam ankaŭ pli raŭka. Ĉie oni kriadis kaj bruadis. Neniu sciis pro kio. Sed ĝi estas karakteriza por homoj, ke tiukaze, se multaj kunestas, ili ŝatas krei. Ĉiu unuopulo el ili deziras superkrii ĉiun alian, ĉar ĉiu el ili pensas, ke tio, kion volas diri li, estas pli grava ol tio, kion volas diri la aliaj.

„Aquí, aquí, la seda legitima de Francia y las mas barata. Ĉi tien, ĉi tien, aŭtentike franca silkoŝtofo, plej malkara tutmonde.“

La aŭtentike franca silkoŝtofo, kiun la krianta komercisto flirtigis en la aero kiel longan standardon, por ke ĝi ondu kaj brile muaru, estis sisala produkto el Jukatano. Sed, ĉar li kriis tiom laŭte, ke ĝi estas franca silko, fidis lin la ĉirkaŭstarantaj inoj, alie, se la viro mensogus, li ĉe tia kriadado devus ja sufokiĝi je la propraj mensogoj.

La komercisto de silkoŝtofo estis arabo el Tabasko, sufiĉe longe en la lando por scii, kiel oni hispanlingve plej lerte povas trompi kaj mensogi meksikanojn en malgrandaj urboj.

Kiel najbaron li havis kubanon, kiu vendis kuracilojn. Ne estis iu korpa aŭ anima difekto de la homaro, por kiu li ne havis la ĝustan kuracilon: kuracaj radiketoj, herbetoj, piloloj, ekstraktoj, boteletoj kun sanigaj akvoj.

Hispano staris ĉe eta tablo, vendante peruan dentopulvoron. Estis la pulvoro, kiel li asertis, kiun jam uzis la inkaoj. Li diris, ke li elportis ĝin el la subteraj volbaĵoj de ruinoj en Peruo kaj Bolivio, kaj ke ne multe postrestis de tiu mirakla dentopulvoro, nur kelkaj cent kilogramoj ankoraŭ. Kaj li aldonis, ke tiam, kiam li estos elvendintaj ilin, la homoj, kiuj poste deziros konservi siajn dentojn sanaj por ĉiam, bedaŭros tion tro malfrue. Li konsilis al la homoj, ke ili aĉetu tuj kvin pakaĵetojn, anstataŭ nur unu el ili, ĉar tio estis laŭ li la plej bona kapitalinvesto, kiun ili povus fari.

Kiam li atingadis tiun parton de sia parolado, li prenis malgrandan indiĝenan knabon, kiu tie staradis. Kun

multaj vortoj kaj kun imponaj magiistaj gestoj li vaste malfermis la buŝon de la knabo kaj frotis al li iom de la pulvoro sur la dentojn.

„Gesinjoroj, kun tiu pulvoro vi ne plu bezonas dentbrosilon. Kun tiu miraklo-dentopulvoro de la famaj inkaoj vi bezonas purigi la dentojn nur per la montrofingro, ĝuste tiel, kiel faris tion la famaj inkaoj mem“, li diris, dum li poluris la knabajn dentojn per sia fingro tien kaj tien. Kiam li estis fininta tion, ĉiam parolante kaj glorigante la pulvoron, li verŝis iom da akvo en la buŝon de la malgranda knabo. Tiu devis gargari la buŝon kaj la akvon poste elkraĉi. Tiam la pulvoroviro ree ŝire malfermegis la buŝon de la knabo, multe pli vaste, ol la knabo normale povas malfermi ĝin, kaj turnis la vizaĝon kiel aŭtomatan pupon al ĉiuj flankoj. La knaba rikano malkovris blindige blankajn dentojn. La ĉirkaŭstarantaj homoj estis nun konvinkitaj, ke la perua dentopulvoro efektive mankis, kaj ke tio estas la kaŭzo, kial ili havas malsanajn dentojn. Ili aĉetis la kvin ofertitajn pakaĵetojn, ĉar unu el ili certe ne sufiĉus ĝis la fino de ilia vivo. Ili estis ekde nun tute certaj, ke ili neniam plu havos dentdolorojn dum sia tuta plua

ekzistado. Tion oni ja promesis al ili.

La kvar malgrandaj indiĝenaj knaboj, kiuj estis la ekspoziciaj uloj de la pulvora viro, ricevis du centavojn da salajro. Por tio ili estis devigitaj ŝmiri sur siajn dentojn verdete flavan paston el maizo, kiun kunlaboranto de la pulvoroviro ie tenis preta en angulo. Krome la knaboj devis staradi en la proksimo de la pulvoroviro, tiel ke li povis tiri ilin en okazo de bezono evidente tute hazarde el la homamaso.

Plej proksime al la pulvoroviro ne estis tablo, sed tie staris du viroj kaj ino. Unu el la viroj havis gitaron, la alia violonon, kaj la ino tenis en la manoj presitajn folietojn, ruĝajn, verdajn, flavajn kaj bluajn.

„Jen nova kanto, gesinjoroj“ vokis la viro kun la gitaro.

„Nun ni kantas por vi ‚*Soy Virgencita*‘, mi estas ankoraŭ virgulino, senmakula virgulineto. Ek do, aŭskultu do.“

Li kliniĝis antaŭen, apogis la gitaron sur la genuo de la antaŭmetita femuro, agordis ĝin, ŝanĝis ŝovante la lokon de la gitara ponteto kaj ludis la akordon.

La viro kun la violono komencis ludi, kaj tiam la

kantistino komencis kanti. Post la unua stanco ankaŭ la viroj ekkantis kun ŝi.

Ili kantis softe, iom lamente, sed kun agrablaj harmoniaj voĉoj. La ino ŝajnis kvazaŭ ŝi legus la kanton de unu el la folietoj, kiujn ŝi tenis en la mano. Sed ŝi sciis ĉiun vorton parkere. Ŝi kaj la viroj kantis tiun kanton kaj sian tutan ceteran repertuaron certe jam pli ol dekmilfoje.

Ili estis *cantadores de corridos*, meksikaj kantistoj de baladoj, kiuj vagas de loko al loko kaj mankas sur neniu festo en Meksiko.

Post kiam la kantado venis ĝis la fino, ili turnis sin al la pelmela aro de homoj ĉirkaŭstarantaj ilin en ringo: „Tiu ĉi belega balado, kiujn ni ĵus ĉi tie prezentis por via plaĉo kaj nia granda plezuro per dolĉaj kaj melodiaj sonoj, estas nun je via, al ni tiel agrabla kaj ŝatata dispono. *Dos surtidos cinco Centavos, cinco surtidos diez – nada más. Quién? Cuáles?* Du diversaj kantoj kostas kvin centavojn, kvin diversaj dek, ne pli. Kiu aĉetas? Kaj kiujn?“

Oni rondirigis la folietojn, rigardis, elserĉis kaj aĉetis ilin por dudek aŭ dudek kvin centavoj. Kiam la vendo stagnis,

la kantistoj vokis: „Neniu plu por la virgulino? *Oiga, oiga, amigos*, he, he, amikoj, tiukaze do nova, tute nova kanto: ‚Vivo, heroaĵoj kaj morto de la generalo Santana‘, aŭ ĉu ni kantu por vi ‚La gringoj en Churubusco‘? Diru, ni kantos laŭ via deziro.“

La violonisto agordis sian violonon, kaj denove ili kantis baladon.

Jen la loko, kie Andreo haltis. Estis la plej malkara amuzo. Oni povis stari dum horoj kaj aŭskulti la baladajn kantistojn. Oni ne estis devigita aĉeti baladojn.

Al Andreo du baladoj ekplaĉis kaj li aĉetis la folietojn, ruĝan kaj verdan. Li tralegis ilin, kunfaldis ilin kaj ŝovis la folietojn en sian ĉemizan poŝon, kie li portis sian cigaredoskatolon.

Poste li opiniis sin devigita iri en la preĝejon.

La katedralaj pordoj estis vaste malfermitaj. En la monda kriado kaj tumulto, kiu regis sur la placo antaŭ la preĝejo, miksiĝis de tempo al tempo kelkaj akordoj de la malgranda orgeno, kiu troviĝis en tiu preĝejo. Sed ankoraŭ ofte oni elaŭdis la monotonan kantadon, per kiu respondis la homoj en la katedralo la ĵurpetojn de la klerikoj.

Andreo ne sciis multon pri la katolika religio, kaj eĉ multe malpli pri la kristana religio. Kion li sciis, tio estis sufiĉe konfuza. Kaj nur unu aferon li konis pli bone, kaj tio estis la ceremonioj ligitaj al la religia servo. Li sciis, kiel signi sin ĝuste per kruco, li sciis kiel aspergi sin per akvo, li sciis, kiam li surgenuiĝu kaj kiom da kruccignoj li faru dum certaj tekstpartoj de la litanioj.

Li sciis nek pli nek malpli de la katolika religio ol tion, kion lia patrino kapablis instrui lin, kion liaj najbaroj en la kabanoj de la bieno sciis kaj kion li hazarde aŭdis sen iam kompreni ion, kiam li servis en la grandsinjora domo de la bienposedanto.

Ankaŭ tio, kion la familio de *don* Arnulfo sciis pri religio, estis nur tre limigita. Ankaŭ ties religiaj scioj tute ne superis la ceremoniojn, la kutimajn preĝojn kaj avemariojn. Kiel ĉiuj nur malbone edukitaj homoj ili estis forlogitaj al supraĵa sinteno kaj al nura priatento de la ceremonioj, kiuj ja en la eklezioj tiom antaŭeniĝis, ke oni forgesas pro tio la esencan enhavon kaj identigas la ceremoniojn kun la religio mem.

La katedralo sur la placo estas tre alte konstruita. Ĝia fundamento troviĝas pli ol dek metrojn super la nivelo de la placo. Tial la konstruaĵo ne estis damaĝita de la oftaj inundoj, kiuj okazas en la pluva sezono kaj transformigas la placon en lagon.

Sed tiun tiel favoran lokon por la katedralo tute ne malkovris la hispanaj monaĥoj. Ili simple starigis la katedralon sur la fundamentoj de la praa indiĝena templopiramido, kiu tie staris jam milojn de jaroj. Kun nur kelkaj esceptoj ĉiuj preĝejoj en Meksiko estas konstruitaj sur la fundamentoj de praindiĝenaj temploj aŭ piramidoj.

Supren al la katedralo kondukas tre vasta ŝtona ŝtuparo, tiom vasta, ke ĝi estas multe pli larĝa ol la granda portalo en la mezo de la katedralo.

Sennombraj homoj, viroj, inoj kaj infanoj, ladinoj kaj indiĝenoj iris supren la ŝtuparon aŭ ili descendis. La inoj ĉiuj volvis siajn nigrajn lantukojn ĉirkaŭ la kapon; ĉar estas malpermesite por inoj eniri la preĝejon sen

kapkovrilo. La hararo de la inoj devas esti nevidebla. Satano, kiu ĉie embuskas kaj enŝteliĝas ankaŭ en bone katolikajn preĝejojn, povus misuzi la hararon de la inoj por tenti iujn virojn aŭ eĉ la sinjorojn *curas* per pekaj pensoj interne de la preĝejo.

La liberaera ŝtuparo estis plena de vivo ne nur pro la piaj preĝejaj vizitantoj, sed same tiom pro la almozpetantoj, kiuj tie sidis tage kaj nokte sur la ŝtupoj. La eklezio instruas la homojn fari bonon al aliaj. Por ke la privata posedaĵo estu pli bone protektata. Malsatuloj kaj malesperintoj havas nenion, kion ili povus perdi kaj tial ili facile inklinas al tio ataki la privatan posedaĵon kaj eĉ fari revoluciojn. Sed, ĉar oni ne ĉiujn malsatulojn kaj malesperintojn povas satigi per bonaj faroj, la postulado de karitataj faroj fariĝas sobra negoco kiel ĉiu alia. Al la piulo oni instruas kaj rekomendas fari bonon. Kiel fidela filo de la eklezio li sekvas tiun ordonon kaj faras bonon al tiu, kiu kaŭras plej proksime ĉe siaj piedoj kaj etendas malferman manon. La pia homo donas tie kaj ĉi tie centavon kaj per tio lia konscienco estas malŝargita.

Sur la plej supraj ŝtupoj kaj proksime al la pordoj staris

dense kunpremitaj la tabloj de la komercistoj, kiuj vendis konsekritajn kaj nekonskritajn kandelojn, bildojn de sanktuloj, preĝofolietojn, amuletojn, krucetojn, rozariojn, arĝentajn koretojn, manetojn, piedetojn, azenojn, ĉevalojn, bovinojn kaj okulparojn. Tuj ĉe la eniro interne de la katedralo la tabloj pliiĝis. Tie en la katedralo ili staris laŭvice ĉe la vandoj. Interne de la katedralo estis jarfoiro, kiu estis tiom ampleksa, kiom tiu ekstere de la katedralo sur la granda placo. La diferenco estis nur tiu, ke oni malpli kriis sur la jarfoiro interne de la katedralo. Tie oni nur flustris, ne laŭte interparolis, ŝakris varojn kaj vehemente gestadis per brakoj kaj manoj.

Andreo supreniris sur la ŝtuparo, demetis sian truigitan bastan ĉapelon kaj iris en la preĝejon. Li trempis manon en la ŝtonan pelvon kaj aspergis sian frunton, li surgenuiĝis, kliniĝis jam ĉe la eniro antaŭ la altaro, kiu troviĝas ĉe la alia fino de la katedralo, kaj krucoŝignis sin plurfoje.

Per tiuj ĉi agoj li faris ĉion, kion li sciis pri la katolika religio. Fakte li tiel plenumis sian devon. Miloj da aliaj, eĉ ladinoj, ne sciis pli kaj ne faris pli.

Sed Andreo estis avida je scioj kaj scivolema. Li volis observi, kion oni faras en tiu katedralo, kaj kio okazas en ĝi. Li jam sufiĉe ofte estis ankaŭ en aliaj preĝejoj, en Tenejapa, en *Chiapa de Corso*. Sed tiam li estis pli juna, kaj li malpli konsciis sian vivon kaj la aferojn, kiuj okazas ĉirkaŭ li. Ĉio estis por li tro nova kaj fremda. Nun jam pli aĝiĝinte, li fariĝis pli konscia. Kaj pro la seninterrompa kunesto kun multaj aliaj ĉaristoj de diversaj frajtentreprenoj el diversaj lokoj kaj pro sennombraj ideoj kaj opinioj, kiujn li ie kaptis kaj aŭdis, apenaŭ estis io plu fremda al li en la vivo, kiun li vivis jam dum kelkaj jaroj.

Li rigardis ĉiujn aĵojn kaj aferojn, kiuj perdis sian fremdecon al li, pli sobre kaj pli klare mense. Li jam komencis kompari aĵojn, okazaĵojn, statojn. Kaj tiel li komencis kritiki ilin. Li ne plu lasis kapti sin per vortoj kaj opinioj. Li rigardis tion kaj jenon, komparis tion kun aliaj aferoj, kiujn li vidis aŭ pri kiuj li aŭdis, kaj li komencis akcepti kaj alproprigi nur tion, kion li konsideris bona aŭ prava, surbaze de la akiritaj kaj pli kaj pli ampleksiĝintaj spertoj.

Li jam komencis pensi memstare. Liaj pensoj de tempo al tempoj devojiĝis kaj puŝiĝis tie kaj tie, instruante lin per tio, ke li estas sur la malĝusta vojo. Tiukaze li reiris al la elirpunkto de sia pensado kaj sekvis novan vojon.

Lia laboro fariĝis pli facila por li, ĉar li jam sciis ĉiujn detalojn pri ĝi kaj ne plu devis pensi pri la laboro. Tiel li ricevis pli da libero por sia propra pensado. Dum horoj li povis sidi trankvile sur la ĉaro, se la vojo estis bona kaj la ĉaro en ordo, kaj fari ĉe tio nenion alian krom pensi kaj pensi. Liaj pensoj kuris nun tre libere kaj tre senbride. Li havis la grandan avantaĝon, kiu mankas al milionoj da homoj, ke liaj pensoj ne ricevis certan direkton per

instruado. Li ne pensis antaŭjuĝe. Sen antaŭjuĝo li konsideris ĉiun aĵon kaj procedon, sen esti malhelpata per pensoj aŭ vortoj, kiujn iu alia jam havis antaŭ li aŭ diris. Li tiris siajn konkludojn el la natura stato de la aĵoj kaj el la spertoj, kiujn li faris. Li rigardis aĵojn kaj okazaĵojn ne tiel, kiel priskribis ilin iu antaŭ li, sed li rigardis ĉion tiel, kiel ĝi estis aŭ kiel ĝi laŭŝajne estis por li.

Ĉar li sciis ankaŭ pri religio tre malmulte, precize dirate, nenion, li konsideris ankaŭ la religion kaj ties ceremoniojn sufiĉe sobre. De ĉia kredo pri mirakloj, kiun la religio progandas, kiel ekzemple pri la daŭranta virgeco post la nasko, la revivigo de mortuloj, la irado sur la maro, la nutrado de kvin mil malsataj homoj per kvin panoj kaj du ordinaraj fiŝoj, la metamorfozo de akvo al vino, la ĉieliro kaj pri ĉio simila, li estis tute libera. Se iu estus provinta persvade altrudi tiajn aferojn kiel veron al li, li ne estus akceptinta tion. Nur unu el ĉiuj ĉi mirakloj li certe konsideris verŝajna, la rakonton laŭ kiu Kristo post sia morto aperis al siaj apostoloj, eĉ sur la vojo al Emaus. Tion li certe supozis verŝajna ne tial, ĉar la aŭtoritata eklezio rakontis tion, sed, ĉar ekde infaneco li multfoje

aŭdis pri tiaj fantomoj en la kabano de sia patro kaj en la kabanoj de aliaj indiĝenoj. Al unu el liaj najbaroj aperis la mortinta onklo, al alia la jam delonge putrinta avino kaj al iu alia viro la murdita filo. Al li aperis ankoraŭ neniu el liaj mortintaj parencoj aŭ konatoj. Sed ĉar li plenkreskiĝis kun tiaj rakontoj, li eble akceptus, ke la mortinta Kristo aperis al kelkaj homoj, kiuj konis lin.

El ĉio ĉi montriĝas sufiĉe klare, ke Andreo estis malica pagano, pri kies konverto oni devas rezigni. Kaj li estas ekzemplo por tio, ke la eklezio saĝe agas per tio, ke ĝi pelas la gregon en la stalon jam tiam, kiam homo ankoraŭ estas infano kaj ĉion kredas laŭvorte, kion oni rakontas al li, kaj ankoraŭ ne havas la kapablon mem pensi kaj mem juĝi kaj disigi ion eblan de io propabla, kaj la neeblan de simbolo. Kion oni instruas al la infano, antaŭ ol ĝi povas pensi kaj juĝi, restas enplantita kaj kunligiĝas laŭ progresanta aĝo kun sentimentala junulara romantiko; kaj ĉar la plenkreskinta viro ne havas la kuraĝon ofendi sian patrinon, kiu instruis al li tiujn fabelojn, li jesas ĉion. Ĉar li estis edukata en tiu maniero kaj nun opinias esti utila membro de la homa socio, li vidas tion nur tro volonte kun profunda ĝojo kaj sentimentala rememoro je

sia propra juneco, se ties propra edzino al la propraj infanoj rakontas la samajn rakontojn kaj instruas la infanojn kredi ilin. La eklezio floras kaj prosperas, ĉar ĝi sekurigas al si sufiĉe frue la junan generacion.

Post la genufleksoj kaj la krucosignoj Andreo efektive ne sciis, kial li do restadu plu en la katedralo.

Sed li ankoraŭ restadis en ĝi, ĉar enestis ankaŭ tiom da aliaj homoj, kiuj same ne vere sciis, kial ili restadas tie, kaj kiuj videble restadis tie nur tial, ĉar ili ne sciis kion fari. Kaj tiel, kiel Andreo tie staradis, ĉar tiom da aliaj homoj staradis tie, estis certe ankaŭ rilate al ĉiuj aliaj ĉeestantoj. Ĉiuj estis tie, ĉar ankaŭ la aliaj tie estis. La grego deziris kunesti kaj kune restadi.

Krome estis ŝajne tiel, ke la homoj, kiuj ekstere de la preĝejo en sia normala vivo kaj en siaj negocoj neniam estas unuecaj kaj neniam povus esti unuecaj, tie trovis la harmonion, kiun ili bezonis kiel gregon.

Multaj centoj da kandeloj bruletis kaj flagradis. La kandeloj estis starigitaj ne nur antaŭ la altaro, kie ili kompreneble estis plej multnombraj. Kandeloj staris en ĉiuj anguloj kaj loketoj de la katedralo. En ĉiu niĉo, kie staris gipsfiguro drapirita per katunvesto aŭ per pluŝmanteleto, brulis kandeloj. Kaj antaŭ ĉiu el la

nenombreble multaj sokloj, sur kiu staris hororige aspektanta lignopupo kun vitraj kaj gapantaj okuloj kaj kun feltiĝinta aŭtentika homa hararo, brulis centoj da kandeloj. Ĉeestis certe dekoj da povruloj, kiuj en sia hejmo havis nur kenajn torĉojn kiel lumon, sed kiuj tie oferis sian lastan peson por aĉeti ĉe la komercistoj bele pentritajn kaj ornamdesegnitajn kandelojn por starigi ilin en la katedralo.

Multnombraj inoj, kiuj tie surgenuiĝis, tenis siajn kandelojn enmane. Ili faris tion, por ke la sanktaj figuroj el vakso kaj gipso povu vidi kaj scii, kiu oferis la kandelojn. Ĉar tiukaze, se ili starigus la kandelojn inter la centoj kaj centoj de la aliaj kandeloj, tion ili supozis, la sanktulo ne plu povus scii, kiu donis la kandelon al li kaj eble eĉ forgesus plenumi la deziron de la preĝo direktita al li.

Kelkaj centoj da homoj surgenuiĝis tie. Sed inter la centoj de preĝantoj oni vidis apenaŭ pli ol dudek virojn. La plimulto estis inoj, junulinoj kaj infanoj.

Se viroj submetas sin al la influo de la eklezio kaj de ĝiaj apostoloj, tiukaze okazas, aparte de tre malmultaj

esceptoj, pro negocaj kaj politikaj kaŭzoj. Ili volas brili kiel bonaj ekzemploj antaŭ la aliaj, por ke ili estu rigardataj en siaj politikaj kaj komercaj aferoj kiel virtaj kaj honoraj, ĉar tio estas utila por ties negocoj. Ili volas atingi la konfidon de la ŝafoj, kiujn ili intencas tondi. Kiel atentaj observantoj ili ofte spertis, ke la rekompenco estas riĉa, se oni estas fervora paroĥano. Male al tio la ino plej ofte en sia tuta esenco kaj en sia tuta ekzistado falas sub la influon de la eklezio, kelkfoje ĝis tioma grado, ke ŝi laŭ la ordono de la pastroj kaj potenculoj rifuzas en la lito la ĝojojn de seksa amo al sia edzo. Ke Meksiko, tiu revolucia respubliko ĝis nun ne donis la politikajn rajtojn al la meksika ino, kvankam meksikanino estas same tiel inteligenta kiel usonanino, okazas tial, ĉar la meksikaj revoluciuloj tre bone scias, ke la katolika eklezio provas regajni helpe de la ino la sinistran potencon super la meksika popolo, kiu estis rompita de la revolucio. Ĉe la aktualaj cirkonstancoj en Meksiko doni politikajn rajtojn al la ino, signifus, ke oni denove transdonus la meksikan popolon en la manojn de Romo. Se oni serĉas en meksika preĝejo, tute egale ĉu en Meksikurbo aŭ en fora angulo de la vasta lando inteligentajn inojn kaj knabinojn, oni devas

iri en la malmultajn protestantajn preĝejojn. La inteligenteco de ino sub la influo de la protestanta eklezio povas same bone esti disrompita en mil pecojn kiel sub la influo de la katolika eklezio. La pruvo: la netoleremaj kaj bigotaj inoj en Usono. Sed en Meksiko la protestanta eklezio ne havas potencon.

La preĝantoj ĉiuj estis surgenuaj. La katedralo havas nur tre malmultajn benkojn. Ĝuste nur antaŭe. La sidlokoj de tiuj benkoj estis ĉiuj venditaj kaj luitaj al tiuj, kiuj havas sufiĉe da mono pagi tion, kaj kiuj ne deziras preĝi al la sama Dio apud indiĝenino kun pedikoj. Tion oni ne povas postuli de homo, kiu havas monon; kaj tio legblas ankaŭ nenie en la biblio, ke tiu, kiu lernis uzi naztukon, en la preĝejo sidiĝu apud iu, kiu boradas per la fingro en la nazo. Tial oni ne riproĉu la milionulojn, ke ili posedas en la preĝejoj loĝiojn kovritajn de paneloj el mahagono.

La planko de la katedralo konsistas el duraj ŝtontabuloj. Sed la planko estis kovrita per dika tavolo de freŝaj abiopingloj, kies balzamaodoro miksiĝis kun la dika fulganta fumo de la kandeloj kaj incensaj kaldronoj svingataj tien kaj tien de malgrandaj knaboj, kiuj celis prepari sin kiel sanktuloj.

Pro tiu fumigado la tuta preĝejo estis vualita en densa nebulo. Oni ne povis klare vidi la aĵojn. Ĉio perdis siajn konturojn, ĉio, kio estis, foriĝis.

La inoj surĵetis kotontukojn al si. Ili tiel komplete kovris sin per la nigraj kaptukoj, ke rigardate de malantaŭe, ili aspektis kiel surstarigitaj nigraj kegloj.

Multaj el la kovre envolvitaj inoj havis sur la dorso konsekritan sanktulan bildon, kiu pendis je blua rubando ĉirkaŭ iliaj koloj. Aliaj tie anstataŭ la bildo pendigis medalon. La inoj, kiuj pendigis dorse tiajn medalojn kaj bildetojn, estis tute piaj kredantinoj, ĉe kiuj oni ekvidu jam sur la dorso, ke ili forŝovis de si ĉian surteran aferon, kaj ke neniu tento de Satano plu povas tuŝi ilin.

Kiam antaŭ la altaro nenio estis farenda kaj nenio okazis, la inoj kantis: „*Al cielo quiero ir, al cielo quiero ir*, en la ĉielon mi volas iri, en la ĉielon mi volas iri.“ Tion ili kantis nelacigeble, sen iu variaĵo. Per tio la preĝejo estis plenumata per stranga monotona kantado, kiu distingiĝis neniel de la monotonaj kantadoj antaŭ la budhaaj temploj en Barato kaj Ĉinio. El tiu ĉiam sama monotona kantado oni ne povis elaŭskulti sencon, se oni ne konis la vortojn jam antaŭe. Kio estis kantata, tio povis esti same bone ĉinlingva, aŭ japanlingva, aŭ malajlingva. Neniu povus diri tion kun certeco.

Sed la kantado troviĝis en plena harmonio kun tio, kio okazis nun antaŭ la altaro.

Tie staris sinjoro. Andreo kompreneble ankaŭ ĉe li ne povis ekkoni kun certeco, ĉu li estas sinjoro aŭ sinjorino. La sinjoro surhavis robon por tuj dekomence distingiĝi de ĉiuj aliaj viroj, kiuj sin vestis per pantalono kaj por atentigi ĉiujn homojn pri tio, ke li estas eksterordinarulo. Andreo ankaŭ tuj ekhavis la impreson, ke la viro estas sorĉisto aŭ io simila.

La viro estis envolvita en vastan pezan orobrokatan mantelon, kiu tute kovris lian figuron. La mantelo kostis pli ol ĉiuj inoj tie surgenuaj povus perlabori dum sia tuta longa vivo, kaj ĉiuj kune.

Andreo vidis nur la orobrokatan dorson de la viro. Kaj la ora mantelo estis tiel larĝa, ke oni ne povis vidi, kion la viro efektive faras per la manoj. El la movoj de la mantelo oni povis konkludi, ke la viro faris tie kelkajn diversajn misterajn agojn. Li prenis arĝentan kandelingon, kiu staris dekstre de li kaj metis ĝin maldekstre antaŭ sin. Tiam, post iom da tempo, ĉe tio daŭre murmurante, li starigis la kandelingon denove dekstren. Tiam li legis

murmurante el ampleksa libro, kiu kuŝis maldekstre, poste denove el ampleksa libro, kiu kuŝis meze aŭ dekstre antaŭ li.

Ĉiufoje, kiam kelkaj sekundoj pasis, li kliniĝis antaŭ la libroj, kaj la sanktaj knabetoj ŝvingadis incensajn kaldronetojn.

Tiam elpaŝis viro el la profundo de malhela fumtavolo. Li estis ordinara viro, je duono indiĝeno, nur per pantalono kaj ĉemizo vestita kaj kun sandaloj je la piedoj. Li kliniĝis trifoje al la altaro, kaj tiam li pendigis sur la ŝultrojn de la viro, kiu tie laboris, novan oran mantelon. La nova mantelo estis eĉ pli multekosta kaj pli bela ol la alia, per pompaj buntaj valorŝtonoj abunde ornamita kaj brodita per oraj kaj arĝentaj ornamaĵoj. Nun la sinjoro havis pli da riĉo sur sia korpo ol la tuta distrikto povus pagi laŭ sia jara buĝeto.

La sinjoro kliniĝis denove kelkajn fojojn. Tiam li eltiris de ie oran kalikon, kiun li kovris per ina poŝtuketo. Li forprenis la tuketon kaj ŝvingis la kalikon tien kaj tien. Poste li kovris la kalikon denove per la tuko kaj starigis la kalikon ien, kie li ĝuste havis lokon sur sia magiista tablo.

Post tio li kliniĝis denove. Nun li aperigis kvazaŭ el nenio oran starigilon kun surmetita granda ora radiara krono. Li swingadis tiun starigilon tien kaj tien. Tiam li fine turniĝis kaj oni povis vidi, ke lia vizaĝo estas malbeligita de variolaj cikatroj.

Per ambaŭ manoj li tenis la radiaran kronon alte super si.

Kaj nun la ĉeestantoj falis en deliron de ekstazo. La starintoj falis sur la genuojn; kaj la surgenuantoj, precipe la kovre involviĝintaj inoj premis siajn fruntojn sur la plankoŝtonojn. La sinjoro swingis la radiaran kronon naŭfoje, trifoje en tri diversaj direktoj. Ĉe ĉiu swingado kelkaj sanktaj servoknaboj, vestitaj en ruĝa kitelo kun blanka puntopelerino, skuis faskon kun sonoriletoj. Kaj ĉe ĉiu eksonado de la sonoriletoj la kovre volviĝintaj inoj batis siajn kapojn sur la plankon kaj frapis sin per la fingroj sur la frunton, la buŝon kaj la bruston. Okazis precize tiel, kiel antaŭ templo de la paganoj en sudorienta Azio. Se tie la pastroj frapas la gongon, la kredanta amaso falas sur la genuojn, apogas la platajn manojn sur la grundon kaj frapas per la kapo la teron, kaj tio ripetiĝas ĉiufoje tiam, same kiel en la katedralo, kiam la sonoriletoj

sonoras.

La sinjoro en la orobrokata mantelo turnis sin denove al la altaro kaj svingis tie la starigilon kun la ora radiara krono trifoje supren kaj malsupren. Poste li starigis ĝin antaŭ la altaron kaj kliniĝis.

Kiam tio jam estis pasis kelkan tempon, li ree metis la kandeligon de tempo al tempo de maldekstre al dekstre kaj de dekstre al maldekstre. Tiam li komencis paroli.

La kredantoj respondis tion per monotona kantado. Sed eĉ ne unu homo en la preĝejo komprenis vorton el tio, kion la sinjoro parolis murmure.

Triono de la ĉeestantoj parolis nur la hispanan lingvon, dua triono la hispanan kaj indiĝenan lingvon, el la cetera triono duono parolis la celtalan, la ceteraj la tojolavalan. Sed tio la sinjoron ŝajne ne afliktis, ĉu iu komprenas lin aŭ ne. Li parolis latinlingve.

Kiom ajn Andreo provis adaptiĝi per siaj sencoj kaj sia menso al tio, kio okazis, li akiris eĉ ne dum minuto la impreson, ke eĉ unu homo en la preĝejo scias, kial la sinjoro tiel kondutas kaj moviĝas, kiel li faris tion. Ĉio ĉi

estis sen senco kaj nenio pli ol nura gesto.

Ne estis la kulpo de Andreo, ke li tie vidis kaj aŭdis nur tion, kion li vidis kaj aŭdis, kiam li iris kun sia patro al la indiĝenaj festoj, en kiuj oni alvokis la diojn, por fekundigi la kampojn kaj gardi la peonajn kabanojn kontraŭ damaĝoj, malfeliĉo, epidemioj kaj demonoj! La edukita eŭropa katoliko, kiu antaŭ si vidas ofici en la plej multaj kazoj erudician klerikon, ne perceptas magion kaj maskeradon. Li scias, ke tiu supozata magio kaj ŝajna maskerado estas nur la simboloj kaj eble la ornamaĵoj.

Sed Andreo, kiel ĉiuj indiĝenoj, kiel la grandega plimulto de la suba needukita klaso tie, rimarkis nenion alian krom magio, maskerado, alivestiĝo, ŝamandanco, nekompreneblaj murmurataj magiaj kaj ensorĉigaj formuloj. Ne estis lia kulpo, ke li aŭdis nur magiajn kaj ensorĉigajn formulojn kaj vidis nenion alian krom apatia grego de homoj, kiu faras en nebuleca fumo sensencajn gestojn.

Dum la sonoriletoj sonoris, la dekoj de komercistoj, kiuj tie ofertis en la preĝejo siajn varojn, interrompis sian marĉandadon dum certa tempo. Apud siaj tabloj, ili, kiel ĉiuj aliaj homoj en la katedralo, falis sur la genuojn kaj same frapis siajn kapojn sur la plankon, humiligante sin antaŭ siaj dioj. Sed ili estis tiaj bonegaj komercistoj, ke ili eĉ en tiuj momentoj ne forgesis sian komercon. Ili strabis al siaj tabloj por atenti, ke ne ŝtelu iu eble kandelon aŭ bildeton aŭ eĉ tuŝas la kason. Kelkaj estis tiel diligentaj, ke ili kaŝe palpebrumis al tiuj inoj, de kiuj ili ĵus estis disigitaj en sia agado, kiam la monstranco kun la radiara krono estis svingata tien kaj reen, kaj per la fingroj montris al ili nombrojn rilatantajn al la prezoj, pri kiuj oni ankoraŭ ne povis interkonsentiĝi.

Kiam la granda ceremonio estis laste finita, tuj denove komenciĝis ĉe la tabloj la babilado kaj la marĉandado per eĉ pli laŭtaj vortoj kaj per eĉ pli vehementaj gestoj, rekomenciĝante je tiu momento, kiam ili estis interrompitaj. Ankaŭ la eklezio komencis nun malfermi sian negocon. En Meksiko, kiel ankaŭ en Usono, la ŝtato

ne kolektas impostojn por la eklezioj, ĉar la ŝtato konsideras la ekleziojn pro bonaj motivoj kiel konkurantan entreprenon. Tie neniu povas esti vokata antaŭ juĝiston pro nepagitaj ekleziaj impostoj aŭ eĉ devigata transdoni garantiaĵon por certigi la pagon. En tiuj landoj la eklezioj mem devas zorgi pri tio, ke ili trovu sian profiton. Se en Usono la protestantaj eklezioj aranĝas en la preĝejo balojn kun ĵazmuziko kaj bazarojn, en kiuj, favore al la eklezio, estas vendataj kisoj kaj malboniĝintaj konservujoj oferitaj de pia nutraĵkomercisto de delikataĵoj al la preĝejo, oni certe rajtas nomi tion honesta kaj sincera negoco, ĉar la eklezio en tiu kazo libervole kaj kuraĝe koncedas, ke ĝi sole de la rekompenco de Dio ne povas vivi kaj ne emas atendi ĝis la vivo en la paradizo, ĉar *Mr. Preacher*, la sinjoro pastoro, se li ne povas pagi la luon por la domo, same tiel rapide kaj sen mebloj estas ĵetata sur la straton kiel ĉiu alia civitano. Kaj se li ne povas aĉeti al sia edzino novajn robojn kaj ĉapelojn, minacas la danĝero, ke li ne plu praktikos la deĵoron de Dio kaj la savadon de la animoj, sed transprenos aŭtomobilagenturon de *Mr. Henry Ford*. Nur ne restu ĉe via laboro, tajloro, se vi ĉe alia negoco

povas enspezi eĉ pli!

La katolika eklezio ja ne estas tiel senhonta kiel la protestanta; kaj tial ĝi estas malpli malfermita kaj malpli kuraĝa ĉe la enspezado de mono. Ĝi ne aranĝas balojn en la preĝejo, en kiuj la ĉarlestono kaj la *Black-Bottom* estas dancata per malsuprenruligitaj silkaj ŝtrumpoj kaj kun jupoj, kiuj finiĝas sep colojn super la genuoj. Super la genuoj. Mezurite kompreneble en la direkto al la umbiliko. Kaj la katolika eklezio en la preĝejo ankaŭ ne vendas kisojn kaj ŝtrumpligilojn de edziniĝintaj inoj favore al la sinjoro pastoro, kiu, por speciale amike rilati kun kelkaj de siaj multe influaj viraj paroĥanoj, invitas la sinjorojn malplenigi kelkajn viskiobotelojn en la grace favorata tempo de la prohibicio. En tiu tempo de la prohibicio, kiam la vidvino de laboristo, kiu, por havigi panon al siaj malsataj infanoj, vendis duonon de litro da brando, estis kondamnita pro tiu ago al dumviva prizono. Ĉe la prohibicio temas ja ne pri tio, ke oni ne vendu viskion, sed nur pri tio, al kiu socia tavolo apartenas tiu, kiu vendas la viskion. La vidvino de multobla milionulo, kiu ĉiutage povas konsumi ducent dolarojn da pensio, povas vendi po semajno kvincent kestojn da viskio tuj

fronte al la polica administrejo. Enmiksiĝus neniu en ŝian honestan metion. La federacian agenton, kiu ekkaptas ŝin aŭ eĉ kuraĝas konfiski unu el ŝiaj plene ŝarĝitaj kamionoj, oni eksigas aŭ metas en frenezulejon, kien li apartenas efektive.

Sed la katolika eklezio, kiu volas riĉigi sin nek per baloj, nek per venditaj ŝtrumpligiloj nek per kontrabandita viskio, devas havigi la monon al si per aliaj rimedoj.

Maldekstre, proksimume en la mezo inter la altaro kaj la portalo staris sur soklo Sankta Caralampio, tiu, je kies honoro oni festis la feston.

Pli precize dirate, li ne staris sur la soklo, sed li surgenuis. Li estis el ligno, havis nimbon ĉirkaŭ la kapo, rigidajn vitrajn okulojn kaj barbon. Vestita li estis per malhele blua velurmantelo. Li surgenuis tiel, ke lia vizaĝo rigardas al la altaro. Ĉu estis lia persona altaro, tio ne ekkoneblis. Liaj manoj estis plate kunpremitaj kaj levitaj por preĝo. Kial li preĝis kaj al kiu, tio ne estis videbla. Kaj neniu penis ekscii tion. Ĉiu kontentiĝis per tio, ke li estas tie, kaj ke oni povas vidi lin persone.

Certe nur tre malmultaj homoj en la katedralo rigardis lin kiel fotografajon aŭ kiel skulpturon. La plimulto de la homoj, la indiĝenoj ĉiuj, kaj la suba tavolo de la meksikanoj je naŭ dekonoj, firme kredis, ke la figuro, kiun adori ili venis, estas la efektiva sanktulo en propra persono, ke tiu persono ŝtoniĝis, ligniĝis kaj elsekiĝis. Ekzistas ja ankaŭ elsekiĝintaj pecoj de aliaj sanktuloj en grandaj kvantoj, haroj, ostetoj, fingroj, dentoj, peklitaj

koroj en oraj rondaj skatoloj kaj cerboj en kestetoj el ebono. Sed kiom ajn forta estis la kredo ĉe kelkaj individuoj, ke la figuro tie efektive montras Sanktan Caralampion, pri tio ili tamen ĉiuj, sen iu escepto, estis konvinkitaj, aŭ almenaŭ ili certis pri tio, ke la spirito kaj la animo de Sankta Caralampio rampis en tiun figuron kaj elektis ĝin kiel sian eternan loĝejon. Se oblato povas transformiĝi per simpla ceremonio en la veran karnon de Dio, efektiva sanktulo povas des pli verŝajne kaj same tiel bone transformiĝi en lignan figuron, tute per si mem aŭ kun la helpo de ceremonioj. Tiujn ceremoniojn oni entreprenis verŝajne antaŭ multaj jarcentoj, kaj ekde tiam la figuro estis la vera Sankta Caralampio.

Kiam la Di-servo tiam estis finita, ĉiuj ĉeestantoj starigis sin en longaj vicoj, por ke ĉiu kiel unuopulo povu montri decan respekton al Sankta Caralampio.

La malhele blua velurmantelo kovris la tutan korpon de la sanktulo kaj falis vaste sur la piedojn, kiuj turnis siajn nudajn plandojn al la homoj, kiuj staris en la vico de la atendantoj.

Tiu, kies vico estis, ekstaris proksime ĉe la plandoj de la

sanktulo, murmuris preĝon aŭ petegan formulon aŭ solenan promeson, tiam levis la velurmantelon tiel, ke ekvideblis la nudaj gamboj de la sanktulo, kaj premis tri kisojn sur la plandojn de la figuro. Poste la kredanto sin krucosignis plurajn fojojn, murmuris denove kelkajn formulojn, kaj tiam li iris plu, por cedi la lokon al alia kredanto, por ke tiu povu kisi la plandojn.

Sed tiu, kiu jam havis la okazon kisi la plandojn de la sanktulo nun ne rajtis simple foriri. Ĉe la plua irado li eniĝis en specon de baraĵo. Kaj ĉe tiu baraĵo staris viro kun almozskatolo, kiun li tenis al la kredanto proksime antaŭ la bruston. Kiu volis kisi Sanktan Caralampion sur la nudajn plandojn, devis pagi por tio.

Andreo observis la manipulojn, maskeradojn kaj la saltadon de la ŝamanoj kaj sorĉistoj, li vizitis cirkon, kaj li nun ĉeestis ĉe la Di-servo en katolika preĝejo ĉe granda sanktulofesto. Ne estis lia kulpo, ke li faris komparojn, kiuj malĝustis. Estis la kulpo de tiuj, kies devo estas ebligi bonan edukadon al li. Sed la mastroj de la katolika preĝejo rigardis la indiĝenojn kiel infanojn. Kaj ili konsideris tion kiel sian sanktigitan taskon, teni la

indiĝenojn kaj la ceterajn proletajn tavolojn de la popolo por ĉiam kaj por eterne en la stato de infanoj, kies patro estas Sankta Patro en Romo kaj la sinjoroj *curas* ties apudaj patroj kaj onkloj.

Kvankam li mem ne sciis tion, Andreo estis certe la ununura persono en la katedralo, kiu tie, pro sia inteligenteco rapide disvolviĝinta dum la lastaj monatoj, faris komparojn, al kiuj neniu el la aliaj ĉeestantoj estis kapabla, ĉar ili estis infanoj kaj videble kontentaj resti infanoj. Estas tiel komforte, se oni tute ne pensas. Sed tie, starante sub la influo de la amaso, kiu kondukis kiel grego, kaptis lin, kiel ĉiujn aliajn, la imita instinkto. Ĉar ĉiuj homoj tie faris la samon, inter ili multaj, kiuj, se oni prijuĝas ilin laŭ iliaj vestoj, ŝajne multe pli prudentis, ol li supozis sin mem, li pensis, ke devas esti io kaŝita kaj por li mem nekonata en la afero, kio instigas ĉiujn tiujn homojn fari la samon. Li supozis, ke eble en lia interno okazos ŝanĝo, kiu ne videblas al ekstere. Por ekscii, ĉu tio estas prava, kaj ĉu li povus gajni novan komprenon, ankaŭ li fine enviciĝis. Li ne volis senti sin kiel forpelito de la grego, kaj tial li faris, kion faris la grego. Ankaŭ li iris al Sankta Caralampio kaj kisis liajn lakitajn plandojn

ekzakte tie, kie centoj da malsekaj buŝoj antaŭ li postlasis sian salivon. Kaj ankaŭ li pagis al la viro kun la almozskatolo ĉion, kion li kulpis.

Kiam li fine forlasis la preĝejon, li rimarkis, ke nenia ŝanĝo okazis en li, pri kiu li esperis, ke ĝi devu okazi, se li faras ĉion, kio tie estas kutima.

Kiam li faris tiun eltrovon, li ĉesis esti infano. Li pensis pri sia patro, pri siaj onkloj kaj kuzoj, pri ĉiuj viroj de sia parenco, kaj ankaŭ pri la ŝamano, kiun li timis ĉiam. Starante ekstere antaŭ la portalo de la katedralo kaj rigardante la placon kun la kriantaj kaj kriĉantaj komercistoj, li tamen sentis ŝanĝon en si.

Li klare konsciiĝis, ke li nun jam tre superis sian patron, ja eĉ la ŝamanon. Li sciis, ke li ekde tiam ne plu timos la ŝamanojn de sia popolo. Kaj tial li perdis ĉiun timon rilate al la dioj, ĉu ili estis indiĝenaj, ĉu aliaj. Li havis la impreson, ke ĉiuj dioj faras iun komercon, ĉiu laŭ sia maniero. Per tio ili ĉiuj malkovris siajn sekretojn al li. Ili perdis sian hororon, ĉar montriĝis, ke ili estas rompiĝemaj. Ili kaŭzis nek tondrojn, nek fulmojn, nek tertremojn. Tiujn okazaĵojn – li konkludis – bezonas nur

tiuj, kiuj volas fari negocojn kun la dioj, la pretekstitaj kaŭzantoj de tiuj naturfenomenoj.

Tiel li ekkonis, ke la eklezio kaj ĉio, kio estas en konekto kun ĝi, por aliaj homoj estas interesa kaj grava nur en tiu kazo, se ili trovas nenion alian por pensi pri ĝi.

Tiel la kristaniĝo de Andreo ĉesiĝis antaŭ ol ĝi efektive komenciĝis. Li sciis kaj sentis, ke li ekde nun sufiĉe bone eltenos dum sia tuta plua vivo sen eklezio.

Sur la antaŭlasta malsupra ŝtupo de la katedrala ŝtuparo sidis Luis. Luis estis ĉaristo kiel Andreo, sed ĉe alia frajtentreprenisto. Ankaŭ li havis indiĝenan sangon, sed ne devenis de bieno, sed el la indiĝena urbo Yalanchen, kiu situas okcidente de Balún-Canán.

Luis maĉis *enchiladas*, enĉiladojn, kiujn li ĵus aĉetis, kaj kiuj ankoraŭ tute varmegis. La graso gutis sur liajn manojn, denove kaj denove li metis la enĉiladojn sur la alian manon, por leki la grason de la liberigita mano.

Andreo kaj Luis konis unu la alian jam delonge. Ofte ili marŝis en la sama karavano. Ĉiuj ĉaristoj estas en certa senco kamaradoj. Ĉiam denove ili renkontiĝas ĉe la marŝoj, aŭ irante malsupren al la fervoja stacio aŭ supren irante sur la altan ebenaĵon. Ili helpas unu la alian survoje, se ĉeestas neniu mastro. Ili helpas unu la alian eĉ tiukaze, ĉe la restarigo de disrompiĝinta ĉaro, ĉe la eltirado de ĉaro kaptiĝinta en ŝlimo kaj ĉe multaj aliaj aferoj, se ili pro tio plilongigas la marŝtempon kaj riskas dekalkulon de la salajro.

„Ĉu vi estis en la preĝejo?“ Luis demandis maĉante.

„Jes“, diris Andreo kaj sidiĝis apud Luis sur la saman ŝtonŝtupon.

„Vi estas tre pia katoliko, ĉu?“ demandis Luis kun flanka rigardo.

„Mi pensas, ke ne“, respondis Andreo. „Tio estas ĉio tiel konfuziga. Oni eĉ ne iomete komprenas, kio tie okazas, kaj kion tie faras la viro en la ora mantelo.“

„Lin mi konas bone“, diris Luis, kiu metis denove la enĉiladojn el unu mano sur la alian kaj forlekis la varman grason de la fingroj. „La viro en la ora mantelo, kiu tie turnadas la orajn kalikojn kaj la nimbon en la aero, estas *don* Usebio. Usebio li nomiĝas nur ekde tiam, kiam li laboras ĉi tie en la preĝejo. Lia vera nomo estas Nicolás, sciu tion. Lia patro estis tajloro en Tonalá. Ili gajnis tiam iutage monon en la hispana loterio, tiel estis. Mi ne scias, kiom da mono. Kaj tial la patro tiam sendis la knabon Nicolás en lernejon, por ke li lernu la magion, en seminario, jes ja. Tie Nicolás tiam ĝuste lernis sorĉi. Li povas ensorĉi malgrandajn tortiljojn el Harina,

malgrandajn etajn bakaĵojn el faruno en homan karnon kaj hispanan ruĝan vinon en homan sangon. Tion diris Felipe al mi, ankaŭ li estis sufiĉe longe en la seminario, antaŭ ol ili forpelis lin, ĉar li volis geedziĝi, sed tion ili ne permesas.“

„Ĉu Nicolás nun povas sorĉi?“ demandis Andreo.

„Ne multe“, respondis Luis. „Li ne ĝuste lernis tion. Antonio, vi ja konas lin, la ĉaristo ĉe *don* Ambrosio, tiu iutage iris ĉi tie en la katedralon, kaj jen Nicolás donis al li malgrandan tortiljon. Sed Antonio diris al mi, ke tiu tortiljo tute ne gustis laŭ viando, sed nur laŭ faruno, kaj ke li ekde tiam scias, ke Nicolás ne ĝuste lernis la magion. Sed li enspezas tie multe da mono, jes ja, ili pagas al li multajn belajn pesojn por la bapto de infanoj, por geedzigoj, por entombigoj kaj por preĝoj, kiuj savas vin el la infero. Felipe diris al mi, ke la mastroj en la seminario diras, ke la *curas* la homojn timigu en la preĝejo, ke oni ĉiun el ili rostos kaj pinĉos per pinĉiloj, kiam ili estos mortaj. Sed, se ili fervore frekventas la preĝejon kaj ĉiam faras tion, kion la pastro diras, oni ne rostos ilin, sed varmigis kaj lavos ilin en varma akvo, por ke ili fariĝu

puraj. Felipe diras, ke tio tute malpravas, ke oni nur tiel rakontas tion, por ke la homoj ĉiuj terure ektimu. Komprenu, la homoj estas ja ĉiuj tiom stultaj. *Es claro*, estas klare, se oni mortas, oni sentas nenion plu, egale ĉu ili rostas vin aŭ pinĉas per varmegaj pinĉiloj. Sed tiel estas, la homoj kredas tion, tio tiel bele hirtigas la haretojn sur ilia haŭto, se ili kredas tion, kaj tial ili kredas ĝin. La *curas* volas nur la monon de la homoj, por ke li bone povu vivi kaj ne devu labori tiel streĉe. Ankaŭ nia *brujo*, la ŝamano en Yalanchen, rakontis al ni ĉiufoje tiajn terurajn rakontojn pri grotoj, en kiujn oni metos nin post nia morto, kie estas serpentoj kaj jaguaroj. Sed, kiam mia patro kaj mia onklo donis al li ŝafon aŭ porketon, li diris, ke li interparolos kun la *santitos*, kun la dioj, por ke ni ne estu metitaj en la grotojn, kie atendas la serpentoj kaj la jaguaroj.“

„Tion nia *brujo* tiel ne diris“, interrompis lin Andreo. „Nia rakontis al ni, ke oni metos nin en nigran fosaĵon, kiam ni estos mortaj kaj ne faris tion, kion li ordonas. Kaj en la nigra fosaĵo estas ŝlima lago, kaj oni metos nin tiom profunde en la ŝlimon, ke ĝi tuŝos nian mentonon, kaj tiam ni ne povos morti kaj ankaŭ ne vivi, sed terure devos

frostotremi, kaj ni ne povos elbarakti nin, ĉar la flankoj estas tute krutaj kaj ŝlimaj kaj kovritaj de malgrandaj serpentoj kaj de grandaj bufoj. Ni ĉiam devis doni al nia *brujo* tekilon kaj maizon, poste li dancis kaj preĝis, kaj la *santitos* en la nokto diris al li, ke ni ne sinkos en la ŝlimon, se ni faros, kion li diras, sed se iu diros al la bienulo, kiu estas la *brujo*, kiun tiu ne konas, jen ni certe estos metitaj en la ŝlimon, kaj tiam neniuj tekiloj kaj neniuj porketoj por la *brujo* povos liberigi nin el ĝi.“

„Jen mi foje volas doni al vi bonan konsilon“, diris Luis, kiu preskaŭ duoble tiom aĝis, kiam Andreo, „se vi tute ne atentis tion, kion diras la *brujo* aŭ la *cura*, se vi tute ne kredas je io, ne je la rostado, ne je la grotoj kaj fosaĵoj, tiukaze vi vivos pace kaj kontente kaj vi ĉiam estos en gaja humoro, tiel kiel mi. Aŭ ĉu vi jam iam vidis min kun vinagro sur la mieno? Certe ne. Kiam la bovoj ĉagrenas min, aŭ se ĉaro disrompiĝas, nu jes, tiam mi sakras, ke tondras. Sed tio estas nur por momento. Vivu, kaj kiam vi estas je la fino, tiam lasu zorgi la aliajn. Kiam via vivo estas finita, tiam neniuj plu interesiĝos pri vi. Kiu tiom klopodu post via morto ankoraŭ dum jaroj lukti barakte kun vi?! Post via fino vivos ankoraŭ sufiĉe da aliaj, pri

kiuj estas pli grave, ke oni okupiĝu pri ili. Ankaŭ ni ja ne haltas ĉe la vojo kaj ne skurĝas bovon, kiu ĵus mortaĉis, ĉar ĝi ĵetis ĉaron en la abismon. Sed nun mi devos ekiri por trinki glaseton da komiteko, por digesti la enĉiladojn.“

„Kion vi pagis por la enĉiladojn?“ demandis Andreo.

„Realon por ses da ili. Pli bonaj ili ne povus esti.“

„Kie?“

Luis montris al tablo, kiu staris inter vandoj el faskaj folioplennaj vergoj.

Ĉapitro 11

01

Luis vizitis kantonon, por verŝi komitekon en sin, kaj Andreo promenis transen al la restoracio konsistanta el tablo, kiu estis starigita laŭ la formo de tre primitiva laŭbo.

Malantaŭ la tablo staris malgranda fornelo el lado, en kiu ardis lignokarboj. Sur la forneleto kuŝis lada pleto, kiu estis iomete kavigita en la mezo. En la kavo ŝuŝis graso.

Apud la forneleto kaŭris maljuna indiĝenino, kiu ĉiam denove ardigis la lignokarbojn per bastventumilo. Ŝi estis la kuiristino de la restoracio.

Ŝi rostis tortiljojn kaj plenigis ilin, laŭ la deziro de la mendinto, per *barbacoa*, *guajolote*, *pollo*, *res*, *ternera* aŭ *queso*. *Barbacoa* estis porkaĵo rostita sur krado.

Guajolote estis rostita meleagro, *pollo* kokineto aŭ koketo, *res* bova viando, *ternera* bovideta viando kaj *queso* raspita kaprina fromaĝo aŭ io alia, kio estus preta transpreni la kulpon por tiu fromaĝo.

Estis tute egale al la kuiristino, en kiu lingvo oni postulis la enĉiladojn kaj ties enhavon. Ŝi parolis la hispanan lingvon, la cocilan, la tojolavalan kaj la celtalan. Hispano, kiu havis sian vendostandon transe de ŝi, diris, ke la indiĝenino komprenas ankaŭ la anglan kaj la araban, se oni samtempe montras per fingro sur la viandajn specojn, kiujn oni volas havi. Ĉar kiu ajn, kiu tie aĉetis enĉiladojn, montris perfingre, per kio estu plenigitaj la enĉiladoj, ne estis konstatebla kun certeco, ĉu la indiĝenino vere komprenas alian lingvon ol la tojolavalan.

Apud la indiĝenino sur la tero troviĝis pli ol dekdu argilaj pelvetoj kaj potetoj, ĉar ŝi metis krom la diversaj viandospecoj en la enĉiladojn ankaŭ cepojn, tomatojn, iom da ruĝa aŭ verda kapsikoj, verdan salaton, verdajn citronfoliojn, kukurbajn florojn, kaj ankoraŭ dudek aliajn diversajn spicajn herbetojn, folietojn kaj radiketojn.

Ŝi uzis nur aluminian kuleron por turni la bruniĝantajn enĉiladojn en la graso. Tranĉiloj, forkoj aŭ aliaj helpiloj estis fremdaj al ŝi. La viandon ŝi tiris de la kokineto aŭ de la bovideta femuro per nudaj fingroj. Tio iris multe pli rapide, kaj ŝi deŝiris la ĝustajn porciojn por enĉiladoj kun

tiom da akurateco, ke perpleksigas.

Estis plezuro vidi, kiel ŝi manipulas en la eta loko, kiun ŝi havas, je tiom da viandospecoj kaj legomoj, sen tio, ke ŝi iam ajn erare interŝanĝis ilin.

Ĉe la eta tablo staris du el ŝiaj filinoj, kiuj tie priservadis la aĉetantojn. Indiĝenaj knabinoj kun longa malsupren pendanta hararo sur la dorso. Ili metis la pretigitajn enĉiladojn sur telereton kaj transdonis ilin tiel al la aĉetanto. La aĉetinto ricevis nek tranĉilon, nek forkon, nek kuleron, ĉar io tia ne disponeblis en la restoracio. Sed la manĝintoj ricevis grizan grasmakulitan viŝtuketon, per kiu sekigeblas la fingroj kaj la buŝo. Poste ĉiu ricevis malgrandan argilan kruĉeton kun akvo por povi gargari la buŝon. Tiuj, kiuj estis kutimiĝintaj al granda lukso, mendis aldone argilan poteton kun nigra nedolĉigita kafo, kiu kostis kvaronon de realo.

La teleretoj kaj kruĉetoj neniam estis vere purlavitaj. Oni devus tamen eviti respondi la demandon, ĉu la manĝilaro estas tute ne pura, ĉar oni precize ne povus priskribi la fakton per klara 'jes'. La manĝilaroj estis nekredeble malpuraj, sed strange, pri tio oni tie eĉ ne pensis. Neniu

sentis la manĝorestaĵojn kiel ion abomenan kaj naŭzan aŭ ĝenantan. Ili apartenis al la afero kiel la nuboj al la ĉielo. La harmonion de la tuta ĉirkaŭaĵo ili detruis neniel.

Strange estis, ke la manĝilaroj tamen ĉiam aspektis kiel ĵus lavitaj. Kompreneble, kie kaj kiel kaj per kio oni lavis ilin, ne eblis rigardi, ekscii kaj eltrovi. La telerojn kaj kruĉojn oni jam fortiris, kiam la vizitantoj ankoraŭ manĝis, kaj ili devis preni la postrestaĵon en siajn manojn. Intertempe novaj enĉiladoj estis pretaj, la manĝilaroj el ie reaperis, kaj antaŭ ol oni havus la tempon konstati, ĉu la manĝilaroj estas lavitaj aŭ ne, la novaj ankoraŭ varmegaj kaj gutantaj enĉiladoj troviĝis jam sur la teleretoj, kaj tiam jam ne plu decideblis, ĉu la grasa bruna saŭco devenis de la novaj enĉiladoj aŭ ĉu ĝi ankoraŭ postrestis de la antaŭaj. Estis simile pri la argilaj kruĉetoj, en kiuj oni transdonis la kafon, kiun oni ĉiam tre abunde enverŝis, tiel ke ĝi inundis la kruĉeton; tial la kafomakuloj sur la ekstero de la kruĉeto povis esti aŭ sekiĝinta restaĵo de la freŝa aŭ de la malnova kafoj. Se io ŝajne ne estis tute en ordo, la servanta filino per rapida viŝado purigis la randon de la kruĉeto aŭ de la telereto. La fingrojn ŝi purigis per lekado aŭ forviŝis ilin sur la blanka

antaŭtuko, kiu tiom plenis de saŭcostrioj, ke oni ankaŭ en tiu kazo ne povus diri, ĉu la knabino ĵus aŭ jam antaŭ tri horoj sekigis la fingron sur ĝi.

Tamen, la homoj, kiuj venis tien, ja ne aĉetis manĝilaron, sed volis manĝi enĉiladojn. Por ili ne la manĝilaro estis la ĉefa afero, sed bonaj kaj bongustaj enĉiladoj. Kaj la enĉiladoj estis bonegaj.

Tial la negoco prosperis. Kaj la homoj kverelis, kies vico estas.

Andreo devis atendi sufiĉe longe, antaŭ ol li ricevis la enĉiladojn.

Sendepende de tio, ke oni povis aĉeti ĉiujn sentaŭgajn aĵojn kaj fatrasojn en tiu urbo, kiu en neniu pli granda estis vendebla, troviĝis tie apenaŭ iu vera distro aŭ amuza plezuro. Tie estis nek karuseloj, nek boatpendoloj, nek toboganoj nek io simila, kio vigligas jarfoirojn en aliaj lokoj. Tiaj maŝinoj ne transporteblis tien, ĉar la transporto estus tro komplika kaj multekosta, tiel, ke ĉia gajno estus vorita de la transportkostoj.

Oni devis delektiĝi je la kriadado de la komercistoj kaj je la humuraj paroladoj de lertaj viroj, kiuj vendis nerompeblajn flekseblajn orajn plumojn, vitrotranĉilojn, tranĉilakrigilojn, fadentraigilojn por kudriltruoj, vitrajn lensojn, kiuj uzeblas por legado, por la ekzamenado de falsigita silko kaj kiel teleskopo, akvon por la forigo de makuloj, purigan pomadon, gutojn por la stomako, likvaĵon por la okuloj, reŭmatisman unĝventon, krajonajn forigilojn de papiloj, tinkturoj por piedkaloj.

Sed eĉ por Andreo ĉio ĉi fariĝis post mallonga tempo sufiĉe enua, ĉar ĉiu vendisto, tuj kiam li finis la propagandon de aĵoj, kiujn li vendis, rekomencis siajn

ŝercojn kaj flirtadon kun precize la samaj vortoj kaj nuancoj.

La fajroglutistoj, serpentohomoj kaj senkateniĝistoj, kiuj ĉiuj laboris sendepende de la aliaj kaj ĉiu je sia propra kalkulo, akompanataj nur de sia edzino aŭ de helpanto, same enuigis la rigardantojn, ĉar ili ĉiuj regis nur unu artifikon kaj ripetis tiun de la kvara posttagmeze ĝis la dekunua nokte tiom ofte, kiom longe antaŭ ili ankoraŭ staris almenaŭ unu vizitanto, kiu estigis la impreson, ke li verŝajne havas enpoŝe kvin centavojn, kiujn oni eble povus ellogi de li. Ankaŭ ĉe la ludotabloj oni perdis rapide la intereson, se oni ne kunludis mem. Sed tie ĉiam staradis homoj, observis ĉion, elpensis numeron al si kaj estis feliĉaj, se ilia numero perdis la ludon, ĉar ili tiel retenis la monon en la poŝo.

Por la plimulto de la homoj la plezuro konsistis esence el tio, ke ili vagadis, ie haltis momenton kaj aliloke restadis kvaronon de horo, rigardis aŭ aŭskultis kaj tiam denove puŝiĝis plu antaŭen.

Plej plezuriĝis la gejunuloj el la urbo, kiuj uzis la ĉirkaŭpromenadon kaj la premegadon de la amaso por

provoke allogi kaj pli interproksimiĝi unu al la alia sen esti atentataj, kio tiel apenaŭ eblus ĉe aliaj okazoj. Eĉ ĉe baloj ĉiam ĉeestis la patrinoj aŭ la onkloj, kaj la knabinoj ne povis fari unu propran paŝon sen akompano. Sur la placo tiu maniero de vartado ne praktikeblis.

Kvankam ili iris kun siaj patrinoj sur la foirplacon, estis facile aranĝebla, ke oni perdiĝis tridek minutojn el vidodistanco. Estis ja ne la kulpo de la gejunuloj. Estis la homoj, kiuj retenis kaj flankenŝovis la gejunulojn.

Tial okazis, ke tiuj tiel bone protektataj kaj gardataj virgulinoj de la urbo povis ĝoji pli ol unufoje en la premegado aŭ ie en la ombro de domomuro pri agrabla masaĝo de la lipoj aŭ eĉ pri tio, ke oni rapide, lerte kaj kvazaŭ anatome palpis ilin, kio kondukis al ĝojigaj sentoj, kiuj ne estis tro serioze traktataj, ĉar estis kontribuo por la plivigligo de la festo, kiun oni aranĝis por montri al la sanktulo Caralampio la necesan respekton. Kelkaj filinoj de alte estimataj civitanaj familioj de tempo al tempo dum pli ol tridek minutoj perdiĝis en la interpuŝado. Ili ne perdiĝis por ĉiam. Ili revenis al la maltrankviliĝintaj gepatroj, kiuj sensukcese serĉis ilin, kun iom taŭzita hararo, kaj ankaŭ entute iom ĉifitaj, kio sufiĉe pruis

iliajn vortojn, kiom pene ili devis trabarakti sin por retrovi siajn amatajn gepatrojn.

Kiam la ĉirkaŭpromenantaj homoj fine ne sciis kion fari, ĉar ili jam rigardis ĉiun tablon kaj ĉiun standon almenaŭ tricent okdek fojojn, ili ree iris por kvarono de horo en la preĝejon, kies pordoj estis ĉiam malfermitaj, kaj en kiu ludis la orgeno, kiu instigis kanti la vualitajn inojn sub la nigraj kaptukoj. Kaj tiam la katedralo sonorigis siajn sonorilojn. Tiujn ankaŭ la plej fortika komercisto aŭ ruletbankiero ne povis superkrii. Tiel la ĉirkaŭpromenantaj homoj ankoraŭ ĝustatempe estis avertataj, ke ili ne disipu sian tutan monon ĉe la komercistoj, ĉe la ruleto, por enĉiladoj kaj por komitekoj, sed lasu restaĵon por la eterna vivo.

Neniu faras pli bonan reklamon ol la katolika eklezio en Meksiko, kie oni vidas tiom ofte antaŭ la almozkolektujoj papereton kun la atrakcia anonco: „La centaveton, kiun vi ĉi tie pagas, oni repagos al vi per oro en la ĉielo.“ Bankieron, kiu tian anoncon elpendigus en sia fenestro, oni tuj arestigus pro defraŭdo de deponmono surbaze de malĝustaj pretendoj. La juĝisto de li postulus, ke li

nepridubeble pruvu, ke la deponmonoj en la ĉielo estos repagitaj, kaj ke ĉielo ekzistas kaj kie ĝi troviĝas. La meksika eklezio ne devas pruvi tion. Al ĝi oni kredas tion. Kaj kiu ne kredas tion, tiu blasfemas Dion.

Kiel indiĝeno pri tiaj aferoj ankoraŭ tenu la fadenon de kompreno?

Ankaŭ Andreo ne sciis kion fari, laŭirinte dudek fojojn la samajn vicojn tien kaj reen. Li aŭdis la monotonan kantadon el la katedralo kaj la plendantan orgenludon, kiu faras onin tiom malagema, tiom penspigra kaj tiom senrezista, ĝis oni diras al ĉio amen.

Li eĉ ne iomete emis iri ankoraŭfoje en la katedralon.

Tion eĉ malpli, ĉar proksime al la puto troviĝanta sur flanko de la placo kaj provizanta la tutan urbon per akvo, alvenis kelkaj muzikistoj, kiuj komencis ludi.

Tiu puto estis la ĉiutaga gazeto de la urbo. La urbo ne havis alian gazeton. Sed la puto anstataŭis tiun malavantaĝon, aŭ avantaĝon, laŭ tio kiel oni konsideras tion.

Ĉar la urbo ne havis akvodukton, la enloĝantoj devis havigi al si la tutan bezonatan akvon el tiu puto. Ĉiu familio havis en sia domo plurajn argilajn kruĉojn, havantaj proksimuman kapaciton de okdek ĝis cent litroj. Tiujn grandajn kruĉojn produktis indiĝenoj en la sama formo kaj speco, kiel oni faris tion jam antaŭ dumil jaroj.

La pli bonaj familioj de la urbo rigardis tion sub sia digno sendi siajn servistinojn al la puto, por ke ili alportu la akvon en ne tre grandaj kruĉoj sur siaj kapoj. La dignosento de tiu civitanoj prosperigis specialan negocon en la urbo, tiu de la akvoliverantoj. La liverantoj estis indiĝenoj, kiuj fariĝis urbanoj kaj loĝis en la antaŭlokoj de la urbo. Ili havis du aŭ tri azenojn, kiujn ili laborigis ĉiutage de matene je la sesa ĝis malfrue posttagmeze. La azenoj havis surdorse kadran portilon, en kiu facile transporteblis grandaj argilaj kruĉoj plenigitaj per akvo.

Kun sia akvoŝarĝo la akvoportistoj iris de domo al domo kaj ofertis sian varon. Se ili trovis klienton, ili venis tiel ofte kun ŝarĝo, ĝis la grandaj provizaj kruĉoj en la klienta domo estis plenigitaj. Por tio ili postulis difinitan malgrandan monsumon.

La familioj, kiuj eĉ pli atentis pri sia digno ol la aliaj, kutime havis propran azenon, sur kiu indiĝena knabo, kiu servis en la domo, alportis la akvon.

La familioj, apartenantaj al la plej proksima pli suba socia tavolo, ricevadis nur ŝarĝope la akvon, por kio ili pagis realon, aŭ nur dek centavojn, aŭ eĉ malpli.

Poste sekvis plia tavolo, kies familioj de tempo al tempo sendis la duan indiĝenan knabinon al la puto, por alporti la akvon.

Poste estis en la vico tiu tavolo, kies apartenantoj povas permesi al si nur unu indiĝenan knabinon, kiu estas bezonata por ĉio, do ankaŭ por la alportado de la akvo.

Fine aldoniĝis la plej suba tavolo, en kiu la edzino mem aŭ ŝiaj infanoj devis alporti la akvon, ĉar eĉ la du centavoj por malgranda akvoŝarĝo estis sumo, kiun ili ne elspezu

por io, kion ili povas fari mem.

Sed neniu, eĉ ne profesia akvoportanto veninta al la puto kaj pleniginta siajn kruĉojn el unu el la pluraj tuboj, el kiuj ŝprucis la akvo seninterrompe tage kaj nokte en dikaj strioj, tuj forkuris poste. Ĉiu, kiu venis al tiu puto iom restadis kaj babilis kun tiuj, kiuj jam staris ĉe la puto. La viroj rulumis cigaredon, kaj la knabinoj fingrumis je sia hararo aŭ je la jupo. Estus kontraŭ la etiketo, se iu venus tien, prenus la akvon kaj tuj forkurus. La prenado de la akvo okazis kvazaŭ kontemple kaj sen hastaj gestoj.

Kiam la kruĉoj estis plenigitaj, la knabinoj starigis ilin sur la teron kaj nun ŝajne ekpripensis, ĉu ili tuj denove levos la kruĉon aŭ ĉu ili antaŭe ankoraŭ iom atendos. Krome necesis, ke almenaŭ du knabinoj ĉeestu, ĉar la laste alveninta knabino devis helpi al la forironto levi la kruĉon sur la kapon. Vespere ĉiuj servoknabinoj, eĉ tiuj de la distingitaj familioj, kiuj neniam sendas siajn servistinojn al la puto, serĉis pretekston por rajti iri al la puto, eĉ se nur dum dek minutoj. En la domo ili klarigis, ke la akvo en la grandaj provizkruĉoj estas malklara kaj malfreŝa, kaj ke estus avantaĝe por la saneco kaj la bona apetito de

la mastro, se ili rapide kurus al la puto por alporti freŝan fridetan akvon por la vespermanĝa tablo.

Kiam la servoknabino revenis de la puto, speciale vespere, la mastrino de la domo jam atendis ŝin en la kuirejo, sed ne pro la akvo, sed por aŭskulti, ĉu estas efektive vere, ke *don Jorge* en tiu semajno jam trifoje iris en la domon de la vidvino *doña Amalia*, kaj ĉu pravas, ke li forlasis la domon nur je la unua matene, kaj kiel finiĝis la kverelo inter *señor* kaj *señora* Osorio, ĉu li vere tiom tradraŝis sian *señora*, ke ŝi ne plu povas montri sin, kaj ĉu estas fakto, ke *doña Ana*, la *partera*, la akuŝistino, diris, ke la ĵus naskita infano de *señora Zavala* alvenis monaton tro frue, aŭ ĉu la bebo estas sepmonata, ĉar la *señora* geedziĝis ja nur antaŭ ok monatoj. Tiuj aferoj estis multe pli gravaj ol la bagatelo, ke ĉe la lasta reelekto de la prezidanto *don Porfirio* nur tri procentoj el la tuta meksika popolo iris al la balotkestoj, ĉar ĉiu meksikano, ĉu inteligenta ĉu ne, jam sciis duonon de jaro antaŭ la elekto de la prezidanto, kiu estos elektita, kaj ke oni parolas en ĉiuj lokoj kaj anguletoj de la respubliko pri revolucio, kiu forigu la tiranecon.

La junulinoj tie ĉe la puto ankaŭ inter si devis tiom babili pri siaj amrakontoj kaj ĵaluzkomedioj kaj tragedioj, ke ne estis miraklo, ke oni renkontis ĝis malfrue en la nokto kun kruĉoj knabinojn, kiuj devis alporti freŝan akvon por siaj mastroj. Kaj ĉar la junuloj de la urbo sciis, ke ili tie kun certeco renkontos tiujn koramatinojn, kiujn ili elektis al si, la puto en la vesperaj horoj estis multe frekventata loko.

Dum la *feria* la idilio de la puto kompreneble estis tute detruita. Estis tro laŭte en ĝia proksimo, pro la kriadado de la komercistoj kaj pro la babilado de la tien kaj reen promenantaj vizitantoj. Male al la kutimaj tempoj, kiam la puto troviĝas en ega tenebro, sub la kondiĉo, ke ne estas lunlumo, nun neniu intima ĉirkaŭbrako plu eblis. Estis tro da heleco sur la placo, heleco, kiu eliris de la iluminataj vendostandoj. Sed helecon ĉirkaŭ si ŝatas nur tiuj homoj, kiuj estas geedziĝintaj pli ol du monatojn, ĉar ili retrovis sian prudentecon kaj volas vidi, kiun ili havas antaŭ si, por povi pli bone konatiĝi al tiu persono kaj por trovi respondon al la demando: 'Nu! Kial mi azeno, kiu mi estis, faris tion?'

La muzikantoj trovis lokon apud la puto kaj komencis gaje ludi. Estis tie libera lokopeceto, kiun la aŭtoritatoj ne forŝakris, por ke la akvoportistoj kaj iliaj azenoj havu sufiĉe da loko.

Sur tiu loketo nun komencis danci la indiĝena junularo de la urbo. Se danco finiĝis, unu el la junuloj donis al la muzikantoj kvin centavojn, kaj tuj ili denove ekludis dancon.

La antaŭdiro estis tre verŝajna, ke oni dancus ĉi tie ĝis la dua aŭ tria matene, ĉar tuj, kiam la gejunuloj de la urbo aŭdis, ke oni dancas ĉe la puto, ili tre rapide alvenis kiel grandaj grupoj el la plej malproksimaj anguloj de la urbo. La dancadon ili ne preterlasis. Alia distro ne estis. Ne por la apartenantoj de la plej suba klaso kaj ne por tiuj de la supraj. Ankaŭ la estimataj bonstataj civitanoj, bezonante distron, dancis, en la aktuala semajno en la domo de la familio Suarez, en la sekva semajno en la domo de la familio Cota, kaj tiel plu la tutan jaron. Jen pro *cumpleaños*, la naskiĝtago de la dommastro jen pro la *día de su santo*, la sanktula tago de la dommastrino; jen

en alia domo estis baptita ĵus naskita bebo; kaj jen oni festis geedziĝon. Jen krome la du semajnoj de la *posada* – la kristnaskaj festotagoj – kaj la festo por la nova jaro. Kaj se estis tute neniuj kaŭzoj por danci, la junaj sinjoroj de la urbo invitis ĉiujn damojn al balo en hotelo, nur pro la balo. Jen eĉ okazis, ke juna needziĝita kuracisto forlasis la urbon kaj transloĝiĝis al Usono, por plua edukado. Honore al li oni aranĝis balon. Alia juna viro el Meksikurbo jam finis sian studadon kaj revenis por setli kiel dentkuracisto aŭ kiel juĝisto. Oni bonvenigis lin per balo.

Kion alian la homoj faru? Nek estis kinejo nek teatro, neniuj koncertoj; neniuj prelegantoj, kiu entreprenus la ruinigajn penojn de vojaĝo ĝis tien. Eĉ malsatmortonta cirko estis rara.

La indiĝenoj eĉ multe pli sekvis la internan impulson serĉi kaj trovi distron ĉe la dancado.

La indiĝenoj dancis eĉ en siaj funebraj ceremonioj. La ĉerkon kun la mortinto oni starigis en la mezo de la plej granda ĉambro de la domo. Se la familio havis kelkajn ŝparitajn superflujajn pesojn, jen oni aĉetis pastron, por

ke li benu la mortan korpon kaj aspergu la mortinton per akvo. Se la homoj ne havis monon, ili ne kuraĝis mendi la pastron, ĉar ili sciis, ke li faras nenion por nenio. Kiam la pastro jam finis siajn manipulojn kaj foriris, komenciĝis gaja muziko, kaj la homoj dancis plenaj de ĝojo ĉirkaŭ la ĉerko, inklude la parencojn de la mortinto aŭ de la mortintoj. Ili dancis ĝis la frua mateno. Poste oni levis la ĉerkon kaj ĉiuj marŝis lamente kaj plorante al la tombejo.

La ladinoj – la meksikanoj kaj blankuloj – tion kompreneble ne faris. Ili konsideris tian agadon pagana barbareco. Mankis al ili la matureco de kulturo kaj ankoraŭ pli mankis al ili saniga laŭnatura filozofio. Estante dum jarcentoj sub la influo de eklezio, kiu per brila ceremonio anstataŭis la simplan instruon, kiu ne volis kaj ne volas esti io alia ol simpla instruo, la homoj fariĝis hipokrituloj; kaj tiel ili detruis en si ĉion tion, kio servas al la disvolviĝo de simpla kaj sincera homo. Ja, se oni rigardas deca danci ĉe la naskiĝo aŭ ĉe la bapto de infano ĉe ĉiu okazo, kiam oni kontraŭ sia propra volo estas pelata en la mizerojn kaj suferojn de la vivo, kial tiukaze pro ĉio en la mondo dancado estas nedeca kaj pagana, kiam oni adiaŭas sin de la suferoj kaj hasto de l'

vivo kaj reiras en la landon de l' eterna paco? Sed ili estas maldignaj hipokrituloj. Se ili serioze kredus al la preĝoj de sia religio, jen ili devus ĝoji kaj devus danci pro jubila ĝojo, ke la adiaŭanto nun rajtas enpaŝi en la eternan Elizeon de laŭdokantoj kaj harpaj sonoj.

Sed la indiĝenoj estas tro stultaj por kompreni la profundajn misterojn de la katolika eklezio. Tial ili faras ĉion alie ol ni, kaj ni teruriĝas pri ilia barbareco.

Kaj tamen la indiĝenaj gejunuloj dancantaj tie, eĉ ne iom aspektis kiel barbaroj. Ili surhavis, almenaŭ la knabinoj, malkarajn, tre malkarajn, sed purajn vestojn. Ili ĉiuj zorge lavis sin kaj ilia longa nigra hararo estis tiel bone kombita kiel oni faras tion en kosmetika salono en Baltimoro ne pli bone, sed pli neglekte.

La knabinoj staris aŭ kaŭris sur la tero, sur unu el la flankoj, kaj la junuloj staris vice aŭ en lozaj grupoj sur la alia flanko.

La indiĝenaj junaj viroj ne iris al la knabino, kun kiu ili intencis danci; knabino ne kliniĝis antaŭ juna viro, kaj la junaj viroj ne demandis per bele formulitaj kaj bone ekzercitaj vortoj, ĉu ili rajtos havi la honoron aŭ kian ajn tian plu.

La junuloj surhavis blankajn pantalonojn kaj blankajn jakformajn ĉemizojn. Kelkaj el ili portis sandalojn, sed la plej multaj estis nudapiedaj. La plimulto de la knabinoj same nudpiedis. Sed kelkaj portis ŝuojn el lakledo kun tre altaj kalkanumoj.

Se viro volas danci, li iras, tuj, kiam la muziko komenciĝis, duonon de paŝo antaŭen, tiras el sia ĉemizopoŝo ruĝan silkan tuketon kaj ĵetas ĝin sur la sinon de la junulino, kun kiu li intencas danci, aŭ, se ŝi staras, al la vizaĝo. La knabino kaptas la tuketon, kaj tio signifas, ke ŝi dancos kun la posedanto de la tuketo. Sed, se ŝi reĵetas la tuketon al li, tiukaze tio signifas, ke ŝi rifuzas danci kun li. Sed ŝi reĵetas la tuketon certe nur en tiu kazo, se la dancemulo estas tre ebria, aŭ tiukaze, se ŝi vidas, ke alia dancisto, kiun ŝi preferas, samtempe ĵetas la tuketon al ŝi. Sed reĵeti la tuketon al dancemulo, tion oni konsideras kontraŭetiketa. La plimulto de la knabinoj akceptas la tuketon eĉ tiukaze, se la dancemulo aspektas ebria, por ne ofendi lin. Kompreneble ŝi tiam dancas kun li nur kelkajn taktojn kaj residiĝas. La dancinto tiel estas almenaŭ liberigita de la honto esti rifuzita, kaj li tute kontentas pri kelkaj muzikaj taktoj.

La dancanto parolas dum la danco eĉ ne unu vorton kun sia dancpartnerino. Ankaŭ ne, kiam la danco finiĝas.

La dancparoj ne ĉirkaŭbrakas sin ĉe la dancado, sed ili dancas vidalvide, ĉiu por si mem. Ili interŝanĝas de tempo

al tempo nur la pozicion, ĉe tio ambaŭ preterdancis la alian por atingi la alian flankon. La viroj ĉiuj dancas en unu vico sur la sama flanko, kaj la knabinoj ĉiuj sur la kontraŭa flanko. Se ili estis ŝanĝintaj la pozicion denove, ĉiuj viroj estas sur la sama flanko kaj la knabinoj sur la alia.

Dum la dancado la dancantino tenas la silkan tuketon de sia dancpartnero en la dekstra mano. Kiam la danco estas finita, ŝi redonas la tuketon al li, kaj sen diri dankvorton aŭ ion alian ŝi turnas la dorson al li kaj reiras al la ceteraj knabinoj, kiuj tie kaŭras aŭ staras.

Se la danco daŭras tro longe kaj dancantino sentas sin laca aŭ pro alia kaŭzo ne volas plu danci, ŝi faras paŝon al sia partnero, redonas la tuketon al li kaj iras al sia loko.

La dancantino havas ĉiam la rajton ĉesigi la dancadon, se ŝi volas, per redono de la tuketo. La dancanto ne rajtas ĉesigi la dancadon, tiom longe, kiom li ne estas rericevinta sian tuketon. Okazas, ke la muziko ludas seninterrompe dum duono de horo. Kiam la dancantino estas tiel nelacigebla, kiel estas ĉiuj indiĝenaj knabinoj, ŝi dancas ĝis la renversiĝo de sia partnero, se li ne estas

same persista kiel la knabino.

La knabinoj faras tion de tempo al tempo, se ili kvazaŭ volas repagi ion al iu junulo. Ili dancigas lin en tiu kazo ĝis tia elĉerpiĝo, ke li estas detruita por la resto de la nokto. Inoj posedas fajnan instinkton por bone celata kaj bonege trafanta venĝo al viro. Ankaŭ la indiĝenaj inoj estas ege kapablaj trovi efikajn rimedojn kaj uzi ilin, se tio servas al iliaj intencoj, kaj se plezurigas ilin.

Sed estas vere, tie sur la placo en la urbo estis multaj paroj, kiuj dancis kune, kiel estas kutime sur la baloj de la ladinoj, ĉar tie certe duono de la knabinoj kaj junuloj estis urbaj indiĝenoj, naskitaj kaj plenkreskintaj en la urbo aŭ en loko antaŭ la urbo.

Andreo staris en la vico de la junuloj. Li emis danci. Sed ĉar li ne konis knabinon, li estis timida. Ĉirkaŭstaris ankaŭ kelkaj aliaj el la ĉaristoj, kiuj same venis de la kampadejo en la ebenaĵo. Ili puŝis sin reciproke en la ripojn por instigi la alian, ke li do dancu, por poste povi sekvi lin. Sed neniu el la ĉaristoj ekkuraĝis. Ili sentis sin tie tro embarasitaj kaj tro fremdaj.

Andreo, ne trovante motivon, por tie stulte staradi kiel knabeto, retiriĝis iom post iom el la vico de la junaj viroj kaj leĝere promenis al domo, antaŭ kiu li sidiĝis kaj apogis sin al la muro, kun suprenigitaj genuoj kaj siaj brakoj ĉirkaŭ la kruroj.

De tie li povis observi la dancantojn same tiel bone, kiel de tie. Li aŭdis la muzikon ne tiel akrasone, sed pli harmonie, ĉar la sonoj en pli granda ĉirkaŭa spaco pli disvastiĝas kaj pli intime kunmiksiĝas. La dancantojn li povis malpli bone observi, ĉar tie staris tro multaj gejunuloj kovrantaj la scenejon. Li vidis nur la kapojn de la dancantaj knabinoj kaj junaj viroj kaj kaptis nur ĉeokaze klaran vidaĵon, kiam ekestis breĉo inter la

ĉirkaŭstarantaj homoj.

Sed tio sufiĉis al li. Tiel li havis la eblon revii kaj neniigi ĝenis lin ĉe tio.

De tempo al tempo li aŭdis ridon aŭ subrideton de la knabinoj aŭ preterpasantan babiladon. Iam denove preskaŭ bruantan interparoladon de la viroj, kiuj kverelis pro io.

Tiel sidante kaj revante en la muziko kaj ensorbante la retenatan ridadon de la knabinoj, kaptis lin stranga sento, kiun li ne komprenis, li demandis sin, kial li ekzistas, kaj por kio estas ĉio ĉi tie. Li pensis, ke same tiel bone li povus esti morta, kaj ke tamen neniu mankus en la mondo.

Tri knabinoj, babilante preteriris proksime ĉe li kaj ŝtelire perdiĝis post angulo en la nigra nokto. Post iom da tempo ili revenis, tirante kaj glatigante siajn vestojn. Ili babilis ĉiuj samtempe kun kverantaj voĉoj.

Kaj en tiu ĉi kveranta babilado, kiu sonis en kelkaj koncizaj frazoj foje tiel base kiel sub dika malhela vualo, iom anhele, kaj foje plenvoĉe kaj peze, Andreo ekaŭdis

unuafaje en sia vivo konscie la sekson.

La tri indiĝenaj knabinoj parolis hispanlingve, sed ili miksis en siajn paroladojn, kiam ili ne trovis sufiĉe rapide la ĝustan hispanan vorton, la celtalan, kiu estis ja lia gepatra lingvo. La knabinoj ne rimarkis lin, ĉar li sidis en la profunda ombro de la muro, kaj ili parolis tiel memforgesinte, ke ili ŝajne vidis tute nenion ĉirkaŭ si.

Tion, kion diris la knabinoj kaj de tempo al tempo jam nur flustris, li ne povis kompreni rilate la enhavon. Li aŭdis nur la bazan tonon de ilia interparolado, la melodion de iliaj voĉoj, kiuj kunfluis. Estis tiu kveranta kaj anhelanta melodio, kiu eskcitis lin. Kaptis lin sopiro. Li supozis, ke estas sopiro al la patrino. Sed tuj li sciis kaj sentis ĝin forte, ke tio estas alia sopiro. Sopiro al io. Al io ajn. Al io ajn bela. Sed ankaŭ tion li ne kapablis klare difini, el kio konsistas tiu bela afero. Poste li pensis, ke ĝi estas hejmsopiro. Sed ankaŭ tio ĝi ne estis. Estis io varmega, kio leviĝis kaj ondadis en li. Li eksentis nemezureblan malĝojon. Kaj profundan solecon.

Ĉio ĉi okazis al li ĝis tiam neniam.

Centfoje li aŭdis paroli inojn kaj knabinojn. Sed neniam antaŭe li aŭdis en la voĉo de ino ion, kio ekscitis lin. Dum kelkdekaj fojoj inoj estis en la karavano. Junaj inoj, maljunulinoj, belaspektulinoj, edzinoj kaj needzinoj. Kelkfoje dum semajnoj kunveturis en la karavano inoj de ĉaristoj, kiuj akompanis siajn virojn.

Kiom ajn ofte li troviĝis en tiuj okazoj en la proksimo de inoj, li tamen neniam sentis ion precipan pro ilia ĉeesto. Li levis inojn de la ĉaro aŭ li helpis al ili supren. Li portis sennombrajn fojojn inojn sur sia dorso tra riveroj. Li vekis inojn frue matene en ranĉoj kaj trovis ilin nur parte vestitaj aŭ, pro la varmego, tute nudaj kaj ripozantaj sur ties kuŝejo. Li hazarde surprizis vojaĝantinojn kun la karavano ie post arbustoj ĉe la vojo dum ĉiaj ajn faroj kaj situoj. Li vidis multajn fojojn en noktoj en subita lumo de fulmo aŭ ĉe neatendita hela ekflamiĝo de kampadeja fajro virojn, kiuj brakumis siajn inojn sub ĉaro aŭ kie ajn aliloke. Ĉe la travado de riveroj, riveretoj kaj lagetoj li kelkcentfoje vidis sin banantajn inojn senvestitajn ĝis la koksoj aŭ knabinojn nudajn ĝis la plandoj.

Sed neniam li sentis ion, kio povus havi rilaton al li, aŭ

kio vekis iujn dezirojn en li.

Ĉiu ino estis por li kiel viro. Ŝi havis nur iom alian staturon. En lia hejmloko laboris kaj la viroj kaj la inoj. Jen ne estis diferenco. La diferenco estis nur pri la speco de la laboro, ĉar la ino estas ja malpli forta kaj portas infanojn en si kaj naskas infanojn kaj flegas kaj nutras ilin.

Maturan inon li akceptis laŭsente kiel sian patrinon aŭ onklinon, kaj knabinon li rigardis kiel iun el siaj fratinoj.

La kabano, en kiu li plenkreskiĝis, havis nur unu ĉambron. Ekde la juneco li vidis, ke lia patro ne havas alian dormlokon ol flanke de la patrino kaj sur la sama minca petato. Tra la sveltaj stangetoj de la vandoj falis la hela lumo de tropika luno en la kabanon, kaj li vidis, kion lia patrino kaj lia patro faras sur la kuŝejo. Kaj kiam ne estis lunlumo, sed tenebro en la kabano, li povis aŭdi je la ekĝemoj, kion ili faras. La gepatroj ne havis sekretojn antaŭ la infanoj. Se ili rigardis ion rekomendinda aŭ necesa, ili ne petis la permeson de la infanoj kaj ties ĉeesto ne afliktis ilin. Ili sciis tion, sed neniam rompis al si la kapon pri tio, ĉar tio estis memkomprenebla por ili,

ke iliaj infanoj respektis ilin sen iu limigo, kaj ke tiu respekto kaj la amo de la infanoj estis skuebla per nenio, des malpli per aferoj, kiuj estis por ili tiel naturaj kiel la leviĝo kaj la subiro de Suno aŭ la kreskado de la maizo kaj de la floroj.

Mensogemajn romanojn, mensogitajn poemojn kaj trompajn filmojn Andreo ne konis. Li nek vivis nek plenkreskis en lando, kie predikantoj de etiko kaj skribantoj de leĝoparagrafoj pri malĉasteco instruas infanojn kaj plenkreskintojn pri tio, kio estas obscena afero, kaj kiel oni trovu tiun kaj kiel oni utiligu tiun al si, por tiel akiri la rajton pri aparteno al la bonkonduataj civitanoj.

Kio povus esti la kaŭzo, kial en Andreo nun en tiu momento ekestis tia arda sopiro, li ne povis trovi.

Li provis klariĝi pri tio, ĉar io simila antaŭe neniam okazis al li. Dum duono de minuto li supozis, ke ĝi estas ekestanta febro, kiun li ie kaptis al si. Sed apenaŭ li ekpensis tion, li jam konsciiĝis, ke ĝi ne estas febro. *Calentura* komenciĝas alie. Li havis nek kapdolorojn nek li sentis, ke peziĝis liaj membroj.

Eĉ male, li opiniis, ke lia kapo neniam estis tiel klara kiel nun, kvankam obtuzita. Kaj li deziris migri la tutan nokton kaj la plenan sekvantan tagon, migri kaj migri. Ien. Nur migri. Sekve ne estis la pezaj membroj, kiuj molestis lin.

Estis la homoj, kiuj tie ridis kaj babilis kaj sencele promenadis sur la placo. Estis la monotona kantado kaj la teda ludado de la orgeno en la katedralo, kiu ĉiam denove miksiĝis en la dancmuzikon. Kaj estis la dancmuziko mem, sensignifa kaj tamen gaja. Estis la ekscititaj junuloj en siaj puraj blankaj pantalonoj. Estis la subridantaj kaj babilantaj knabinoj kun sia longa nigra, bone trakombita hararo kun la enplektitaj floroj. Estis iliaj blankaj brilaj dentoj, iliaj plenaj lipoj, kaj iliaj serĉantaj noktonigraj okuloj, kiuj de tempo al tempo malsate ekbrilis kaj trafis lin. Kaj ĉiuj knabinoj zorge lavis sin kaj odoris laŭ forta sapo. Iliaj vestoj estis puregaj kiel novaj. Kaj kiam ili movis sin, videbliĝis de tempo al tempo peco de iliaj petale blankaj ĉemizoj.

Sed kiam la tri knabinoj tiom proksime preterpasis lin, kaj staris tie iom da tempo, li kaptis la odoron de ilia ioma

ŝvito, kiun li rimarkis des pli bone, ĉar ĝi estis freŝa kaj eliris de bone lavitaj korpoj. Li sentis tion kiel dolĉaĵon.

Sed kio lin el ĉiuj ĉi aferoj plej multe forlogis, estis la knabinaj voĉoj. En ili ne estis muziko. Sed la voĉoj efikis al li kiel muziko.

Nur, ke estis muziko de alia speco. Ĝi ne estis sama al tiu muziko, kiu ludeblas per muzikiloj.

Estis la softeco, kiu estis en la voĉoj de la knabinoj. La profunda boneco de la inoj, kiuj povas esti kaj plej amata amatino kaj samtempe patrino, kio ondadis en la varmaj, kverantaj kaj volupte forfluantaj voĉoj, sen tio, ke la knabinoj konsciiĝis pri tio. Ŝajnis, kvazaŭ ili je tiu ĉi vespero fine klariĝis pri tio, kiu estas tiu, kiu inter ĉiuj viroj surtere sole kapablas prezenti la mondon envolvita per rozofloroj kiel donacon.

Kvankam Andreo ne sciis la kialon, kiu kondukis lin al stranga vekiĝo, li tion tamen sciis, ke li ne estas pli longe la sama viro kiel ankoraŭ antaŭ horo.

En li okazis ŝanĝiĝo, pri kiu li jam nun sentis, ke ĝi tute okupos lin.

Ke inoj havas aliajn voĉojn ol viroj ne estis nova por li. Sed, ke inoj per la melodio de siaj voĉoj povas distingiĝi de la viroj tiel akre, ke ili, nur per la intonacio de la voĉo kaj per la malkovro de sia animo en tiu voĉo, povas meti tutan mondon inter viro kaj ino, estis por Andreo nedivenita nova ekkono.

Tiu eltrovo skuis lin dum momenteto tiom, ke kaptis lin timo. Li eksentis sian necertecon. Li subite dubis, ĉu li plu trovos la fadenon de Ariadno en la mondo.

La sopiro al io nekonata, kio tamen estas bela, interligis sin en liaj sentoj kun lia disvastiĝanta necerteco kaj timo.

Li subite ektimis inojn. Ili havis ion je si, kion li per unu fojo ne komprenis plu. Restis al li nur la pure sobra sento, ke li povas kompreni nur sian patrinon, kaj ke ŝi estas la sola ino surtere, kiun li ne timas, ne nun kaj neniam.

Sed samtempe kun tiu timo pro la fremdeco de la ino kaptis lin la sopiro aŭskulti la paroladon de la inoj kaj lasi karesi kaj dorloti sin de la patrina boneco de ina voĉo.

Li fariĝis profunde malĝoja, kaj li havis la ardan deziron plori. La knabinoj jam senzorge iris plu. Li vidis, ke ili

denove ŝovis sin en la vicojn de la knabinoj, kiuj atendis dancemulojn. Pro la ŝajne senatenta pluirado de tiuj knabinoj li ekhavis la senton, ke malgraŭ la homamaso sur la placo li nun estas tute forlasita kaj sola. Li ne havis amikon. Neniun, kiu parolas bonkorajn vortojn al li. Neniun, al kiu li povas paroli pri tio, kion li sentas kaj kio okazas en li.

Li sentis, kiel li laciĝis. Li esperis, ke li facile kaj sen doloroj formortu. En tiu momento, sen eĉ devi leviĝi.

En tiu softa reva pensado venis al li la ekkono de lia sopiro. Kaj la sopiro, tiel nedifinita kaj ŝvebanta ĝis tiam, densiĝis al klareco.

Ĉapitro 12

01

Estis certe malĝojige por li, ke li ne sufiĉe profunde enpenetris en la misterojn de la religio. En tiu kazo li irus en tiu momento en la katedralon, oferus al la ĉiela reĝino du grandajn kandlegojn glukovritajn per bunta papero kaj elkore petegus la reĝinon doni tion, kion li deziris al si en sia koro. Estas pli oportune almozpeti la diojn kaj diinojn ol mem peni havigi al si la deziratan, ĉu per laboro, ĉu per prudenta kaj inteligenta manipulado de la cirkonstancoj, kiuj ofertiĝas. Aferoj, kiujn oni deziras al si fervore, plenumiĝas ne ĉiam, kaj ili plenumiĝas nur malofte tiel, kiel oni deziris tion. Sed aĵoj, kiujn oni fervore deziras, multe pli proksimiĝas kaj lasas sin, sufiĉe proksimiĝintaj, multe pli facile kapti kaj firmteni ol aĵoj, kiujn oni deziras nur sen pasio aŭ tute ne. Tio estas tre natura kaj certe ne mistera. La malmulte edukita homo kaj la ne tre inteligenta homo devas preĝi por koncentriĝi al siaj deziroj. Kaj tial estas tute egale, al kiu preĝas iu, ĉar ne estas la preĝo, sed la serioza deziro, kiu proksimigas ion deziratan.

Andreo sciis bone, certe pro longa sperto, ke malaperas eĉ ne unu truo sur la vojo, se oni preĝas por tio. Se li aŭ liaj *compañeros* ne plenigus la truojn per ŝtonoj kaj ne atentus krome atente la vojon, la ĉaro simple rompiĝus.

Li sciis, ke la patrono ne donus al li eĉ duonon de realo pli da salajro, se li surgenus dum horoj antaŭ Sankta Virgulino. Li devis persone ellukti tion el sia patrono, ĉu rekte, ĉu per artifiko. Kaj kiam bovo falas en abismon, neniu kiom ajn fervora preĝo eltiros ĝin. Necesas horoj da turmenta sangolaboro de la ĉaristoj por retiri kaj reirigi la bovon sur la vojon, per lazoj kaj per arboj kaj per elfosado de ŝtupoj kaj aranĝo de vojsulko.

Kvankam la katedralo tiel insiste vokis lin el sia malferma portalo, venis eĉ ne dum sekundo en lian kapon la penso peti Sanktan Virgulinon pri la kamarado, kiun li deziras al si.

Andreo estis sendecida, kion fari? Kaŭrante laŭ la maniero de la indiĝenoj, li apenaŭ moviĝis. El iom pli malproksima distanco rigardate, li aspektis en la ombro de la muro, kontraŭ kiu li apogis sin, kiel figuro, kiu apartenas al domo kiel ornamstatuo. Eĉ la kapon li ne turnis. Ĉion, kion li volis vidi de la okazaĵoj sur la ne tre iluminata placo, li povis rigardi preskaŭ sen movi la okulojn.

Nur en sia interno li fariĝis maltrankvila pro la renkontiĝo kun la junulinoj. Li ne emis kaŭri plu, sed li ankaŭ ne volis ekiri. Io nova tie ne plu videblis. La dancado de la junaj viroj kaj de la knabinoj daŭris plu. Sed por tiu, kiu nur rigardas la dancadon, la dancado baldaŭ fariĝas enua. La ebenaĵo nun estis vualita en nigra nokto. La ĉaristoj dormis, kaj tiuj, kiuj ne dormis, estis ebriaj kaj blekadis sence kvazaŭ por si mem. Ĉarojn, bovojn kaj ĉaristojn li povis vidi ĉiutage. Sed *feria*, kie li pigre kaj reve povas sidi kaj aŭskulti sen molesto, estas rara en lia vivo. Li ne sciis, kiam li ree tiel povos partopreni tian jarfoiron. Unu aŭ du jaroj certe pasos ĝis

tiam.

Pensante pri tio, ke li eble ne partoprenos dum jaroj denove sanktulofeston, se lia laboro ne permesos tion kaj li troviĝos sur longaj marŝoj, li fine decidis denove iom promeni inter la vendostandoj, laŭboj kaj rulettabloj. Io interesa ja ĉiam videblas. Li pensis pri tio iri en kanton kaj svingi gorgĝen malgrandan komitekon. Eble okazos, ke li renkontos knabinon, kiu ne havas amanton, kaj kiu do vagadas tie sola kiel li. La penso, ke li povus renkonti knabinon, kiu eble eĉ estas kiel unu el tiuj tri knabinoj, kiuj ekscitis lin tiel novspece kaj tiel strange por li, boligis lian sangon. Estus eble, ke li trafos junulinon, kiu estus preta interparoli kun li, danci kun li, promenadi kun li sur la placo, eble eĉ iom elmigri el la loko kun li, preter la domoj, trans la ponteton ĝis la lastaj ranĉodomoj, kie komenciĝas la ebenaĵo.

Li etendis la gambojn, poste li kaptis sian altan bastĉapelon, kiu glitis de lia kapo.

Kiam li disetendis la membrojn por ekstari, li aŭdis sonon, kiu similis al retenata suspiro.

Li rigardis dekstren. Dum la longa tempo, kiam li tie kaŭris, li eĉ ne unu fojon rigardis en tiu direkto. Tie estis tenebro, kiu densiĝis tie, kie ĝi transiris en strateton. Tie estis nenio, kio eble povus esti interesa. Ĉar ĉio, kio rigardindis, troviĝis antaŭ li kaj maldekstre de li. Nur la katedralo troviĝis dekstre, sed pli antaŭe.

Kiam li nun de pli proksime rigardis, li rimarkis profunde en angulo de la domo kunruliĝintan homan fasketon, kiu kvazaŭ rampis en si mem, kvazaŭ ĝi timas forpreni tro da loko de la mondo kaj de la ceteraj homoj. Ŝajnis krome, ke tiu fasketo opiniis, ke ĝi en la urbo tute ne havas rajton je kiu ajn loko. Tiel dense kunruliĝinta ĝi tie kaŭris.

La fasketo ne moviĝis. Oni vidis nek kapon nek piedojn. Ĉio ĉi firme estis involviĝinta en *jorongon*, ĥorongon el nigra lano kun mincaj grizaj strioj.

Rimarko

ĥorongo: lankovrilo, ĉiam kun truo por la kapo

Andreo ne povis klarigi al si, kiel la fasketo venis ĉi tien, tiel proksime, ke li preskaŭ povis tuŝi ĝin permane. Bone eblis, ke liaj pensoj vaste vagadis kaj li ne atentis, kiam kaj kial la fasketo kaŭriĝis apud li. Eble ĝi tie estis jam, kiam li sidiĝis tie. Ĉiukaze li tiam ne rimarkis ĝin.

Kaj ĉar ĝi nun tiel neatendite tie kuŝis, ŝajnis al li, kvazaŭ la fasketo falis de la ĉielo.

Li ŝoviĝis iom pli proksimen. Kaj kiam li faris tion, ŝajnis al li, kvazaŭ la fasketo ankoraŭ pli rampas en si mem.

Denove li aŭdis mallaŭtan eksingulton, kiu sonis kiel la transiro de longa plorado en pli kaj pli normalan spiradon.

Per softa voĉo li demandis: „Kial vi ploras, knabineto?“

Li ne ricevis respondon.

Venis en lian kapon, ke ŝi eble ne komprenas la hispanan lingvon. Kaj li demandis ŝin nun en sia gepatra celtala lingvo: „Kial, malgranda knabino, vi estas malĝoja?“

La fasketo ekmoviĝis kaj iom etendiĝis alten.

„Ĉu vi ne havas patrinon?“ li demandis.

„*Muquenal*“, la fasketo diris mallaŭte, denove ĝemante.

„Do, en la tombejo“, respondis Andreo.

„Kaj via patro, ĉu?“ li demandis.

„*Mee muquenal, tat milvil, nebahachisch, mucul, aquil namal*“, diris la fasketo. „Mia patrino estas sur la tombejo, mia patro mortbatita, mi fariĝis nun orfino, mia hejma vilaĝo estas malproksima de ĉi tie.“

Per tiuj malmultaj vortoj ŝi rakontis evidente sian tutan rakonton.

Andreo ankoraŭ pli proksimiĝis al ŝi.

Li diris: „Ĉu mi povas helpi al vi, malgranda knabino?“

Ŝi silentis iom, kvazaŭ ŝi devus pripensi tion. Tiam ŝi diris: „*Bocon*“, „mi nun ekiros“.

„Kien vi volas iri, tiom malfrue en la nokto? La sovaĝaj hundoj mordos vin. Kaj la ebriuloj, kiuj sternis sin sur la vojoj, vin molestos.“

„Mi ne timas ilin“, ŝi respondis. „Mi havas tre akrajn dentojn kaj durajn ungojn je miaj fingroj, kaj mi elserĉos al mi du grandajn ŝtonojn kaj portas ilin kun mi sur la brako.“

Dum ŝi parolis, ŝi pli kaj pli elvolviĝis el sia ĥorongo. La kapo nun estis libera.

„Kiom da jaroj vi havas?“ li respondis.

„*Jolajuneb*, mi havas dekkvin jarojn.“

„*Anelvaneg*, fuĝinto, ĉu?“

„Jes, *anesvil*, mi fuĝis de la bieno“, ŝi diris.

Ŝia hararo estis konfuzita, tordita kaj nekombita, malpura kaj kiel Andreo facile vidis, plena de pedikoj. Ŝian vizaĝon kaj ŝiajn manojn ŝi kelkajn tagojn ne plu lavis. Ŝia haŭto aspektis malhele bronza. Ŝiaj okuloj estis profunde nigraj kiel ŝia faska hararo, kaj tre grandaj kaj brilaj.

Andreo povis vidi ĉion tion, post kiam ŝi turnis sian vizaĝon al li kaj la lumo de la foirplaco falis sur ŝin.

„Ĉu vi ne havas kuŝejon por la nokto?“ li demandis.

„Mi iros eksteren sur la ebenaĵon“, ŝi diris.

Li ridis al ŝi. Kaj kiam li vidis, ke ŝi respondis lian ridadon kun hezitema rideto, li diris: „Mi prenos vin kun mi al la ĉaroj, kaj mi faros por vi belan varman kaj molan kuŝejon en ĉaro. Ĉu vi volas?“

„Vi estas bona al mi, *Binash Yutsil*, bela knabo“, ŝi diris simple. Kaj per tio ŝi akceptis lian inviton.

„Sed ni iru unue al la puto“, li konsilis.

„Kial?“

„*Suquel*, por lavi nin.“

Li estis galanta kaj ĝentila. Ĉar li celis, ke ŝi mem lavu sin. Sed, ĉar tio okazis nun komune, ne dolorigis ŝin aŭdi, ke ŝi sin nepre lavu.

Li tiris pecon da sapo el poŝo kaj donis ĝin al ŝi. Ŝi lavis sin kliniĝinte ĉe la rando de la puto, kie la akvo fluis en la trogojn por la bestoj kondukataj tien por trinkigi ilin.

„Atendu ĉi tie etan momenton“, li diris kaj forkuris.

Jam post minuto li revenis kaj alportis lignan kombilon, aĉetitan por kvin centavoj ĉe unu el la standoj.

„Kaj nun ni iros kaj kombos nian hararon ĝis ĝi estos bela.“

Li prenis ŝin je mano, kaj ili reiris en la ombron de la domo, kie ili trovis unu la alian.

Ŝi zorgeme komencis trakombi sian hararon. Tio daŭris

longan tempon. La hararo, kiu jam per si mem estis tre plena kaj faska, aspektis kiel felta bulo.

Li observis ŝin ĉe tio, ridis kaj parolis kun ŝi, kvazaŭ li konas ŝin jam dum multaj jaroj.

Ŝi fariĝis konfidema al li kiel al frato. Evidente tio efikis eksterordinare bonfartiga al ŝi, ke ŝi trovis iun, kun kiu ŝi povas interparoli tute libere.

Tiu konfidemo, kiun ŝi havis al li, plenigis lin kun stranga sento de varmo. Li sentis sin, kvazaŭ lia koro banas sin en sunlumo. Agrable tiklanta ondo trakuris lian korpon. La sopiro, kiu tiel malĝojigis lin, ĉar ĝi ŝajne estis direktata al nenio, kaj nur sopiro pro la sopiro mem, solviĝis en li al kvieta kaj granda ĝojo. Li ne povis doni nomon al ĝi, ĉar estis ĝojo, kiu estis nova al li, ĝi interligeblis al nenio, kion li konis. Li deziris, ke tiu nokto neniam ĉesu, kaj ke la knabino babilu kaj babilu sen fino.

Kiam ŝi dum la kombado reĵetis la hararon por skui ĝin, iom kliniĝinte la rigardon, ŝi turnis sian vizaĝon al li, ridante kaj ludante per siaj blankaj dentoj dum sia rido, li ekhavis la senton, kvazaŭ estus naskita nova mondo. Li

sentis sin nemezureble riĉa, ke li povis aĉeti kombilon por la knabino, kaj ankoraŭ pli riĉa li sentis sin, ke li estis kapabla oferti al ŝi ĉaron kiel domon.

Finfine la knabino estis kombinta sian hararon. Ŝi skuadis ĝin kaj turnis sian vizaĝon nun tute al li. Ŝi tiris la elkombitajn harojn el inter la dentoj de la kombilo, purige frapadis la kombilon sur la ŝtonoj kaj tiam transdonis ĝin al li.

„Jen via kombilo, donaco por vi de la sanktula festo“, li diris.

„Sed mi ne havas poŝon, en kiu mi povus porti ĝin“, ŝi rimarkis ridete. „Ĉu vi bonvolus porti ĝin en via poŝo?“

Li prenis kaj enpoŝigis ĝin kaj diris: „Mi tiom ĝojas, ke mi rajtas porti ĝin por vi. Tiukaze vi ĉiufoje devos reveni al mi, se vi volas elkombi vian hararon.“

„Tion mi faros ja kun plezuro“, ŝi rediris.

Li ekstaris kaj diris: „Kaj nun, *vehel ta hacabaltic*, ni ekiru por vespermanĝi. Ĉu vi emas? Ĉu vi malsatas?“

Ŝi klinis la kapon malantaŭen, por rigardi el sia kaŭranta

pozicio al liaj okuloj: „Mi estas tiom malsata, bela kaj bona knabo, *Binash Yutsil*, du tagojn mi ne manĝis ion.“

Ili iris al la malgranda indiĝena kuirejo, kie Andreo pli frue en la vespero aĉetis enĉiladojn por si.

„Nu, kion vi do volas havi kiel vespermanĝon, *tujom ants*?“ li demandis amikece.

Ŝia vizaĝo profunde ruĝiĝis, kiam li diris tion, kaj ŝi rigardis kun honto malsupren; ĉar „*tujom ants*“ signifas „belulino“. Kaj kiel li diris tion kaj kiel li ridetis al ŝi ĉe tio, tio ne nur estis admiro, sed pli.

Sed tiam ŝi turnis la kapon kaj rigardis lin de la flanko ridetante kaj kun iom fermitaj okuloj.

„Nu?“ li demandis denove. „Kiun vespermanĝon la malgranda knabino volas havi?“

„*Tibal*“, ŝi rediris. „Viandon, multe da viando, mi estas tre malsata.“

Li mendis la enĉiladojn. Dum ili observis la preparadon, ŝi diris: „Sed mi tute ne plu estas malgranda knabino. Mi nun estas granda. Mia sango fluas jam pli ol jaron. Tion vi povas kredi al mi, *Binash Yutsil*, *huinic*, belaspekta

knabo.“

Ĉe tio ŝi ridis denove.

Ŝi estis nudapieda. La rigida nigra lana kitelo, truigita kaj priŝmirita kun strioj de sekigita tero, atingis nur ĝis la komenco de ŝiaj muskolaj suroj. Kaj la gamboj kaj la brakoj aspektis kiel facile polurita mahagona ligno. Ŝiaj piedoj estis tre malgrandaj, sed ŝiaj piedfingroj estis larĝaj kaj en sana formo unu apud la alia. Ŝuoj neniam malhelpis kreski ilin.

Sub la kitelo ŝi ŝajne ne havis ĉemizon. Sed la brusto estis vestita per blanka lanjaketo, kies orlo estis brodita kun ruĝa lano kun simplaj linioj kaj modestaj steletoj.

La jaketo estis profunde griza de koto kaj de la enpenetrinta polvo.

Sur la jaketo ŝi portis ĥorongon, nigran krudan lanokovrilon kun mincaj grizaj enteksitaj strioj. La lanokovrilo havis en la mezo fendon, tra kiu ŝi estis ŝovinta la kapon. Tiel la ĥorongo falis gardante sur ŝian bruston. Ĝi estis mallonga kaj atingis nur ĝis la koksoj. Ĉe la koksoj la lanokitelo estis kunrulita al dika ringo, ĉar la

kitelo, laŭ indiĝena modo, estis tiel vasta, ke oni ne devis ŝanĝi ĝin, kiam la portulino atendas bebon. La kitelon kuntenis larĝa ruĝa lanorubando, kiun ŝi volvis ĉirkaŭ la koksojn kaj kies finaĵojn ŝi kunplektis.

Ŝiaj brakoj estis nudaj ĝis super la kubutoj. La kolo estis libera, sed la nuko kovrita de ŝia plena, densa, krispa kaj spite la kombadon ankoraŭ nun felta hararo, kiu pendis malsupren ĝis la talio.

La enĉiladoj fine estis pretaj. Li pagis kaj petis ankoraŭ pri iom da salo, kiun li ricevis en bananfolio. Malgrandan citronon li ricevis aldone.

Tiam li diris: „Ni manĝos tie transe sur la ŝtuparo de la preĝejo kaj poste revenos ĉi tien kaj ĉiu trinkos kafon el poteto.“

„*Hutsil*“, ŝi diris ridante, „tio estas bona tiel.“

„Ĉu ne ankaŭ vi volas manĝi? ŝi demandis, kiam ili sidis sur la ŝtupoj de la ŝtuparo.

„Mi jam manĝis, kaj mi nun ne malsatas“, li ripetis.

„Sed tiukaze vi el ĉiuj enĉiladoj devas formordi pecon, alie la manĝo ne gustus al mi kaj mi restus malsata“, ŝi diris kaj tenis enĉiladon al lia buŝo.

„Kiel vi nomiĝas, knabineto?“ li demandis.

„Mi ankoraŭ ne havas nomon“, ŝi repondis.

„Mia patro kaj mia patrino vokis min ĉiufoje nur *huntic*, infaneto, nenion pli. Kaj en la bieno la mastrino vokis min ĉiufoje nur *antsil vinic*, servistino. Kaj José, la filo de la mastro, vokis min ĉiam *mejajel*.“

„Kial li vokis vin *mejajel*?“ Andreo demandis ĉagrenite.

„Tia aĉa nomo por vi, malgranda knabino. Kia malica kanajlo tiu José devas esti! Tie transe en la kantino, rigardu tien, jen ĉiu el la ŝminkintaj knabinoj, kiuj tie alportas la komitekojn por la viroj al la tablo kaj sidiĝas sur iliajn genuojn kaj lasas palpi sin de ili sub la jupo aŭ

sur la mamojn, por ke ili estu bone pagataj por tio, nu, ĉiu el ili estas *mejayel*.”

Ŝi ne tute komprenis tion, ĉar tio, kion Andreo parolis, estis tiel fremda al ŝi kiel al normala homo la prapeko. Sed ŝi komprenis, ke fremda kaj nekutima mondo malfermiĝas antaŭ ŝi. Ŝi vidis neniun sencon en la okazaĵoj de tiu nova mondo. Tial ŝi pensis, almenaŭ je la unua rigardo, ke ŝi ne ekkonas interrilaton je tio. Sed, kiam ŝi pli ofte rigardis transen al tiu kantino, kaj pli ofte observis la knabinojn kaj ŝiajn manipulojn kaj ĉe tio provis, tion, kion ŝi vidis kaj observis, akordigi kun tio, kion Andreo ĵus klarigis al ŝi, ŝi lante ekkomprenis. Ŝi komencis eĉ pli rapide ordigi la interligojn en ŝia kapo ol Andreo atendis tion. Kaj post certa tempo de observado kaj pripensado, ŝi ekkonis, ke oni faris en tiu kantino la samon, kion ŝi vidis en la bieno. En la kantino, la plej proksima domo apud la katedralo, nur la maskerado kaj la iluminado estis alia. Jen la sola diferenco.

Ŝi diris tiam: „José mensogis. Mi nun scias, kio estas *mejayel*. Sed José mensogis, mi ne estas *mejayel*. Sed li volis fari min tia. Tion mi nun scias. Tio estas la kaŭzo,

kial mi forkuris de la bieno.“

„Mi volas ĉion ĉi rakonti al vi, *Binash Yutsil*“, ŝi diris,
kiam ŝi jam manĝis.

„Ni antaŭe trinku kafon el poteto, vi certe soifas“, konsilis
Andreo.

Ili sidis tiam denove sur la ŝtuparo de la katedralo. El la preĝejo ili aŭdis la eternan murmuradon de la preĝantaj inoj, de tempo al tempo monotonan kantadon.

La bruado kaj kriado de la komercistoj sur la placo mallaŭtiĝis, iom post iom. Sed ankoraŭ nun homoj promenis tien kaj reen, sed neniu plu aĉetis kion ajn. Pli grandaj amasoj da homoj, kiuj parte ludis kaj parte observis la ludadon, plu formiĝis nur ĉe la ludotabloj, ĉe la ruleto, ĉe la ĵetkubaj tabloj, ĉe la granda knaranta rado kun nombroj, kie la malicaj, ore makulitaj florovazoj, la japanaj ventumiloj kaj la rustiĝintaj vekhorloĝoj estis elludataj, krome ĉe la grandaj loteriaj tabloj, kie la homoj metis fabosemojn sur la ludokartojn, esperante, ke, post la elvokado de la luditaj kartoj ili povos vicigi kvar bildojn, per kio ili gajnus bukedon el paperfloroj, brandoglason aŭ kombilon.

Ĉe tiuj loteriaj tabloj la bruo estis plej laŭta. Oni aŭdis la kriadon de viro, kiu malkovris la kartojn por montri ilin: „*El diablo! El diablo!*“ ripetis lia helpanto, por ke ĉiu el la ludantoj povu okupi la elluditan karton per fabosemo, se

ĝi kongruas kun propra karto. „*El globo!*“ – „*El globo!*“
„*El alacrán!*“ – „*El alacrán!*“; „*La vaca!*“ – „*La Vaca!*“

La elvokanto de la luditaj kartoj ŝatis spici la bildojn de la montrataj kartoj per paroloj, kiujn li supozis spritaj. Kelkaj komercistoj komencis kovri siajn tablojn per oleotrepitaj toloj; aliaj pakis siajn varojn en kestojn; pluaj kovris la sternitajn varojn per fragmitaj matoj. Se tio estis farita, la komercistoj kaj komercistinoj kuŝiĝis sur maton sub la tablo aŭ apud la tablo por dormi.

Pli kaj pli de la fulgantaj lanternoj kaj de la ladoboteloj, en kiuj bruletis kotonpeco trempita en oleo, estingiĝis. La homoj promenantaj tien kaj reen aperis kiel fantomaj ombroj inter la tabloj de la komercistoj, kiuj finis sian negocon en tiu tago.

Sed proksime de la puto oni ĝoje dancis plu.

El fore malantaŭa strato oni aŭdis la melankolie ŝvelantajn, flutecajn, zumantajn sonojn de marimbo. Kelkfoje ĝi sonis kiel harpoj, kelkfoje kiel hobojoj en ĉiuj grandoj, kelkfoje kiel la kantado de basaj sonoraj damaj voĉoj, kelkfoje kiel la delikata sonado de sonoriloj. Iu

civitano de la urbo havis privatan solenaĵon en sia domo, aŭ amanto kantis serenadon por sia koramatino, aŭ familio festis la sanktulan tagon de unu el siaj membroj.

„Ĉu vi volas iom danci kun mi?“ demandis Andreo.

„Mi volonte kun vi dancus, beleta knabo mia, sed mi timas.“

„Vi ne devas timi, malgranda knabino“, li trankviligis ŝin.

„Tie ne estas ladinoj ĉe la danco, ĉiuj homoj tie estas kiel ni, indiĝenoj, kiel vi kaj mi. Ni ekiru.“

Ili iris al la dancantoj.

Neniu atentis ilin. Li aspektis kiel ĉiuj ceteraj junaj viroj tie, kaj ŝi aspektis en sia ĥorongo kiel pluraj el la aliaj knabinoj de la ĉirkaŭaj lokoj, kiuj venis al la festo.

Li donis sian buntan koltukon al ŝi manen; kaj ili dancis indiĝenan *zapateado*, ĝoje kaj senzorge, kiel ĉiuj aliaj, kiuj tien iris al la dancado.

Ili tute forgesis, ke ili konis sin ne pli longe ol du horojn. Kaj ne ĝenis ilin, ke neniu el ambaŭ konis la nomon de la alia. Ambaŭ havis la senton, kvazaŭ ili konus sin jam en la

tempo, kiam vekigis la mondo.

Rimarkoj

alacrán = skorpio

el diablo = la diablo

globo = kuglo

vaca = bovino

Fariĝis malfrue en la nokto.

La muzikistoj laciĝis. Ili ludis tiam jam tri semajnojn, tage kaj nokte, ofte ĝis la nova hela tago. Ili perlaboris ne multe, ĉar tiuj, kiuj venis al ili por danci, havis nur malmulte da elspezebbla mono. Sed ili, indiĝenoj, kiel ĉiuj aliaj tie, ŝajne sentis sin sufiĉe pagataj per tio, ke ili havis la eblon ĝojigi aliajn homojn, ke ili rajtis forgesigi la zorgojn, kiujn ĉiu havis, kiu venis al ili, kaj eĉ se nur dum kelkaj gajaj horoj de la nokto.

„Nu, ni denove ekiros kaj trinkos kafon el kruĉo kaj aldone aĉetos dolĉan panon al ni“, proponis Andreo, kiam la knabino redonis la tuketon al li.

„Tute laŭ via plaĉo, *Binash Yutsil*“, ŝi diris, ridante al li.
„Ordonu kaj mi obeos al vi.“

Li kaptis ŝin ĉe la kubuto kaj kondukis ŝin tiel al la kuirejo de la indiĝenino, kiu dormeme kaŭris apud sia eta fornelo. La ino tie sidis tage kaj nokte kaj kuiris por la malsataj indiĝenaj gastoj, kiuj venis al ŝi. Kiel la plimulto de la komercistoj kaj ludotablaj posedantoj, ankaŭ ŝi jam

estis ĉe la festo en Sapaluta. Ne estis diveneble, kiam ŝi propre dormas. Ŝi havis certe la kapablon sufiĉe dormi, dum ŝi kaŭras apud sia forneleto kaj ĝuste neniuj gastoj staras antaŭ la tablo. Ŝiaj gastoj neniam rapidis, neniam ili urĝis ŝin, neniam ili parolis laŭte kaj grumble, se la enĉiladoj ne estis sufiĉe rapide pretaj. Tiel la indiĝenino eble dormetis, dum ŝi ŝajne manipuladis ĉe la forno. Kiam ŝi vidis, ke neniuj staris ĉe la tablo, ŝi tiris sian *rebozo*, sian tukon, vaste super la kapon, kaj ŝi dormis tuj tiom firme, ke ŝi ronkis. Sed unu el ŝiaj filinoj devis nur flustre voki: „*Madrecita, dos con pollo, dos con res*“, kara panjo, du kun birdaĵoj kaj du kun bovaĵo, kaj jam ŝi vekigis el la dormo kaj kiel aŭtomato ŝi preparis la postulitajn enĉiladojn, sen iam erari pri la diversaj salatoj kaj saŭcoj. Ŝia unua ago, kiam oni vekis ŝin el la dormo, estis ĉiam kvazaŭ aŭtomate flamigi la ardetantan fajron per alblovado. Alblovi la ardetantan fajron, kiu ardas sur la tero aŭ sur argila fornelo, estas ĉiam la unua ago de indiĝenino post la vekigo; tiel kiel estas la unua ago de indiĝena servisto, kiu akompanas vojaĝanton en la ĝangaloj kaj praarbaroj.

Fariĝis nun jam sufiĉe fride. Kaj la varmega kafo, kompletigita per kelkaj *biscochos*, dolĉaj biskvitoj, bonfartigis kaj ĝojigis ambaŭ junulojn.

„Mi pensas, malgranda knabino, ke vi nun estas sufiĉe laca“, diris Andreo kareseme. „Ĉu vi volas dormi? Mi preparos al vi bonegan varman kuŝejon en ĉaro, kie vi povos dormi, tiom longe kaj tiom multe kiom vi emas.“

Sen embaraso ŝi respondis: „Se vi tion ordonas, mi devas certe obei al vi.“

„Ĉu vi ĉiam volas obei al mi, malgranda knabino?“ li demandis flustrante.

„Ĉiam“, ŝi diris simple, „ĉiam, ĉar vi estas bona al mi.“

Ili iris tra la longaj kvietaj stratoj. Ju pli ili foriĝis de la placo des pli malhele fariĝis. La stratlampoj jam ne lumis.

Ili ofte stumblis.

Ĉar la instancoj, aŭ pli bone la personoj, kiuj estis la instancoj, uzis la monon destinitan por la plibonigado de la stratoj en maniero, kiu al ili ŝajne estis pli utila, kaj tial

disponigis ĝin al siaj propraj personaj celoj, pro tio la stratoj estis en plendinda stato, tuj, se oni ne plu estis en la centro de la urbo. Tie troviĝis elrompitaj ŝtonoj, profundaj truoj kaj fosaĵoj, en kiujn oni sinkis foje tri metrojn, se oni falis en ilin, profundaj kanaletoj kaj sulkoj plenigitaj per glitiga koto kaj fetoranta ŝlimo, akvomarcetoj kaj flakoj, superfluantaj kloakoj, arbotrunkoj, tabuloj, ĉarotimonoj, malsuprenfalintaj domaj tegmentoj, kaj forrompitaj dommuroj troviĝis ĉe ĉiu paŝo transverse kaj ĉiudirekte en la stratoj de la eksteraj urbopartoj. Pontetoj havis en la mezo grandajn truojn, kelkaj havis parapetojn, sed parte derompitajn, aliaj tute ne havis parapeton. Jam en la hela tago estis sufiĉe fortostreĉe iri sur tiuj stratoj sen iuj malagrablaj incidentoj. Nokte oni riskis rompojn de membroj kaj membanadon en fetorantaj fosaĵoj post ĉiu deka paŝo.

Andreo tiris el siaj malantaŭaj pantalonaj poŝoj kenosplitaĵojn kaj bruligis ilin por prilumi la vojon. Elektran poŝlampon, unu el siaj plej ardaĵoj deziroj en sia vivo, li ne povis akiri ĝis nun. Li ankaŭ ne vidis iun ajn foran eblon, iam posedi tian lampon. Sed li, tiel kiel ankaŭ la knabino, estis kutimiĝintaj al kenaj torĉoj. Nek

en la domo, nek ĉe la laboro ili disponis pri alia lumo. Ĉiu ĉaro kompreneble havis lanternon, sed tiuj lanternoj efektive ne tre utilis, tial la ĉaristoj, se ili nepre bezonis bonkvalitan lumon, eklumigis kenajn torĉojn. Pro tio ili ĉiam havis sufiĉe grandan provizon da kenoj en siaj ĉaroj. La kenoj kostis al iliaj mastroj eĉ ne centavon, ĉar la ĉaristoj eltranĉis ilin survoje el abioj, kiujn ili renkontis kaj kiujn ili ne pridemandis, kies posedo ili estas. Tio malpliigis al la mastroj la elspezojn por la petroleo de la lanternoj.

La urbo estis vaste konstruita, ĉar ĉiu familio loĝis en speciala domo, kaj ĉiu familio havis grandspacan internan korton. Tial daŭris certan tempon antaŭ ol ambaŭ atingis la lastajn domojn de la urbo. Tie la vojo fariĝis pli sekura ol en la urbo; ĉar tie sternis sin la vasta ebenaĵo antaŭ ili.

Andreo sidiĝis sur taluson kaj diris: „Ĉu ni ĉi tie iom restadu kaj fumu cigaredon? Ĉu vi volas?“

„Mi volas“, ŝi diris, kaj sidiĝis apud li.

Li rulumis cigaredojn kaj donis iun el ili al ŝi.

La profunda nokto estis super kaj ĉirkaŭ ili kun sia tuta pezo, sed ĝi ne ŝarĝis kaj ne premis ilin. Ĝi estis vasta kaj grande spaca torentado el saturita malhelo kaj bonfartiga trankvilo. Sur la ebenaĵo violonis kaj zumis kaj flutis la griloj kaj kio krome eble vivas ĝoje inter herboj. De tempo al tempo oni aŭdis el granda foro la basan grumblon de bovo aŭ la plendantan trumpetadon de mulo.

La steloj brilegis kaj scintilis super ili en tropika klareco kiel malgrandaj sunoj.

Tiam kelkaj vespertoj flirtis trans iliajn kapojn, revenis kaj ĉirkaŭflugis ilin laŭ cirkloj, kiuj foje estis proksimaj, foje malproksimaj.

El la urbo glimis kelkaj perditaj lumoj antaŭ ili. Kelkajn fojojn eksplodis malfruiĝintaj piroteknikaĵoj super la

urbo, tie kaj tie kelkaj raketoj ĵetiĝis sible en la aeron por veki Sanktan Caralampion. Li ja ne eble eĉ deziras dormi en sia naskiĝtago! Tion oni ne povas permesi al li.

Jen la knabino diris: „Kiam mi vidas super la profunde nigra kaj tamen tiel klara ĉielo la stelojn, kiuj sternis sin tiel brilegaj kvazaŭ ili volus paroli, jen mi devas pensi pri mia kara patrino. Eble ŝi nun vivas sur iu el tiuj steloj. Ŝi amis la stelojn pli ol ion alian en la granda naturo. Nokte ŝi povis sidi multajn horojn antaŭ la kabano kaj rigardi la stelojn kaj ĝoji pri ili, min tenante sur sia sino aŭ inter la genuoj. Kaj iam en tia nokto, kiam la bienulo forsendis mian patron por kelkaj tagoj kun la bovoj, mia patrino rakontis al mi historion pri la steloj. Mi neniam forgesis tiun rakonton. Mi portas ĝin ĉiam en mia koro. Kaj tial mi ne timas en la nokto, kiom ajn nigra la nokto estas. Mi neniam rakontis la historion al iu, ĉar ĝi estas sankta por mi, kiel la plej kara kaj plej bela, kion mia bona patrino povis heredigi al mi. Sed al vi, *Binash Yutsil*, mi volas rakonti la historion, ĉar vi estas bona al mi, tiel bona, kiel estis al mi nur mia patrino, krome neniue en la mondo. Eĉ ne mia kara patro, kiu ĉiam estis laca pro multe da laboro kaj ĉiam kovrata de vundoj pro la laboro en la ĝangalo.“

Post longa paŭzo, kiam ŝi apogis sin al li por pli bone

gardi sin kontraŭ la frideta leviĝanta vento, li diris softe kaj karese: „Tiu rakonto, malgranda knabino, estas la plej bela donaco, kiun vi povas doni al mi. Mi volas tiel bone kaj tiel pie aŭskulti vin, kvazaŭ via kara panjo parolus al vi. Mi supozas vere, ke ŝi loĝas sur unu el tiuj steloj kaj malsuprenrigardas al vi kaj gardas vin per ĉiuj siaj fortoj kontraŭ fatala sorto, kiu povus trafi vin.“

Ŝi premis sin pli forte al li. Kaj li prenis ŝin al siaj brakoj kaj karegis ŝin bonfartige en ties ĥorongo.

Same tiel mallaŭte, kiel ŝi parolis, ŝi diris:

„Ĝi estas la rakonto pri la dio, kiu kreis la sunon.

La malicaj spiritoj, kiuj volis neniigi la homaron, ĉar ĝi estis kreaĵo de la bonaj dioj, estis venkintaj la bonajn diojn kaj mortbatis ĉiun el ili.

Kiam tio jam okazis, ili estingis Sunon per neĝo kaj glacio kaj per fridaj ŝtormoj.

Kaj tiam komenciĝis eterna nokto surtere.

Ĉio estis kovrita de glacio.

Homoj mortis pro frosto.

La maizo, kiu apenaŭ kreskis, vivtenis nur kun granda peno la mizere vivantajn homojn.

Sed multaj, multaj mortis pro malsato.

Ne plu kreskis arboj kun dolĉaj fruktoj.

Ne plu floris floroj.

Ne plu kantis birdoj.

La griloj kaj cikadoj ĉesis violoni kaj fluti.

La homoj mortadis, kaj ĉiuj bestoj de la arbaroj kaj de la ebenaĵo mortadis, tiel ke la viroj pli kaj pli malofte povis ĉasmortigi beston por nutri la inojn kaj infanojn kaj por provizi ilin per varmigaj feloj.

Kiam la mizero tiam fariĝis pli kaj pli granda, ĉiuj tribestroj kaj reĝoj de la indiĝenaj popoloj kunvokis sin por granda interkonsiliĝo, por decidi, kiel oni kreu novan sunon.

En la ĉielo staris ja nur la klaraj steloj.

La stelojn la malicaj spiritoj ne sukcesis estingi.

Sur ili vivis la spiritoj de mortintaj homoj, kiuj bone sciis kiel defendi sin, ĉar la bonaj dioj donis forton al ili, kaj ĉar estis ilia tasko por eterne teni lumantaj la stelojn.

Multajn semajnojn daŭris la granda interkonsiliĝo de la reĝoj kaj tribestroj.

Sed neniu el ili sciis kiel fari novan sunon.

Inter la reĝoj estis *sabio*, saĝulo, kiu jam havis pli ol tricent jarojn kaj lernis ĉiujn sekretojn de la naturo.

Kaj tiu diris: ,Certe estas vojo krei novan sunon. Juna, forta kaj tre kuraĝa viro devas iri al la steloj. Tie li devas peti la spiritojn de la mortintoj doni de ĉiu stelo etan peceton.

Tiujn malgrandajn pecojn li devas kolekti kaj porti kun si pli alten, pli kaj pli alten, ĝis li fine atingos supre la mezan punkton de la ĉiela volbaĵo.

Tie li devos fiksi ĉiujn tiujn stelopecetojn al sia ŝirmilo. Kaj se li estos farinta tion, la ŝirmilo transformiĝos en grandan lumantan kaj varmegan sunon.

Mi mem irus kaj farus tion.

Sed mi estas olda kaj malforta.

Mi jam ne kapablas plu bone salti.

Tial mi ne povus salti de unu stelo al la alia.

Kaj mi ankaŭ ne plu estas sufiĉe forta kaj lerta por ĵeti lancon kaj teni la ŝirmilon kaj por batali kontraŭ la malicaj spiritoj, kiuj provos malhelpi, ke nova suno estos kreita.'

Kiam la saĝulo jam finis la parolon, suprensaltis ĉiuj

reĝoj, tribestroj kaj grandaj batalantoj, kiuj kunsidis en la interkonsiliĝa rondo, kaj vokis: 'Ni estas pretaj ekiri.'

Al tio diris la saĝulo: 'Tio tre honoras vin, ke vi volas fari tion.

Sed nur unu el vi povos foriri, kaj tiu devos iri sola kun sia ŝirmilo, ĉar nur unu suno estu kreata.

Tro multaj sunoj bruligus la teron.

Tiu, kiu faros tion, devos oferi la plej karan, kion homo povas fordoni.

Li devos forlasi sian edzinon, siajn infanojn, sian patron kaj sian patrinon, siajn amikojn kaj sian popolon.

Li neniam povos reveni sur Teron.

Li devos poreterne migri je la ĉiela volbaĵo, la ŝirmilon sur la maldekstra brako; kaj poreterne li devos esti armita por povi batali kontraŭ la malicaj dioj, kiuj ne ripozos por denove estingi Sunon.

Li ĉiam povos vidi Teron kaj sian popolon, sed li ne plu povos reveni.

Li estos por ĉiam solulo en la universo.

Ĉiu el vi antaŭe pripensu tion bone antaŭ la ekiro.

Kiam la reĝoj tion aŭskultis, ili ĉiuj tre senkuraĝiĝis.

Neniu el ili deziris apartiĝi poreterne de sia edzino kaj de siaj infanoj, de sia patrino, de siaj amikoj kaj de sia popolo.

Ĉiu el ili preferis iam morti kaj kuŝi en sia tero ĉe sia popolo.

Jen ekestis longa silento en la interkonsiliĝo.

Sed finfine parolis unu el la pli junaj tribestroj:

'Mi volas paroli, kuraĝaj viroj.

Mi estas juna kaj forta kaj bone ekzercita je la armoj.

Mi havas junan kaj belan edzinon, kiun mi tre amas, pli ol min mem.

Kaj mi havas belegan knabon, kiu estas al mi tiel kara kiel mia korsango. Kaj mi havas karan bonkoran patrino, kies protektanto kaj espero mi estas.

Kaj mi havas multajn amatajn amikojn.

Kaj mi amas mian popolon, en kiu mi estis naskita, kaj de

kiu mi estas nedisigebla parto.

Sed pli ol mian edzinon, pli ol mian knabon, pli ol mian patrinon, miajn amikojn kaj mian popolon mi amas la homaron.

Mi ne povas esti tute feliĉa, kiam mi vidas suferi la homaron.

La homoj bezonas sunon.

Sen suno la homaro devos pereii.

Mi estas preta ekiri kaj krei la sunon por la homoj, kio ajn estos mia destino kaj mia sorto.'

Estis Chicovaneg, kiu tiel parolis.

Li diris adiaŭ al sia edzino, al sia knabo, al sia patrino kaj al sia popolo.

Provizite per la konsiloj de la saĝulo, li komencis iri sin.

Li faris al si fortan ŝirmilon el jaguarfelo kaj el la haŭto de serpento.

Li faris al si kaskon de potenco aglo.

Kaj li faris al si firmajn ŝuojn el la piedegoj de grandega

jaguaro, kiun li mortigis en la ĝangalo.

Tiam li eliris por serĉi la plumhavan serpenton.

Li trovis ĝin post multaj jaroj da serĉado en profunda malhela kaverno. Ĝi estis la simbolo de la mondo. Tial ĝin gardis malica sorĉisto, kiu estis soldulo de la malbonaj dioj.

Per multe da ruzaĵoj kaj prudento li sukcesis mortbati la malican sorĉiston.

Li faris lin ebria per dolĉaj agavosukoj.

Kaj kiam la malica sorĉisto kuŝis tute ebria kaj ĉiuj liaj okuloj estis fermitaj, Chicovaneg kaŝe proksimiĝis kaj mortigis lin per lanco, kiun li venenis per cent venenoj, kiujn ĉiujn konigis la saĝulo al li.

Tiam li kantis dolĉajn kantojn, kaj per sia ŝalmo li flutis dolĉajn melodiojn; kaj jen la plumhava serpento venis kaj sekvis lin, obeante ĉiujn liajn ordonojn.

Post tio Chicovaneg longe migris, ĝis li venis post multaj jaroj kaj multaj bataloj kontraŭ malbonaj dioj al la fino de la mondo.

Tie la steloj estis plej malaltaj super la tero.

La plej malsuban stelon li povis atingi per facila salto.

Li rakontis al la spiritoj de la mortintoj loĝantaj sur tiu ĉi stelo, kiuj havis nigrajn vizaĝojn, ĉar ili ne havas indiĝenan sangon, ke la homoj ne havas sunon, kaj ke li forlasis sian edzinon kaj sian popolon, por krei novan sunon por la homoj.

La spiritoj ĝoje donis al li peceton de sia stelo, por helpi al la homoj.

Chicovaneg fiksas la pecon mezen de sia ŝirmilo, kie ĝi tuj ekbrilis en plena beleco kiel diamanto.

Ekde nun li jam pli bone povis vidi sian vojon en la profunda nokto, ĉar tiu eta steleto sur lia ŝirmilo prilumis la vojon.

Nun li saltis de stelo al stelo.

Kaj ĉie, kien li venis, kaj tute egale, ĉu la spiritoj havis flavajn, blankajn, brunajn aŭ nigrajn okulojn, ili donis al li volonte peceton de ilia stelo.

Kaj kiam li venis al tiuj, kiuj havas la saman sangon kiel

li, oni akceptis lin kun granda ĝojo.

Ili estis fieraj, ke li estas unu el la propra sango, kiu volas rekrei por la homoj la sunon.

Ili fortigis lian laciĝintan korpon kaj akriĝis liajn armilojn.

Post ĉiu salto, kiun li faris de stelo al stelo, lia ŝirmilo fariĝis pli lumanta.

Kaj kiam la ŝirmilo nun finfine tiom lumis, ke ĝi forte superbrilis la plej grandan el la steloj, la malicaj dioj rimarkis lin.

Ili ekkonis, ke li estas kreonta novan sunon por la homoj.

Kaj ili komencis batali kun granda kolero kontraŭ li kaj malhelpis lin ĉe la pluirado.

Ili tremigis Teron, por skui la stelojn, por ke li mise pretersaltu la sekvan stelon.

Ili sciis bone, ke tiukaze, se li pretersaltus nur unufoje, li falus en la nigran universon, el kiu li ne plu povus liberigi sin, ĉar tie la malicaj dioj havas la tutan potencon por si mem.

Sed Chicovaneg estis prudenta.

Kiam stelo estis tro malgranda, por povi vidi ĝin bone, li petis la plumhavan serpenton, ke ĝi unue ĵetu rigardon sur ĝin.

Kaj ĝi diris al li la distancon, por ke li povu ekkuri per la ĝusta rapideco, ke li saltu ne tro mallonge, sed ankaŭ ne transsaltu la stelon.

Se la distanco estis tro granda por salto, la plumhava serpento unue devis flugi transen, kaj ĝi tenis pendante sian unuan finaĵon tiel, ke post la salto li facile povis kapti ĝin kaj suprengrimpi sur la korpo de la plumhava serpento.

Kiam li nun grimpis pli kaj pli alten en la ĉiela volbaĵo kaj lia ŝirmilo fariĝis pli kaj pli hele lumanta, la homoj surtere finfine ekvidis lin.

Ili sciis, ke li nun kreas la sunon por ili.

Kaj ili fariĝis gajaj kaj festis multajn festojn.

Sed ili ankaŭ povis vidi, kiel peniga estas lia vojo.

Kaj se ili vidis la distancon al la sekva stelo kaj ekkonis, ke

li saltinte eble eĉ mistrafos tiun stelon, ekkaptis ilin profunda malespero.

Ili ankaŭ vidis la batalon de la malicaj dioj kontraŭ li.

La malbonaj dioj hurligis fortajn ŝtormojn, kiuj detruis ĉiujn kabanajn de la homoj kaj dezertigis iliajn kampojn.

La malicaj dioj inundis Teron per akvotorentoj, kaj ili ordonis al la montoj, ke tiuj elsputu fajran lafon, por neniigi la homojn, antaŭ ol Suno staros en la ĉielo.

Kaj la malicaj dioj katapulte ĵetis ardantajn ŝtonojn al la suprengrimanta Chicovaneg.

Ili ĵetis tiom da ili al li, ke miloj el la ŝtonoj ankoraŭ nun flugas plu tra la nokta ĉielo.

Sed pli alten kaj pli alten grimpis Chicovaneg.

Pli hele kaj pli hele lumanta fariĝis lia ŝirmilo.

Floroj komencis kreski kaj flori surtere.

La birdoj revenis kaj kantis ĝojajn kantojn.

Mangoj kaj papajoj komencis maturiĝi je la arboj kaj bananoj, figokaktoj, tomatoj baldaŭ abundis.

Kaj tiam finfine, kiam la homoj iutage suprenrigardis, staris Suno brile kaj varme en la ĉiela volbaĵo, meze de la ĉielo super ili.

Kaj ili festis grandan sunfeston, honore al Chicovaneg.

Sed la malicaj dioj seninterrompe provas estingi denove Sunon. Tiam ili vualas Teron en nigrajn nubojn kaj la homoj ektimas, ke la suno nun estu estingita.

Sed Chicovaneg, la kuraĝulo, gardas ilin.

Post lia ora ŝirmilo li kaŭras por gardi la homojn kontraŭ malicajn diojn.

Kaj se la malbonaj dioj tro malice agas, li koleriĝas kaj ĵetas siajn fulmantajn sagojn ĉirkaŭ Teron, por trafi kaj forpeli la malicajn diojn, kiuj kaŝiĝas en la nigraj dikaj nuboj.

Tiam li skuas sian ŝirmilon tiel, ke sovaĝa tondrado ekstremigas la aeron.

Kaj se li finfine estas forpelinta la malicajn diojn, tiam li pentras sian buntkoloran arkon sur la ĉielon, por anonci al la homoj, ke ili estu trankvilaj, kaj ke li ne permesos, ke

Suno de la malicaj dioj ankoraŭfoje estos estingita kaj detruita.

La knabino, kiu ankoraŭ nun tute dense premis sin al li, finis sian rakonton. Ŝi diris nenion plu.

Andreo demandis post certa tempo: „Ĉu via patrino ankaŭ rakontis al vi, kiu kreis la *huhon*, Lunon?“

„Jes“, ŝi diris.

„La filo de Chicovaneg.

Kiam la filo plenkreskiĝis, li volis viziti lian patron.

Sed li ne povis trovi plumhavan serpenton, ĉar lia patro estis kunpreninta la ununuran, kiu ekzistis, kaj ĉar tiam, kiam la patro estis kreinta Sunon, li ordonis al ĝi, ke ĝi volviĝu malsupre ĉirkaŭtere, tie, kie la ĉiela volbaĵo apogas sin surtere.

Tie ĝi kuŝas gardante kontraŭ la malicaj dioj, kiuj troviĝas sur la alia flanko de la ĉiela volbaĵo kaj de tie volas invadi, por plifortigi la potencon de la malicaj dioj sub la ĉiela volbaĵo.

Sed Chicovaneg estas prudenta.

Li ne tute fidis al la plumhava serpento kaj timas, ke ĝi

eble dormas kaj neglektas la gardadon.

Tial li ĉiuvespere malsupreniĝas al ĝi por rigardi, ĉu ĝi eble eĉ dormas.

Kaj ĉar estas nur unu plumhava serpento, la filo devis serĉi alian beston, kiu povus helpi lin grimpi sur la ĉielan volbaĵon.

Li elektis al si kuniklon, ĉar kuniklo bone povas salti. Ankaŭ li do saltis helpe de la kuniklo de stelo al stelo.

Sed la spiritoj de la mortintoj ne plu povis doni al li tiom el siaj steloj, kiom ili donis al lia patro.

Alie la steloj fariĝus tro malgrandaj.

Kaj tial lia ŝirmilo ne estas tiel granda kaj brila kiel tiu de lia patro.

Sed por esti proksima al sia patro, li sekvas lin trans la tuta ĉiela volbaĵo, kaj se li preteriras sian patron, li salutas lin de sia patrino, kiu dormas sur alta monto sub mantelo el neĝo.

La kuniklon, kunprenitan de la filo por povi pli bone salti de stelo al stelo pro ties helpo, vi certe vidas en lia

širmilo.“

Andreo rigardis ĉirkaŭ si, trans la grandan ebenaĵon kaj supren al la ĉiela volbaĵo. En lia imago li vidis suprengrimpi la junan tribestron de stelo al stelo.

La poezio, kiun li sentis, kiam la knabino rakontis tiun historion de sia religio, ne estis en la historio mem. Li sentis la poezion pli en la simpla maniero, kiel la knabino rakontis ĝin, kun sia softa trankvila voĉo kaj plej forte pro tio, ke la knabino, dum ŝi rakontis tion, lasis travivi lin, ke ŝi pensas sin sekura en lia proksimo kaj inter liaj brakoj kontraŭ ĉiuj veoj en la mondo. Li trovis sin granda kaj forta pro la konscio, ke li rajtas gardi ŝin, ke li rajtas protekti ŝin, kaj, ke ŝi tute akceptis, sen demandi kaj sen pripensi, lian protekton.

„Ŝi estas kiel senhelpa kantobirdeto, kiu falis el la nesto“, li diris mallaŭte. Ŝi ne respondis. Sed ŝajne ŝi aŭdis la vortojn, sed sen percepti ilin, ĉar ŝi eĉ pli kareseme premis kaj nestigis sin inter liaj brakoj.

Sed, kiam li denove rigardis supren al la vasta steloplana tegmento, la rakonto tuj denove fariĝis reala. Tuj li

revidis suprengrimpi la junan tribestron, vidis lin forlasi sian edzinon kaj sian infanon kaj li vidis kiel preterflugis lin ardanta ŝtono sendita de la malicaj dioj, sur alta flamanta arkovojo.

Kaj li demandis sin, ĉu estas dezirinde esti dio kaj vivi en radianta beleco. Estas certe necese krei por la homoj sunon, se ili ne havas sunon kaj suferas tre mizere. Kaj estis certe bela gloroplena ago, kiun plenumis la juna tribestro. Li meritis, ke li fariĝis dio kaj, ke li estas honorata de la homoj. Sed en la profundo de sia koro li ĝojis pri tio, ke la homoj nun jam havas Sunon, kaj ke tial la turmentoj de la konscienco kaj de la helpopreteco ne povas torturi lin por fari saman aŭ similan kiel tiu tribestro. Li sentis la knabinon varma ĉe sia brusto, kaj tio pensigis lin pri tio, ke li ja apenaŭ estus kapabla tiel oferi sin kiel tiu dio, kiu forlasis la edzinon, la infanon kaj la popolon poreterne. Tiel pensante kaj sentante, li komprenis nur des pli klare, kiom granda, kiom homama kaj kiom grandioza estis la ago de tiu dio, kiu oferis ĉion, kio donas sencon al la vivo, por helpi al la homoj. Kaj tiom pli granda estis tiu admirinda ago, ĉar tiu dio neniam povas morti, neniam dormi, neniam forgesi, ĉar li

eterne kaj eterne devas pensi pri siaj karaj, kiujn li forlasis, ĉar lia doloro pri la perdo neniam finiĝos. Kvankam li scias, ke ĉiuj, kiujn li konas surtere nun mortas jam de dekmiloj da jaroj, ili ja tamen plu vivos poreterne en lia memoro, tiel forta kiel en la tago, kiam li forlasis ilin, por la homaro. Estas nur tre malgranda konsolo por li, ke lia filo estas proksima al li, kaj ke li povas ĉirkaŭbraki sian filon en la raraj tagoj, kiam surtere dum horo Suno malheliĝas. Tial estas certe laŭnature, ke en Andreo ne vekigis la ambicio fariĝi dio de sia popolo, ĉar li venis post pripensado kaj konsidero al la ekkono, ke la sorto de la dioj ne estas enviinda: La brilo kaj la majesto de la dioj estas tre kare pagata.

Li volis diri ion. Sed tiam li vidis, ke la knabino firme endormiĝis.

Zorgeme li prenis ŝin pli proksime al si, levis ŝin kaj portis ŝin en siaj brakoj sur la vasta vojo transen al la kampadejo de la ĉaristoj.

Liaj kamaradoj ĉiuj dormis. Kelkaj ŝajne sufiĉe ebriiĝis pro la respektplena festado de la festo honore al la sanktulo Caralampio. Ili ĝemis kaj gruntis endorme kaj kuŝis sur la tero kiel ŝtipoj.

Kareseme li demetis la knabinon. Tiam li preparis al ŝi molan kuŝejon en sia ĉaro.

Kaj kiam li estis kontenta pri la kvalito de la kuŝejo, li levis ŝin zorgeme en la ĉaron kaj ennestigis ŝin.

Ŝi nur unufoje forte elĝemis pro sia granda laco.

Tiam li metis sian petaton, sian maton, sur la teron sub la ĉaro kaj sternis sin por dormi.

Lia lasta duondorma penso estis, ke li neniam en sia tuta vivo ekdormis tiel ĝoja, tiel kontenta, kaj tiel esperplena

kiel hodiaŭ. Dum sia lasta endormiĝa momento li konsciĝis en la koro, ke la plej bela kaj plej dolĉa tempo en lia vivo estas komenciĝanta. Tempo, kiu forgesigos al li ĉiujn penojn kaj zorgojn en lia dura vivo.

Kaj li tiom devojiĝis en sia sonĝaj pensoj, ke li flustris al si mem: „Esti ĉaristo, tio estas la plej bela vivo en la mondo.“

Ĉapitro 13

01

La ĉaristoj frue vekiĝinte leviĝis. Kiel ĉiam. Estis sufiĉe da laboro. La ĉaroj ankoraŭ ne estis tiel bonordaj, kiaj ili devus esti por trapasi la sekvajn semajnojn sen rompoj. La viroj preparis sian matenmanĝon.

Kelkaj havis damne pezan kapon de la aĉa falsita tekilo, kiun ili trinkis, ĉar la mono ne sufiĉis por trinki la pli bonan.

Andreo estis respondeca por la bona stato de la marŝkolono. Sed li vidis, ke en ĉi tiu tago oni ne faros multon por la plibonigado de la ĉaroj. La viroj estis ankoraŭ en festebrieco. Frue posttagmeze ili jam denove ektrinkos. Alian amuzon kaj distron ili ne sciis, kaj se ili sciis aliajn, ili ne trovus ilin tie.

La plej neutiligeblajn ulojn, kiuj sekve de la postebrieco estis letargiaj kiel malsekaj viŝĉifonoj, li sendis al la ebenaĵo, por ke ili okupiĝu pri la bovoj, por ke ili ne tro vaste disiru kaj ne havu vundojn de la mordemaj muŝoj. Tio estas simpla laboro, kaj la viroj povis fari tion.

Por si mem li decidis iri kun kelkaj aliaj ĉaristoj en la menciitan abian arbaron proksime de El Puente kaj tie ĉarpenti rezervajn timonojn kaj jugotrabojn.

Kiam la matenmanĝo estis preta, Andreo iris al sia ĉaro, por vidi, kion faras la knabino.

Ŝi jam delonge vekiĝis, sidis sur kesto en la ĉaro kaj trakombadis sian hararon.

„*Buenos dias*, malgranda knabino, bonan matenon! Kiel vi dormis?“ li demandis ridante.

Ŝi diris gaje: „Mi dormis tute bonege. Tiel bonege, kiel jam dum monatoj ne. Mi deziras al vi tre bonan tagon, *Binash Yutsil*.“

„Vi nun certe estas malsata“, li diris. „Ni ne havas multajn bonaĵojn por la matenmanĝo. Nigrajn fabojn, tortiljojn, kapsikon kaj kafon.“

„Tio estas ja manĝo kvazaŭ por riĉulo“, ŝi diris. „Mi jam havas grandan apetiton.“

Ŝi grimpis malsupren de la ĉaro. Tiam ŝi aranĝis sian truitan jupon, glatigis la ĥorongon sur siaj mamoj kaj

venis timide pli proksime al la bivakfajro, kie la viroj jam komencis preni la fabojn per la tortiljoj kaj ŝtopi ilin en siajn malsatajn faŭkojn.

Ili ĉiuj rigardis supren, kiam la knabino proksimiĝis, sed sen direkti scivolemajn rigardojn al ŝi aŭ gapi ŝin impertinente. Ĉar Andreo venis kun ŝi de sia ĉaro, ili jam sciis, al kiu ŝi apartenas.

„*Mi mujer*“, Andreo diris koncize kaj senemocie, „edzino mia. Ŝi iras nun kun ni.“

Per tiuj ĉi vortoj estis finita ne nur la prezento de la knabino, sed samtempe ankaŭ farita la geedziĝo, kiun la kamaradoj de Andreo nun tiel respektis, kvazaŭ ĝi estus sigelita en preĝejo. Se la knabino mem ne donos motivon por tio, ŝi estos same tiel netuŝebla kaj ekstere de ĉaristaj deziroj kiel la edzino de patrono.

La ĉeestantaj ĉaristoj, kiel ĉiuj aliaj sur la vojoj, estis ankaŭ multe tro prudentaj por provi stultaĵojn. Tio kostus la vivon. Ĉiu sciis tion. Se ne en publika batalo, tiukaze nokte ie en la ĝangalo, kiam oni serĉas la bovojn. Ĉiu havas ja sian maĉeton en la mano por trabati por si vojon

en la vepro. Kaj maĉeto glitas pli rapide en la dorson de la kulpulo ol tiu povus ekscii, kio okazis. Oni enfosas la kulpulon. La ĉaristoj havas sian propran moralon kaj sian propran honoron. Okazis juste al la mortigito. Kial li ne lasis la edzinon en paco. Oni avertis lin ĝustatempe. Kaj la knabino tute ne volis havi lin. La verdikto de ĉiuj ĉaristoj, kiuj sciis kiel okazis, estis konciza kaj klara. Tiukaze nenio estis nebuleca. Neniu longaj debatoj kaj superfluaĵoj. Al la patrono oni rakontas, ke la kondamnito mortis en la ĝangalo ĉe la serĉado de bovoj. Kaj se la afero vere iam malkovriĝus, eble pro la babilaĉo de ebria ĉaristo, tiukaze povus okazi, ke tiu, kiu ekzekutis la mortkondamniton, devos transpreni la ŝuldojn de la mortigito. Sed neniu juĝisto interesiĝas pri tio. Se la juĝisto volus okupiĝi pri la privataj aferoj de la ĉaristoj, la ŝtato havus nur malnecesajn elspezojn pri aferoj, kiuj, ĉar ili jam foje okazis, ne plu ŝanĝeblas. Kaj se la juĝisto devus zorgi pri la privataj rajtoj de la ĉaristoj, tiam la frajntreprenistoj baldaŭ ne plu havus eĉ unu uzeblan ĉariston. Krome la juĝisto havas sufiĉe da aliaj farendaj laboroj, kiuj enspezigas monon. Je la ĉaristoj li povas enspezi eĉ ne centaviton. Por kio do la peno kaj la

suramasigado de aktuoj, sur kiuj tavoloĝos la polvo, se
neniu legos ilin, kaj se oni skribante kaj ordigante disipus
nur fortojn kaj tempon!

La ĉaristoj diris indifere: „*Cómo estás chica*; kiel vi fartas, knabino?“ Ĉe tio ili eĉ ne ĉesis maĉi.

Estis nek io grava nek io nova, ke iu el la marŝkolono levis inon de la vojrandoj kaj kunprenis ŝin.

Tio okazas jen ĉi tie kaj jen tie ĉe marŝo.

Kelkfoje la ino restadis nur dum unu marŝo en la kolono. Tiukaze tio ne plaĉis al ŝi, kaj ŝi serĉis servon en iu alia loko, kiun ili trairis, aŭ ŝi trovis kamplaboriston, kies nenomada vivmaniero pli plaĉis al ŝi, aŭ kies karaktero ŝin pli altiris. En tiu kazo la divorco ĵus okazis. Sen ploroj kaj sentimentaleco.

La streĉega kaj kruda vivo de la ĉaristoj dorlotas nek la korojn nek la animojn. Ili prenas la vivon tiel, kiel ili trovas ĝin. Romanojn kaj filmojn kaj poemojn de plorsingultaj poetoj, poemoj tiaj, kiaj povus detrui ilian naturan fortikecon, ili ne konas. Estas nur la mensogitaj romanoj kaj la mensogitaj poemoj, kiuj enblovas sentojn al la homoj, kiujn ili en vero tute ne havas kaj neniam sentas sen embaraso.

La viroj iom pli dense kunsidiĝis por liberigi lokon por la knabino, por ke ŝi povu sidi proksime ĉe la fajro. Estis ankoraŭ tre frue. Suno ĵus heziteme leviĝis. Larĝa malseka nebulo vualis la ebenaĵon, kaj la aero estis senteble frida.

Andreo kaŭriĝis apud la knabino kaj donis argilan pelvon kun varmegaj faboj al ŝi, el sia akveca saŭco sen graso aŭ viando. Li metis la tortiljojn sur la malfermitan fajron por varmigi ilin. Li turnadis ilin tiel ofte super la fajro, ĝis li supozis, ke ili estas nun sufiĉe varmegaj. Poste li donis ilin al la knabino.

Ili enbuŝigis la fabojn per derompitaj pecoj de la tortiljo. Kulerojn ili ne havis.

Li metis iom da *chile*, do verdajn akrajn kapsikojn sur la tortiljojn kaj donis ilin al ŝi. Ŝi demordis pecetojn de la akraj kapsikoj por spici la sengustajn nigrajn fabojn. Tiam li verŝis por ŝi varmegan kafon en sian argilan kruĉeton kaj ŝovis ĝin al ŝi. Li mem trinkis la kafon el fruktoŝelo de kalabaso.

Ĉiuj ĉaristoj trinkis la kafon el tiaj fruktoŝeloj, kaj ili ĉiuj

havis nur tiajn fruktoŝelojn por sia fabosaŭco. La kruĉeto, kiun havis la knabino, kaj la argila pelveto estis la solaj manĝiloj ĉe la fajro, kiuj memorigis iom pri la civilizacio.

Pri alte evoluita civilizacio memoris nur la blue emajlita kuirpoto, en kiu kuirigis la faboj. Sed tiu pototo estis tiom disformita de premkavetoj, ke ĝi ŝajne apartenis en la plej bona kazo nur al surŝutita rubo aŭ al rubobarelo, kiun la civilizacio elkraĉis ie. La lada pototo jam tute nigriĝis de la fumo kaj ĝi aspektis tiom primartelita kaj kavetigita, ke oni ekkonis plu nur je kelkaj etaj lokoj, ke ĝi estis antaŭ cent jaroj emajlita, ekstere blua kaj interne blanka. Oni turnmovadis la fabojn en la pototo per peco de spokosplitaĵo.

„Manĝu diligente, knabino“, diris Andreo por kuraĝigi ŝin.

Ŝi kapjesis al li kiel obeema infano.

„Vi estas sufiĉe magra, *chica*“, diris Manuel, unu el la viroj. „Mankas al vi la kusenoj je la femuroj, knabino. Laŭ mia gusto vi ne estus, tion mi diras al vi. Mi devas senti karnon inter la manoj, se mi estu feliĉa.“

La knabino kapjesis al li. Ŝi ne komprenis, kion li diris, ĉar ŝi sciis nur malmulte la hispanan, kaj ĉar ŝi supozis, ke li diris ion similan al ŝi kiel Andreo.

„Ŝi ne komprenas la hispanan“, diris Andreo. „Kaj krome, lasu la mokadon.“

„Nu, ne ekscitiĝu, Andreĉjo“, Manuel diris ridante, „tiukaze ja estas pli bone, se ŝi ne scias la hispanan, jen ni ne devas elartikigi la lipojn pro ŝi. Sed, *hombre*, tion vi mem devas diri, kion vi trovas je tiu minca stangeto? Se vi foje vere surseliĝos ŝin, *hombre*, ŝi tuj saltos el siaj artikoj. Ŝi ja ne plu kunus, kaj vi tuj malantaŭe elirus de ŝi.“

La viroj ridis pri tio.

Sed tio estis nek malica nek naŭza ridado. Ili tute ne pensis fariĝi obscenaj. Ĉar tio estis por ili tiel natura, kvazaŭ ili parolus pri la stato de siaj ĉaroj. Por ili pri tio estis nek malklaraj sekretoj nek subigita seksa senseco. Ili ja ne estis edukitaj sub eklezia influo. Neniu instruis al ili, ke oni hipokritu pri naturaj fenomenoj kaj, ke memkompreneblaj agoj estas pekoj.

Kompreneble ili ne pesis siajn vortojn. Ili elparolis tion, kion ili pensis kaj kiel ili sentis tion. Kaj, se laŭ la gusto de Manuel, la knabino ne havis sufiĉe da karno, li ne povis senti emon al la knabino, kia ajn ŝi estis krome. Tio estis klara, simpla kaj objektiva. Problemoj pri psikologio kaj sekso estis fremdaj al ili. Tial oni senutile ne molestis ilin. Viro estas viro kaj ino ino, kaj se ambaŭ kunvenas, ili scias, kion ili deziras de la alia. Tio estis la sumo de ilia seksfilozofio. Kaj ili sentis sin tre bone pri tio kaj ĉiam sciis, kiel kondukti.

Andreo sciis kompreneble sufiĉe bone, kion ili opiniis kaj pri kio oni parolis. Sed iun personan sperton sur tiu tereno li kompreneble ankoraŭ ne faris. Kaj ĉu li esperis,

ke li nun kun tiu knabino faros tian sperton, tion li mem ne sciis. Difinitan esperon li havis same malmulte kiel klaran deziron. Li sentis ĝis tiu momento al la knabino nur profundan kamaradecon kaj pasian helpopretecon. Sed li sentis ankaŭ sufiĉe forte, ke tiu emo al la knabino estis de alia naturo ol tiu al lia patrino aŭ al unu el liaj fratinoj. Se li efektive havis difinitan deziron, tiukaze estis tiu, ke inter li kaj ŝi ĉio tiel restu, kiel estis en la lasta nokto kaj matene. Li sentis, ke li pri tia stato sufiĉe kontentus. Se plua okazus, li akceptus tion kun ĝojo kaj dankemo. Sed pri tio, ke li urĝu ŝin, li eĉ ne pensis.

Kaj kiam li pripensis tion, li sentis sin supera al siaj laborkamaradoj. Ili ja tuj sur la vojo tirus ŝin al si por elprovi ŝin kaj por scii, ĉu valoras la penon kunpreni ŝin kaj zorgi por ŝi.

Sed pri tiu punkto li tre malpravis, kiel li pli poste mirigite rimarkis. Tiam li eksciis, ke Manuel, kiu sin prezentis tiel kruda kaj tiel rekte marŝis al la celo, tute same atendente kaj esperante agis kiel li mem. Manuel trovis knabinon kaj traktis ŝin tute tiel, kiel Andreo sian knabinon hieraŭ kaj hodiaŭ. Kaj li vidis, ke ambaŭ dum

semajnoj kunestis kaj apudestis sur la marŝoj, sen tio, ke ili efektive fariĝis perfekta paro. Ĝis fine venis nokto, kiam ili ĵetiĝis kiel freneziĝinte reciproke en la brakojn, superfortitaj de dezirego, kiun ili, kiel ili supozis, ne povus rezisti eĉ nur horon pli longe.

Tio estis bona instruo por Andreo, ĉar li lernis per tio, ke li vere ne havas rajton senti sin supera al siaj kamaradoj, ke li tute ne havas sentojn, kiujn nur li mem povus havi kaj de kiuj liaj kunproletoj estas ekskluditaj. Li lernis tial, ke dependas certe nur de la cirkonstancoj, ĉu kiu ajn alia homo povas havi kaj evolui sentojn, pri kiuj Andreo ĝis tiam supozis, ke nur li mem estas la elektito, kiu noble kaj bone pensas kaj sentas.

Sed la aliaj viroj, des pli, ĉar ili nun ja sciis, ke la knabino ne komprenas, kion ili parolas, uzis rigore la bonŝancon daŭre mistifiki Andreon kaj plezuriĝi je liaj kostoj.

La ŝercoj neniam havis malican intencon, sed estis klaraj aludoj. Se la knabino ne sidus en la rondo, la akompanaj gestoj estus ankoraŭ multe pli klaraj ol la vortoj.

„Vi ja eble ne lasis elsekiĝi ŝin en la nokto, Andreĉjo?“
Jose demandis laŭte ridante.

„Kompreneble ne“, diris Andreo. „Kion vi pensas pri mi? Mi bone pinĉadis ŝin, Pepe, je tio vi povas trinki grandan gluton, tion mi diras al vi.“

„Kaj ĉu vi bone eliris?“ demandis Esteban.

Andreo ridis kun supera mieno.

„Kaj kiomfoje? Ankaŭ tion ni ja volus scii“, demandis Hilario.

„Aŭskultu foje, *pollitos*, flavbekuloj“, diris Andreo kunpinĉinte siajn okulklapojn. „Se mi surŝarĝas kestojn, tiukaze mi nombras ilin, kaj kiam en la kantino oni

eldonas la monon je mia donita peso, mi nombras tiun.
Sed en multaj aferoj mi ne nombras. Ĉu vi tion
komprenas, *hombres?*“

„Tio estas abunda“, Manuel koncize rimarkis. „Se oni
povas misnombri, estis bone kaj abunde.“

Li verŝis la kaforekrementon el kalabasa kruĉo en la
fajron, ekstaris kaj poste diris: „Ni nun ekiru eltranĉi la
timonojn. Mi volas iri posttagmeze ree sur la placon. Eble
mi havos feliĉon kaj ankaŭ alvenos edziĝite ĉinokte. Sed
pli da karno ŝi devus havi, tion mi diras al vi.“

Ili tiam ĉiuj ekstaris iom post iom. Du el la viroj, kiujn
Andreo pro ilia postebria stato elserĉis por tio, iris
eksteren sur la ebenaĵon por observi la bovojn, kaj la
ceteraj kroĉis la maĉetojn al la zono kaj pretigis sin por iri
en la abian arbaron.

La knabino lavis la kruĉeton kaj la pelveton kun la akvo,
troviĝantan en disformita gazolina ladujo kaj portis la
manĝilaron al la ĉaro, en kiu ŝi dormis.

Andreo sekvis ŝin.

Kiam ili staris ĉe la ĉaro, Andreo prenis tri kuprajn

kvinentavajn monerojn el pantalonpoŝo, enmanigis ilin al ŝi kaj diris: „*Tujom ants*, bela ino mia, vi iru nun transen en la urbon kaj aĉetu kelkajn kudrilojn kaj nigran tvirnon. Tiam vi revenu ĉi tien kaj kunkudru ĉiujn truojn en via jupo.“

„Tion mi faros“, diris la knabino. „Tion mi volonte faros, ĉar diras vi tion.“

„Kaj poste“, Andreo parolis plu, „vi iru malsupren al la rivereto, vidu tien, tie malsupre ĝi estas, kaj jen vi lavu viajn piedojn ĝis ili estos puraj, kaj viajn gambojn kaj vian vizaĝon. Kaj se vi estos farinta tion, vi revenu ĉi tien kaj kombadu vian hararon tiom longe ĝis ĝi brilos.“

Ŝi ridis kaj diris: „Tion mi ĉion volonte faros, kiel vi diris tion.“

„Kiam iu demandos vin, al kiu vi apartenas, jen diru, ke vi apartenas al la ĉaristoj de *don* Laŭreano, kaj ke unu el la ĉaristoj estas via *marido*, via edzo. Tiukaze neniu dolorigos vin kaj la polico ne metos vin en karceron, ĉar ĝi supozas, ke vi ne havas mastron kaj forkuris. Kaj se oni demandos vin, kie estas via *na*, via hejmo, kaj kie vi estas

tocvil naskita, tiukaze vi diru, ke en Ĉiapaso. Ĉu vi tion ĉion komprenas, malgranda knabino?“

„Jes, mi komprenas ĉion“, ŝi respondis, „kaj mi ĉion tiel diros kaj faros kiel vi ordonis tion al mi.“

„Vicente, la knabo, restados ĉi tie ĉe la ĉaroj kiel gardanto.“ Andreo estis jam ekironta, por sekvi siajn kamaradojn, kiuj jam iom malproksimiĝis. „Se Vincente alportos akvon, vi restados ĉe la ĉaroj por gardi ilin. Ĉi tie neniu faros ion malbonan al vi, vi ne devas timi ion, malgranda knabino. Mi nun ekiros; ni havas multe da laboro.“

Rimarko

pollitos = kokidoj, kokinetoj

Andreo sciis tre bone, kial li donis ĉiujn tiujn strangajn konsilojn al la knabino.

La knabino ne estis sklavino. Neniu havis korpan rajton je ŝi. Ŝi estis libera meksika civitano. Sed, se oni renkontus ŝin sen akompano kaj ŝi ne povus rakonti akceptindan rakonton, policano kunprenus ŝin al la urbodomo, ĉar li esperus, ke li povas perlabori peson kiel rekompenco de tiu mastro, el kies servistaro ŝi fuĝis kaj ĉe kiu ŝi certe havas ŝuldojn. Estis ja eĉ ne unu indiĝeno, ĉu vira aŭ ina, kiu ne havis ŝuldojn ĉe iu mastro, se ili ne apartenis al sendependa komunumo. Kaj se ŝi ne apartenus al iu mastro, oni arestus ŝin eĉ des pli certe. Iu kulpigo troviĝus ĉiam. Oni kulpigus ŝin esti ebria, aŭ pri tio, ke ŝi ŝtelis de la stando de iu komercisto butonon, aŭ, ke ŝi estas vagabondino sen hejmo kaj loĝloko. Poste la urbestro aŭ la polica ĉefo aŭ la impostoficisto aŭ la politika distriktĉefo, aŭ la ĉefo de la enmigra oficejo ricevus malmultekostan servistinon. Ŝi ricevus ĉiumonate peson da salajro, ĉar ŝi ja ne estis sklavino; la fihumora mastrino kaj ties filinoj batus ŝin. Kaj se la mastro aŭ unu

el ties filoj trovas plaĉon pri ŝi, ili faras al ŝi infanon, ĉu ŝi volas tion ĉu ne, ĉar ŝi devas obei kaj fari tion, kion oni ordonas al ŝi, egale kion oni postulus, eĉ se oni postulus, ke ŝi sternu sin kaj malfermu la gambojn. Sed, se ŝi havis *maridon*, viron, kiu zorgas por ŝi, policisto prefere ne kunprenis ŝin. La ĉaristoj, estas vere, ne havis pli da rajtoj ol indiĝena knabino, sed la policisto aŭ la urbestro certe foje devas rajdi al alia urbo, kaj tiam facile povus okazi – kaj eĉ okazas kun certeco, ke ĉaristoj estas sur la vojo. Kaj preskaŭ neeviteble estas inter ili iam la ĉaristo, kies knabinon oni forprenis pro tiu aŭtoritata persono. Tiu aŭtoritatulo neniam plu revenus, neniu sciis, kie li estas, neniu trovas la termonteton, sub kiu putrus lia karno, kaj dekduo da juĝistoj nek per rekompencoj nek per arestopunoj nek per torturadoj eltrovas, kiu faris tion. Kaj ĉar ĉiuj aŭtoritatoj de la politika ĉefo ĝis la nudapieda policano ĉion tion tre bone sciis kaj sciis tre bone tion ne nur onidire, la edzino de ĉaristo estis tiel netuŝebla kiel la tribestro de sendependa indiĝena komunumo, kiam li tenas la bastonon per la mano.

La ĉaristoj havis nek sindikatojn nek ion similan. Sed ili estis respektataj en la ŝtato. Ili konis nur la memhelpon,

kaj tiun ili uzis tiel konsekvence, tiel brutale kaj kun tia neevitebleco, ke fuĝo ne eblis.

Ili havis tre aĉajn salajrojn, mizeran manĝon kaj senkompate duran laboron, kiu detruas la korpon. Tion ili akceptis, kvazaŭ tio estus neevitebla sorto, en kiun ili estis naskitaj. Sed multajn aliajn aferojn ili ne akceptis. Oni regis, subigis kaj ekspluatis ilin ĝis la lasta sangoguto, kiu estis en ili. Sed eblis nur tiukaze regi kaj sukcese ekspluati ilin, se la regantoj kaj ekspluatantoj tute precize sciis, kion ili povas riski fari kaj kion ne. Kaj la frajntrepenisto, kiu sciis tion plej bone, havis la plej bonajn ĉaristojn kaj enspezis plej multe pere de ili. Kiel tiom da proletoj en Meksiko, Peruo, Bolivio aŭ Venezuelo, ankaŭ la ĉaristoj fajfis pri tio, ĉu oni pafmortigas aŭ pendumas ilin. Tial ili moviĝis ekstere de la leĝo, precipe de tiuj leĝoj, kiuj ne akordigeblis kun la propraj imagoj pri justeco.

Je la frua posttagmezo la viroj revenis en la kampadejon. En la sekva tago ili intencis altreni helpe de la bovoj la eltranĉitajn timonojn kaj trabojn en la kampadejon.

Ambaŭ ĉaristoj, kiuj havis la taskon serĉi la bovojn, ankoraŭ ne revenis. Andreo diris: „Ili ie tie ekstere kuŝiĝis, kaj tie ili ankoraŭ nun dormas. Ili certe ne perdiĝos.“

La knabino fiere montris la flikitan jupon al Andreo. Ĝi estis tiel mallerte flikita, kiel tio eblas en la plej aĉa kazo. Sed ŝi pruvis, ke ŝi almenaŭ havis la bonintencan volon fari tion. Ĉiukaze la jupo aspektis nun iom pli bela ol antaŭe. Iomete pli bela. Por fari bone tiun laboron, estus necesaj flikopecoj, kiujn la knabino ne havis. Sed Andreo promesis, ke li provos ricevi kelkajn ŝtofajn pecojn.

Ŝiaj piedoj kaj gamboj estis ĵus lavitaj, ankaŭ la manoj kaj la vizaĝo. Sed la plej bela estis ŝia hararo. Pro la zorgema kombado, kiu daŭris horojn, la feltiĝinta miksamaso el hararo sur ŝia kapo transformiĝis en longan briletantan profunde nigran ondaron tiom abundan kaj plenan, ke ŝi

povus envualigi sian tutan supran korpoduonon per la hararo.

Andreo vidis ŝin nun unuafoje en hela lumo. Matene, kiam li foriris, la vetero estis ja tiom nebula, malgaja kaj malseka, ke li ne povis gajni ĝustan impreson pri ŝi. Kaj tio, kio eble estis videbla, estis parte kovrita de la ĥorongo, kiun ŝi metis pro la forta frideto tiel sur sian korpon, ke ĝuste nur la okuloj, la nazo kaj la buŝo restis nekovrataj, kaj parte ŝi estis tiom kovrata de koto kaj polvo kaj de terkrusto, ke nur malfacile estis diveneble, kio povus esti sub tio.

Kaj Andreo vidis tre mirigite kaj ankaŭ kun granda kontentiĝo, ke ŝi estas linda knabino kun fortaj blankaj dentoj, kun regulaj trajtoj, brilaj nigraj okuloj, kurta rekta nazo, ronda mentono kaj obtuza malhela bronzokolora haŭto.

Ŝi ridis al li kaj diris: „Ĉu mi nun ĉion tiel faris, kiel vi ordonis?“

„Jes, malgranda knabino, tion vi faris“, li diris al ŝi kaj ekkaptis ŝin je ambaŭ brakoj.

„Kaj ĉu vi estas kontenta pri mi?“ ŝi demandis, pli proksimiĝante al li.

„Jes, mi estas“, li respondis.

Li turnadis ŝin kaj rigardis la knabinon de ĉiuj flankoj. Li vidis nenion alian krom nudapiedan hominfanon en tro kurta ĉemizo kaj disfalanta lanjupo. Tio estis ĉio. Estis nur la flikita kaj iom brodita ĉemizo, la malnova nigra kurta lanjupo kaj la kurta ĥorongo, kion ŝi havis pli ol besto en la ĝangalo. Kaj ŝajnis tute tiel, kvazaŭ ŝi ne bezonus pli por esti feliĉa en la mondo, ĉar ŝi montris al li sen embaraso, kiel ŝi ĝojas en lia proksimo.

„Tiam, post la manĝo“, li diris, „ni denove eliros sur la ebenaĵon, vi kaj mi, kaj sidiĝos kaj rakontos al ni reciproke ion belan.“

„Jes, tion ni certe faros“, ŝi konsentis. „Rakonti ion belan. Vi scias tiom da belaj aferoj. Ĉion, kion vi diras, *Binash Yutsil*, estas bela. Mi povus aŭskulti vin poreterne, kiam vi parolas. Ĉiu vorto estas tiel prudenta.“

Li ekhavis strangan senton, kiam ŝi diris tion. Neniam iu diris al li, ke liaj vortoj estas prudentaj, kaj ke ĉio, kion li

rakontas, estas bela. Sed, ĉar diris tion ŝi, tial li fartis pli bone, ol se dirus tion lia patrino aŭ iu alia persono.

„Mi volas diri al vi ĉiam nur belajn vortojn“, li diris flustrante.

„Tiukaze mi ĝojos por ĉiam“, ŝi respondis.

La juna viro metis la fabojn frutempe sur la fajron, kaj ili estis nun jam preskaŭ molaj.

La viroj lavis siajn manojn, metis la kafokruĉetojn sur la fajron, kaj tiam ĵetiĝis lacaj sur la teron por pasigi la tempon per dormado ĝis la manĝo estos preta.

Nun alvenis ankaŭ ambaŭ viroj, kiuj matene estis elsenditaj por serĉi la bovojn. Ili ne trovis la bovojn, kiel ili klarigis al Andreo.

„Kompreneble ne“, diris Andreo, „vi havas ja eĉ nun dormemajn okulojn. Vi dormis tie malsupre ĉe la rojo.“

„Ĉu vi havas la rajton komandi nin, *pollito*, flavbekulo?“, unu el ambaŭ demandis ĉagrenite.

„Mi ne rajtas komandi vin“, diris Andreo, „tion vi scias. Kaj mi ankaŭ ne volas komandi vin. Sed, se ni ĉi tie tri tagojn postkuras la bovojn kaj la ĉaroj ne estas veturpretaj, se la *comerciantes*, la komercistoj volas ekveturi, tiukaze mi havos mem spektaklon kun la patrono. Kaj vi ĉi tie staras kaj rikanas.“

Manuel, kiu pro laco longe kuŝis sur la tero, rektigis sin kaj diris al ambaŭ: „Andreo pravas. Sur lian kapon trafos la riproĉoj de la *viejo*, de l' ĉefo, se ni ne ekveturos ĝustatempe. Kaj tio tiam estos kulpo via, hontu foje, vi *sinvergüenzas, parranderos, léperos, cabrones!*“

Hajlis svarmo da bestecaj insultvortoj, kiujn li kvazaŭ hurlis, al iliaj vizaĝoj. Dum tio li ekscitiĝis pli kaj pli. Fine li salte ekstaris kaj iris taŭre kliniĝinte rekte al ambaŭ. Li pugnigis la manojn kaj kriis al ili: „Hontu, sterkomerduroj insidaj. For nun! Serĉu la bovojn, aŭ mi dishakos vin en pecojn!“

La du pigruloj sciis, ke tio ne alportos bonon, se oni serioze malamikiĝas al Manuel. Li disdonis krudajn batojn, se li opiniis tion helpema. Ili turniĝis por denove iri sur la ebenaĵon.

Sed Andreo diris: „Prefere restadu ĉi tie kaj eldormiĝu. Morgaŭ frumatene ni iros ĉiuj kune eksteren por serĉi la bovojn. Ni bezonas ilin por la altrenado de la timonoj kaj jugotraboj, kaj morgaŭ ni ankaŭ devos nutri ilin per maizo. *Oye, Vicente, ĉu la frijoles estas molaj? Bueno.* Alportu la tortiljojn. Tiukaze ni nun povos manĝi.“

Kiam ili jam manĝis kaj poste iom dormis, la viroj lavis sin kaj poste deskuis la polvon de la piedoj por iri denove en la urbon. Tie krakadis jam denove la piroteknikaĵoj.

Centmiloj, por ne diri milionoj da apartenantoj de la proleta klaso en Meksiko havas nek tutan ĉemizon nek tutan pantalonon, kaj pri paro da ŝuoj ili eĉ ne revas. Sed ili ĉiam havas monon por aĉeti ĉe la multnombraj sanktulaj festoj de la eklezio grandamase piroteknikaĵojn por pafi en la aeron la monon, monon, kiun ili tiel urĝe bezonas por la plej necesaj aĵoj en la vivo. Honore al la eklezio, kiu neniam konsilis al ili uzi la monon pli bone, tiel kiel la sama eklezio neniam konsilis ne elspezi la lastan peson havatan de proleta familio por kandeloj kaj por prilumi la sanktulojn en preĝejo. En la propra domo la milionoj da proletoj havas nur kenajn splitaĵojn por lumigi ion. Sed en tiu lando, kie la potenco de la katolika eklezio efikis tiom malfeliĉige, estas ĝuste tiuj milionoj da proletoj havantaj nur kenajn torĉojn kiel lumon en siaj kabanoj, kiuj aĉetas la plej multajn kandelojn kaj la plej multajn petardojn por „edifi“ la sanktulojn. La sanktuloj restas ankaŭ tiukaze sanktuloj, se ili ne havas kandelojn kaj neniujn raketojn. Ili bone povas rezigni pri ili, ĉar ili

jam delonge estas mortaj. La ankoraŭ vivanta proleto bezonas ĉemizon kaj pantalonon centfoje pli necese ol sanktulo kandelon aŭ petardon. Sed la eklezio prenas kaj prenas kaj prenas, kaj ĝi interesiĝas malpli ol Satano pri tio, ĉu mankas aŭ ne mankas la plej necesaj aĵoj por la vivo al tiuj, al kiuj ĝi preĝas ĉiam denove doni al la eklezio kaj oferi al ĝi por veni iam en la ĉielon. La eklezion tio tute ne afliktas, ke ekzistas povruloj, kaj ke pro ties instruoj kaj pro la promeso pri la eternaj ĝojoj en la paradizo neniam ajn vidita de iu, kaj pri kiu neniu eĉ scias, kie ĝi estas, pligrandiĝas kaj disvastiĝas la povreco de milionoj da proletoj kiel nesanigebla malsano! Ju pli da povruloj kaj malsatuloj en la mondo estas, des pli granda estas la profito de ĉiuj tiuj, kiuj scias kiel uzi la povrulojn por riĉigi sin je ties laboro. Malsata stomako kaj disŝirita ĉemizo faras la plej servopretan proleton, kiu tial ne ekŝvelas kolere kaj ne ribelas, ĉar lia stomako krias kaj lia haŭto postulas protektan varmon. Se nur la eklezio fariĝas riĉa, plu restas riĉa kaj kun ĝi ĉiuj tiuj, kiuj komandas kaj diras: 'Konservu al la proletaro la religion, ĉar ĝi estas nia plej granda protekto.' Kion la proleto povus havi jam ĉi tie surtere, tion vidas proleto, kies

okuloj ne estas priŝmiritaj. Sed kion li iam povos havi en la paradizo, tion li ne vidas kaj ne scias. Povas okazi al la proleto, ke tiukaze, se vere ekzistas paradizo kaj li tie finfine alvenos post la penoj de la vivo, tie supre sidas la samaj kun la pelvo, kiuj jam ĉi tie surtere ĉerpis la kremon de la vivo. Tiuj ĉi homoj havas firmajn manojn, kaj ili prenas al si tie, kie ili povas preni ion, en la ĉielo aŭ sur la tero. Ili ĉiam ricevas sian parton. Kaj se tro malvastas kudrilotruo, tra kiu kamelo iras pli facile ol ili, ili simple faras ĝin pli vasta kaj la damaĝo estas forigita. Nur kion vi vere havas, proleto, tio estas via kaj vi povas delektiĝi je ĝi. La pasero en la mano estas pli valora por vi ol du grasaj meleagroj en la ĝangalo. Kaj se vi ĉi tie surtere lernis bone ekkapti la okazon kaj preni tion, kion vi meritas, vi estas ekzercita, kiam vi ĉiele alvenos. Eklumigu la kandelojn en via domo kaj ĝoju pri ili, se vi volas elspezi monon por kandeloj, proleto. Fidu al tiuj, kiuj havas surteran sperton, proleto: Se vi rifuzas doni al la eklezio viajn centavojn kaj rifuzas esti devota kaj fidi pri ties aŭtoritato, tiukaze la unktitaj dioservistoj kiel vi devas malsuprenveturi per lifto en la minojn kaj devas kiel vi ŝoveli karbojn, kaj kiam ili staras apud vi kaj kun vi

konstruas danĝerajn minogaleriojn, tiam vi rapide ekscios, kiun valoron ili havas en vero, kiam ili ne portas sutanon kaj ne plu orobrokatan mantelon sur la ŝultroj. Kaj se ili tiam kun vi kaŭros sur la malseka tero kaj kiel vi ĉerpos per kulero la manĝaĉon el gameloj, kiuj estas kotaj kaj ŝvitmalsekaj, kaj se ili tiam kiel vi portos en sia subkonscio la timon, ke atendas ilin eksplodoj de gasmiksaĵoj en la mino, trarompoj de akvo kaj malsuprenrompiĝoj de ŝtontavoloj, tiam lasu foje rakonti al vi de ili la rakonton pri la paradizo. Ili rakontos ĝin tiam en alia maniero, kaj ili fariĝos centfoje pli rapidaj kaj pli bonaj revoluciuloj ol vi estos en via tuta vivo, se vi atendos plu la eternajn goĵojn de la paradizo anstataŭ preni al vi ĉi tie surtere tion, kio estu via kaj kio apartenas al vi pro via laboro.

De Andreo oni ne povis atendi, ke li pensus ion tian, kiam li aŭdis la krakadon de la petardoj honore al la sanktulo Caralampio. Li ne konis paradizon en la alia mondo. Neniu parolis pri tio al li. Sed li ankaŭ ne konis paradizon surteran. Li sciis, kiel vivas la riĉaj bienuloj, li sciis kiel vivas bonstataj komercistoj kaj sukcesaj frajntreprenistoj. Sed, ke li povus partopreni ties

bonfarton, aŭ, ke li eĉ havus rajton postuli pli grandan parton de la havaĵoj, tio ne venis en lian kapon.

Li, kiel ĉiuj ceteraj ĉaristoj, kiel homo vivanta estis surtere en la socia ordo sur tiel malalta ŝtupo, ke por li jam signifus la paradizon, se li havus dudek kvin centavojn pli ĉiutage kiel salajron, se li trovus viandon en sia manĝo, se liaj ŝuldoj ĉe lia mastro ne estus ĉiam multe pli altaj ol li povus perlabori por malpliigi aŭ eĉ nuligi tiujn ŝuldojn.

Ĉion, kion li vere posedis surtere kaj pri kio li povis plezuriĝi, se li trovis la tempon por tio, estis la nuda vivo, kion li havis.

Kaj tio efektive estis multo. Li memoris, ke iutage, kiam li ankoraŭ estis sur la hejma bieno, peono kontraŭdiris ion en kverelo pri la prezo de porko, kiun li bredis mem. Komercisto ofertis al la peono ok pesojn por la porko. Sed la bienulo ofertis por la porko nur kvin pesojn. Kaj kiel peono li estis devigita vendi la porkon al la patrono por nur kvin pesoj, ĉar la patrono havis la prioritatan aĉetorajton je ĉiuj bestoj, kiuj plenkreskiĝis sur lia terposedaĵo, tute egale, kiu bredis kaj provizis ilin per la

maizo, kiun la peono kultivis per siaj propraj manoj sur sia parceleto da tero. Kiam la kverelo fariĝis troa al la bienulo, li koleriĝis kaj batis la peonon per la maĉeto sur la kapon. La peono sangante renversiĝis, kaj kuŝante sur la tero petis mallaŭte plendante: 'Indulgon, *patroncito*, indulgon, ne mortigu min, patronĉjo.' La patrono tretis lin per piedo en la ripojn kaj diris: „Estu ĝoja, kota hundo de indiano, ke vi ankoraŭ havas la vivon. Kion vi bezonas plu?“

Andreo havis la vivon. Kion plian li postulu! Sed la eklezio, tiu granda savanto de la animoj, instruis nek al li nek al aliaj indiĝenoj vivantaj en dependeco, kion instrui devus esti la unua devo de animosavantoj kaj de redemptuloj: Faru la plej bonan kaj la plej avantaĝan el via vivo kaj poste zorgu vin pri la ceteraj aferoj.

Rimarkoj

sinvergüenzas = impertinentaj kanajloj

parranderos = lanteremuloj

léperos = lepruloj

borrachos = ebruloj

cabrones = virkaproj

Ĉapitro 14

01

„Ĉu vi volas iri transen al la urbo, al la *plaza*?“ demandis Andreo la knabinon.

„Ne, aŭ nur tiukaze, se volas vi fari tion“, ŝi respondis.

„Mi prefere irus kun vi eksteren sur la ebenaĵon por sidi tie kaj por rigardi la mondon kaj por aŭskulti vin, se vi parolas.“

Tial ili do iris ĝis la abia arbaro. Ĉe la unuaj arboj ili sidiĝis. De tie ili povis superrigardi la vastan ebenaĵon kaj samtempe ankaŭ longan distancon en la arbaron, kie la arboj staris, sesdek ĝis okdek metrojn altaj kaj dikaj kiel la kolonoj de giganta halo. Filikoj, kelkajn metrojn altaj, staris en la arbaro. Kaj en multaj lokoj estis altaj herbejoj. Dise sur la tero kuŝis abiaj konusoj, kiuj estis tiom grandaj kiom melonoj.

„Vi vivis ĉiam nur sur la altebenaĵo, ĉu?“ li demandis.

„Jes, ĉiam.“

„Tiukaze vi ankoraŭ ne vidis palmojn, neniun ĝangalon,

neniujn tropikajn arbarojn, ĉu?“

Ŝi kapjesis.

„Pri tio mi tre ĝojas“, li diris, rigardante ŝin.

„Kial?“

„Ĉar mi tiukaze povos montri ĉion ĉi al vi, ĉar vi vidos ĉion tion je unua fojo en via vivo pro mi. Tiam ĝi estos ligita por ĉiam en via memoro kun la memoro pri mi.“

„En la memoro, ĉu?“ ŝi demandis, kun vaste malfermitaj okuloj. „Ĉu vi do ne volas, ke mi mem ĉiam restadu ĉe vi? Mi volas restadi ĉe vi, ĉiam. Mi ne volas memori vin. Mi volas esti kun vi, iri kun vi, en bonaj kaj malbonaj tempoj.“

Andreo kaptis manon de ŝi. Li rigardis antaŭ si sur la teron.

Post longa tempo li diris: „Kiu sciu, ĉu mi plaĉos ĉiam al vi, knabineto? Mi ne estas bona, mi supozas. Mi ne scias, kiel mi konduku al edzino. Mi neniam havis inon. Eble mi ne estas tia, kia vi pensas. Vi konas min ja nur unu tagon.“

Ŝi kapjesis kaj diris per voĉo, kiu fariĝis hezitema: „Jes, mi konas vin nur dum tago. Sed ankaŭ vi min konas ja ĝuste nur tagon. Sed post multaj lunoj ni konos nin tiam dum jaro.“

Li ridis, kaj ŝi ekridis kun li.

Du grandaj skaraboj persekutis unu la alian ĉe iliaj piedoj.

En tiu momento ŝi diris sen rigardi lin: „Ĉiu skarabino havas sian skarabon. Mi ne volas esti sola. Mi volas esti kun vi. Mi volas helpi al vi rilate la bovojn kaj ĉe ĉiu alia laboro. Mi lavos por vi, kaj ĉion, kion vi diros, mi faros. Mi ankaŭ lavis min kaj mian hararon por vi. Por mi mem mi ne kombus mian hararon. Tion taŭzos la vento kaj la dormo ja tamen denove. Sed por vi mi kombos ĝin denove kaj denove. Mi ankaŭ flikis mian jupon por vi. Por mi mem ne estus domaĝe, se mia jupo estus plena de truoj.“

„Tiel devas esti“, li diris kun ludata seriozeco. „Mi ne volas, ke vi estu kiel la inoj, kiujn havas kelkaj *muchachos* en la ĉaroj, kiuj neniam lavas sin, kiuj ĉiam estas tute ĉifonitaj, kiuj ebriiĝas, kiam kaj kie ili havas

okazon, kaj poste ruliĝas sur la tero kaj krias kaj blekas senhontajn parolojn.“

„Ion tian mi certe neniam faros, *Binash Yutsil*“, ŝi respondis kaj mienis severe helpe de siaj lipoj.

Poste ŝi aldonis: „Sed kiel mi sciu, kio estas bona, kaj kio ĝustas, kaj kio plaĉas al vi, se vi ne diras al mi? Mi ne estas tiel prudenta kaj tiel sperta kiel vi. Vi devas ĉion diri al mi, kion mi faru por povi plenumi viajn dezirojn. Vi estas viro mia, mia *señor*. Kaj mi ĝojas, ke estas vi, vi kaj neniu alia. Sed, se vi ne diras, kio estas ĝusta kaj kio plaĉas al vi, kiel mi sciu tiukaze? Neniu faris al si zorgojn pri mi, de kiam mia patro estas morta. Sed vi.“ Ŝi rigardis lin subite per vaste malfermitaj okuloj, per okuloj, en kiuj montriĝis petego, malĝojo kaj senhelpeco, ĉio samtempe. „Sed vi, edzo mia, vi zorgas pri mi kaj afliktiĝas pro mi. Vi estas la viro, kiu faras kun mi, kaj kiu rajtas fari kun mi, kaj kiu faru kun mi, kion ajn li volas.“

Li diris malrapide parolante: „Mi certe neniam forlasos vin, knabineto, kaj mi volas diri al vi, ke mi tiel supermezure ĝojas, ke mi trovis vin, kaj ke vi volas, ke mi estu via edzo.“

Li metis manon ĉirkaŭ ŝian kapon, tiris ŝin pli proksime al sia brusto kaj mankaresis ŝian hararon.

Ŝi ekkaptis manon de li, kondukis ĝin al siaj du vangoj, kiujn ŝi premis per siaj mandorsoj, kaj tiam ŝi kisis la manon. Li kliniĝis malsupren sur ŝian hararon kaj tuŝis ĝin per siaj lipoj per gesto, kion li, silente kiel neeldirita elkore karan preĝon, tiom longe daŭrigis, ke al li ŝajnis, kvazaŭ jarcentoj fluus nerimarkataj tra la universo.

Neniu el ambaŭ diris ion plu. Neniu el ili provis fari movon, pro spirete delikata timo, ke per tio io bonfartiga en ilia estado kaj en la mondo povus esti detruata.

Kaj tiel la lasta laca trembrilo de la mortanta tago fluis super la vastan ebenaĵon. La ebenaĵo envualiĝis por la nokto en nebulon longe etendiĝantan, kiu proksimiĝis de ĉiuj flankoj samtempe kiel ondaro kaj kiu antaŭiris la rapide proksimiĝantan nokton.

La nokto venis.

Kiam ambaŭ finfine vekiĝis el sia tranca stato, kiam ili malfermis la okulojn kaj ĉirkaŭrigardis, ili trovis sin ĉirkaŭataj de saturita tenebro. Estis al ili, kvazaŭ

nemezurebla eterneco preterhastis kaj ili, nekonsciaj pri la okazintaĵoj, sole postrestis. Ili sentis ĝojon, ke ili ne estis forŝiritaj unu de la alia, sed, ke la sorto, kiu favoris ilin, kunformige miksis iliajn korojn kaj korpojn en ununuran etan parton de la naturo. Sed la nokto, kiu venis, trovis ilin ambaŭ tiel sendeziraj, kiel ilin forlasis la tago, kiam ĝi adiaŭis ilin. Ili sentis profundan kontentecon, kiu, kiel ŝajnis al ili en tiu momento, estis detruenda per nenio, kio ajn okazos ankoraŭ, kaj kion ajn la venontaj tagoj ankoraŭ kaŝos je malfeliĉo kaj zorgoj.

Ŝi solviĝis iom el liaj brakoj. Mirigite ŝi ĉirkaŭrigardis al ĉiuj flankoj.

„Rigardu“, ŝi diris, „fariĝis nokto. Nigra plena nokto, kaj mi tute ne rimarkis.“

„Ĉu ni nun retroiru al la ĉaroj aŭ al la placo, aŭ ĉu vi volas, ke ni ankoraŭ restadu sidante ĉi tie kaj rakontu ion reciproke?“ li demandis.

„Ĉi tie estas bele“, ŝi respondis, „se vi ne devas labori tie ĉe la ĉaroj, mi certe prefere volus sidi ĉi tie kun vi, tiom longe, ĝis fariĝos frida.“

„Ĉu vi ne malsatas?“ li demandis.

„Ne, mi ne malsatas, kaj se mi malsatus, la malsato volonte atendus. Mi tiom ofte devis atendi manĝon, ke mi lernis, kiel oni forgesas la malsaton. Mi ofte dum tuta tago aŭ ankaŭ dum du ne havis ion por manĝi. Sed nur de tiam, kiam mia patrino kuŝas en tombejo. Iutage ŝi estis morta. Ni ne sciis, kial. Eble estis marĉa febro. Kaj la bienulo ne havis medicinon, neniun blankan pulvoron. Li diris, ke mi foriĝu, ke la patrino estas nur tro pigra, kaj ke

ŝi jam morgaŭ denove estos sana. Sed matene ŝi estis tute kvieta kaj morta. Tute trankvile ŝi foriris.

Mi tiam kuiris por la patro kaj faris ĉion en la domo. Sed tiam iutage estis la festo de la sanktulo Antonio. La bienulo donis al ĉiu peono grandan brandon. Ili trovu plaĉon je la brando. Kiam ili trovis sufiĉe da plaĉo je ĝi, ili volis havi pli da brando. Tial li ja antaŭe donis la fajroakvon al ili. Sed nun, ĉar ili volis havi pli da ĝi, ili devis aĉeti la brandon de li. Kaj li vendis tiom, kiom ili volis, sed ne je kredito.“

„Tion mi scias“, diris Andreo. „Kredite la bienuloj ne rajtas vendi *aguardiente*. Tio estas kontraŭleĝa.“

Ŝi rakontis plu: „Tiam la peonoj alportis sian lastan monon, kiun ili havis, por aĉeti *aguardiente*, poste ili alportis siajn hakilojn, siajn ĉemizojn, siajn pantalonojn, siajn porkojn, siajn kaprinojn, siajn ŝafojn, nur por ricevi *aguardiente*. Ili ne povis trinki ĉion, ili pli forverŝis, ol ili povis trinki. Sed ili aĉetis ĉiam denove. Mia patro trinkis nur tre malmulte. Li estis malĝoja, pro la patrino.

Je la sekva tago estis la granda festo, kiam oni eksigis la

ĝistiamajn *capitános*, la kapitanojn de la eklezio kaj elektis novajn kapitanojn por la eklezia jaro. Mia patro estis en tiu jaro en la vico esti elektota kiel kapitano. Sed tie estis alia viro, kiu same asertis, ke li estas en la vico. Kaj ĉar la novaj *capitanos* devas doni feston en sia domo por ĉiuj homoj, la viro diris, ke mia patro ne povus aranĝi feston, ĉar li ne havas edzinon. Li diris krome, ke li havas ja filinon. Jen la viro diris, ke la filino, kaj tio estis mi, ne povas kuiri kaj ne doni bonan feston, kaj ke la homoj ne povus havi sian sanktulan feston, se kuirus mi.

La viroj ankoraŭ ĉiuj estis ebriaj, ĉar ili aĉetis ĝis la frua mateno brandon, *aguardiente* de la bienulo, kaj tuj matene ili jam denove komencis drinki kaj drinki. Ĉe tio ekestis kverelo pri tio, kiu estu unu el la novaj *capitanos*, ĉu mia patro aŭ la alia. La kverelo pli kaj pli krudiĝis, kaj la homoj, kiuj en sia ebrio tute ne plu sciis, kion ili faras, ludis per la maĉetoj. Ankaŭ tiuj atakoj pli kaj pli akriĝis, kaj mia patro, kiu ne havis maĉeton ĉe si, profunde estis pikita en la ventron de la alia. Li mortis ankoraŭ en la sama nokto. Sed tiam ankaŭ la alia viro estis ankoraŭ pikita. Sed li ne mortis.

Kiam la patro tiam troviĝis sur la tombejo, la bienulo alvokis miajn du fratojn kaj montris al ili la konton de mia patro. Sed ili ne povis pagi la ŝuldojn. Kaj ĉar la bienulo volis havi sian monon pro la konto de mia patro, li vendis miajn du fratojn por la ŝuldosumo al *montería*, al monterio, kie la hispanoj en la praarbaroj havigas al si la mahagonlignon.“

„Kaj tio okazis al viaj kompatindaj fratoj?“

Andreo demandis kompateme.

„Jes“, ŝi diris, „tio okazis al ili. Ili estas ja ankoraŭ tiel junaj, unu el ili deksejara, la alia ne pli aĝa ol deksep jarojn. Ĉar ili estis tiel junaj, ili ne ricevis terpecon sur la bieno, kaj ĉar ili ja krome ankoraŭ ne havis edzinon. Kaj la bienulo ne volis, ke ili forlaboru la ŝuldon sur la bieno. Li diris, ke li tiukaze neniam ricevus sian monon, ĉe la malmultaj centavoj, kiujn li povus pagi por ilia laboro. En la monterioj ili povus perlabori pli da mono. Kaj ĉar la hispanoj neniam povas ricevi sufiĉe da viroj por la monterioj, tial ili elaĉetas ŝuldiĝintajn peonojn, kiuj tiam ĉe ili devos forlabori la ŝuldosumon.“

Andreo intencis diri, ke monterio estas pli terura ol povus esti kia ajn infero, kaj ke indiĝeno, kiun oni vendis tien, tie trovos sian tombon. Sed li prisilentigis tion, kion oni rakontis al li, por ne aflikti la knabinon.

„Ankaŭ min la bienulo volis vendi. Sed la agento de la monterio eĉ por nenio volis havi min, ĉar mi laŭ li estis tro malforta kaj malgranda kaj eĉ ĉe la kuirado ne povus helpi, kaj ĉar mi ne transvivus la marŝon dum semajnoj tra la ĝangalo.“

Malĝoje ŝi aldonis: „Ĉiuj en la vilaĝo diris al mi, ke mi neniam plu revidos miajn fratojn. Kiu estas vendita en monterion de la hispanoj, tiu revenos neniam plu. Li tie mizere pereos, pli mizere ol besto. Tial ĉiam la agentoj vagadas ĉi tie, por elaĉeti pliajn peonojn kaj por logi aliajn homojn, kiuj liberas, per kontraktoj.

Kiam miaj fratoj tiam forestis, venis la bienulo en nian kabanon kaj diris: 'La kabanon mi nun donis al Daniel. Vi venos al la *casa*, en la mastrodomon, kaj laboros en la kuirejo. Tuj.' Mi tiam laboris en la domo. Frumatene, tri horojn antaŭ la sunleviĝo mi ekstaris kaj pistis grajnojn kaj lavis la manĝilaron kaj frotlavis la ĉambrojn kaj

laboris ĝis kvar horoj post sunsubiro. Li pagis nenion al mi kaj ne donis jupon al mi kaj nenion ajn.“

Andreo interrompis ŝin: „Kaj tial vi forkuris, ĉu?“

„Ne, tial ne“, ŝi rediris. „Ĉiuj servistinoj ja same laboras. Sed Jose, la filo de la bienulo, estis seninterrompe ĉirkaŭ mi kaj sendis min nokte jen tien jen ĉi tien, kaj tiam li kaptis min kaj diris, ke mi venu en lian liton. Sed mi tre timis lin. Li estas tiom kruda kaj morna. Li kunestis kun knabinoj de la peonoj, kiuj ĉiuj havas infanojn de li, kaj la knabinoj ne povas gajni indiĝenan viron, ĉar la junaj viroj ĉiuj timas, ke Jose pafmortigos ilin, ĉar la knabinoj ja estas liaj knabinoj. Kaj se efektive knabino el ili trovas junan viron, kiu ŝatas ŝin, tiukaze la viro neniam scias, kiam Jose denove volos havi ŝin, kaj tiam li batas la viron, se tiu ion diras kontraŭ tio, aŭ pafmortigas lin. Du virojn el ili li jam pafmortigis. Sed la municipaj aŭtoritatoj nenion entreprenis kontraŭ li, ĉar la *presidente* estas lia amiko. Kaj li diris, ke la du viroj per maĉetoj volis senkapigi lin, kiam li serĉis en la arbaro disirintajn bovojn kun ili, kaj ke li devis pafmortigi ambaŭ virojn por gardi sian vivon kontraŭ ili. Li ne pafmortigis ilin je la sama

tago, la unuan el ili en la pasinta jaro kaj la duan en tiu ĉi jaro. Li ankaŭ volis pafmortigi alian, sed tiu prenis en la nokto sian edzinon kaj migris kun ŝi al Tabasko. Sed la knabinoj povas fari nenion kontraŭ li. Li estas tiom forta. Ili tiam devas labori en la domo, kaj li alportas por ili el la urbo silkajn rubandojn kaj perloĉenojn kaj orelingojn kaj diras al ili, ke ili ĉiam restados ĉe li, kie ili havos bonan vivon kiel por ekzemplo la mastrino. La knabinoj scias, ke ĉio ĉi estas granda mensogo. Sed ili povas fari nenion. Ili estas la knabinoj de peonoj. Kiam mi tiam estis ĉe la rivero, por lavi min, jen li alrajdis, haltis kaj diris: 'Vi venos hodiaŭ en mian liton, ĉu vi komprenas, rato?' Mi diris: 'Sed mi ne volas veni al vi, mi timas vin. La knabinoj ploras antaŭ vi, kaj vi batas ilin.' Jen li diris: 'Vi ne devas timi min, rato, mi estos tre bona al vi, se ankaŭ vi al mi estos tre bona. La knabinoj estas impertinentaj kaj mensogas, tial mi devas tradraŝi ilin, por ke ili ne mensogu en la vilaĝo kaj ĉe mia patrino. Mi kunportos ruĝajn silkorubandojn al vi, kiam mi rajdos al la poŝtejo.' Mi diris: 'Lasu min, mi petas, en paco, *patroncito*, mi ne volas veni, kaj mi ne venos.' Jen li deseliĝis de la ĉevalo kaj batis min per la vipo sur la dorson, tiel, ke mi

surgenuiĝis pro doloro kaj timo. Tiam li tute proksimiĝis al mi, kaptis mian hararon kaj ŝire ekstarigis min pere de la hararo tiel, ke mi kriis, ĉar tio tre dolorigis min. Li tiradis mian hararon en siaj pugnoj kune kun mi tien kaj ĉi tien kaj diris: ' Rato, vi venos hodiaŭ vespere en mian liton. Se vi ne venos, mi tiros vin el via angulo kaj elŝiros al vi la tutan hararon kune kun la haŭto, kaj tion mi tiam ĵetos antaŭ la porkojn, kaj mi enfermos vin dum la nokto en la maizgrenejon, por ke la ratoj voru vin vivanta, kaj tio, kio restos de vi, mi ĵetos tiam al la porkoj. Tion mi ĵuras al vi ĉe Sankta Virgulino kaj la Infano, ke mi ĉion tion faros kun vi, se vi ne venos en mian liton hodiaŭ vespere. Mi lasos la fenestron malfermita.' Tiam li puŝis min teren.

Sciu, Andreo“, ŝi turnis sin al li, „jen en la maizgrenejo estas pli ol mil grandaj ratoj, kiuj formanĝacas ĉion, kio nokte eniĝis la grenejon. Kaj tial mi tre timis. Tial mi nokte volis iri al li, kiel li ordonis tion. Sed, kiam mi revenis de la rivero, jen venis renkonte al mi unu el liaj knabinoj, kiu havas tri infanojn de li, kaj ŝi diris: '*Chica*, mi scias, Jose vin persekutas, sed ne obeu lin. Vi ne ricevos bonan viron, sed vi ricevos infanon, kaj vi estas

ankoraŭ tiom juna, vi ne scias, kion fari kun la infano, kaj tiam ĝi mortos.' Post la manĝo, kiam la patrono kaj ĉiuj aliaj en la domo dormis, kaj ankaŭ Jose, mi forkuris. Unue tra la granda arbaro, kie mi plu timis kaj volis reiri. Sed jen venis indiĝeno kun sia ino, ili pelis porkojn al Jovel. Kun tiuj mi tiam iris grandan parton de la vojo. Kaj ili diris al mi, ke en Balún-Canán estas la festo de la sanktulo Caralampio, kaj ke mi iru tien, ke mi tie facile trovos servolaboron, kaj ke mi, ĉar estas urbo, estos sekura kontraŭ la bienuloj.

Ili estis tre bonaj al mi, la paro, ili parolis kiel mi, mian lingvon. Kiam ni tiam krucis vojon, ili diris al mi, ke mi iru tien, ĉar la vojo estas pli mallonga al Balún-Canán. Se mi irus kun ili al Jovel, mi venus tro malfrue al la sanktulofesto, ĉar tio estus granda ĉirkaŭvojo kaj kun la porkoj ili ne antaŭeniĝus tiel rapide kiel mi, ĉar mi estas sola kaj ne havas ion por porti.

Ili diris ĉion, kion mi faru, kaj ili rakontis, ke sur tiu vojo mi renkontos komercistojn, indiĝenajn potaĵkomercistojn, ĉapelfaristojn, plektistojn de petatoj, felokomercistojn, faristojn de lanrubandoj, kiuj ĉiuj kiel

mi iros al Balún-Canán por tie vendi siajn varojn. Ili diris, ke mi aliĝu al tiuj, kiuj ŝajnas al mi plej afablaj, kaj, se iu demandus min, kial mi iras sola kaj ĉu mi estas forkurinta ie de bieno aŭ de servo, tiukaze mi diru, ke mi solene promesis al mia mortinta patrino, ke mi iros al la festo de la sanktulo Caralampio kaj oferos kandelon kaj kisos liajn plandojn. Ili aldonis, ke tion ĉiu kredos al mi, se mi diros tion, kaj ke mi ne diru, ke mi venis de bieno, sed ke mi estas el Bachajón, ĉar tio estas sendependa *pueblo*, libera indiĝena vilaĝo.

Ili donis al mi kelkajn tortiljojn, fazeolojn kaj kelkajn akrajn kapsikojn, kaj mi ektrotis. Sed je la unua tago mi neniun trafis sur la vojo, la tutan tagon ne. Malfrue posttagmeze mi venis al maizejo, kie estis du kabanoj, en kiuj vivis kelkaj indiĝenaj familioj, al kiuj apartenis tiuj du maizkampoj. Mi rakontis al ili, ke mi estas sur la vojo al Balún-Canán por kisi la plandojn de la granda sankta dio, ĉar tio estas solena promeso al mia morta patrino, kaj mi rakontis ĉion, kion mi laŭ la viro kaj la ino kun la porkoj devis rakonti. La homoj donis al mi manĝon kaj mi restadis dum la nokto en ilia kabano ĉe la fajro, kie estis varme. Matene, kiam la suno estis leviĝinta, mi volis ekiri,

sed la homoj diris, ke mi ne iru sola, ĉar sur la vojo estas jaguaroj kaj pumoj. Sed pumojn ili ankoraŭ neniam vidis en tiu regiono, sed jaguarojn ja jam ofte.

Ili diris, ke mi prefere atendu, ĉar posttagmeze aŭ morgaŭ en la mateno preterpasos multaj indiĝenaj komercistoj kun siaj inoj kaj infanoj, kiuj iros ĉiuj kiel mi kun siaj varoj al Balún-Canán, kaj ke ankaŭ el tiu domo, kie ni staris, kuniros viro kaj edzino, kiuj portas papagojn al la festo, por tie vendi ilin.

Tiel vere okazis. Jam tagmeze venis tiuj komercistoj kun siaj familioj. Ili venis el la regionoj de Cancúc, Oshchúc, Chiilum, Hucutsín, Sivacjá, Tultepec, Chanjál, kaj mi ne scias de kie plu. Ili ĉiuj kolektiĝis en Achlumál, kaj tie la *presidente* de la urbo ne lasis preterpasi ilin. Unue ili devis pagi kontribuojn al li por la pasrajto, do por la permeso uzi la vojojn. Ili ne sciis, ke tie la *presidente* forprenus ilian lastan monon, alikaze ili irus sur ĉirkaŭvojo, kaj tute tuŝus lokon, kie estas *presidentes*. Pro tio la *presidentes* ĉiuj fariĝas riĉaj kaj tiam baldaŭ povos aĉeti bienon al si.

Kaj kun tiuj komercistoj mi venis tiam ĉi tien. Sed mi ne

trovis servolaboron. Neniu demandis min, ĉu mi volus servi por ili. Mi timis demandi la ladinojn pro laboro kiel servistino. Ĉiufoje, kiam mi staris antaŭ dompordo, por demandi ĉu mi povus servi ĉe ili kaj iu paŝis el la domo, jen mi vidis, ke ili havas ĉiam tre malicajn vizaĝojn. Jen mi timis ilin kaj ne demandis plu pro servo. Sed, ĉar mi malsatis, mi tamen ĉiufoje atendis antaŭ la pordoj, por ke eble iu demandu min, ĉu mi volas havi servon en la domo. Sed, kiam la mastro aŭ la mastrino elvenis, ili puŝis min kontraŭ ŝultron kaj vokis: 'For de ĉi tie, vi certe volas ŝteli ĉi tie, foriĝu kaj ne lasu vidi vin je dua fojo ĉe ni!' Jen mi havis ĉiam denove timon. Kaj mi ne sciis, kion fari kaj kion manĝi. Kaj finfine mi sidiĝis en malhela angulo por morti, ĉar mi estis tiel malĝoja. Kaj kiam mi tie tiel malĝoja sidis kaj pensis, ke mi nun baldaŭ mortos, jen vi tiam venis, kaj vi estis afabla al mi sen koni min, kaj vi faris min via edzino sen demandi, kiu mi estas kaj de kie mi venas. Vi estas tiom bona, *Binash Yutsil*, kaj mi ĉiam estos bona al vi kaj neniam malĝojigos aŭ dolorigos vin.“

Rimarkoj

chica = knabino

montería = monterio, laborkoncentrejo en la ĝangalo, kie oni

dehakas kaj prilaboras permane la mahagonarbojn por povi fortransporti ilin de tie. Tiu laboro per maŝinoj ne fareblas, pro la tro altaj kostoj.

Andreo tiris ŝin al si kaj karesis ŝian vizaĝon. Li intencis forpeli de ŝi ĉiun malfeliĉon trasuferitan en la lastaj monatoj, li volis forgesigi ŝin, ke ŝi estas sola surtere. Pro sia senhelpeco kaj sia soleco ŝi kondukis tiel bonvole al li pri ĉio, ke li eksentis sin kompatindulo rilate al ŝi.

Li ne sciis, kion fari; ĉu konservi sian rilaton al ŝi en la ĝistiamata stato, aŭ ĉu li akceptu ŝin serioze kiel sian edzinon. Neniu ĉeestis, ne ĉe li kaj ne ĉe la ĉaroj, kiun li povus demandi pri konsilo, kion fari por ĝojigi kaj feliĉigi la knabinon. Eble, se li havus la patrinon proksime, ŝi certe povus diri al li, kio estas bona kaj ĝusta. Sed ju pli li cerbumis, des pli ŝajnis al li, ke eĉ la propra patrino pri tiu afero ne povus konsili. Fariĝis klare al li, ke estas nur lia propra afero, kaj ke tial nur li mem povos decidi kaj agi laŭ tio, kiel instigas kaj postulas tion de li lia emo al la knabino.

Pro tiu konsidero kaj pripensado li pli kaj pli malcertis. Li ne plu komprenis sin mem. Ne estis lia maniero esti nedecidema. Kaj tiom pli kiel ĉaristo hezito estis fremda por li. En la plej multaj kazoj la ĉaristoj rapide kaj kun

certeco devis decidi, kion fari. Memgarda pripensado povus kosti la ĉaron, varojn, kelkajn bovojn kaj eble eĉ la vivon de kamarado.

Kvankam Andreo ankoraŭ neniam spertis ion persone pri inoj, li sentis instinkte, ke ĉe ĉiu alia ino li sciis sen longa pripensado, kion fari kaj kiel fari la ĝustan.

Male al tio li estis rilate al tiu ĉi ino ŝanceliĝema pri decido. Certa li estis nur pri tio, ke li ŝatas ŝin, kaj ke li ne volas perdi ŝian inklinon. Kaj li timis, ke li povus perdi ŝian konfidon kaj inklinon, se li farus la malĝustan. Sed kio estas en tiu momento la malĝusta, ĝuste tion li ne sciis. Povus esti, ke tio, kio momente estas la malĝusta, morgaŭ estos ĝusta.

Se li nur divenus, kion la knabino atendas. Sed de kiam li sciis, ke ŝi estas sen certa sperto, kaj ke ŝi mem pri tio, kion ŝi parte divenis, ne havas certan imagon, li eĉ ne per malgrandaj trukoj povus ellogi, kion ŝi atendas.

Plenumi al ŝi tiun parte ankoraŭ revatan kaj parte jam urĝan deziron, kiu eble leviĝis en la lasta horo en ŝi, povus same detrui tiun bonfartigan staton, en kiu li

troviĝas rilate al ŝi, kiel la malo, se li ne plenumus ĝin.

La solan instinkton aŭ impulson, kiun li sentis tute certe rilate al ŝi, estis tiu, ke li ne volas perdi ŝin, kaj ke li tion, kion li por si mem priskribis kiel ŝian kvietan animon, ne volas detrui.

Li rememoris tiumomente, ke li diris al la ĉaristoj, ke ŝi estas lia edzino, kaj ke li diris al ili, kiam iliaj aludoj ne plu misinterpreteblis, ke li estis en la nokto ĉe ŝi. Sed tio ne estis la vero. Li diris tion nur, ĉar li pro denaska indiĝena ruzo tuj komprenis, ke li sufokas per tia facile donita koncedo ĉiujn pluajn demandojn. Li diris:

„Kompreneble mi estis ĉe ŝi, kion alian vi pensas!“ Per tio estis kreita fakto, kiu al neniu de liaj kamaradoj plu donis okazon enmiksiĝi per spicitaj paroladoj en liajn privatajn aferojn. Kaj en tiu kazo li trafis per sia koncedo la ĝustan. Post tiuj amikece diritaj paroloj, per kiuj la viroj stimulis sin je lia geedza travivaĵo por iom kunĝui ĝin, la knabino estis gardata kontraŭ iuj obscenaj vortoj. Ŝi estis akceptita en la parencaro kaj ekde nun oni respektis ŝin kiel la laŭrajtan edzinon de membro de la parencaro. Je okazaĵo, foje akceptita kiel neŝanĝebla fakto de ĉiuj

ĉeestantoj kaj amikoj, perdiĝas obscenaj paroloj sen eĥo, ĉar ili fariĝas senvaloraj, senenhavaj kaj senefikaj.

La knabino ne komprenis, kial Andreo enkondukis ŝin kiel sian edzinon ĉe la ĉaristoj, ĉar li diris tion hispanlingve. Sed ŝi tre bone sentis, kion li opinias. Ŝi mem diris al li, ke ŝi nun estas lia edzino.

Sed Andreo ne sciis, kiel vaste etendiĝas la senco de la vorto por la knabino, kion ŝi imagas pri la edzino de viro. Li havis la impreson, ke ŝi ĝis tiu horo komprenis pri rilato inter viro kaj edzino ne pli ol tion, ke ino obeas certan viron, kiun ŝi rigardas kiel sian mastron, kaj kiu zorgas por ŝi, kiun ŝi subtenas ĉe la laboro laŭ siaj plej bonaj fortoj kaj kapabloj.

Kiam li venis kun ĉiuj siaj konsideroj al finpunkto kaj lia plua pensado kaj pripensado ŝajne nur denove remigris kaj sin perdiĝis en cirklo, Andreo fine konvinkiĝis, ke li hodiaŭ aŭ morgaŭ neniukaze volas ŝanĝi aŭ influi la aktualan staton de ilia kunesto. Per tio li rericevis sian sekurecon. Kaj kun tiu gajnita sekureco li trovis la certecon, ke ĉio, kion li aŭ la knabino pli deziras, iutage aŭ en iu nokto tute per si mem okazos, kiel io, kio estas

neŝanĝebla, nedeturnigebla kaj neevitebla en tiu momento, kiam ĝi okazas. Tiam tio estos plej ĝuebla, pli ĝuebla ol ĝi povus esti en tiu momento. Tiun ĝuindan aferon travivi je la ĝusta kaj neevitebla tempo, ŝajnis instinkte al li tia dolĉa kaj perfekta, ke ĝi estas tiom valora por li, ke oni ne disipu ĝin dum necertaj konsideroj kaj flirtantaj sentoj.

Tre bone imageblis, ke la knabino pensis ion similan. Ŝi estis nesperta nur pri la ago kaj la ĝuo mem. Sed ŝi ne estis tute nesperta en certa scio pri la okazaĵoj. Ŝi estis ja indiĝena knabino, natura kiel arbara besto kun siaj instinktoj, sentoj kaj impulsoj. Ŝi vidis en sia hejma domo, kio okazas, kaj aliaj, pli aĝaj kaj jam edziniĝintaj knabinoj parolis pri tiaj agoj en la plej natura maniero, kiel pri aĵoj, kiuj estas tiel simplaj kiel manĝado, dormo, laboro kaj danco. Estis agoj, kiuj nek per vortoj nek per gestoj estis kaŝataj, pri kiuj oni parolis libere kaj sen embaraso, tiel, kiel pri la koloro de brodaĵo de ĉemizo aŭ jaketo. Estis agoj, kiuj ŝajne necesas kaj neeviteblas. Kaj des pli estis eĉ agoj, kiuj ŝajne plaĉas al ĉiu, kiuj ĝojigas ĉiun, kaj al kiuj oni konsentas, kiam ajn oni havas la deziron en si.

Ŝia deziro estis instinkta. Se Andreo eĉ nur per vorto aŭ gesto esprimus la deziron, ŝi estus preta por ĉia tia ago. Sed kiel ŝi sentis, ŝi estus preta nur tial, ĉar li deziras tion, kaj ŝi kiel lia edzino sentus sin devigita obei al li kaj permesi tion, kion li postulas. Parte nekonscie kaj silente ŝi demandis sian propran senton ankore kun la sama longa silentemo, kun kiu Andreo en sia kapo pesis ĉiujn pensojn kaj sopirojn.

Estis ŝia sento kaj estis ŝia instinkto, kiuj kondukis la knabinon al la sama decido, al kiu venis ankaŭ Andreo en la sama minuto. Tiel ŝi trovis ĝin tre bonfartiga, ke Andreo postulis nenion kaj deziris nenion, kaj nenion aludis, sed, ke li sidis nur apud ŝi kaj protektis ŝin kun siaj brakoj.

Ĝuste tio, ke li ne urĝis ŝin, ne postulis ion, ke li atendis je la sama neevitebla destino, kiun atendis ŝi, estis tio, kio naskis ion en ŝia koro kaj lasis kreski tion, kion ŝi sentis neniam ĝis tiu momento. Sento, al kiu ŝi ne povis doni nomon. Sento, kiu ŝin tute varmigis, kio faciligis ŝian animon, kio donis al ŝi strangajn kreaĵn fortojn, kio donis al ŝi profundan sekurecon kaj senton pri nestvarmo. Ŝi

sentis, kvazaŭ ŝia koro plivastiĝus kaj plivastiĝus, ĝis ŝi opiniis, ke ĝi plenigas ŝian tutan korpon. Ŝi opiniis aŭskulti sian koron ne nur en la brusto, sed je ĉiu ajn parto de sia korpo. Kaptis ŝin la mistera sento pri la konscio, ke ŝia koro kaj ŝia spirito, la animo kaj la korpo fariĝis ondeganta, sed nedisigebla unueco.

Tiam ŝi fine portis en si nur solan deziron plu, pri kiu ŝi supozis, ke ŝi povus esprimi ĝin per vortoj, por klariĝi pri tiu deziro: Mi volus, ke li mortigu min; tio estus la plej dolĉa, kio povus okazi surtere.

Ŝi kisis liajn manojn kaj ennestigis sin pli profunden inter liajn brakojn por esti pli proksima al li. Dolorigis ŝin, ke ŝi ne povis enrampi en lin por tute unuiĝi kun li.

Jen li karesis ŝian hararon kaj diris: „Aŭskultu, *tujom ants*, mia bela malgranda edzino, vi estas kiel tute eta steleto en la ĉielo. Ĉiam, kiam mi vidas vin aŭ sentas aŭ pensas pri vi, tiam mi devas pensi pri la historio, kiun vi rakontis al mi, kaj kiun rakontis al vi via bona patrino. Vi estas malgranda steleto je mia ĉielo, la plej bela kaj plej aminda steleto, kian mi povas imagi en mia animo. Se mi estus reĝo, kiu ekiras por doni la sunon al la kompatindaj

homoj, mi fiksigus vin kiel mian unuan briletantan steleton meze de mia ŝirmilo. Tiam vi estus ĉiam kaj eterne ĉe mi, se mi suprengrimpus je la granda blua volbaĵo de la ĉielo. Tiam mi neniam estus sola, sed ĉiam ĝoja, kaj mi jubilus de sur la ĉiela katedralo, tiel, ke la tuta mondo aŭskultu tion, kiom ĝoja kaj feliĉa mi estas. Mi donacus al ĉiuj homoj nur ĝojon kaj feliĉon kaj ridadon, tiel, ke neniu malĝojo plu estu, nenie surtere, kaj ke neniu indiĝenaj peonoj plu suferu sur la bienoj kaj devu toleri maljustecon, sed, ke ĉiuj estu ĝojaj sur sia kamparo, kies fruktoj apartenu al ili kaj al neniu alia. Kun vi, mia malgranda steleto en mia ŝirmilo, mi spitus al ĉiuj malicaj dioj, kaj mi ne estus afliktita stari supre meze de la ĉielo, for de la Tero, kaj for de ĉio alia. Kun vi en mia ŝirmilo mi povus konkeri ĉiujn mondojn, kiuj ekzistas, por alporti al ĉiuj homoj ĝojon, kie ajn ili vivas. Vi ne havas nomon, malgranda knabino, sed mi volas doni al vi nomon: *Estrellita*. Ĉu vi scias, kion tio signifas? Ĝi signifas: Malgranda steleto. *Estrellita* mia, *dulce Estrellita*, mia dolĉa malgranda steleto, kiu falis de la ĉielo sur mian sinon.“

Ŝi, kiu malpli kapablis esprimi sin per vortoj, kion ŝi

sentas kaj kion ŝi portas en la koro, diris simple: „Kaj vi, *Binash Yutsil Huinic*, vi estas mia Chicovaneg, kiu donis al mi la sunon. Sed mi ne povas doni tiun nomon al vi, ĉar ĝi estas la nomo de alia. Por mi vi estos por ĉiam kaj eterne Chicovaneg. Sed mi volas doni al vi la voknomon: *Viltesvanel*. Ĉar vi estas en vero *Viltesvanel*, ĉar vi al ĉiuj aĵoj surtere povas doni belajn nomojn kaj belege scias rakonti. He, mia *Binash Yutsil Huinic*, kiel plaĉas al vi via nomo?“

„Ĝi estas la plej bela nomo, kiun mi akceptas kiel mian, ĉar donis vi ĝin al mi, steleto mia.“

Ĉapitro 15

01

La marŝkolono de Andreo estis preta por la ekveturo. Mallonge post noktomezo ili volis ekveturi de la ebenaĵo por ŝarĝi la lastajn transportendaĵojn en la urbo, kie la komercistoj atendis kun siaj pakaĵoj. Andreo havis la intencon esti survoje kun sia kolono jam antaŭ la kvara matene. La ĉaristoj interkonsentiĝis, ke la kolonoj, por ke ili povu formi grandan kaj fortan karavanon, atendu la aliajn kolonojn apud la malnova piramido Junchavin, troviĝanta dekstre de la vojo, sur kiu la kolono devas veturi. Ĉar la vojo ĝis la indiĝena urbeto Tsobtajal estis ne tute sekura kontraŭ banditoj, kiuj tie loĝis en solecaj ranĉoj kaj kiuj kalkulis pri tio, ke ili povu rikolti konsiderindan parton de la abundaj benoj, kiujn la sanktulo Caralampio donacis al centoj de komercistoj kaj ruletbankieroj, se ili kiel rabistoj nur lerte penas pri tio.

Ĉar la ĉaroj tiutempe ĉiuj troviĝis jam en bona veturstato, kaj ĉar oni jam alkondukis la bovojn kaj tenis ilin sub bona kontrolo proksime de la kampadejo por havi ilin rapide ĉemane, tuj kiam estos eksoninta la marŝordono,

estis vespere fakte nenio plu farenda en la kampadejo.

Kaj ĉar la kampadejo mem havis eĉ ne iom da alloga forto, ĉar oni konis ĝin jam tro bone, kelkaj ĉaristoj ekiris por ankoraŭfoje viziti la urbon, por elgustumi ankaŭ la lastajn restojn de la sanktula festo, kiu ĵus finiĝis kaj por ankoraŭ rapide kunpreni de la ĝojoj tion, kio ankoraŭ kapteblas en la lastaj horoj.

Inter la ĉaristoj, kiuj iris al la urbo, troviĝis ankaŭ Manuel, la amiko kaj kunlaboristo de Andreo.

Veninte en la urbon, li trovis, ke la foirplaco jam tre trankviliĝis, kaj ke la tuta urbo ŝajnis prepari sin refali post tiuj tumultaj semajnoj en sian kvietan kaj memkontentan estadon. Oni havis la impreson, almenaŭ sur la tristiĝanta foirplaco, ke la urbo kaj ties loĝantoj en la profundo de siaj koroj estas ĝojaj, ke tiu sovaĝa festo estas finita kaj, ke ĉiuj denove povos fordoni sin al la kvieta kontempla vivo, en kiu la solaj ĝojigaj kaj varioplenaj aferoj estas serĉi klaĉon kaj tiel bone kiel eblas disvastigi ĝin por semi malamon kaj ĵaluzon inter si kaj la parencaĵoj kaj por bone nutri kaj bredi, grasigi kaj plenigi la malamon kaj la ĵaluzon. La bonaj civitanoj

ekokupiĝis denove pri la naskado de novaj civitanoj, el kiuj poste multaj estis kondamnitaj de siaj gepatroj porti la nomon Caralampio tra la tuta vivo – por meksikaj oreloj tiu nomo estas aĉe sonanta – pro neniu alia kaŭzo krom tiu, ke la gepatroj supozis, ke la infano, kiu ricevis tiun elektitan nomon, povos ĝoji super ĉiuj mezuroj pri la speciala protekto de la sanktulo Caralampio rilate ĉiujn ĉielajn kaj surterajn aferojn de la vivo.

La plimulto de la komercistoj jam fermis siajn standojn, kaj ties pruntitaj tabloj kaj budoj estis jam forportitaj aŭ ĝuste nun malkonstruataj de la pruntedonintoj. Nur je la ludotabloj la negoco ankoraŭ estis bona, tiel, kiel ĉe la kuirejaj tabloj, je la tendorestoracioj kaj kompreneble en la kantinoj, kie la „mamnutristinoj“ nerveze kaj haste pelis siajn „kelnerinojn“ antaŭen por ke ili aranĝu la lastan vesperon kiel la plej sukcesan.

Tie en la kantinoj fariĝis ju pli sovaĝe, des pli malfrue estis kaj des pli proksimiĝis la momento, kiam ankaŭ tiuj knabinoj, kiuj alportis tiom da ĝojo al la malsataj viroj de la urbo, devos pretigi sin por la vojaĝekveturo por ankoraŭ atingi sufiĉe frue la veturpretajn ĉarojn.

Ĉiu, kiu estas aŭtoritato, aŭ kiu senpere servas al la aŭtoritato troviĝis en la laŭta beateco de sufiĉe da enverŝitaj torentoj de komiteko kaj biero. La aŭtoritatoj estis ĝojaj kun la ĝojuloj. Ili ne plu vidis kaj ne plu aŭdis ion. Sankta Caralampio toleris kaj benis la elbalaadon de sia aktuala festo.

La honorindaj edzinoj de la bonaj kaj respektindaj civitanoj de la urbo estis bone konservataj en siaj geedzaj litoj. Kaj ĉar tio en Meksiko estas kontraŭ ĉiuj moroj, ke sinjorino hastu en la noktaj horoj tra la urboj kaj rastu la kantinojn, ĝojohalojn kaj voluptotemplojn pro sia edzo, ĉar ŝi ankaŭ sen tio jam scias, kion li faras en tiu bela tempo de bonfartiga nokto, la viroj restadas sen ĝeno dum sia strebado transdoni siajn lastajn profundajn kaj respektoplenajn dankesprimojn al sanktulo Caralampio. La viro, kiu laboras, havu plezuron; kaj la viro, kiu ne laboras, havu eĉ pli da plezuroj.

La plimulto de la honorindaj civitanoj de Balún-Canán ne laboras. Kiam komenciĝas ilia efektiva vivo kiel matura viro, ili avide klopodas iel kunkolekti kvincent pesojn.

Kiam ili kunhavas tiujn kvincent pesojn, aŭ kvarcent pesojn, ne dependas de kelkaj centavoj pli aŭ malpli, ili geedziĝas. Kiam ili jam estas edzoj dum du semajnoj kaj la plej supraj kremtavoloj de la geedza vivo estas jam ĉerpitaj per kulero, tiam ili aĉetas malgrandan *tienda*, malgrandan vendejon, en kiu oni elmetas la plej necesajn bezonataĵojn de la ĉiutaga vivo.

En tiun ĉi vendejon ili metas sian edzinon, ĉar iu ja devas esti en la vendejo. La edzino donas ekde tiam al sia edzo ĉiutage du pesojn, kelkfoje tri, kaj foje nur unu peson el la gajno de la vendejo. Ĉiujn eldonojn por la domo kaj por la vivteno de la familio la edzino devas gajni per ekonomia mastrumado el la vendejo, post kiam ŝi transdonis la ĉiutagan parton da tri aŭ du pesoj.

Ŝi pliriĉigas la negocon per tio, ke ŝi muldas kandelojn, kudras vestojn, ŝakras kun la indiĝenoj, kiuj vendas siajn produktojn, ke ŝi produktas *rompopo*, ovolikvoron, ke ŝi vendas pomalgrande en malantaŭa ĉambreto komitekojn sen pagi la impostojn, kaj per tio, ke ŝi intertraktas dum horoj kun la kontrabandistoj, kiuj kontrabandas silkajn ŝtofojn el Gvatemalo.

La edzo zorgas pri tio, ke ŝi ricevu multajn infanojn. Tio estas lia tuta laboro. Jen la ofico de la princeca edzo. Li estas ĉiam gaja, afabla, kontenta pri la mondo, ĝenerale kaj speciale pri ĉiuj siaj kuncivitanoj. En la cetera tempo li faras politikon. Li ĉiam havas revolveron en la zona pistolingo. Kaj se okazas balotado, li provas kapti postenon por fariĝi urbestro aŭ polica ĉefo aŭ vendisto de impostmarkoj aŭ impostkolektisto aŭ poŝteja estro. Se li fariĝas urbestro, ĉiuj liaj plej bonaj amikoj ricevas bonan postenon. Li forgesas neniun. Pro tia vivo kaj pro tia nekompareble bela, dum la tuta jaro same balzama klimato de la regiono, kie neniam estas tuberkulozo aŭ kancero, li fariĝas, sen fari ion por tio, okdekjara, cent - aŭ eĉ cent tridek jara. Jen aĝo, kiun oni ne vidas je lia aspekto; ĉar lia edzino ĉiam denove naskas infanojn al li, kiam li jam estas avo dum dudek jaroj. Cetere li mortas ĝenerale nur se la baloto eliras sen decido, ĉar la plej efika balotilo estas la revolvero. Kompreneble ne la revolvero portata kiel ornamo en la abunde ornamita zono por montri, ke la portanto efektive estas viro, sed la revolvero, per kiu oni pafas al tiuj, kiuj ne povas konsenti al la revolvera viro rilate la politikan opinion de la

kuncivitanoj, kiuj volas havi postenon. Sed, ĉar ankaŭ aliaj balotantoj havas revolveron, la libera elekto ne estas limigata unuflanke je certa grupo. La plej bona celpafisto, kiu havas la plej bonajn celpafistojn kiel partianojn, estas elektata kiel urbestro. Jen la respubliko kaj la balotsistemo laŭ la modelo de la multe prikantata malnova honorinda respubliko Romo. Murdu Cezaron kaj vi fariĝos Unua Romia Konsulo; murdu la prezidanton Francisko Madero kaj vi fariĝos la prezidanto de la plej aminda kaj plej pacienca loĝantaro surtere, prezidanto de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Meksiko.

Tial, se ne estas baloto, restas al la viroj de la plaĉa kaj gastafbla urbeto Balún Canán nenio alia krom la festo de Sanktulo Caralampio, kiam ili iom volas distri sin en sia kvieta, kontempla kaj kutime malmulte ekscitiga civitana vivo.

En bona respubliko la aŭtoritatoj eliras de la popolo. Sed tiuj, kiuj estas la aŭtoritato, ne distingiĝas de la aliaj civitanoj de la urbo. La aŭtoritatoj morgaŭ denove estos civitanoj, kaj tiuj, kiuj nun estas civitanoj, morgaŭ estos aŭtoritato. Jes ja, por kio do en la mondo oni en tiu kazo

acidigu la plezuron al la homoj, se ĉiu rigardas la plezuron kiel la plej gravan parton de la vivo, kiu kutime estas tiom trista. Ke la homoj vivas por la laboro estas la filozofio de la pietistoj kaj de tiuj, kiuj estas kastritaj per iu moralo. Se la vivo de la homoj entute havas sencon, kio estas pridubinda, jen la senco estas nur tiu ununura:

Plezuriĝu laŭplaĉe kaj permesu, ke ĉiu alia plezuriĝu laŭ sia maniero; kaj tiom longe, kiom li damaĝas nek vin nek viajn kunhomojn, lasu lin nepre en paco; ĉar vi estas eĉ ne je joto pli bona ol li, kaj li estas eĉ ne joton pli sankta kaj pli valora ol vi mem; ĉar la nesanktuloj, la maliculoj kaj krimuloj estas ĉiam nur tiuj, kiujn oni kaptis ĉe iliaj agoj.

Morgaŭ la festo de la sanktulo Caralampio denove estos finita dum tuta jaro. Tial ni ĝoju hodiaŭ, kiam estas la tempo por tio, kiam ni staras sub la protekto de sanktulo Caralampio, je kies honoro ni plezuriĝas kaj je kies laŭdado ĉiuj niaj pekoj estas pardonataj en pekokonfeso aŭ por bone pagita meso aŭ por surplanka pergenua glitado de la preĝeja pordo ĝis la altaro. Kiuj homoj sub kiu ajn religio eltenus tiom longe, se la religio ne permesus karnavalon al ili, kun la rajto je maskolibero. Sub la kondiĉo, ke plu estu sanktigita Cindromerkredo, je

kiu oni ne preterlasu la meson, ankoraŭ en nebula ebrieco
kaj kun nelavita umbiliko.

Ho, amata sanktulo Caralampio, ke vi ne povis vidi tion, kio okazis en la lasta nokto je via honoro en la kantinoj. La dankon meritas la prudentuloj, kiuj ĝustatempe starigis la lignan sanktulon Caralampio en kvietan malluman anguleton de la katedralo kaj fermis kaj riglis la preĝejajn pordojn, ke li kiel Harun-al-Raŝido en la nokto ne povu eliri por vidi, kion faras liaj kredantoj.

En la kantinoj neniu plu tenis folion antaŭ si, nek sube nek supre. La kelnerinoj dancis tiel, kiel oni volis, kaj sen vestoj. El sub unu el la viroj supren kaj poste sub alian viron malsupren. Kaj tial, ĉar la lastaj kaj la plej lastaj pesoj devis esti enspezitaj tiom rapide, kiel rapida salto permesas tion, ĉar la ĉaroj jam atendis, neniu disipis la tempon per tio, ke li malsuprentiris kurtenojn, riglis pordojn kaj fermis fenestrojn. Multaj, por ne suferigi la negocon, ne uzis eĉ tiom da tempo por kuri ĝis iu el la familioj, kiuj ludonis ĉambrojn *para un ratito*, por mallonga tempo, eĉ ne tiom da tempo por iri al ĉeokaza ĉambreto, kiun havis la gastejestro, kaj kiun li ofertis sufiĉe multekoste. Tiuj ĉambroj estis preskaŭ ĉiam, kiel

Road-Houses en Usono, okupitaj de tri aŭ kvar personoj samtempe, pro la urĝeco de la afero kaj pro la limigitaj ĉambretoj. Sed eĉ tiom da tempo ne plu estis, ĉar la mamnutristinoj kaj patrinoj urĝis la virojn kaj indigniĝis pro la procentoj. Do tuj rapida fiko en angulo aŭ en anguleto. Kaj se la anguloj kaj anguletoj en kaj ĉe la kantino estis okupitaj, jen do transe en angulo de unu el la katedralaj pordoj, proksime al la protektanta sanktulo Caralampio.

Estis publika ĝojofesto, la orgio pri la ora bovideto.

Ĉio estis publika. Tiu, kiu havis la tempon kaj la emon, povis plezuriĝi per rigardado. Estis tiel, ju pli la horoj avancis, des pli senbride kaj des pli senhonte oni feste tumultis inter kaj sur aliaj. Sed ĉio okazis paceme. De tempo al tempo iu blekis ion aŭ iu alia kriis aŭ alia kantis ion. Sed ĉiuj konkordis fratece. Krome oni ŝajne pagis ĉion ĝuste; ĉar oni ne aŭdis iun kvereladon pri mono. La civitanoj de la urbo estis jam lacaj aŭ jam elspezis ĉion, kion ili havis. La nombro de la vidataj homoj pli kaj pli malpliiĝis. La scenejon fine regis nur la bienuloj, la agentoj kaj kontraktistoj de la monterioj kaj la

eksterurbaj komercistoj, kiuj nun finfine ankaŭ volis iom kunĝui la benon de sanktulo Caralampio.

Sed ĉe la puto la publika danco trankvile daŭris. Kompare al la sovaĝa tumulto en la kantinoj estis modeste kaj laŭmorale tie, kie plezuriĝis honore al sanktulo Caralampio tiu parto de la loĝantaro, kiu devis perlabori ĉiun centaviton per dura laboro. Ne tial, ĉar la homoj tie eble estis tiom pli bonaj kaj tiom pli piaj ol la ceteraj, sed ĉar ili ne havis la monon petole moviĝi en la kantinoj. Eĉ se ili havus la monon, tamen mankus al ili la rutino, kiun havas tiuj, kiuj ĉiam disponas pri sufiĉe da mono, pri kiu ili ne scias, kion fari per ĝi. Ĝuste kaj sukcese plezuriĝi estas io, kion oni longe devas ekzerci kiel ĉiun alian okupon.

Ankaŭ de tie, de la publika danco de tempo al tempo retiriĝis paroj al la mallumaj katedralaj pordoj por tie studi arkitekturon. Sed al la plimulto de la tie dancantaj homoj ŝajne pli plaĉis la danco, kaj nur la danco, pli ol iuj aliaj aferoj. Eble ili sciis, ke ili povus havi la aliajn plezurojn je ĉiu ajn alia vespero, se ili nur volus; sed dancon ili ne povus havi ĉiun vesperon, ĉar kutime ne estis muziko kaj la marimbistoj ne tiel malmultekoste

ekludis dum dancoj, kiel tion faris la vagantaj indiĝenaj muzikantoj.

Ankaŭ Manuel, la ĉaristo, fine tien venis, ĉar krome sur la placo jam ne rigardeblis io interesa. La ludotabloj, kie oni laboris nun tiel, kiel en la kantinoj kun sovaĝa hasto, por elpremi dum la lastaj horoj ankoraŭ la lastan kurban centavon el la ŝatata Balún-Canán, fariĝis enuaj por Manuel, ĉar li ne havis ion, kion li povus forludi kaj li ne havis tiom da konfido al Fortuno, ke li povus esperi gajni per siaj kelkaj centavoj grandan posedaĵon aŭ almenaŭ kelkajn pesojn. Tie ĉe la danco, kie estis nur anoj de lia propra tavolo, li tamen sentis sin plej gaja kaj laŭ sia sento plej amuziĝis.

Kiam li ĉirkaŭrigardis por serĉi dancistinon, li rimarkis junan inon, kiu tenis kunligitaĵon en la mano. Ŝajne ŝi apartenis al neniŭ, kaj eble ŝi estis la servistino de komercistino, kiu estis veturonta frumatene hejmen kun la ĉaroj.

Li pli proksimiĝis al la knabino. Poste li staris dum certa tempo sendecide. Li supozis, ke eble unu el la dancantaj junaj viroj estas ŝia edzo, kaj ke ŝi atendas lin. Sed kiam

kelkaj dancoj pasis kaj neniu el la viroj iris al ŝi, li proksimiĝis al ŝi ankoraŭ iom pli.

Denove li staris dum iom da tempo. Tiam ŝi lin ŝajne rimarkis. Ŝi rigardis lin. Kaj kiam ŝi rigardis al li, li ridis. Ŝi same ridis. Pro tio li diris: „Ĉu ni dancu, *chica*?“

„*Cómo no*“, ŝi diris, „kial ne, sed kie mi lasu mian kunligitan fasketon? Mi ja ne povas bone danci kun ĝi.“

„Ho tio, la fasketon, ĉu?“ li respondis, „tion mi prenos en la manon.“

Li prenis la fasketon dekstramane, kaj ĉar li ja ne devis ĉirkaŭbraki ŝin dum la dancado, li dancis kun la fasketo ĉemane. Tio aspektis komika, sed neniu el la dancantoj interesiĝis pri tio, ĉu tie iu dancas kun fasko en la mano aŭ kun kesto sub la brako. Kaj se iu serioze atententus pri tio, li dirus al si, ke, se iu dancas kun fasko ĉemane, li certe havas bonan kaŭzon por tio, ĉar ĝi estas maloportuna.

Post la unua danco li invitis ŝin kune trinki kruĉeton da kafo. Ŝi ŝajne ĝojis pri tio. Kaj kiam ili trinkis la kafon, ŝi ŝmace sipis ĝin kun tia granda plezuro, ke li demandis:

„Ĉu vi estas tre malsata?“

Ŝi diris, ke jes, kaj li aĉetis kelkajn enĉiladojn por ŝi.

Li demandis la indiĝeninon tie, kie ili trinkis la kafon, ĉu li eble povus lasi la fasketon dum horo sub ŝia protekto.

Tiam ili denove iris transen al la dancantoj.

„Kiel vi do nomiĝas, kara“, li demandis post danco.

„Kial vi volas scii tion?“ ŝi demandis.

„Mi ja ne povas diri al vi ĉiam *chica*, se mi prenas vin kun mi“, li diris ridante.

„Tiel rapide?“

„Kial ne“, li diris seke. „mi devas esti rapida, ĉar tuj post noktomezo ni ektrotos. Mi estas ĉaristo. Kaj se vi volas, vi iru kun mi.“

Nur dum sekundo ŝi pripensis tion, kaj tiam ŝi diris:

„Kien vi iras?“

Kvazaŭ la tuta kolono estus lia propra, li diris: „Unue mi iros kun mia kolono al Jovel, poste al Niba, tiam al Chiapa. Tie mi ricevos novajn ordonojn. Tiam mi iros

verŝajne al Tukstla kaj tiam malsupren al Arriaga kaj eble ankaŭ ĝis Tonalá.“

„Tio certe plaĉus al mi“, ŝi diris, „Tukstla, tio estas granda, tie mi certe povus ricevi bonan pagatan servon, je dek aŭ eĉ je dekkvar pesoj.“

Kompreneble, li interrompis ŝin. „Kaj se vi tie ne ricevos servon kaj volos plu veturi, ankaŭ tie estas sufiĉe agrable en Arriaga kaj en Tonalá, kaj tie ili ĉiam bezonas *kriadas*, servoknabinojn. Sed, se vi ne diros al mi kiel vi nomiĝas, mi ne kunprenos vin, kaj lasos vin ĉi tie.“

„Rosario López, *su servidora*, via obeema servistino“, ŝi diris ĝentile.

„Do, Rosario. Rosita, *querida mía*, mia amata.“

Sed ŝi tuj objetis, sed kun ridado: „*Mira, mira, caballero*, ne tiel rapide, ne tiel rapide. *Querida suya*, via amata, tion ni unue observu. Ne tiel rapide. Vi ja ankoraŭ tute ne scias, ĉu vi vere plaĉas al mi. Nu. *Pero, pensando*, sed pensante pri tio, *yo creo que sí*.“

„Kial *que sí*?“ li demandis. „Kion do? Ĉu mi plaĉas al vi aŭ ne, diru tion klare, konfesu do!“

Ŝi ruĝiĝis kaj embarasite diris: „Mi supozas, ke vi plaĉas al mi.“

„Bone, interkonsentite“, li diris koncize. „Do, mi vin kunprenos. La ceteron ni tiam ekscios sur la vojo. Hodiaŭ ne estos multe da dormo por mi. Ni ankoraŭ devos ŝarĝi la ĉarojn kaj enjungi la bovojn. Sed vi povos dormi du aŭ tri horojn. Mi faros al vi neston sub jam ŝarĝita ĉaro. Ni havas ankoraŭ alian knabinon kun ni, la edzinon de Andreo. Vi dormu kun ŝi, por ke vi tenu vin ambaŭ varmaj. Ni, ankaŭ Andreo, hodiaŭ nokte ne havas tempon okupiĝi pri niaj damoj. Ĉiu horo estas plenŝtopita per laboro. Jen komenciĝas nova danco. Antaŭen, Rosita, ek do, kaj movu la gambojn.“

Dum la dancado li komencis nun trankvile pensadi pri la rapida svatado kaj geedziĝo. Li rigardis ŝin plurajn fojojn, sen tio, ke ŝi rimarkis tion, ĉar ŝi rigardis dum la dancado per siaj okuloj sur siajn movigantajn piedojn, kiel decas por dancistino ĉe indiĝena *zapateado*.

Ŝi plaĉis al li pli kaj pli, ju pli ofte li rigardis ŝin. Ŝi estis indiĝenino, sed plenkreskis en urbo, ĉar ŝi parolis puran meksikan hispanan, miksitajn kun esprimojn el Gvatemalo,

kiel oni parolas en la limregionoj de la ŝtato. Ŝi estis sendube sperta kaj tute ne sen scioj pri la vivo. Sen tordiĝo kaj sen hezito ŝi konsentis pri tio, kion li aludis sen diri tion. Ŝi nur iom kritikis la subitecon kaj la rektecon kaj la evidentecon de lia edziĝpropono, kion ĉiu knabino rigardas kiel sian devon, por povi firmteni almenaŭ la lastan fadenon de la vualo de modesteco je vestanguleto. Neniu ino ŝatas tion, se tiu, kiun ŝi honorigis per sia elekto, poste iam riproĉos al ŝi, ke ŝi falis sub liajn gambojn jam en la unua minuto. Ŝi ne ŝatas tion eĉ tiukaze, se ŝi sopire atendas kaj atendis fali tiom rapide kiom eblas en la ĝusta loko, tuj kiam ofertiĝas la okazo.

Kaj pensante pri tio, li trovis ŝin nur tiom pli alloga. Al la diablo la estintecon de la knabino, se lin urĝas, kaj oni ne povas havi iun pli bonan. Post iom da tempo ĉiam montriĝos, ke la diferencoj estas nur imagataj kaj ne realaj. Ĉiu ino povas esti bona kaj ĉiu neeltenebla, egale kia ŝi estas aŭ ŝia estinteco. Je ino multe pli malofte kroĉiĝas la estinteco ol al viro. La viro ĉiam tro inklinas esti pedanta, morala kaj centprocente respektinda, plagata de konscienciproĉoj kaj preta oferi pro sia limigita malgrandanima honoro ĉion, eĉ sian edzinon.

Escepte de la elsekigitaj preĝulinoj kaj de la paliĝantaj velkulinoj, kiuj jam delonge ne plu ŝanĝis siajn vidpunktojn, la viro estas multe pli neeltenebla virkapra stinkema kaj pli elkraĉanta pietisto de nazmuko ol la ino. Ĉe la ludonado de meblitaj ĉambroj al senfamiliaj viroj la viro estas multe pli naŭza ol ino, kiu multe pli facile komprenas homojn kaj multe pli vastanimas kaj per tio estas multe pli deca kaj en vero pli laŭmorala. Ŝian moralon oni fuŝas nur en tiuj landoj, en kiuj ankoraŭ ekzistas leĝoj el la tempo de la severe tondranta Lutero, en kiuj oni sence babiladas pri fisvatado kaj kaŭzado de publikaj skandaloj, pri aferoj, kiuj estas tute relativaj kaj kiujn oni ne povas difini kiel ekzemple ŝteladon en banko. Sed ne estas la inoj, sed la viroj, kiuj persistas pri la daŭrigado de tiaj idiotecaj leĝoj kaj kiuj defendas ilin, kaj, ĉar ili ne havas alion, uzas ilin por hipokrite montri al la publiko kiom respektindaj kaj kiom profunde moralaj ili estas. Sed la vero estas, ke ĝuste la moralaj viroj volas havi ĉiujn inojn por si mem kaj neniun inon volas cedi al alia. La plej bona ekzemplo en la historio estas la granda moralisto kaj mondopliboniganto Josefo Smith, la fondinto de la mormona eklezio en la nordo de Usono.

Ĉasteco, moralo kaj religio estis la altaj idealoj de la viro, kiu en la flortempo de la mormona sekto nomis okdek edzinojn sia propraĵo, tiel, kiel oni nomas ĉevalojn aŭ bovinojn sia propraĵo.

Kiam Manuel estis dancinta ankoraŭ plurfoje kun sia ĵus gajnita knabino, li rigardis supren al la steloj por vidi laŭ la steloj, kioma horo estas.

„Ni povos danci ankoraŭ du fojojn, *querida*, kaj tiam ni foriros“, li diris. „Ni havas multe da laboro“.

Kiam ambaŭ dancoj estis finitaj, Manuel prenis la knabinon ĉe brako kaj poste ili foriris al la indiĝenino por repreni la kunligitan fasketon. Ili preteriris kantonon.

„Jen, *chica*, rigardu foje tion“, li diris haltante. „La bienuloj kaj grandaj sinjoroj de la monterioj disipas la monon, kvazaŭ ĝi estus sen valoro. Ili festas sanktulon Caralampio pli ol bone, ĉu? Ĉe la diablo! Ĉiu el ili havas du el tiuj ŝminkintaj inoj kiel rajdantinojn sur siaj genuoj, kaj jen sub la tablo ili ruliĝadas. Kaj jen malantaŭe en la angulo, rigardu foje tien, jen ili havas tri el ili sidantaj sur la tablo antaŭ si, kaj nudigitaj ĝis la ŝtrumpoj. Iliaj vestoj ĉiuj pendas je la ĉapelhokoj. Tamburoj kaj flutoj, tio estas vivo! La kantinisto devas meti la monon en sakojn, kaj multe da ĝi.“

„Kial vi ĝuste rigardas tien?“ ŝi demandis maleme kaj tiris lin ĉe la brako plu. „Ĉu vi eble volus partopreni tion, ĉu? Tio povus plaĉi al vi.“

„*Celosa?* Ĉu ĵaluza?“ li demandis kaj ekridis. „Tio ja bone komenciĝas, *querida mía*. Sed lasu tion, *chica*, ni ja bone interkonsentiĝos. Vi ne devos plendi pri mi. Sed“, li aldonis, „se mi vidas, kiel ili tie diboĉas, jen mi ja tamen devas pensi pri la sklavigitaj peonoj kaj pri la kompatindaj *muchachos* en la monterioj, kiuj havas nenion, kiuj tie mortaĉas kaj pereas pli terure ol muloj aŭ hundoj, kaj ĉi tie ili forfikas kaj fordrinkas kaj disipas la monon kaj ŝovas ĝin antaŭe kaj malantaŭe en la inaĉojn, tien, kien ili volas havi ĝin, se nur estas ormoneroj. Kaj plej multaj el la inoj eĉ ne riĉiĝas tiel. La plej grandan parton ricevas iliaj *dueñas*, iliaj mastrinoj, kiuj ŝtelas ĝin de ili, kiam la kompatindaj knabinoj ebrie falas en la litojn. Kaj tio, kio restas al ili, tion forprenas iliaj amikoj hejme, kiuj vivas de la mono, en Tapachula, Verakruco, Frontera, El Carmen kaj Progreso, aŭ de kie ajn venis la knabinoj. Tiuj uloj prenas la monon, kiun la knabinoj ĉi tie perlaboras, por disipi ĝin kun aliaj knabinoj. En kolono, kiu venis kun ni, estis grego el tiaj knabinoj. Jen

mi aŭskultis tion, kion ili diris kaj rakontis, kaj kiam ili kverelis. Kia mondo tio estas! Dio mia! Damne!“

Li kaptis subite sian knabinon firme ĉe brako kaj ŝire tiris ŝin al si, premis ŝin firme kontraŭ sian korpon kaj diris: „Aĥ, merdo kaj perdo, *querida*, ni ekiru. Se mi pensas pri niaj ĉaroj kaj vidas tion ĉi tie kaj tiam pripensas, kiel ni firmgluiĝas en la koto kaj neniam havas tutan vestaĵon sur niaj kadavraj korpoj! Jen mi, ĉe Dio en la ĉielo, damnite, tamen volonte sciis, kiu kreis ĉi tiun mondon!“

Ili iris iom. Sed io tumultis plu en li, ĉar ĝi foje komenciĝis.

Kiam li sentis la varman korpon de la knabino proksime ĉe si kaj stumble trotis tra la malhelaj stratoj, evitante ŝtonojn kaj truojn kaj flakojn, li komencis, verŝajne la unuan fojon en sia vivo, klare vidi sian ekonomian situacion, ja sian tutan mizeran vivon.

La knabino estis forta kaj sana, tute malsama al la infano, kiun Andreo havis kiel edzinon. Kiam li dancis kaj staris kun ŝi kaj trinkis kun ŝi kafon, li vidis ion novan je inoj. Ion, kion li ĝis tiam ne vidis.

La sincereco de tiu forta kaj sana knabino, havanta tiajn durajn manojn pro la laboro, ŝia honesteco al li, kaj la varma plena ina maniero, kiu elradiis de ŝi, vekis sovaĝan kaj samtempe preskaŭ humilan deziron en li.

Certan distancon de la vojo ili ankoraŭ iris plu. Tiam li haltis, tiris ŝin proksime al sia brusto kaj diris: „Rosita, mi konas vin nun nur ekde momento. Sed al mi estas tute egale, kio vi estas kaj kial vi forkuras. Mi volas, ke vi fariĝu mia edzino.“

Ŝi diris: „Sed, atendu, mi petas vin, kiam ni estos sur la vojo aŭ – ne ĝuste ĉi tie – estas ankoraŭ sufiĉe da tempo, kaj kompreneble mi volas ĝin, vi ja kunprenas min al Tuxtla, kaj mi scias ja bone, kial vi kunprenas min. Mi volas, ja tamen. Tion vi scias – sed...“

„Ne, ne“, li respondis, „ne tion mi opinias. Jes, ankaŭ tion mi opinias, sed mi celas ion alian. Mi vere volus, ke vi, sendepende de ĉio alia, estu mia edzino. Mi volas diri per tio, por ĉiam. Kion mi opinias, estas, ke mi volas loĝi kun vi en kabano, sur peco da tero. Aŭ ni iru en urbon, kie mi povos trovi laboron, kaj kie vi ĉiam estos kun mi.

Aŭskultu, atentu, kion mi volas havi, estas tio, ke mi volas

havi infanojn kun vi, kaj ke ni estu ĝusta paro. Mi provos ricevi iom da mono. Kiam ni alvenos en Arriaga, mi fuĝos kun vi al la plej proksima trajnstacio. Tiam ni aĉetos bileton, kaj ni veturos ĝis ni venos en urbon, kie neniu konas nin, kie oni ne scias, ke mi forkuris kaj ke mi havas ŝuldojn ĉe la patrono. Mi diros, ke mi estas de Tapachula. Kaj post iom da tempo ni ankoraŭ foriros plu, al pli granda urbo. Tie tiam neniu plu scios ion. Kaj mi povos labori en fabriko aŭ ie. Kaj ni havos tiam vivon tute por ni mem, nur por vi kaj por mi kaj kun infanoj. Ĉu vi volas tion, Rosita?”

„Mi pensas, ke mi volas tion“, ŝi diris simple.

Pro tiu interparolado, sed eble ankoraŭ pli pro la simpla kaj neromantika respondo de la knabino, Manuel eksentis serenan kaj saturitan kontentecon, kiu dissolvis kaj froblovis la urĝajn dezirojn, kiuj akre direktiĝis al la momento.

Okazis io simila en lia animo, kio okazis kelkajn noktojn antaŭe en la animo de Andreo; kvankam la kaŭzoj kaj kondiĉoj estis tute diversaj. Tiel diversaj, kiel Andreo de Manuel kaj Estrellita de Rosario.

Por Manuel la proksima kunestado kun ino ne estis nova. Kaj kiel li bone sentis, ankaŭ Rosario estis iniciita en la naturajn sekretojn de la vivo. Tute certe nek por li nek por ŝi ekzistis nesolvitaj misteroj en la videblaj kaj senteblaj homaj manifestadoj de la vivo.

Sed anstataŭ la urĝa deziro, kiu turmentis lin dum la lastaj horoj, kreskis en li la espero pri io bela. Ĉu ĝi estas bela, pri tio li ne estis certa. Sed laŭ lia sentado ĝi ŝajnis al li esti la plej bona, kion la vivo povus oferti al li. Kiel ĉaristo li centfoje pensis, ke oni same tiel bone tute ne vivu ol plu elteni tiun senesperan kaj duran vivon, kiu en tiu formo finiĝas ŝajne neniam.

Sed vidalvide kun la forta, sana kaj sincera knabino ekflamis en li la denaska sovaĝa sopiro al familio, al familio, kun kiu estas ligita hejmo kaj kamparo, kie estas laboro, kiun oni komencas, kiun oni vidas disvolviĝi kaj maturiĝi, kies celojn kaj rikoltajn fruktojn oni superrigardas. Estis la neniam kontentigebla, neniam satigebla sopiro de la homoj al trankvila punkto, al mezpunkto de la vivo. De la vivo, kiu ĉiam kaj ĉiam estas seninterrompa moviĝo.

La profesio, en kiu li estis katenita, preskaŭ sufokis tian sopiron en la homoj, kiuj estis kaptitaj de ĝi. Kaj ĝis tiu tempo, ja ĝis tiu horo tiu sopiro al Manuel apenaŭ estis konscia. La ĉaroj efektive preskaŭ sukcesis mortigi tiun deziron en li.

Kiam li ekkonis ĉion tion, li finis la impertinentan atakemon, kiun li montris al ŝi dum la tuta vespero. Li ne plu rigardis ŝin kiel ĝuste nur trovitan aŭ alkurintan knabinon, kun kiu oni seksumas, kaj kiun oni poste akceptas aŭ ne akceptas ĉe si, laŭ tio, kiel oni sentas tion. Tiun inon li volis havi por ĉiam. Kaj por povi reteni ŝin, li pensis, ke li devas antaŭe gajni ŝin.

Ne estis sentimentaleco, kiu gvidis lin, kaj mistifikojn kaj trukojn li ne konis. Softaj kaj dolĉaj sentoj estis fremdaj al li; li ankaŭ ne povus kutimiĝi al tio en la vivo. Kaj se li opiniis gajni la inon, jen ne laŭ tiu senco, ke li pensus efiki per longaj paroladoj kaj belaj vortoj aŭ per precipa ĝentileco kaj servopreta respekto. Io tia ne venis en lian kapon. Tio venus neniam en la kapon al iu indiĝeno, kiu ankoraŭ konservis sian naturecon kaj sanan vivmanieron. Sekvante sian instinkton, li provis gajni la inon per tio, ke

li ĉion tion, kion li estus povinta havi en tiu momento, ne prenis, ke li eĉ rezignis pri ĉia penso pri tio. Ne estis tiel, ke li eble estis plagata de la imago, ke tio estas fia aŭ malmorala, aŭ ke ĝuste sub tiuj cirkonstancoj tio ne estas honesta ago.

Lin tute subite kaptis la sopiro liberigi sin. Li sentis en sia animo, ke li povus liberigi sin nur pere de tiu ino kaj nur kun ŝi. Tiom longe, kiom tiu ino estus la mezpunkto de tiu sopiro, li neniam delasus de la penso liberigi sin de la ĉaroj. Povus esti, ke en tiu kazo, se li ne rezistus sian deziron, la ino jam en tiu tago ne plu estus tia por li, kia li deziras ŝin. Eble ne. Sed li ne volis ludi senpripense per tiu „eble ne“. Kun la deziro pri hejmo kaj familio ligis sin la deziro konservi ion belan por okazo, kiu ne prezentiĝas tiel hazarde kaj nevokite kiel en tiu ĉi momento.

Se Manuel estus alte evoluita viroprodukto de la civilizo, tia agado devus peri la impreson, ke li pensas en subtila ruza maniero nur pri sia propra ĝuo kaj pri tio, kiel pligrandigi tiun ĝuon. Sed Manuel estis indiĝeno kaj ĉaristo. Kiel oni povas pligrandigi ĝuojn per lertaj spekuladoj, preparoj kaj hezitoj, tion li ne sciis. Eĉ se li

havas tiajn ideojn, li neniam penus uzi ilin. Tio daŭrus tro longe al li. Tiajn artifikojn li ne konis. La celo, laŭ lia opinio, estis atingebla plej certe sur la plej rekta vojo, jen lia opinio.

Kial li agis tiel, li ne povis klarigi. Li instinkte ekhavis tiun imagon. Se li povus reteni la inon nur per tio, ke li ne hezitas eĉ dum horo, li certe farus tion. Sed li sentis, ke li povos pli bone interkompreniĝi kun tiu ino kaj, ke ili pli bone geamikiĝos, se li atendos. Tio laŭ li ekpensigos ŝin, kial li ne prenas tion, kion ŝi atendas, ke li prenos ĝin. Tiel ŝi ekkomprenos, ke li pli multe kaj pli serioze ŝatas ŝin, ol ŝi supozis ĝis tiu momento.

Li agis tiumaniere, ĉar li ne sciis, kiel alie esprimi sin por diri al ŝi, kion li sentas pri ŝi, kaj ke tio, kion li sentas, venas el la profundo de lia koro. Formi vortojn li ne povis por tiu ĉi sento. Li ne tre kapablis esprimi per vortoj profundajn sentojn, tiel, kiel li ne povis elpremi plorojn, kiam li sentis en sia animo funebbron aŭ doloron.

Intertempe ili denove iris.

Manuel ne plu tenis ŝin proksime al si. Kiam li diskutis kun si mem, por klariĝi, kion li celas, ambaŭ jam solviĝis unu de la alia, sen efektive rimarki tion.

La vera kaŭzo eble estis la vojo: la ŝtonoj, truoj, flakoj, kavaĵoj plenaj de akvo, fosaĵoj kaj traboj, kiuj komplikis la iradon en la malhela strato. Tial ili finis sian brakumon ĉe la stumblado. Oni pli facile iris tie, se ĉiu unuope trabaraktis sin sur la vojo.

Kiam la lasta, la plej ekstera strato de la urbo estis traირita kaj ili staris antaŭ la libera ebenaĵo, la vojo fariĝis pli bona.

Rosario iris nun apud li.

Li rememoris pri io kaj li diris: „Rosita, sed vi devas diri ĉe ne unu vorton al iu el la *muchachos*, ke mi volas forkuri. Vi sciu, se la patrono ekscius tion, li ne plu lasus veturi min malsupren al Arriaga kaj al la stacioj. Aŭ fariĝos ĉe miloble pli terure, se li vendus min pro mia ŝuldo ĉe li al monterio, por povi esti sekura, ke li ne perdu

sian monon pro mia forkuro. El monterio oni ne povas fuĝi, tie oni retenas la *muchachos* multe pli sekure ol en punkolonio.“

„Mi tute certe diros nenion, *muchacho*“, ŝi trankviligis lin. Tiam ŝi aldonis: „Sed kiel vi nomiĝas, karulo, por ke mi sciu kiel mi voku vin. – Ha, tiel? Manuel. Jes certe, Manuel, tion mi sankte ĵuras al vi: mi ne perfidos vin.“

Ĉar ŝi promesis teni sekreta lian planon, tio ligis lin en lia sento des pli forte kun ŝi. Ili de tiu momento estis aliancanoj. El la tono, per kiu ŝi parolis al li, li aŭskultis, ke li povas fidi al ŝi, ke ŝi tenas la promeson, kiun ŝi donis solene. Ili de tiam ne nur estis aliancanoj, sed fariĝis ankaŭ fidelaj gekamaradoj. Estis tiaj malmultaj, ŝajne negravaj vortoj, per kiuj ili ligis sin pli proksime kaj pli intime. Sed ne estis sole la vortoj, estis multe pli la tono kaj la maniero, kiel ŝi parolis, kio lasis ekkoni al li, ke li estas sur bona vojo kun ino, kiu havas sian valoron.

Multon ŝi ankoraŭ ne diris ĝis tiam. Ŝi ŝajne ne estis tre babilema. Tio estis kontraŭ ŝia karaktero, kiel li supozis.

Ŝi jam delonge ne plu estis infano. Ŝi havis certe

dudekkvin jarojn aŭ similan aĝon.

Nun irante apud ŝi en la tenebro, kiun heligis nur iom la klaraj lumantaj steloj, li vidis ŝin nur kiel ombron. Ŝi estis nur iom pli malgranda ol li.

Ŝi estis nudapieda kaj iris kun longaj sekuraj paŝoj.

Li portis ankoraŭ nun ŝian kunligitan faskon.

Kaj nur por diri ion, ĉar ili iradis tiel silente, li demandis: „Kion vi havas en via fasketo, *querida*?“

„Nur mian dimanĉan robon, du ĉemizojn, mantukon kaj du parojn da duonŝuoj kaj paron da longaj kotonŝtrumpoj“, ŝi diris. „Ne estas multe, kion mi kunportas por vi, karulo, sed mi ne ŝtelis kaj mi ne bezonas multon.“

Per brutale sobraj frazoj ŝi rakontis al li sen iu plibeligo tion, kio okazis, sen timo, ke ŝi povus perdi lin, kaj sen la pensado, ke li povus ekmalestimi ŝin. Ŝi ne vidis tragikon en siaj travivaĵoj, tiel, kiel li neniam rigardis la vivon de ĉaristo kiel tragikon, aŭ eĉ kiel malbenon de la sorto. Al ili kiel al ĉiuj aliaj de ilia speco, ĉiu aĵo, ĉiu okazaĵo, ĉiu travivaĵo, estas natura ĉiu mizero kaj ĉiu ĝojo, kion oni

eble povas eviti ruze, sed kion oni devas akcepti, se ĝi trafas onin, kaj se oni ne povas fuĝi ĝustatempe. Kaj, se ili tamen serĉas klarigon, tiukaze ili respondas laŭ bone dresita humileco de subulo: Dio ne deziris ĝin alie.

Ke Dio volas nur tion, kion la homo per sia prudento, per sia pacienco kaj sia volo eldevigas al si, tio por ili estis nekutima penso. Alie ili ja ne rangus tiom sube, en la plej suba kaj plej povra tavolo de la popolo. Estas pro la pacienca piemo kaj pro la naiva kredo, kial ili transcedas ĉion al Dio, anstataŭ mem forte kapti la okazon. Jen la plej grandaj obstakloj, kial la proletoj ne prenas al si tion, kion ili meritas.

Rosario rakontis, kiam ili iris nun sur la ebenaĵo, ke ŝi, kiam ŝi havis dekdu jarojn, devis forlasi la sendependan indiĝenan vilaĝeton, en kiu ŝi naskiĝis, ĉar estis tro da infanoj hejme. La parcelo, kiun la komunumo donis al la patro, estis plena de ŝtonoj, magra kaj tro eta por granda familio. La fekundan kaj fruktoriĉan grundon de la komunumo iom post iom forprenis la politikaj ĉefoj de *don Porfirio* kaj vendis ĝin al hispanaj kaj germanaj grandbienuloj.

Rosario iris al Yajatón por servi tie ĉe ladino, kiu havis tie magazeton. Ŝi ricevis kiel salajron peson ĉiumonate. Antaŭ ol ŝi fariĝis dekkvarjara, ŝia servomastro gravedigis ŝin. Ŝi restis en la servo kaj ricevis kiel salajron peson kaj kvindek centavojn ĉiumonate. Ŝia infano mortis, kaj ŝia servomastro volis havigi al ŝi duan infanon.

La unuan infanon ŝi naskis sen scii kiel tio okazis. Ŝi miris pri tio, kiam la infano venis subite en la mondon, dume ŝi staris antaŭ la fornelo kaj kuiris kaj la bebo subite falis antaŭ ŝiajn piedojn. Ŝia servomastrino alvenis kaj donis la unuan helpon. Ŝi sciis, de kiu devenis la infano. Tial la

knabino restis sen ĝeno en la domo, ĉar la infano ja laŭrajte apartenis al la familio. En Meksiko ne estas tragiko ligita al tiaj tute naturaj okazaĵoj. La edzino faras dum kelkaj horoj skandalon al sia edzo; kaj tiam ili denove repaciĝas. Pri divorco ŝi ne pensas eĉ dum sekundo. Ili estas bonaj katolikaj geedzoj, kaj la eklezio permesas ĉiun fivolupton en la edzeco, la batadon de la edzino kaj skandalojn, sed la divorcon ĝi ne permesas, eĉ ne tiukaze, se la geedzoj povas nek flari nek vidi sin reciproke pro malamego. Dio ja kunigis ilin, ankaŭ en tiu kazo, se la nupto estis nur afero pri mono aŭ proviza asekuro aŭ impulso, kiu ne daŭris.

Kiam nun ŝia servomastro denove proksimiĝis al ŝi, atendante, ke nun estas eĉ pli facile, ĉar li supozis, ke li akiris rajtojn je ŝi, ŝi estis jam pli prudenta. Pro sia sperto ŝi lernis, de kio venas la infanoj kaj per kio. Meze de la nokto ŝi ekbruis alarme. La servomastrino alvenis, kaj la infanfarulo ne povis deŝarĝi sin.

Rosario restis ankoraŭ kelkajn monatojn en la domo. Sed fariĝis por ŝi pli kaj pli neelteneble, ĉar la viro ne lasis ŝin en paco. Finfine ŝi foriris kaj servis en la sekvantaj jaroj

en diversaj lokoj de la regiono, por du, tri kaj kvar pesoj ĉiumonate. Fine ŝi venis al Balún-Canán. Tie ŝi servis en diversaj domoj kiel kuiristino kaj kiel servistino por ĉio. Post kelkaj ŝanĝoj ŝi ricevis laboron ĉe vidvino, kiu pro la ĉagreno, ke ŝi ne havas viron en la lito, monaton post monato fariĝis pli kaj pli malica en sia karaktero. Sed ŝi havis tempojn, kiam ŝi fariĝis intima al Rosario; kaj ofte tiom intima, ke tiu indiĝena knabino, kiu tute ne estis koruptita en siaj seksaj instinktoj, ne povis eltrovi, ĉu la mastrino estas pli vira ol ina. Ŝi postulis aferojn kaj agojn, kiuj konfuzis kaj plej ofte ĝis naŭzo molestis la knabinon. Tial la knabino iom post iom havis timon pro la mastrino, timon, kiu estis multe pli forta ol tiu, kiun ŝi havis pro sia unua servomastro, al kiu ŝi estis malsupera ja nur pro tro granda timo kaj pro liaj batoj.

Ŝi maldungis sian servon. La ino, troviĝanta en la plej aĉa tempo de la transiraj jaroj, perdis nun ĉian prudenton. Ŝi estis esperinta trovi taŭgan subjekton, pri kiu ŝi supozis, ke ŝi povus inklinigi ŝin en la paso de la tempo per donacoj kaj aliaj favoraĵoj por siaj deziregoj deflankiĝantaj de seksa normaleco. Kiam Rosario ne volis

nuligi sian maldungon, la ino venĝis sin je ŝi, eĉ tiam plu kun la espero, ke ŝi povas cedi la knabinon. La ino iris al la polico kaj akuzis la knabinon, ke ŝi ŝtelis monon de ŝi. La monon oni efektive trovis en la malhela truo, kie dormis la knabino.

Se la kazo estus traktita en kortumo, oni devus verdikti la knabinon per prizonpuno. Sed la ino, ankoraŭ nun en la espero, ke ŝi povos malkuraĝigi kaj obeigi la knabinon, priparolis kun la polica ĉefo, ke ŝi ne volas konduki la akuzon ĝis la ekstremo, sed ke la polica ĉefo metu ŝin en la vilaĝan prizanon kaj punu la knabinon per *multa*, per kvindekpesa monpuno. Tiun monpunon la polica ĉefo tre preferis. Li ne havis gajnon el tio, se iu troviĝas en prizono. Li gajnis pli, se oni pagas la punmonon, ĉar li povis interkalkuli la monpunon tiel, ke la pli granda parto de ĝi trovi la vojon en lian monujon. Tiuj *multas* estas ja unu el la kaŭzoj, kial en la malgrandaj urboj post la nova balotado de la urbestro kutime restis kuŝi sur la batalkampo kvin aŭ kvindek balotrajtigitoj, laŭ la emfazo de la batalo. Kiel mortigitoj. Se ili bonŝancis, kiel kripluloj.

La mastrino atendis, ke Rosario en la prizono ekfariĝos malrezistema, kaj ke ŝi petos ŝin, ke ŝi do pagu la punmonon, por ke Rosario povu eliri el la prizono. La mastrino liberigus ŝin sub la kondiĉo, ke Rosario votus sub la bildo de Sankta Virgulino senkondiĉan obeon, kaj ke tiu obeado devas rilati al ĉio, kion ordonas la mastrino.

Sed Rosario tute ne estis tiel timema pro la prizono, kiel la mastrino pensis. Ŝi prefere restis en la prizono, anstataŭ komenci aferon kun sia mastrino laŭ ties deziroj.

Eble la kaŭzo estis ankaŭ tiu, ke oni ne traktis ŝin malbone en la prizono. La prizonoj en la pli malgrandaj lokoj en Meksiko estas ja plej ofte veraj pestkavernoj, plenaj de ratoj, puloj, pedikoj kaj la plej aĉa koto. Sed tio estas abunde kompensata per la foresto de ĉia disciplino. Plej ofte dum la tago la prizonuloj estas en la korto. Ili rajtas ludi kaj fumi, kiom ili volas. Ili rajtas akcepti vizitojn, kiam ili volas kaj kiom longe ili volas. Ili rajtas akcepti ĉion, plej ofte post nur tute supraĵa ekzamenado de la manĝoj, do trinkaĵojn, cigaredojn, vestaĵojn, librojn, gazetojn, tion, kion amikoj kunportis por ili. La inoj plej ofte havas siajn infanojn ĉe si, kaj bebojn oni neniam

forprenas de ili, ofte eĉ ne en la grandaj, bone organizitaj ŝtataj kaj federaciaj prizonoj. Forpreni de ino la infanojn, tion rigardas la meksikano kiel kruelecon. Eĉ punkaptitoj el la severa kategorio ĉeokaze rajtas akcepti siajn inojn, ili rajtas esti kun ili solaj dum la hela parto de la tago kaj kelkfoje eĉ en la nokto. La meksikano scias, ke tio estas bona por la sano kaj la anima stato de la prizonulo kaj pli favora por la natura konduto de la kaptitoj ol apartiĝo. El ĉiuj landoj de la tero Meksiko havas nun la plej grandaniman kaj plej humanan prizonsistemon, spite al la cirkonstanco, ke, kiel ĉe ĉiuj homaj agoj, ankaŭ en tiu sistemo okazas sufiĉe da transpaŝoj de la leĝo kaj maljustaĵoj.

Rosario ricevis multe pli da privilegioj ol ŝi atendis en la plej bona kazo. Ĉar ŝi estis diligenta, laborkutimiginta kaj laborpreta knabino, ŝi laboris jam en la unua prizontago en la domo de la polica ĉefo. En la dua tago ŝi iris jam sola sur la foirplacon por fari aĉetojn, kaj la edzino de la polica ĉefo sen hezito konfidis la necesan monon por la aĉetoj al ŝi. La edzino de la ĉefo eĉ ne dum horo traktis ŝin kiel punkaptiton. Je la tria tago ŝi jam ne dormis en la prizono, sed en la domo de la polica ĉefo, kiu ĝojis tiom,

kiom lia edzino, havi en la domo, kiel laborfortulinon, tian diligentan knabinon, al kiu li devas pagi neniom. Eĉ male, la nutrokostojn por ŝi li povis kontigi kiel urbajn kostojn, kaj ĉar la knabino manĝis en la domo, li povis meti en sian monujon tiujn centavojn, per kiuj li pagis la bezonatajn cigaredojn.

La servomastrino tute malsukcesis rilate sian venĝon, kaj des pli ŝi perdis sian esperon tamen ankoraŭ gajni amatinon. Ŝi nun ne plu povis fari ion, ĉar ŝi jam interkonsentiĝis kun la polica ĉefo pri la persekutado kaj kondamno de la knabino.

Sed pli la polican ĉefon interesis la kvindekpesa punmono ol la malkara servoknabino. Venis sufiĉe da junaj inoj kaj knabinoj en la prizanon, kiujn li povis okupigi en la domo por neniom. Havi la ĉagrenon, se ili komprenis nenion pri la domservado, estis ja la afero de lia edzino. Tio ne interesis lin.

Estis en la tria semajno de ŝia punkaptiteco, kiam la polica ĉefo en la hotelo renkontis kuraciston, kiu transloĝiĝis en la urbon, kaj kiu rakontis al li, ke lia edzino lamentas pri tio, ke ŝi ne povas trovi kapablan

kuiristinon. Ili interparolis pri tio, kaj la polica ĉefo proponis al la kuracisto, ke li povus havi Rosarion kiel kuiristinon, se li estus preta pagi la kvindekpesan punmonon kaj ok pesojn por ŝia nutrado, li, la kuracisto ja povus enskribi la punmonon en la konton de la knabino kiel ŝuldon, kiun li povus minusi de ŝia salajro, ĉar tio estas laŭrajta, kiel ĉe ĉiu alia ŝuldo, kiun havas laboristo. La polica ĉefo diris tute malkaŝe al li, ke li ne pensas, ke la knabino estas ŝtelistino, kaj ke en tiu kazo temas pri kalumnia akuzo, sed ke li povas fari nenion kontraŭ tio, ĉar la iama servomastrino estas respektata civitanino, kies depozicio pli valoras ol la vortoj de indiĝena knabino.

La kuracisto diris, ke li parolos pri tio kun la edzino. La edzino diris, ke ŝi elprovos la knabinon. Ŝi prenis ŝin en la domon kaj estis tiom kontenta pri ŝia laboro kaj pri ŝia pureco, ke ŝi diris al sia viro, ke li pagu la punmonon por Rosario.

Tial la polica ĉefo vendis Rosarion al la kuracisto por la *multa* kaj la nutrokostojn. La edzino de la kuracisto ne estis avara. Ŝi pagis la nekredeblan kaj multe priparolatan

monatsalajron da sep pesoj al Rosario, kvankam la knabino, kiel la edzino de la kuracisto sincere klarigis, eĉ ne per dudek pesoj estus tro pagata, ĉar ŝi ne plu devas zorgi sin pri io en la domo.

Sed ok monatojn Rosario devis nun servi por nenio, ĉar ŝi devis pagi la ŝuldon per laboro. Ŝi estis ankoraŭ tiam punkaptito kaj oni povis meti ŝin ĉiutempe denove en la prizanon, ekzemple, se ŝi estus forkurinta, antaŭ ol la ŝuldo estus pagita. Tion la polica ĉefo devis promesi al la kuracisto, ke li garantias por la knabino.

Rosario kompreneble bezonis kelkajn vestaĵojn, ĉemizojn, jupojn kaj kelkajn aliajn aĵojn. Kaj por povi aĉeti tiujn aĵojn, ŝi devis pruntepreni monon de la mastrino, per kio ŝi pligrandigis sian ŝuldon.

Sed post dekok monatoj ŝi estis libera de la ŝuldo kaj rajtis iri tien, kien ŝi volis. Ŝi intencis iri al Tuxtla, kie oni pagas, kiel ŝi sciis, pli bonajn salajrojn ol en la urboj de la postregiono. Sed kiam ŝi volis maldungi la servon, la edzino de la doktoro ofertis dek pesojn ĉiumonate al ŝi, kaj Rosario restis. Pro tiu salajro la ceteraj inoj de ŝia socia klaso en la urbo anatemis la doktoran edzinon, ĉar

ŝi fuŝis la salajrojn de la servoknabinoj kaj malbonigis la laborkondiĉojn kaj la traktadon de la servistaro malfavore el la vidpunkto de la honorindaj enurbaj civitaninoj, kiuj kutimis havi sklavojn ĉirkaŭ si.

Rosario laboris du jarojn en la domo de la doktoro. Verŝajne ŝi estus laborinta tie du pliajn jarojn. Sed la doktoro, kiu serĉis distron for de sia edzino, al kiu li tro kutimiĝis, kaj kiu pro tio ne plu povis sufiĉe kontentigi lin en ĉiu kazo, ektrovis plaĉon pri Rosario, ĉar ŝi, kiel li esperis, povus doni al li pli multajn kaj pli bonajn plezurojn ol lia edzino.

Iutage iris lia edzino pro posttagmeza klaĉo al aliaj. La doktoro estis sola. Li vokis la knabinon en sian konsultejon kaj diris al ŝi: „Rosario, mi rimarkis, ke via pulmo ne estas sana. Vi facile povus ricevi tuberkulozon.

Li klarigis al ŝi, kio tio estas, kaj timigis ŝin per tio, ke ŝi povus morti, ke ŝi fariĝus magra kaj malbela, kaj, ke neniu viro plu edziĝus al ŝi, kaj ke tiukaze, se ŝi tamen edziniĝus, ĉiuj ŝiaj infanoj mortus junaj, kaj, ke ŝi fariĝus tre malfeliĉa en sia vivo.

La lasta minaco estis decida. Rosario volis geedziĝi, tuj kiam ŝi trovos, kiu plaĉos al ŝi. Ŝi estis multe tro ino por povi resti je daŭro sen edzo. Kaj plej multe ŝi deziris infanojn de sia edzo.

Ŝi lasis ekzameni sin, post kiam la doktoro sufiĉe longe persvadis ŝin kaj ŝin tiel ege timigis, kiel la pastroj timigas la homojn per la infero kaj la diabloj, kiam ili havas ilin en la preĝejo kaj volas enkasigi ilian monon.

Li diris al ŝi, ke ŝi, kiel li jam supozis, efektive grave malsaniĝis je la pulmo, kaj ke estus la plej urĝa tempo komenci kuracadon, sed, ke la kuracado estas kara, kvankam li ne volas prikalkuli ion por sia laboro, ĉar ŝi apartenas al la domo, kaj, ke li tamen devos pagi la medikamentojn kaj la injektaĵojn.

Unu injekton li faris tuj, por reteni la malsanon, kiun ŝi tute ne havis, ĉar ŝi estis tiom sana, kiom pursanga indiĝena knabino nur povas esti.

Kiam li estis sterilizinta la injektilon, li diris: „La injektaĵo kostas tri pesojn, sed por vi nur du pesojn. Sed en ĉiu semajno ni devas injekti trifoje, se mi konservu vin

vivanta kaj sana.“

„Sed, sinjoro doktoro“, ŝi objetis, „kiel mi pagu po ses pesoj dum semajno, se mi nur du kaj duonon de peso perlaboras ĉiusemajne?“

Li manipuladoj je siaj instrumentoj aŭ almenaŭ ŝajnigis tion.

Tiam li turnis sin al ŝi kaj diris: „Tion mi akceptas, tiom vi ne povas pagi. Sed mi tamen ne povas donaci tion al vi. Estas mia profesio. Tio estas kontraŭ la profesia honoro, komprenu, ke ni kuracistoj fordonacu ion. La studado kostis multe da mono, kaj la instrumentoj kaj medikamentoj estas tre multekostaj. Sed kion vi gajnus el tio, se vi mortus, kvankam vi tiel facile saveblas! Vi ja ne volas morti eble eĉ libervole, ĉu? Aŭ ĉu vi volas?“

„Ne, tion mi ne volas“, ŝi diris ektimigite. „Kara sinjoro doktoro, helpu do al mi, por ke mi ne devu morti.“

Li fariĝis pli bonkora kaj diris: „Tio estas en ordo. Tio plaĉas al mi. Por kio morti, se vi saveblas kaj povas fariĝi feliĉa en via vivo kun edzo kaj infanoj!“

Rosario ridis, sed ŝi havis malsekajn okulojn, kiam ŝi

ridis.

„Mi pripensis tion, Rosario“, li parolis plu, „rigardu min. Mi devas diri ion al vi. Sed ne diru tion al mia edzino. Alie ŝi mortbatos vin. Mia edzino ne estas tute sana, kvankam ŝi aspektas tiel. Kion mi volas diri, estas tio: Ŝi ne povas gedormi kun mi. Ĉu vi komprenas, kion mi volas diri per tio?“

„Jes, mi komprenas“, ŝi diris, jam divenante, kio sekvos. Estis simile al tio, kion diris la unua servomastro al ŝi, nur kun pli krudaj kaj pli brutalaj vortoj. Sed la unua servomastro perfortis ŝin, batis ŝin, kaj minacis strangoli kaj pafmortigi ŝin, se ŝi ne anstataŭus lian edzinon.

„Kaj pensu, Rosario“, diris la doktoro, „vi jam komprenas, kion mi celas. Mi devas havi inon. Mi ne povas forvojaĝi ĉiun monaton al Tapachula aŭ Tonalá aŭ kien ajn.

Mi trifoje ĉiun semajnon injektos al vi tion, kion vi bezonas, por ke vi saniĝu, kaj vi pagos por tio, – mi volas diri, ke vi montros vin dankema por ĉiu injektado. Mi pensas, ke via vivo kaj via saneco kaj la vivo de la estontaj infanoj tiom valoras. Ĉu vi ne pensas tion?“

La mencio pri la infanoj protestigis ŝin: „Sed mi ne volas havi infanojn de vi, sinjoro doktoro. En tiu kazo poste ne estus tiel facile ricevi bonan kaj ĝustan viron. Tion ja ankaŭ vi scias, doktoro.“

Li frapis al ŝi trankvilige sur la ŝultrojn kaj diris: „Mi ja estas doktoro, ĉu ne, tio mi ja estas! Tial vi ne devas afliktiĝi pri tio. Mi scias, kiel preventi infanojn. Mi ne volas havi skandalon kun mia Esposa. Bone do, tion vi ja akceptos de mi. Se vi naskus infanojn, tiukaze la doktora sinjorino ekscius ĉion. Estu tute trankvila pro tio.“

Ŝi diris nenion.

Li iom malpacientiĝis: „Do, kiel vi volas, Rosario. Se vi volas morti mortu do, estas egale al mi.“

Ŝi glutis kaj diris tiam: „Ne, morti mi ne volas.“ Kaj hezitante kaj mallaŭte ŝi aldonis: „Jes, tiukaze mi devas do, kiel vi diras, sinjoro doktoro.“

Tio funkciis tri semajnojn.

Tiam en iu vespero la doktora sinjorino venis pli frue hejmen de la klaĉrondo ol la sinjoro doktoro atendis tion. Ŝi trovis la sinjoron doktoron kaj Rosarion tuj en tia situo

kaj eĉ sur lia propra lito en la geedza dormoĉambro, ke eĉ la plej aŭdaca samtempa ĵurado ĉe Dio, ĉe Sankta Virgulino kaj ĉe ĉiuj sanktuloj ne permesus dubon, kion ŝi trovis kaj rigardis.

Eĉ en tago de la festo honore al Sankta Caralampio.

La doktora sinjorino ne kriis kaj ne kaŭzis skandalon. Ŝi videble retenis ĉion tion por la doktoro.

Ŝi diris koncize kaj severe: „Rosario, kunpaku viajn aĵojn kaj venu en mian ĉambron, pro la salajro. Estas bedaŭrinde, ke mi devas forsendi vin. Vi estis bona servistino. Sed vi devas forlasi la domon! Vi estas perfekte sana. La doktoro ne devas kuraci vin.“

Pro tiuj vortoj Rosario faris novan sperton. Ŝi ne estis la unua, kiun la doktoro volis liberigi de mortiga malsano. Kaj spite la honton, kiun ŝi sentis esti tiel surprizita kaj elĵetita kvazaŭ ceramika rompopeco de la mastrino, kiun ŝi respektis kaj adoris, ŝi tamen tre ĝojis, kiam ŝi nun eksciis, ke ŝi ne havas mortigan malsanon, kaj ke pliaj kuraciloj ne necesas.

Dum kvin minutoj ŝi kunpakis siajn aĵojn. Ŝi iris iom

timeme en la ĉambron de la mastrino, sed la *señora* ne estis kolera pri ŝi. Certe ŝi konis sian edzon. Ankaŭ divorco ne eblis, ĉar ŝi estis katolika. Ŝi devis elteni tion, kaj ĉiun ekskurson de la sinjoro doktoro al la najbaroj.

Dum momento ŝi pripensis ne elĵeti Rosarion, ĉar ŝi sciis, ke ĉiu nova servistino fine tute certe same intimiĝus al sinjoro doktoro.

„Jen via salajro, Rosario“, ŝi diris. „Kaj mi tre dankas al vi por via bona laboro ĉi tie en mia domo. Jen dek pesoj pli ol vi devus ricevi. Sed morgaŭ matene vi foriĝu el la urbo aŭ mi ĵetos vin pere de la polico en la prizanon. Kaj ankoraŭ pluan punkton, se vi diros ion pri tio, kio okazis ĉi tie, mi zorgos por tio, ke vi restos dum jaro en la prizono, pro ofendo de mia familio. Nun vi scias tion. *Adios*, Rosario.“

Rosario prenis la monon. Ŝi staris nudapieda antaŭ sia mastrino, vestita nur per sia lana laborkitelo. Sian kunligitan fasketon ŝi portis en la irejon al la dompordo.

Ŝi diris: „*Mil gracias, Señora* doktoro, por la kara traktado, kiun mi havis ĉi tie ĉe vi. Mi memoros vian

bonecon en mia tuta vivo. Kaj mil dankojn por la mono. Mi foriros morgaŭ frue matene, kiel vi ordonis al mi, kaj tute certe mi diros nenion al iu, tion mi ĵure promesas ĉe Sankta Virgulino.“

Ŝi defendis sin per neniu vorto, ke ŝi fariĝis la viktimo de sinjoro doktoro, sen efektive deziri tion. Ŝi pensis, ke tio povus esti doloriga por la *Señora*.

Ŝi surgenuiĝis kaj kisis manon de la sinjorino.

Tiam ŝi eliris el la domo.

Tial ŝi venis kun sia fasketo al la dancantoj kun la espero trovi iun, kun kiu ŝi frue matene povus migri el la urbo. Ŝi pensis, ke ŝi povus aliĝi al vojaĝantaj komercistoj, tiel, ke ŝi ne devos iri sola.

„Do, tiel estis, Manuel“, ŝi finiĝis, „tio estas ĉio. Se vi emas, kunprenu kaj edzinigu min. Kaj, se vi ne emas, diru tion, kaj mi iros kun aliaj. Sed, ĉar mi volas esti tute honesta al vi, tial mi diris al vi ĉion, kiel okazis. Estu ankaŭ vi honesta al mi, kaj ne diru al iu, kion mi ĵurpromesis diri al neniu al la *Señora*. Sed al vi mi devis diri tion, por ke vi konu min. Neniu alia surtere ekscios

tion de mi. La *Señora* ĉiam bone traktis min. Ŝi estas *santa*, sanktulino, kiun mi pli adoras ol ĉiujn sanktajn virgulinon, el kiuj neniu iam donis ion al mi.“

Manuel lasis fali ŝian fasketon, ĉirkaŭbrakis ŝin kaj diris: „*Querida linda*, amatino, kion vi rakontis al mi, tion mi jam ĉion forgesis. Verŝajne, se mi pripensas tion, mi eĉ ne aŭskultis vin bone, kaj la plej multan el tio, kion vi rakontis, mi eble tute ne aŭdis, ĉar mi ĉiam nur pensis, ke vi estas pli kaj pli mia edzino, ĉar vi ĉion ĉi rakontis al mi. Mi pensis nur pri vi kaj kion mi povas fari por feliĉigi vin en via koro. Nova vivo komenciĝas por vi kaj por mi. Mi nun scias, kion mi volas. Kaj tion mi scias ankaŭ pere de vi. Mi volas foriri de la ĉaroj, kie ne estas espero. Kaj mi volas foriri kun vi tiom malproksimen, kiom niaj piedoj portos nin. En la malproksimo estas la libero.“

Ŝi diris tion tute instinkte, sen konsciiĝi pri la vero de tiuj vortoj: „Ĉiam en la malproksimo estas la libero.“

Brakumante sin reciproke kaj dense alpremiĝante unu la alian, ili staris tiel dum kelke da tempo sur la vasta ebenaĵo. Sen plu paroli ion, sen pensi ion, ili sentis kaj komprenis kaj fidis sin reciproke.

Super ili estis la steloj, kaj ĉirkaŭ ilin la tenebra noktomezo.

En proksima distanco leviĝis la ombroj de la ĉaroj kaj ripozantaj bovoj antaŭ la nigre blua horizonto. La bivakfajroj de la ĉaristoj komencis ekflagri kiel helaj lekantaj langoj kaj ruĝaj makuloj, kiuj per siaj flamoj aŭ montris la bovojn kaj laborantajn ĉaristojn en vasta lumo aŭ kovris ilin per profundaj ombroj. Li apartigis sin el ŝiaj brakoj, levis ŝian kunligitan fasketon, kaj ili iris unu apud la alia al la proksima kampadejo de lia marŝkolono.

La viroj tie, kaj tiuj de la najbaraj kolonoj jam ĉiuj vekiĝis.

La fulgokovritaj ladaj kruĉoj kun kafo kaj la preme kavetigitaj grandaj emajlopotoj kun la nigraj faboj staris jam sur la fajro.

La ĉaristoj alkondukis la trovitajn bovojn kaj komencis

aljugi kaj jungi la bestojn.

Manuel dum certa tempo staris heziteme kaj rigardis la vigliĝantan kampadejon. Li jam sentis sin ne plu tute apartenanta tien. En siaj pensoj li estis jam en granda malproksimo kun sia edzino.

„Hola!“ Andreo vokis en bona humuro, ekvidante Manuelon, „bone, ke vi estas ĉi tie, *Manuelito*. Vi mankas al ni. Vi ja scias, la aliaj estas junaj ŝafidoj, scias nenion pri bokoj kaj kojonoj. Ni havas damnitan laboron kun la bovoj, ili ne volas kaj ne volas alveni. Ili tute dekutimĝis de la rutino.“

„Ne afliktiĝu, Andreĉjo“, respondis Manuel, kiu kvazaŭ tuj refalis en la kutiman jungilaron, „ni ja trotigos ilin.“

„Mi jam pensis“, Andreo diris ridante, ŝovante la hararon for de la vizaĝo, „ke vi engorĝigis pezan ŝarĝon, por adiaŭi vin de Caralampio, tiel, ke ni nun devas kunŝarĝi vin.“

„Preskaŭ“, diris Manuel, „sed mi faris alian.“

„Ay, *hombre!*“ Andreo vokis nun en laborsperta maniero, „*hombre*, rigardu foje, kie troviĝas tiu de Dio damnita Amarillo, tiu kun la parte forrompita korno. Li ĵus ĉi tie

glitis al ni tra la fingroj. Ŝajne ĝi estas tie transe ĉe la kolono de Luciano.“

Tiam Andreo ekvidis Rosarion.

„*Buenos días, muchacha*“, li salutis ŝin afable.

„Mi estas la edzino de Manuel“, ŝi prezentis sin, „kaj mi iros kun vi ĉiuj malsupren al Arriaga.“

„*Felicitaciones*“, Andreo vokis ridante, „multe da feliĉo al vi ambaŭ. *Bienvenido*, estu bonvena.“ Li mansalutis ŝin kaj diris: „Jen mia Steleto ja nun ne plu restos sola. Iru transen al ŝi, *muchacha*. Steleto mia kuŝas tie sub la ĉaro maldekstre. Kuŝigu vin apud ŝi sur la mato kaj dormu iom. Dum duono de horo ni ĉi tie ankoraŭ devos streĉi la muskolojn, antaŭ ol ni ektrotos. Vi ambaŭ devos iri piede, la ĉaroj estas plenŝtopitaj ĝis la tegmentoj. Se vi emas, trinku iom da kafo kaj kunprenu la kruĉeton transen al Steleto.“

Ŝi iris al la ĉaro kaj rampis proksimen al Estrellita, kiu vekigis, kaj al kiu Rosario el sia ĝoja koro paroladis kaj flustradis en la lingvo, kiu al ambaŭ estis familiara.

Ili tuj kondukis, kvazaŭ ili estus malnovaj konatinoj, ĉar

ili de la unua momento komprenis sin, ĉar ambaŭ estis animitaj de la sama ĝojiga espero, en kiu suno leviĝis post tristaj, nubopezaj tagoj.

Sed antaŭ ol ili tiam povis ekdormi, jam la unuaj ĉaroj de la kolono, ŝanceliĝante, knarante kaj kvazaŭ tamburante komencis ekmarŝi for de la alta ebenaĵo.

F I N O

Enkonduko I

Pri la romano „Ĉaro“

Unua enkonduko de „Ĉaro“ ĝis „Generalo“ (1. Daŭrigo) laŭ la libro „B. Traven-sciigoj“ N-o 1-36

En sia libro „Ĉaro“ B. Traven rakontas al ni la sorton de ĉaristo Andreo Ugaldó, kaj tiel pri la malgaja vivo de indiĝenaj ĉaristoj kaj peonoj, do pri la indiĝenaj proletoj en Meksiko dum la diktaturo de Porfirio Díaz.

Oficiale la sklaveco en Meksiko estis forigita per la konstitucio el la jaro 1824. Sed ĉiujn bonkvalitajn rikoltogrundojn oni antaŭe forprenis dum la koloniisma tempo de la *ejidos*, de la indiĝenaj komunumoj. Tial la praloĝantoj de Meksiko laboras nun kiel peonoj, kiel taglaboristoj de la grandbienuloj por aĉa salajro. Kaj kion ili rikoltas sur siaj propraj malfekundaj kampoj, ili devas vendi al la patrono por prezo, kiun tiu mem difinas. Kion ili bezonas por sia vivtenado, ili devas aĉeti de la patrono, por prezoj, kiuj estas multe pli altaj ol ĉe normala komerco. Ili povas nenie aliloke aĉeti ion, ĉar ili neniam havas kontantan monon en la manoj kaj ĉar ili eterne

havas ŝuldojn ĉe sia patrono. Eterne, tio signifas, dum la tuta vivo, kaj ankoraŭ post la morto. Se ili mortas, ilia ŝuldo transiras sur la filon aŭ la fraton aŭ kiun ajn en ilia parencaro. Se ili provas fuĝi, oni kaptas ilin kun la helpo de la polico, kaj la kostoj de la polico transiras sur la debitan flankon de ilia konto. Ilia mastro povas bati ilin laŭ emo kaj plaĉo, ja eĉ skurĝi aŭ pafmortigi ilin. Tiun senhontan ekspluatitan sistemon subtenis de sube ĝis supre korupta registaro sankciigita de ĉiopotenca eklezio, kiu ne plej malmulte profitis de tiaj cirkonstancoj kaj ne havis intereson pri tio liberigi la indiĝenojn el la nesciado kaj sklaveco. La ĉaristoj havas iom pli bonan salajron. Sed ankaŭ ili restas la tutan vivon ŝuldantoj ĉe sia mastro. Sed iliaj ŝuldoj estingiĝas kun ilia morto kaj oni ne povas transskribi ilin sur la konton de la parencaro. Sed ankaŭ ili vivas streĉan kaj rezignoplenan vivon. Ilia tasko estas gvidi bovoĉarojn de urbo al urbo en la regionoj de Meksiko, kiuj ne estas tuŝataj de fervojoj, tion ĉe tropika varmego tra sovaĝaj pejzaĝoj kaj en tranĉanta frido, tra la transpasejoj de Sierra Madre, sur aĉaj vojoj kaj tra marĉoplenaj regionoj, preter krutaj deklivoj kaj ravinoj, kie pluvoverŝoj parte aŭ tute forlavis la vojon, tra vepro,

ĝangalo kaj riveroj, kie finiĝas ĉia vojo, aŭ kion oni nomas vojo en tiaj regionoj forlasitaj de Dio. La materialo por la riparo de malnovaj rompiĝemaj ĉaroj – se sur la malglataj vojoj disrompiĝas radakso aŭ rado aŭ io alia – ili devas prizorgi al si mem, aŭ ŝteli, ĉar tiaj elspezoj ne estas rekompencataj. Ofte minacas ilin survoje atakoj de banditoj, se ili kunhavas valorplenajn ŝarĝojn. Entute estas vivo kiel apenaŭ imageblis, antaŭ ol Traven rakontis tion en sia majstra maniero.

Andreo Ugaldó, la filo de bona peono, en la aĝo de dek unu jaroj estas pruntedonata de la bienulo al sia edziniĝinta filino en Tenejapa, kie li devas labori en la domo kaj en la magazeno de *don* Leonardo. Li estas obeema kaj lerta knabo, kiu eĉ rajtas lerni legi kaj skribi, por ke li povu esti pli utila al sia mastro. Kiam li havas dek kvin jarojn, li fariĝas bovoĉara gvidanto kaj konatiĝas sur siaj vojoj al nova mondo, li observas, komparas kaj komencas memstare pensi. La leganto akompanas nun la marŝkolonojn de la ĉaristoj sur streĉaj vojoj tra la interna lando de Meksiko kaj ekscias multon el la vivo de la indiĝenoj, de iliaj moroj kaj kutimoj, de iliaj zorgoj kaj turmentoj. Tiam li akompanas Andreon al la festo de

Sankta Caralampio en Balún-Canán, kiu daŭras ok tagojn kaj servas unuavice al la eklezio, al la aŭtoritatoj kaj negocistoj por ankoraŭ pli riĉiĝi. Krome ĝi disponigas bonvenigatan okazon sub la kovromantelo de pieco fordoni sin al ĉiaj nur iel eblaj malvirtoj. Pro naŭzo pri la funkciado de la aferoj Andreo paŝas iom flanken al la vilaĝa puto, kie indiĝenaj junuloj kaj junulinoj, kiuj ne povus pagi la multekostajn plezurojn de siaj mastroj, faras al si propran simplan feston kaj dancas. Jen li malkovras en morna anguleto kunkaŭriĝintan timidigitan indiĝenan knabinon. Li interparolas kun ŝi. Ŝi parolas *celtale*, la lingvon de lia tribo. Kaj nun Traven, tiu ofte tondre parolanta kaj maldece sakranta homo rakontas al ni amhistorion, kiu pli delikate kaj pli bele apenaŭ troveblas en la literaturo. Andreo ekscias de tiu knabino ŝian tragikan sorton: patro kaj patrino estas mortaj. La ŝuldoj de la patro transiris al la du fratoj, tiujn tiam vendas la bienulo kiel kontraktlaboristojn al monterio, el kiu malofte iu revenas. La knabino devas nun labori en la domo de la bienulo, la senhonta filo seksperforte molestas ŝin kaj ŝi fuĝas en sia mizero al Balún-Canán, esperante, ke ŝi trovos tie iun pagatan laboron. Kiam ŝi ne

sukcesis, ŝi renversiĝis lacigite en la proksimo de la puto. Andreo donas manĝon al ŝi kaj prenas ŝin al si. Sur la vojo ŝi rakontas al li la kreadan rakonton de sia tribo, kiun Traven en pli ampleksigita versio reverkis en la libreto „Sunkreado“. Al siaj kamaradoj li prezentas la knabinon kiel sian edzinon, kaj ĉar ŝi ne havas nomon, li nomas ŝin *Estrellita*, steleto.

Je la lasta vespero de la festo, kelkaj horoj antaŭ la ekveturo de la karavano de Andreo, ankaŭ Manuel ankoraŭfoje, por lasta fojo volas tralavi la gorĝon kaj iras en la urbeton, kie la festo intertempe degeneris al diboĉa orgio, kia ĝi povus esti apenaŭ pli senhonta. Sed Andreo, kiu atendis, ke li trovos sian kamaradon ebrian kiel porko, trovas lin nun en la akompano de sana kaj forta indiĝena knabino, kiun Manuel prenis al si ĉe la puto. La rakonto de Rosario ne estas tia, kia la rakonto de Estrellita. Ŝi ne estas plu tiom naiva, sed honesta kaj fervora knabino, kaj Manuel pensas pri tio fuĝi ĉeokaze for de sia mastro, por komenci kun ŝi pli liberan kaj pli belan vivon.

Kelkajn jarojn poste – *Estrellita* lernis intertempe en la

veturoj legi kaj skribi la hispanan lingvon- ili trafas survoje indiĝenan grupon, kiuj alportas sciigojn de la bieno Lumbojvil. Malbonaj sciigoj. La bienulo vendis la patron de Andreo al monterio. Dum nokto Andreo pripensas, kio estas farenda. Tiam li decidiĝis, kaj tiel, kiel tio ne estis alie atendebla de nekoruptita indiĝeno. Li gvidas sian karavanon rapide al la destinita loko por iri por sia patro en la monterion. Al Estrellita li diris, ke ŝi serĉu al si en urbo ĉe la bordo laŭ la fervojlinio bone pagatan laboron, por ke li povu trovi ŝin, kiam li post jaroj revenos el la monterio.

„Ne timu vin, steleto, estu kuraĝa. Eĉ se centoj de viroj kaj junuloj el la monterioj ne revenos kaj en ili estos forblovitaj kaj estos tie enfositaj – mi revenos. Mi revenos al vi, steleto mia, kaj eĉ se pro tio la mondo devus rompiĝi en pecojn.“ Kaj la steleto respondis: „Mi atendos vin, ĉiam kaj ĉiam.“

Rimarkoj

Porfirio Diaz estis dufoje prezidanto de Meksiko, de la jaro 1877 ĝis la jaro 1880 kaj de 1884 ĝis 1911. La artikolo supozeble estas verkita de B.Traven mem. (Cezar)

Enkonduko II

Kelkaj pensoj pri B.Traven

Tiu romano, tradukita de mia edzino kaj de mi, estas la dua el la mahagonciklo, jen eksterordinara romano, ĉar en tiu libro parolas al ni maturiĝinta revoluciulo, kiu mem bezonis longan vojon por atingi tian majstrecon kiel verkisto. B.Traven, la filo de la brikofaristo Feige el la nuna Pollando, fuĝis deksesjara el la hejmo.

Li fariĝis iam aktoro kaj nomis sin tiam Ret Marut. Li havis kontaktojn al ruĝaj framasonistoj, estis adoranto de Max Stirner kaj de aliaj individuaj anarkiistoj, poste li ĵetiĝis en la konsilian revolucion en Bavario. Kaj en tiu tempo li komencis jam legi verkojn de Marx kaj Engels, li tre interesiĝis ankaŭ pri la unua libro de Engels : „La situo de la laboranta klaso en Britlando“, kiu tre forte influis lin. Tion pruvas multaj partoj de „La Mortula ŝipo“, kiuj laŭteme estas ĉerpitaj el tiu libro.

Li legis la verkojn de Jack London jam en la angla, ĉar tradukoj de Jack London tiam ankoraŭ apenaŭ ekzistis.

Kiel revoluciulo kaj aktivulo de la Ruĝa Konsilia

Registaro, kiu fine fiaskiĝis, li devis fuĝi kiel serĉata ŝtatperfidulo el Germanio, li estis „sur la fuĝo pro kuloj“ kiel li mem nomis tion, „ĉar el la triopo ŝtato, registaro kaj mi, mi estas la plej forta. Tion notu!“

Kiel kotonplukisto en Meksiko li fine reaperas kaj entuziasmiĝas pri la radikalaj „Wobblies“, jen revoluciema sindikato de laboristoj en Usono kaj Meksiko, kiuj havis krom anarkiistoj, multajn marksistojn en la vicoj.

En la mahagonociklo, kiu konsistas el ses volumoj, Traven uzis ĉiujn ĉi spertojn por verki grandiozan volumaron pri la meksika revolucio. La romanoj estas fakte dokumentoj pri la antaŭhistorio kaj historio de la revolucio en Meksiko mem. Tiuj dokumentoj estas verkitaj surbaze de ekonomia analizo, kiu estis tute laŭmarksa, aŭ ni diru pli sobre laŭ la „Kapitalo I“, kiu ja tre deflankiĝas de la avangarda teorio de Marx, kiu tie tute ne ludas rolon.

Mi pensas, ke neniu anarkiema verkisto antaŭ Traven tiom bone prezentis la ekonomian pensadon de Marx. Nur Jack London jam antaŭ li provis tion. Speciale per la

verko „*People of the abyss*“: „Homoj de la abismo“.

La tamburado pri tio, ke Traven estis anarkiisto, estas ja prava, sed kiel verkisto de la mahagona ciklo li estis ankaŭ ekonomia marksisto. Ne jam en „La Mortula Ŝipo“, kiu estas efektive esence individue anarkiisma verko laŭ la ideologio de Maks Stirner.

Anarkiistoj, kiuj grumblas, se oni mencias la marksimeman flankon de Traven, komprenas Travenon nur parte. Ili subtaksas lin. Traven estis ne nur lerta disvastiganto de konataj anarkiistaj pensoj, sed ankaŭ profunda mempensanto.

Por mi li estis ankaŭ klarvida grava pensulo pri la revolucia potencialo en Latin-Ameriko, kio montriĝas nun iom post iom kiel tute ĝusta diveno.

Traven kiel sendependa pensanto, kiu apartenis al neniu partio, estas tial grava por nia tempo, ĉar ni nepre bezonas novan pensdirekton, kiun li ĉiam postulis.

La revoluciuloj en Ĉiapiro, kiuj konas la verkaron de Traven kaj uzas ties pensojn kaj ideojn eĉ en deklaroj, komprenas tion. Partiano de burokrataj komunistoj

Traven neniam estis, rilate al ili li estis akra anarkiisto.

Kaj efektive, kiun vojon ni iru nun, denove tiun de diktatoroj, tiun de senfantaziaj burokratoj, je la kioma fojo do? Ĉu ni ree iru kun partio avangarda, kiu denove sklavigos nin post la venko de la revolucio? Aŭ tiun de moralistoj laŭ la kleriga movado en Eŭropo? Ĉu ni do pluan fojon provu ŝanĝi la homojn per nura edukado sen scii ion pri la bazo de nia vivo, pri la ekonomio? Kiun vojon ni do iru? Mi pensas, ke ni iru la vojon de tiuj anarkiistoj, kiuj konsicas, ke la ekonomio estas la bazo, sed ne la celo de nia vivo. Kun Traven ni postulu mondon sur la bazo de anarkio kaj de komuneco, en kiu neniu plu regas iun alian. Jam la individua anarkiisto Max Stirner pensis en tiu direkto, kio estas ankoraŭ nun ne tre konata. Li estis individuisto, sed senhonta egoisto en la kutima senco li ne estis.

La plej stulta interpreto kaj impertinenta ŝtelisto de la ideoj de Stirner estis Nietzsche, kiu tordis ties ideojn tiom longe, ĝis fariĝis el ili la malo. La babilaĉo pri la tielnomata superhomo simple estas ridinda. Stulta estas ankaŭ la primitiva kontraŭkomunismo de Nietzsche, kiu

ne havis argumentojn kontraŭ la pensulo Marx. Rilate al Marx li estas nur absurda modofilozofo, kiu postdormis sian tempon je almenaŭ kvindek jaroj. Post Marx kaj Stirner ne plu estis ebla ludi la rolon de superhoma Nietzsche sen ridigi sin inter veramaj homoj. En la historio de la filozofio ludas la talente tre dotita verkisto Nietzsche nur la rolon de ratkaptisto, kiu kapablis kapti precipe tiujn, kiuj mem estas tro arogantaj aŭ tro blindaj por la dialektika kaj historia materiismo de Marx kaj Engels.

Sed paradoksa estas kompreneble ankaŭ komunismo, kiu asertas, ke en komunuma ordo necesas gvidantoj. Tio estas kaj restas absurda. Traven ĉiam akre kontraŭis tion. La volo ne obei laŭ li estas en la homaro multe pli forta ol la deziro regi iun. Ju pli alta la socia evoluŝtupo de la homaro estas, des malpli homoj volas esti nur sklavo de partioj aŭ de aliaj fortaj individuoj.

La estonteco, kiu kaŭras jam kiel leopardo saltoprete en la nuna mondo, la utopio pri pli bona mondo, ne estas io, kio estigendas, sed tio, kio jam delonge komenciĝis kaj moviĝas tie, kie oni permesas tion en sia kapo kaj en sia

vivo. La liberiĝo okazas ankaŭ en la kapo de individuo, kaj tiukaze, se oni ankaŭ agas laŭ tio, se oni ne volas demeti la kapon en la vestejo de iu nobla gvidanto, ĉar tiu laŭdire pli bone scias ĉion ol ni mem, oni povas krei ion, kio meritas la nomon libera socio.

Ke nia pensado kaj la sukceso de nia agado en ĉiu kazo estas ligita al certa evoluŝtupo de la homa socio kaj precipe al la aktuala ekonomia situacio, tio kompreniĝas per si mem. Sed dezirata estonteco, ne ekestas fatale per si mem pro la evoluŝtupo de socio kaj tio eĉ sen sen iuj propraj penoj; se ni ne faras ion por pli hominda estonteco, eble neniam estos pli hominda estonteco. Pri ni kaj niaj infanoj zorgi, por ni mem batali, tion ni devas mem. Se ni ne faras tion, savos nin ankaŭ neniu partiprogramo el la Orwell-mondo, en kiu ni nun pli-malpli devas vivi.

Traven verkis la mahagonociklon unuavice por la legantoj de la sindikata eldonejo *Büchergilde Gutenberg*, do kun la celo „fortigi la dorson de la proletoj“ en Germanio, sed ne nur pro tio li verkis. Traven tute ne estis naciisto aŭ adepto de falsa proletkulto. Traven estis internaciisto kaj

sennaciisto, kiu verkis la mahagonociklon por ĉiuj homoj en la mondo – kaj ĉe tio li eksplicite ne preferis la proletojn, li turnis sin al ĉiuj homoj, ankaŭ vidalvide kun la faŝismo, kiu tiam ekestis kaj triumfis en Germanio.

La okazaĵoj en Germanio rekte respeguliĝas en la tuta mahagonociklo, tial tiu ciklo legeblas ofte kiel komento de la okazaĵoj en la tiama faŝisma Germanio. Sed samtempe la mahagonociklo estas bonega lernolibro por venontaj revoluciuloj kaj por ĉiuj, kiuj ankoraŭ „ŝanceliĝas“, kiuj ankoraŭ ne trovis vojon, sed kiuj tamen jam volus scii, en kia socio ni vivas, kiun vojon ni iru en Latina-Ameriko kaj ĉie en la mondo.

La diktatoremaj komunistaj gvidantoj en Germanio perfidis Travenon per neglekto, kaj aliaj regemaj maldekstruloj ĝis nun perfidas lin (ĉar komunismaj anarkiistoj nur ĝenas ĉe la senhonta regado de homoj); ankaŭ tiuj laboristoj, kiuj volas fariĝi mezklasuloj, perfidas Traven.

Traven tamen neniam estis tute forgesita, kaj ĝuste nun la intereso pri tiu aŭtoro en Germanio kaj en aliaj landoj, precipe en Usono, ree kreskas, la tempoj ŝanĝiĝis,

revoluciuloj kiel Traven ree estas legataj pli ofte! De li mem oni povas mendi plu preskaŭ ĉiujn librojn en Germanio. Kaj „Ĉaro“, tiu majstroverko, estas unu el la plej ŝatataj libroj de Traven entute, ĉar Traven en tiu verko prezentiĝas kiel eksterordinare klarpensa batalanto por la bona afero de la indiĝenoj en Ameriko, sed ne nur por tiu. Traven celis ne pli malmulton ol la emancipiĝon de la tuta homaro.

Mi konsilas al vi, legu la libron. Mi promesas, ke vi ne enuiĝos, se vi legos ĝin. Eĉ se vi ne ĉiam konsentos al la aŭtoro, kion li mem cetere tute ne celis. Li verkis ja por tio, ke homoj mem lernu pensi kaj agi, sen mastroj aŭ dioj.

Unu el la fenomenoj pri la verko de B.Traven estas, ke legas lin tre diversaj homoj kun plezuro, el preskaŭ ĉiuj popoltavoloj de la homaro. Kiam mia kara avino pro mia entuziasmo eklegis Traven, mi estis iom mirigita pri tio, ŝi estis ja iam grandbienulino en Orienta Prusujo, ŝi havis grandan bienon kun multaj bestoj kaj kampoj, eĉ fiŝojn ŝi bredis mem en lago. Tial ŝi pli bone ol mi konis la rilatojn inter mastroj kaj servutuloj, ŝi tuj ekkomprenis,

kion Traven celas, ke li estas tute aŭtentika maldekstrula aŭtoro. Kaj ŝi tuj flaris, kun sia granda vivsperto, ke Traven ankaŭ estas tre leginda kaj kapabla aŭtoro. Mi vere ne trudis la librojn al ŝi, sed subite ili estis en ŝia bretaro, ŝia plej ŝatata libro de Traven estis „Ĉaro“.

Se vi, kara leganto, legos la verkon, vi pli bone komprenos nian entuziasmon pri tiu verkisto.

Se mi provas meti Traven por klarigoj de lia persono en kadron de certaj mondkonceptoj kaj ideoj, mi faras tion tamen bone sciante, ke Traven mem tre misfidis al ĉiuj belaj vortoj kaj voldeklaroj, li neniam asertis pri si esti marksisma anarkiisto aŭ anarkiista komunisto, aŭ kio ajn, sed li agis kiel tia! Kaj tio por li pli gravis ol senfine babilaĉi pri la ĝusta direkto aŭ la ĝustaj nomoj por maldekstrula movado. Li ne bezonis ordenojn por certigi al si, ke tio estas ĝusta, kion li faras. Traven sciis ankaŭ sen pasporto, kiu li estas. Traven havis la memkonscion, kiun bezonas vivanta revoluciulo, kiu ne lasas korupti sin de ĉiuspecaj oportunistoj, kiuj volas havi nur panerojn de la riĉuloj. Traven celis profundan ŝanĝon de la tuta socio, surbaze de revolucioj, sed finfine por la emancipiĝo de la

tuta homaro.

Tierra y libertad, Donjo & Cezar

Glosaro

Hispanaj vortoj kaj parol-turnoj (kiel oni uzas ilin en Meksiko)

aceptado = akceptite, akceptita

aguardiente = speco de brando

alacrán = skorpio

amigo = amiko

Aquí, aquí, la seda legitima de Francia y las mas barata. = Ĉi tien, ĉi tien, aŭtentika franca silko, la plej malmultekosta.

arriero = mulisto, mulpelisto

barbacoa = havas trioblan sencon. La unuaj estas rostkrado kaj rostkradaĵo, viando rostita sur krado. La alia temas pri la proceso kaj produkto kuirviandon ene de granda truo en la tero, kvazaŭ en forno.

bodega = gardejo por vendaĵoj kiel nutraĵoj, kutime ne vendejo

bueno = bone, bona

bueno, muy bueno = bone, bonege

caballeros = sinjoroj, ĝentlemanoj, kavaliroj

cabrones = virkaproj (kiel insultvorto)

cantinas = kantinoj

carcel municipal = municipa karcero

carreta = ĉaro, kutime durada

carretero = ĉaristo

celtalo = germane: Tseltale

chica = knabino

chile = akra kapsiko

cinturón rojo de lana = ruĝa lanrubando

comedor = manĝejo en domo, manĝoĉambro

comerciante = komercisto

comiteco = speco de brando, produkita en Comitán, Ĉiapaso

comiteco añejo = pli longe aĝigita en lignaj bareloj ol simpla comiteco

compañeros = kunuloj, akompanantoj, kamaradoj

cura = pastro

diablo = diablo

don = sinjoro

dulces = dolĉaĵoj

encargado = iu ajn respondeculo aŭ laborestro, zorganto

enchiladas = enĉiladoj, molaj tortiljoj kun spica saŭco, kaj kutime ankaŭ fromaĝo, koka viando, kremo, cepo ks.

feria = foiro, jarfoiro

fiesta = festo

finca = bieno

frijoles = fazeoloj

globo = kuglo, globo

gracias = dankon

gringo = fi-usonano, usonanaĉo, sed ankaŭ simple usonano

hacienda = bieno, haciendo

hijito = fileto, filĉjo

hola = he, halo

jacalito = kabaneto

Jefe Politico = politika ĉefo

Jovel = oficiale kaj hispanlingve San Cristobál, pli ofte uzate de la celtaloj kaj cociloj

lorongo = ĥorongo, lankovrilo ĉiam kun entranĉaĵo por la kapo en la mezo, uzata kiel mantelo, egalas al sudamerika „ponĉo“.

ladino = mestizo = ido de blankuloj kaj indiĝenoj, en

Ĉiapaso uzate specife por kontrasti indiĝenojn kaj ne-indiĝenojn, do ne nur mestizoj, sed ankaŭ blankuloj

La patria, tu pais propio = La patrolando, via propra lando

mayordomo = intendanto, domkortega

mastroadministristo, domisto

medio = ses centavoj

meseras = kelnerinoj, la knabinoj, kiuj alportas manĝaĵon al klientaj tabloj en restoracio, kafejo ks.

mestizoj = miksituloj kun indiĝenaj kaj blankaj gepatroj

milpa = maizejo

montería = monterio: laborkoncentrejo en la ĝangalo, kie oni dehakas kaj prilaboras permane la mahagonarbojn, por povi fortransporti ilin de tie. Tiu laboro per maŝinoj pro la altaj kostoj ne fareblas

muchacho = knabo, junulo, eŭfemisme: servisto
municipalidad = komunuma administrejo, municipo aŭ
municipio de urbo aŭ teritorio havanta relative
sendependan registaron

Orito, muchacho = Momenton, viro (amiko, kamarado, ks)
Otra copita! = Ankoraŭ plian!

parranderos = lantemuloj
patria = patrio, patrolando, hejmlando
patrono = sanktulo aŭ ĉefo
patroncito = ĉefĉjo, patroneto
peso = monunujo en Meksiko
petate = petato, specifa tipo de mato, plektaĵo el palmfolioj

Qué tal? = Kiel vi fartas?

Quién sabe! = Kiu scias!

quinto = kvin centavoj

ranchito = malgranda ranĉo, malgranda bieno

realo = dudek kvin centavoj

rebozo = tuko

Se fué! = Li venkis! Li finigas la ludon! („Se fué“ estas
malnova ortografio) Ĝi estas ludesprimo. Se la bankiero kaj
kunludantoj ludis domenon, „¡se fue!“ signifas ke unu el la
ludantoj metis sur la tablon sian lastan ludmarkon; do, ke iu
gajnis la ludon.

señor = sinjoro

señora = sinjorino

sierra = montaro, montĉeno

siete y medio = sep kaj duono (kartludo)

sinvergüenzas = impertinentaj kanajloj

tan flojos = tiaj malaktivaj dormemaj pigruloj

Tengo hambre, caridad, por Dios, me muero! = Mi malsatas,
donu almozon, je la amo de dio, mi mortas!

tepezcuintle = speco de sovaĝa kuniklo en Meksiko,
Kostariko ks.

tienda = vendejo, butikoj

tienda de abarrotes = nutraĵvendejon kaj magazeno por ĉiuj
specoj de varoj

tilma = tilmo estas kruda kotona mantelo uzata de
indiĝenaj meksikaj kampuloj, nodita sur unu ŝultro.

tortillas = tortiljoj, rostitaj maizoflanoj el muelitaj kaj
kaĉigitaj maizograjnoj, maizaj kukoj, maizaj panetoj

vaca = bovino

Wanamaker Department Store = grandmagazeno

Dankoj

Ni tre dankas al la meksika samideano Juan Jacobo Schmitter, ke li afable respondis iom post iom ĉiujn niajn demandojn pri meksikaj aferoj kaj aĵoj, kaj, ke li helpis ĝuste traduki hispanajn vortojn kaj parolturnojn, kiuj deflankiĝas en Meksiko de la kutima hispana uzado.

Ni tre dankas al la hungaro Blazio Vaha, kiu donis multajn lingvajn konsilojn.

Kaj ni tre dankas al la ĉeĥa samideano Vladimir Türk, kiu lingve kontrolis la tutan libron. (Dorothea & Hans-Georg Kaiser)